# LA TOTALA KOŜMARO

## LA RIBELO EN LA KC SOBIBORO, 14a de OKTOBRO 1943

Memore pri la liberigo de la naziaj koncentrejoj antaŭ la militfino antaŭ 75 jaroj en 1945, kaj aparte pri la ribelo en la nazia ekstermejo Sobiboro en oktobro 1943 en Pollando

*Memore pri Robert Kuwałek (1966-2014)*[1]

**De Andreas Künzli (Svislando)**

### Enkonduko

La 1an de septembro 1939 la germana armeo atakis, invadis kaj okupis Pollandon. Kvankam la (malforta) pola armeo iom defendis sin, ĝi kapitulacis du semajnojn post la germana atako. Samtempe la sovetia armeo okupis la orientan flankon de Pollando kaj do dividis ĝin kune kun Germanio, por la kvara fojo, post la fatalaj tranĉoj en la 18a jarcento. La germanoj do kreis la kondiĉojn por la generado de nova „vivspaco" por la germana popolo, je la kostoj de la poloj kaj judoj, kiuj devis estis forpelitaj de okcidenta Pollando al la nove kreita Ĝenerala Gubernio en sudorienta Pollando, post kiam la plano sendi la judojn al Madagaskaro fiaskis.

### Genezo de la kontraŭjuda amasmurdo (holokaŭsto)

Ekzistas neniu dubo, ke la ekstermado de la juda popolo en Eŭropo formis integran parton de la programo de la germanaj nacisocialistoj. Sed kiel, kial kaj kiam la nazioj venis al la definitiva decido *ordoni* ne nur la forigon de la judoj de la Germana Regno, sed ankaŭ la mortigon de ili ĉiuj en Eŭropo, estas diskutata kaj kontestata en la historiografio. Ne klaras, ĉu ĉi tiu decido estis la rekta rezulto de la radikala antisemitisma „programo" de Hitler, kiel supozas kelkaj historiistoj, aŭ ĉu ĝi estis spontana ago inter la nacisocialistoj, ĉe kiuj ekzistis rivalantaj pozicioj. Ankaŭ ne estas klare, kiam kaj entute ĉu Hitlero mem donis iun ordonon por la holokaŭsto.

Fakte, skribaj dokumentoj, kiuj enhavus tian ordonon por elimini la judan popolon en Eŭropo, ne ekzistis, aŭ ne estis trovitaj, ĉar la spuroj por tiaj plano kaj decido certe devis esti forviŝitaj de la iniciatintoj. Sed estas konate, ke en oktobro 1939 Hitler ordonis la t.n. eŭtanazian „operacon T4", dum kiu la ontaj ekstermantoj de la judoj povis ekzameni la taŭgecon de sia diabla laboro, utiligante gason por mortigi korpajn kriplulojn, mensajn handikapulojn kaj socie nedezirindajn elementojn. Post protestoj flanke de la eklezioj oni (t.e. Hitler) ordonis haltigi tiun operacon en aŭgusto 1941, sed postulis daŭrigi la mortigon de malsanuloj en la okupataj landoj.

Anstataŭ eksplicita skriba ordono de Hitler fizike likvidi la judojn, ekzistis plej diversaj aludoj kaj deklaroj de la germana diktatoro, kiuj evidentigis, ke la judoj devis malaperi el Eŭropo. Sed la publikaj paroladoj de Hitler pri la ekstermado de la judoj estis nebulaj kaj povis esti interpretataj laŭ diversaj manieroj kiel „la volo de la Gvidanto". Nature, la fifama programa aŭtobiografio de Hitler, „Mia batalo", kiun lia eldonejo publikigis en la 1925, estas plenplena de akra polemiko kontraŭ la judoj. Dum la 20aj jaroj en Munkeno, kie li fariĝis politikisto sub la influo de la politikaj eventoj kaj de diversaj antisemitismaj kaj rasismaj ideologoj, fondante kaj maturigante sian movadon, Hitler akre polemikadis

[1] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Robert_Kuwałek.

kontraŭ la judoj, kiuj laŭ li estis kulpaj por la ekesto kaj disvastigo de la rusa bolŝevismo, kiu minacis Germanion, kaj kiuj estis la reprezentantoj de la parazitisma kapitalismo.[2] La antisemitisma kulmino de la nazioj dume estis atingita, kiam la 30an de januaro 1939 Hitler profetis en la germana parlamento al la „internacia financjudaro“, sub ŝtorma aplaŭdo de la ĉeestantoj, la „neniigon de la juda raso en Eŭropo en la kazo de nova mondmilito“. Sed laŭ kiu maniero aŭ metodo tiu neniigu okazu li ne klarigis. En 1941 kaj 1942 li kvarfoje referencis al tiu parolado kaj anoncis la efektivigon de la plano, kiam li diris, ke „la judoj iam ridis pri mia profetaĵo, sed hodiaŭ ili jam ne plu ridas pri ĝi“. Ĉiuj tiuj informoj kondukis al la kredo kaj konvinkiĝo ĉe la popoloj, ke Hitler ordonis neniigi kaj ekstermi la judojn.

Kiam ekde februaro 1941 estis planata la milito kontraŭ Sovetunio, oni diskutis pri amasmurdoj kontraŭ la popolo por „likvidi la inteligencion de la „juda bolŝevismo“, kio estis la favorata termino de Hitler. Kiel en Pollando, ankaŭ en aliaj landoj devis esti unue likviditaj la elitoj. La t.n. dekreto „Pri la apliko de la milita jurisdikcio en la regiono de Barbarossa“ (t.n. „Barbarossa-dekreto“) de la ĉefkomandejo de la germana armeo de la 13a de majo 1941 permesis al la soldatoj de la germana armeo senprokraste mortigi civilulojn, kiuj estis suspektataj pro kontraŭstaro, sen timi jurajn sekvojn. Krom tio ekzistis la t.n. ordono de la 6a de junio 1941, laŭ kiu arestitaj sovetiaj oficiroj de la Ruĝa Armeo ne devis esti traktataj kiel militkaptitoj, sed povis esti mortpafitaj sen proceso. Ligita kun tiuj ordonoj estis la likvido de milionoj de sovetiaj civiluloj pere de malsato. La saman krimon jam Stalin aranĝis en la 1932-33aj jaroj en Ukrainio kadre de la „Holodomoro“, kiu estas konsiderata kiel genocido kontraŭ la popolo de Ukrainio (inter kiuj certe troviĝis ankaŭ multaj judoj).

En majo 1941 Reinhardt Heydrich, ĉefo de RSHA,[3] starigis kaj trejnigis, surbaze de ordono de Hitler, moveblajn „operacgrupojn de la Sekureca Polico kaj de la SD“. Ilia tasko estis kontraŭbatali partizanojn post la linio de la antaŭenmarŝanta armeo. Tiuj senprecedencaj masakroj, kiujn tiuj grupoj aranĝis, kaŭzis estimeble 600 mil ĝis 1,5 milionoj da mortviktimoj en tuta orienta Eŭropo. Do, la libera mortigo de homoj fariĝis kvazaŭ modo, ne konis limojn kaj nature trafis ankaŭ la judojn. Heydrich kaj lia ĉefo, SS-Reiĥgvidanto Heinrich Himmler, laŭvorte interpretis la „ideon“ de Hitler pri la „neniigo“ de la judoj, konsiderante ĝin kiel historie gravan mision, kiu estis puŝota kiel kor-afero de Hitler dum la jaro 1941 por inciti pogromojn kontraŭ judoj. Gravegan rolon ludis ankaŭ Hermann Göring, ĉefo de la aviadila armeo kaj ministro pri ekonomio. La 31an de julio 1941 li donis la taskon al Heydrich starigi „ĝeneralan projekton“ por la „ĝenerala solvo de la juda demando“. La teksto estis verkita en RSHA kaj submetita al Göring por subskribo, do ĝi oficialigis jam okazantajn operacojn. Hitler volis esti informata pri la rezultoj de la procezo. La 15an de aŭgusto unu el la raportoj de la „operacgrupoj“ unuafoje listigis „judojn, judinojn kaj judajn infanojn“ kiel viktimojn de la murdo. Fine de aŭgusto, la operacgrupo D raportis, ke ĝia operacregiono estas „libera de judoj“, kio signifis, ke la plimulto de la judoj en tiuj regionoj estis likviditaj. La „Ordono de la Gvidanto mortpafi ĉiujn judojn“ ricevis leĝan povon kaj propran dinamikon, en kiu la nazioj perdis ĉiujn hezitojn kaj moralan skrupulojn. Inter la nazioj komenciĝis lukto por kvotoj – kiu ordonis mortigi pli multajn judojn, tiu estis granda heroo kaj povis kalkuli pri laŭdado en Berlino kaj kariero-perspektivo. La 17an de septembro 1941 Hitler cedis la insistadon de Alfred Rosenberg kaj Joseph Goebbels, du aliaj gvidaj nazioj, kiuj respondecis pri ideologio kaj propagando, transporti judojn el Germanio, Bohemio kaj Moravio al la „Oriento“. La 2an de oktobro Himmler proponis al Hitler translokadi judojn el Germanio kaj Bohemio-Moravio al la getoj en Riga, Reval und Minsk. Pli kaj pli da judoj do finiĝis en Riga, kie ili estis senkompate mortpafitaj, plej amase en la „sanga dimanĉo“ de la 30a de novembro 1941“. La 10an de oktobro Heydrich konfirmis la celon de Hitler fari la Germanan Regnon „sen judoj“ ĝis la jarfino. En la sama monato oni malpermesis al la judoj forlasi la Germanan Regnon. Do, la judoj, kiuj ne plu povis elmigri al aliaj landoj, estis

[2] Pri ĉi tiu periodo vd. Reuth, Ralf Georg: Hitlers Judenhass. Klischee und Wirklichkeit. Piper Munkeno/Zuriko 2009.

[3] Reichssicherheitshauptamt (RSHA). Tiu Ĉefa Oficejo por la Sekureco de la Germana Regno estis fondita en septembro 1939 de Reiĥgvidanto SS Heinrich Himmler, SS Reiĥgvidanto kaj Ĉefo de la Germana Polico, per unuigo de Sipo (Sekureca Policano) kaj SD (Sekureca Servo). La unua ĉefo de RSHA estis Reinhard Heydrich. Post lia mortigo en junio 1942 ĝia gvidanto estis Himmler mem, kaj ekde 1943 ĝin estris Ernst Kaltenbrunner. La RSHA plenumis ĉiujn taskojn de la sekureco en la Germana Regno, inkluzive de la persekutado de „politike nefidindaj“ homoj. La SS Einsatzgruppen entreprenis batalojn de „ĉiuj elementoj malamikaj al la Regno“ en la okupataj lokoj kaj aranĝis neimegblajn masakrojn inter la civila loĝantaro, precipe en Pollando kaj poste en Sovetunio, tio signifis laŭplanajn masakrojn de ŝtataj kaj kulturaj reprezentantoj de ĉi tiuj landoj, inkluzive de katolikaj pastroj, komunismaj funkciuloj, romaoj (ciganoj) kaj precipe judoj. En la „Sekcio IV B 4“ SS-Obersturmbanngvidanto Adolf Eichmann organizis la burokratian parton de la „fina solvo al la juda demando“, kunordigante la deportadon de la eŭropaj judoj en la ekstermejojn de la Ĝenerala Gubernio.

blokitaj en Germanio kaj Eŭropo. Laŭ iuj historiistoj povas esti, ke tiu evoluo estis la definitiva dato, kiam Hitler decidis praktike lanĉi la murdon kontraŭ la judoj. Kiel kialoj de tiu decido ekzistas diversaj konsideroj, kiujn ni ne detale traktos ĉi tie. En la historiografio oni supozas iun kongruon de la decido por la amasmurdo kontraŭ la judoj kun la agresmilito kontraŭ Sovetunio, ĉar Hitler ĉiam parolis pri la „juda bolŝevismo", kiu staris en la centro de tiu milito. Estas do verŝajne, ke la agresmilito kontraŭ Sovetunio akcelis la murdon kontraŭ la sovetia kaj la cetera eŭropa judaro. Sed povas esti, ke ankaŭ la militdeklaro de Germanio al Usono, kiu sekvis la 12an de decembro, ludis rolon, ĉar tiam la milito alprenis internacian dimension. La elpaŝoj de Hitler fariĝis pli kaj pli fanatikaj kaj ekscesaj, kiam li parolis pri la judoj kiel „monda malamiko", kies „elŝaltado" estas unuaranga. La 21an de oktobro li deklaris: „Se ni ekstermas tiun peston, tiel ni plenumas agon por la homaro, kies signifon niaj viroj ankoraŭ ne povas imagi". La 25an de oktobro li rememorigis la naziajn pintulojn pri sia „profetaĵo" de la 30a de januaro 1939 per la vortoj: „Estas bone, se la teruro anticipas nin, ke ni ekstermos la judojn".

Kiam en januaro 1942 okazis en Berlino-Wannsee la fifama sekreta konferenco de 15 ĉefaj reprezentantoj de gvidaj ministeriaj instancoj sub la gvido de Heydrich en la ĉeesto de Eichmann, kiu respondecis pri la protokolo, la gvidaj SS-funkciuloj volis certiĝi, ke ĉiuj koncernitaj ŝtataj burokratiaj instancoj glate kunlaboros kaj ne montros dubojn aŭ reziston kontraŭ la diabla plano likvidi 11 milionojn da judoj, kiuj vivis en diversaj landoj de Eŭropo. Fakte, neniu de la ĉeestantaj funkciuloj protestis, ankaŭ kiam ili jam sciis, ke la amasmurdo kontraŭ la judoj jam komenciĝis, ekzemple per la unua masakro en novembro 1941 en Riga, Latvio, kiu estis aranĝita de Rudolf Lange, kiu ĉeestis la konferencon. Ankaŭ neniu kontraŭstaro okazis kiam alia funkciulo, Josef Bühler, ŝtata sekretario en la Ĝenerala Gubernio, esprimis sian deziron komenci la „finan solvon" sur sia teritorio per la klarigo, ke la judoj estas danĝeraj pro siaj diversaj malsanoj. Poste Josef Goebbels, la ĉefo de la propagando, kiu estis informita pri la okazaĵoj, notos en sia taglibro, ke en la Ĝenerala Gubernio oni aplikas „sufiĉe barbaran kaj ne pli proksime priskribeblan metodon", tiel ke „de la judoj ne restas multo". La konferenco de Wannsee do legitimis kaj rajtigis la amasmurdon de la Germana Regno kontraŭ la judoj, tiel ke al tiu plano neniu obstaklo plu restis.[4]

Do, la decido por la murdo de la judoj de Eŭropo ne konsistis en unusola ordono, sed estis longa proceso de la radikaliĝintaj nazioj ĉirkaŭ Hitler, kiu maturiĝis dum la jaroj 1941 kaj 1942 kaj plene efektiviĝis en ĉi tiu kaj la posta jaro.[5]

## Pollando, Sobiboro

Anstataŭ do en Madagaskaro, en Nisko ĉe la rivero San en Pollando devis esti starigita rezervejo por 400 mil judoj, kiu signifis fermitan zonon, kie devis esti instalita „aŭtonoma juda ŝtato". Laŭ Adolf Eichmann, respondeculo de RSHA pri la planado de la deportado de la judoj al oriento per trajnoj, tie Hitler promesis al la judoj novan patrujon. Ĉar la fina celo de la nazioj tamen estis forigi la judojn de Eŭropo, la lando ĉirkaŭ Lublino devis servi kiel provizora loko por koncentri ilin kaj konduki la problemon al la „fina solvo de la juda demando", kiel la vizio estis oficiale nomata de la nazioj.

La Ĝenerala Gubernio, situinta sur pola tero[6] kaj estrata de Hans Frank,[7] devis fariĝi integra parto de la Germana Regno, dum Pollando devis malaperi de la eŭropa mapo por ĉiam. La ĉefaj gvidantoj de la „fina solvo de la juda demando", SS-Reiĥgvidanto Heinrich Himmler kaj Reinhardt Heydrich, ĉefo de RSHA, estis taskitaj de Hitler antaŭenpuŝi la koncernan projekton en la „oriento". Intertempe en Pollando estiĝis la fifamaj judaj getoj en Lodzo, Varsovio kaj aliaj urboj, kie centmiloj da judoj vivis enpuŝitaj sub mizeraj kondiĉoj. Ĉar tiuj getoj estis plenplenaj de homoj, la nazioj komencis uzi gason por mortigi unuopajn grupojn de judoj. La unuaj tiaj eksperimentoj okazis en decembro 1941 en Chełmno (germane Kulmhof). Kun la klarigo, ke la judoj iros labori, oni veturigis ilin per kamionoj al tiu urbo en nordcentra Pollando, kie ili devis senvestiĝi kaj iri al la „banejo" en iu vagono, en kiu oni gasmortigis ilin dum la veturo. Ĉirkaŭ 6 kilometrojn norde de Chełmno oni enterigis ilin en amastombejoj apud arbaro. Ĉar tiaj gasvagonoj povis akcepti nur 50-70 homojn kaj la proceduro

---

[4] Informojn pri la konferenco de Wannsee vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Wannseekonferenz.
[5] Lau https://de.wikipedia.org/wiki/Holocaust#Entschlussbildung.
[6] Mapon vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĝenerala_Gubernio.
[7] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Hans_Frank.

montriĝis nepraktika kaj tro malrapida, oni pripensis kiel ampleksigi la kapacitojn por mortigi pli rapide pli multajn judojn kaj venis al mirindaj solvoj. Do, la decido mortigi la judojn jam estis prenita.

Pollando sendube prezentis fekundan teron por antisemitismaj tumultoj kaj komplicecoj kaj taŭgajn kondiĉojn por realigi la holokaŭston, por tiel diri. De jarcentoj judoj loĝis en Pollando, kie la etnaj poloj evoluigis ambiguan rilaton al ili. En la 19a kaj 20a jarcentoj la agresema pola antisemitismo atingis sian kulminon, montrante diversajn formojn.[8] Kvankam certe ankaŭ la tolero al la judoj havis tradicion en Pollando, la pola antisemitismo ludis fatalan rolon dum la holokaŭsto. Por nomi unu faman kaj gravan ekzemplo de kontraŭjuda esprimo, la *masakro de Jedwabne de la 10a de julio 1941* (!) estis pogromo de polaj civitanoj de Jedwabne kaj ĉirkaŭa regiono kontraŭ judaj loĝantoj de la urbeto en nordorienta Pollando, en kiu almenaŭ 340 homoj estis murditaj. Ĝi okazis dum la okupacio de Jedwabne fare de la germana armeo kaj estas konsiderata kiel komuna krimo de grupo de polaj loĝantoj kaj la germanaj okupaciaj trupoj.[9] La *pogromo de Kielce de la 4a de julio 1946*, en kiu pli ol 40 polaj judoj estis murditaj kaj pliaj 80 vunditaj, estis antisemitisma aranĝo, kiu okazis tuj post la militfino. Kvankam en siaj dimensioj multe pli modestaj, Jedwabne kaj Kielce markis du punktojn ĉe la komenco kaj fino, inter kiuj en Pollando okazis la holokaŭsto, kiu kostis la vivon de ĉirkaŭ 3 milionoj da polaj judoj, kiuj signifis la duonon de 6 milionoj da polaj civitanoj, kiuj malaperis dum la dua mondmilito. La poloj bone sciis, ke en ilia lando okazas amasmurdo al la eŭropaj judoj. Granda parto de la pola popolo, kiu estis naciisme blindigita kaj fanatike katolika, silentis aŭ verŝajne eĉ aprobis ĝin, aŭ restis indiferenta al ĝi, ĉar helpi al la judoj estis danĝere kaj ne dezirate. Cirkulis la cinika diraĵo: „Ni ĝojas, ke la germanoj plenumas la malpuran laboron“. En simila psikologia stato troviĝis parto de la ukraina popolo, kiu disponigis parton de la gardistoj de la naziaj koncentrejoj, kies radikala juda fobio esence subtenis la *genocidon* kontraŭ la judoj,[10] kiu estis ankaŭ apogita de multaj litovoj. Ĉu eblas kulpigi la tutan nacion. Ĉe la ĉefaj protagonistoj kaj respondeculoj de la krimoj probable temis esence pri naciistoj kaj antisemitoj, dum la ĝenerala amaso ´pasive´ partoprenis en la genocido, forpuŝante la problemojn laŭ la moto „ni scias nenion“.[11] Tiuj tri popoloj – poloj, ukrainoj kaj litovoj – montris la plej grandan intereson kaj fortan pretecon forigi la judojn de siaj landaj teritorioj kaj tiucele kunlabori kun la germanoj.[12] Ankaŭ la oficiala katolika eklezio de papo Pio XII. en Pollando kaj Litovio ludis malĝojigan rolon. Nature ekzistis ankaŭ bonaj homoj, kiuj kompatis la judojn kaj volis helpi al ili, precipe inter poloj, ukrainoj kaj litovoj, sed tiuj estis raraj escepoj de civilaj kuraĝuloj.[13] Tiuj personoj certe ne helpis al la judoj kiel poloj, ukrainoj aŭ litovoj, sed kiel homoj.

Meze de februaro 1942 la unuaj judoj el Supra Silezio estis gasmortigitaj en Aŭŝvico. Tie en aprilo 1940 Himmler ordonis la konstruadon de koncentrejo por malliberigi politikajn aktivulojn (ĉefe polojn), militkaptitojn (sovetianojn), judojn, ciganojn k.a. „parazitojn“ kaj malamikojn de la Germana Regno, kiuj devis esti ekstermitaj. Paralele la nazioj komencis konstrui novajn koncentrejojn por judoj en Bełżec, Sobiboro kaj Treblinka en la orienta parto de la Ĝenerala Gubernio tre proksime al la german-sovetia limo ĉe la rivero Bug. La ekstermejo en Bełżec ekfunkciis jam du monatojn post la Wannsee-konferenco, la konstruado de la koncentrejoj en Sobiboro kaj Treblinka sekvis iom poste. La konstruado de tiuj koncentrejoj, fakte neniigejoj, likvidejoj aŭ ekstermedjoj, efektivigita kadre de la „operaco Reinhardt“,[14] kiu estis gvidata de la aŭstra nazio Odilo Globocnik, eksestro de la NS-distrikto Vieno, havis la celon sistemece kaj amase detrui la judan popolon de Eŭropo. Kiel ege fanatika, korupta kaj intrigema faŝisto li ricevis persone la ordonon de Himmler en oktobro 1941 prepari la „finan solvon de la juda demando“. Alia koncentrejo en la regiono, Majdanek ĉe Lublino, estis aparte konstruata ekster la „operaco Reinhardt“. Tie estis ´kolektataj´ amaso da laborjudoj el diversaj getoj de Pollando. Krom

---

[8] Vd. https://www.bpb.de/politik/extremismus/antisemitismus/308451/antisemitismus-in-polen.
[9] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Massaker_von_Jedwabne. .
[1010] La antisemitismo en Ukrainio havis longan tradicion: Inter decembro 1918 kaj aŭgusto 1919 „blankuloj“ kaj ukrainaj naciistoj mortigis cent mil judojn kadre de la t.n. „kontraŭrevoluio“, tiel ke la londona Jewish Chroncile parolis en majo 1919 pri „holokaŭsto“.
[11] Ĉi tiu sinteno estis karakteriza por la homoj en Germanio mem.
[12] Vd. https://www.uni-augsburg.de/de/fakultaet/philhist/professuren/kunst-und-kulturgeschichte/europaische-ethnologie-volkskunde/exkursionen/ukraine-lemberg-czernowitz/der-holocaust-der-ukraine, https://de.wikipedia.org/wiki/Holocaust_in_Litauen#Kollaboration.
[13] Vd. la liston de la „Justuloj inter la nacioj“ de Jad Vaŝem (https://de.wikipedia.org/wiki/Gerechter_unter_den_Völkern).
[14] De tempo al tempo oni povas renkonti ankaŭ la formojn Reinhard aŭ Reinhart, sed la ĝusta formo estas Reinhardt.

tiuj koncentrejoj ekzistis similaj ´tendaroj´ en Trawniki,[15] Poniatowa,[16] Dorohucza,[17] Osowa[18] kaj Radom. En Trawniki estis trejnitaj centoj da sovetiaj militkaptitoj, plejparte ukrainaj, sed ankaŭ estonoj, latvoj kaj litovoj, kartveloj kaj armenoj, kiuj rekrutiĝis en la koncentrejoj por militkaptitoj en Chełm, Rovno kaj Brest-Litovsk kiel „libervolaj“ gardistoj en Bełżec, Sobiboro kaj Treblinka. Tiuj senskrupulaj lakeoj de la nazioj mem malamegis la germanojn, sed pretis plenumi ĉiujn ajn malpurajn servojn ordonitajn de ili. Da ili ekzistis pluraj centoj, kiuj estis disdividitaj laŭ la diversaj naziaj neniigejoj kaj aliloke, kie ili devis gardi la instalaĵojn kaj malliberulojn. La plej konata el ili nomiĝis Ivan (John) Demjanjuk, kiu famiĝis pro la juraj procesoj lanĉitaj kontraŭ li en Israelo en la 80-aj jaroj kaj denove en Usono kaj Germanio en la 2000-aj jaroj. Alia parto de la „personaro“ de la koncentrejoj konsistis el t.n. laborjudoj, kiuj ne estis tuj senditaj en la gasĉambrojn por esti likviditaj, sed estis selektitaj post sia alveno en la koncentrejoj por plenumi diversajn taskojn kaj laborojn en la koncentrejo. Nature, sennombraj „laborjudoj“ pereis, ĉar la laboro estis tro malfacila por ili aŭ ili malsaniĝis kaj estis likviditaj en la gasĉambroj, mortpafitaj aŭ ricevis venenajn injekciojn de „kuracistoj“, kiuj laboris en la koncentrejoj, precipe en Aŭŝvico.[19] Multaj ankaŭ mortigis sin mem, ĉar ili ne plu eltenis la psikan kaj fizikan streson. Inter ili postvivis la militon kelkcentoj aŭ kelkdekoj, de kiuj kelkaj povis rakonti al la homaro, kio okazis en tiuj inferaj lokoj de la amasmurdoj.

La germana milito kontraŭ Sovetunio, kiu komenciĝis en junio 1941, malbridis la sovaĝan mortigadon de la judoj kaj aliaj malamikoj de la Germana Rego en la orientaj teritorioj, precipe en Litovio, Belorusio kaj Ukrainio, kie la diversaj operacaj trupoj mortigis ĉ. 1,3 milionoj da homoj. La plej granda amasbuĉa operaco okazis en septembro 1941 en Babi Jar apud Kievo, kie en kelkaj tagoj estis mortigitaj preskaŭ 34 mil homoj, ĉefe judaj viroj, virinoj kaj infanoj.

Ĉiuj tri koncentrejoj de la „operaco Reinhardt“ – Bełżec, Sobiboro kaj Treblinka – troviĝis en sufiĉe flankaj kaj izolitaj anguloj, kie la loka publiko ne havis aliron por rigardi kio tie okazas. Ili estis bone kaŝitaj, praktike nekonataj kaj fakte troviĝis sufiĉe fore en la „oriento“, al kiu la deportotaj judoj el Germanio, Nederlando kaj Francio devis veturi por „labori“, kiel a nazioj asertis. La judoj ne sciis, nek komprenis kaj ne povis imagi, kien ili veturas kaj kio atendos ilin. La ĉefaj kondiĉoj, kiujn tiuj lokoj devis plenumi, kaj la kernaj infrastrukturaj eroj, kiujn ili devis havi, estis: ili devis troviĝi apud fervoja linio, por la alvenantaj viktimoj ili devis fari sendanĝeran impreson, ili devis havi sufiĉe grandajn placojn por senvestigi la homojn kaj kolekti iliajn vestaĵojn kaj havaĵojn, taŭgan lokon por starigi gasĉambrojn kaj vastan terenon por enterigi la kadavrojn. Ĉar Bełżec montriĝis tro malgranda por ´digesti´ la kapaciton de mortigotaj judoj kaj havis aliajn praktikajn malavantaĝojn, en aŭtuno 1941 komenciĝis la konstruado de la koncentrejo en Sobiboro, sub la gvido de Richard Thomalla. Ĉi tiu loko situis inter la polaj urboj Chełm kaj Włodawa, dum la vilaĝo Sobiboro mem troviĝis 6 kilometrojn for de la koncentrejo, kiu estis ligita kun trajnreloj kaj stacidomo, kie trajnoj eĉ haltis laŭ oficiala horaro. En tiu stacidomo ekzistis tri paralelaj reloj, kie la trajnoj povis preterpasi unu la alian. Kaj en Bełżec kaj en Sobiboro kunlaboris, aŭ devis kunlabori, ankaŭ parto de la loka popolo, kvankam la projekto devis resti tenita strikte sekrete. Fuĝi el tia loko estis tre malfacile kaj en la praktiko sensenca. La loko, kie la koncentrejo Sobiboro estis starigita, troviĝis en densa arbaro kaj estis ĉirkaŭata de larĝaj profundaj marĉoj, tiel ke diversaj problemoj prokrastis la rapidan konstruadon. Do, oni povas diri, ke per Bełżec kaj Sobiboro la germanoj faris maltaŭgan elekton, kvankam en tiuj lokoj ili povis mortigi sufiĉe multajn homojn sen esti rimarkate de iu ajn. Unu el la raraj viktimoj, kiuj estis en Bełżec kaj Sobiboro kaj postvivis la militon, estis la pola judo Abraham Margulies (1921-1984). Li estis deportita el la urbo Zamość (kiu devis esti nomata Himmlerstadt). Al la germana personaro de la koncentrejoj de la „operaco Reinhardt“ apartenis kompetentaj funkciuloj, kiuj jam kolektis spertojn pro la gvidado de la eŭtanazia „operaco T4“, kiu kaŭzis 70 mil viktimojn. Unu el la viroj, kiuj estis elektitaj por servi en Sobiboro, estis Karl Frenzel, iama funkciulo de tiu eŭtanazia „programo“. Kun kune liaj kamaradoj Bauch, Bauer, Bolender, Floss, Gomerski, Grömer, Ittner, Michel, Schütt, Steubl, Vallaster kaj aliaj li estis vokita fine de marto aŭ komence de aprilo 1942 de Globoĉnik al Lublino, kie ili devis subskribi devigon kiel

[15] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/SS-Ausbildungs-_und_Arbeitslager_Trawniki, http://www.deathcamps.org/occupation/trawniki_de.html.
[16] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Lager_Poniatowa.
[17] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/SS-Arbeitslager_Dorohucza.
[18] Vd. http://www.deathcamps.org/sobibor/labourcamps_de.html.
[19] Pri tio vd. ekz. Hermann Langbein, Menschen in Auschwitz, ekde paĝo 50.

responsuloj por la konstruado de la tri ĉefaj koncentrejoj en la regiono. Ilia rekta ĉefo fariĝis Franz Stangl, kiu estis aŭstra polica komisaro, kiu fariĝis la komandanto de Sobiboro kaj Treblinka. Post kiam en aprilo 1942 estis faritaj kelkaj „provaj“ gasumoj kaj la trajnoj alvenis ekde la 3a de majo, la koncentrejo de Sobiboro povis esti oficiale malfermita la 22an de julio 1942. Alia grava funkciulo nomiĝis Christian Wirth, policisto el Stuttgarto, kiu estis la unua komandanto de Bełżec kaj poste fariĝis inspektoro de ĉiuj tri ekstermejoj. En septembro nova komandanto de Sobiboro fariĝis Franz Reichleitner (ĝis oktobro 1943), sed ĝia reala gvidanto estis Gustav Wagner, lia anstataŭanto, kiu estis nomata ankaŭ „buĉisto“, „mortanĝelo“ aŭ „lupeto“ de Sobiboro.

La koncentrejo Sobiboro, kiu estis 660 x 440 metrojn, t.e. komence 3 kaj fine 12 hektarojn granda, konsistis el 3, fine 4 partoj plus la t.n. antaŭlagro. La tuta zono de la koncentrejo estis ĉirkaŭata de triobla ŝtala pikdrato, kiu estis 2,5- aŭ pli ol 3 metrojn altaj por eviti fuĝadon kaj enrigardon en la koncentrejon.[20] Parto de tiuj internaj aŭ eksteraj dratoj estis elektraj. La plej ekstera drato estis ĉirkaŭvolvita per plantaĵoj por enviti rigardon en la internon de la koncentrejo. Inter la du eksteraj dratoj troviĝis pado por patrolado. Kelkaj konstruajoj ekzistis jam antaŭ la konstruado de la koncentrejo: la postoficejo vid-al-vide de la ramplo de la stacidomo, kiu estis transformita al la vilao de la komandanto (kaj nomata „hirunda nesto“), la forstista domo, kiu ricevis la funkcion de administrejo, kaj tre malgranda, ĉirkaŭ 16 kvadratmetrojn granda katolika preĝejo el ligno.

Laŭlonge de la fervoja linio tamen estis kelkaj punktoj, tra kiuj eblis vidi la internon de la koncentrejo, ekzemple tra la fenestro de la trajno. Tie oni konstruis altan lignan barilon por malebligi al preterveturantaj pasaĝerojn enrigardi la koncentrejon. Pri la koncentrejo praktike ne ekzistas fotoj, ĉar fotadi ĝin estis strikte malpermesate al ĉiuj ĝiaj loĝantoj kaj ´vizitantoj´. En junio 1943 oni aranĝis ĉirkaŭ parto de la koncentrejo 15 metrojn larĝan strion kun minoj por eviti, ke malliberuloj povu fuĝi aŭ partizanoj povu ataki la koncentrejon. Ŝildoj avertis pri tio kun la surskribo „atentu minojn!“ La koncentrejo havis du pordojn: unu grandan ĉefan pordegon kaj unu apudan pordon.

Sekvas priskribo de la unuopaj partoj (lagroj) en la koncentrejo.

La *antaŭlagro* ampleksis la du pordojn, la apudan relon de la stacidomo kaj la malŝarĝa ramplo, kie la viktimoj devis forlasi la trajnon. Tie staris ankaŭ la vilao de la komdandanto, kiu portis la nomon „patrujo de dio“, la gardejo kaj la armila deponejo. Krom tio tie troviĝis la loĝejoj de la SS-funkciuloj, la garaĝo, la kazino kun la manĝejo, same la barakoj de la ukrainaj gardistoj, kiuj portis nigrajn uniformojn.

La najbara *lagro I*, kiu estis separita de la antaŭlagro per aparta ŝtaldratbarilo kaj profunda fosaĵo kaj kiu estis alirebla nur tra unusola enirejo flanke de la antaŭlagro, ampleksis la barakojn de la laborejoj kaj loĝejoj de la laborjudoj, la kuirejon por la malliberuloj kaj enhavis la placon de la apelo. La dormejoj konsistis el trietagaj litaroj – ĉiu malliberulo havis ĉirkaŭ 3,5 kvadratmetrojn je sia dispono. La virinoj dormis en aparta barako. En la lagro I, kie vivis ĉirkaŭ 50 laborjudoj, troviĝis plej diversaj metiejoj – por ŝuistoj, ĉarpentistoj, lignaĵistoj, juvelistoj, tajloroj, riparistoj de veturiloj kaj aliaj vartistoj. Tiuj metiistoj, kiuj estis selektitaj ĉe la alveno en la stacidomo, havis la taskon produkti plej diversajn luksaĵojn – meblojn, ŝuojn, vestaĵojn, ringojn kaj aliajn oraĵojn por la SS-personaro. La plej fifama ĉefo de la lagro I estis SS-Oberschargvidanto Karl Frenzel.

La *lagro II* estis pli granda kaj inkluzivis diversajn esencajn instalaĵojn por garantii la mortigan procezon kaj la ĉiutagan funkciadon de la tendaro. En tiu parto de la koncentrejo, kie devis labori 400 malliberuloj, inkluzive 100 virinojn, situis la stokejoj, en kiuj estis konservitaj ĉiuj objektoj forprenitaj de la mortigitaj viktimoj, inkluzive la harojn, vestaĵojn, manĝaĵojn, oron kaj aliajn valoraĵojn. Ekzistis ankaŭ malgranda bieno kun staloj por SS-ĉevaloj, brutoj, porkoj, anseroj kaj kunikloj. Ĉi tiu parto de la koncentrejo enhavis ankaŭ la ĉefan administran konstruaĵon, malgrandan katolikan preĝejon kaj la plej altan centran gardoturon de la koncentrejo. Ankaŭ en tiu preĝejo oni mortigis judojn.

En la lagro II la judoj estis „bonvenigitaj“ kaj preparitaj por sia morto. Ĉi tie ili senvestiĝis, la haroj de la virinoj estis tonditaj, iliaj vestaĵoj traserĉitaj kaj ordigitaj. Iliaj dokumentoj estis detruitaj en proksimaj fornoj. La viktimoj faris siajn lastajn paŝojn sur sabla pado, kiu estis 150 metrojn longa kaj

[20] Laŭ Antokolski/Kawerin ekzistis kvar dratoj, la kvara sekvis post la minita strio. Antokolski/Kawerin utiligis la informojn de la postvivintaj atestantoj Selma Wijnberg, Ber Freiberg kaj Aleksandr Peĉerskij.

ĉirkaŭ tri metrojn larĝa. La tiel nomata „tubo“ aŭ „entuziasme reagis ielira strato“, kiu kondukis rekte al la gasĉambroj, estis ĉirkaŭita de pikdrata barilo, en kiu branĉoj de piceo kaj abio devis kaŝi la rigardon al la lagro III kun la gasĉambroj. Inter tendaroj II kaj III situis eĉ flughaveno por pli malgrandaj aviadiloj.

Dank´ al la eldiroj de atestantoj kaj klarigoj de ĉeestintaj eksnazioj, oni estas sufiĉe bone informata pri la proceduro, kiu atendis la viktimojn post ties alveno en la koncentrejo. La tuta mortiga procezo estis perfekte kaj detale organizita. Kiam nova trajno alvenis kun miloj da judoj en Sobiboro, ĉiuj surlokaj funkciuloj sciis kio estas rutine farenda. La pola stacidomestro direktis la trajnon tra la pordego, super kiu estis skribita „SS-Sonderkommando Sobibor“, al la kvara relo ĝis la ramplo, kie la judoj devis forlasi la trajnon. La germanoj mem kontrolis la alvenon de la trajnoj, la ukrainoj gardistoj ĉirkaŭŝirmis la amason de la deportitoj kontraŭ provoj de fuĝado kaj por teni la ordon kaj la laborjudoj de la „stacidoma taĉmento“ devis malfermi la pordojn de la vagonoj kaj „helpi“ al la alvenintaj „vojaĝantoj“, kiuj estis lacaj de la tritaga vojaĝo el Nederlando kaj sentis sin feliĉaj, ke ili finfine alvenis en la celita loko. Kutime la transportoj alvenis je la tria horo nokte. Se la trajno estis tro longa, ĝi estis duonigita kaj la pasaĝeroj de la dua duono devis atendi multajn horojn ĝis kiam venis ilia vico por esti „prilaboritaj“, post la gasumado de la unua parto. La SS-kamaradoj vokis: „Venas salato!“ Sub laŭtaj ordonoj, sovaĝaj krioj, neimageblaj ofendoj kaj batoj de vipoj kaj fusiloj la homoj estis krude elpelitaj el la vagonoj, tiel ke ili devis elsalti ĝin, ofte rompante siajn ostojn. La bagaĝo de la judoj devis esti deponita ĉe la ramplo aŭ stacidomo. Poste la alvenintoj estis selektitaj laŭ viroj unuflanke kaj virinoj kaj infanoj aliflanke, tiel ke la familioj disiĝis. Por rapidigi la purigon de la homamaso de maljunuloj kaj malsanuloj iom poste inter la ramplo kaj la lagro III estis konstruita mallarĝa rela fervojo, 300-400 metrojn longa, sur kiu malgranda dizela lokomotivo veturigis la ĉarojn kun malsanuloj, kiuj ne malofte perdis la konscion, al la „lazareto“ en la lagro III, kie ili estis mortpafitaj kaj falis en la fosojn. Post la senŝarĝado de la vagonoj ili estis purigitaj kaj se necese riparitaj kaj resenditaj al okcidenta direkto de kie ili venis. Tiel okazis, ke la samaj vagonaroj cirkuladis plurfoje inter la diversaj koncentrejoj de okcidento kaj oriento.

Laŭ la vojo, kiun la judoj sekvis post la ramplo al la lagro II, ili vidis belajn ĉaledojn laŭ tirola stilo, kiuj post la kruda akcepto ĉe la ramplo devis ŝajnigi pozitivan impreson. Tiuj dometoj, same kiel la barakoj, estis konstruitaj parte per la ligno de judaj domoj en aliaj vilaĝoj aŭ urboj, kiuj la germanoj detruis post la forpelado kaj deportado de la judoj en la getojn kaj koncentrejojn. En la lagro II SS-ulo Hermann Michel, kiu portis blankan kitelon kaj staris sur malgranda tablo, kun infaneca meino kaj en tre ĝentila tono konvinkis la homojn el Nederlando trankviliĝi kaj ke ili troviĝas en transira koncentrejo. Li pardonpetis pro la malagrablaĵoj, kiuj la vojaĝantoj havis survoje, klarigis al ili, ke ili iros labori en iu nedifinita loko en oriento (Ukrainio aŭ Riga), sed antaŭ tio pro higienaj kialoj ili devos senvestiĝi, deponi ĉiujn vestaĵojn kaj kunportitajn valoraĵojn kiel horloĝojn, monon kaj oron, kaj iri duŝi sin. Li promesis al ili, ke post la banado ĉiuj iliaj havaĵoj estos redonitaj al ili kaj ke ili povos daŭrigi sian vojaĝon al Ukrainio, kie ili vivos kaj laboros. Sapon kaj mantukojn ili ne bezonas, ĉar ĉio troviĝas en la duŝejoj. Samtempe li minacis ilin per severa puno, se ili ne obeos plenumi la instrukciojn. Tiu alparolado vekis certan fidon kaj entuziasmon ĉe la homoj, kiuj nenion suspektis kaj entuziasme reagis, spontane aplaŭdis kaj foje eĉ dancis kaj kantis pro ĝojo, kiel Ada Lichtman, postvivantino de Sobiboro, raportis post la milito. Aliaj tamen kaŝis siajn valoraĵojn. La viktimoj eĉ ricevis la okazon sendi poŝtkarton al la patrujo por konfirmi, ke ili bone alvenis en la nova loko kaj ŝajnigi, ke ĉio estas en ordo. Poste sekvis la ordono senvestiĝi. La plimulto de la homoj unuafoje staris nudaj antaŭ fremdaj homoj kaj hontis.

Kompare kun la sensciaj judoj el okcidenta Eŭropo, precipe Nederlando, Francio kaj Germanio, kiuj parte alvenis per normalaj porpasaĝeraj trajnoj kaj ricevis afablan bonvenigon en Sobiboro, la polaj kaj sovetiaj judoj estis pli krude akceptitaj, ĉar ili ne bezonis hipokritan bonvenigan paroladon, ĉar ili reale suspektis la malbonon, kiu sekvos. Alia okulfrapa diferenco estis, ke la judoj el okcidentaj landoj venis belaspekte, bele vestitaj kaj kun amaso da varoj kaj nutraĵoj, i.a. ĉokoladon kaj kondensitan lakton (kiujn ankaŭ la laborjudoj povis bone utiligi) – ĉio tio mankis ĉe la polaj kaj sovetiaj judoj, kiuj alvenis en mizera stato, fakte kvazaŭ nur kun sia nuda korpo. La judoj kriis: „Ŝma Israel!“ „Adonai Elohajnu!“ „Adonu Ehda!“ (Aŭskultu, ho Israelo! Eterna nia dio! La Sinjoro estas unika!)

Dum la viroj, separitaj de la virinoj, devis senprokraste senvestiĝi kaj estis aparte pelitaj en la gasĉambrojn tra la „tubo“, la virinoj unue devis trapasi – tra pina aleo – la barakojn, kie ili devis demeti la ŝuojn kaj la vestaĵojn kaj kie oni tondis ilian hararon. La harojn oni enpakis en sakojn por terpomoj

por ekspedi ilin al Germanio, kie oni uzis ĝin por industriaj celoj, ekzemple fari matracojn pr subakvaj ŝipoj.[21] La tonda proceso iris tre rapide – eble duonminuto devis sufiĉi por forigi la hararon de la judinoj. Unu el la tondistoj estis Thomas Toivi Blatt, unu el la laborjudoj, kiuj postvivis la ribelon kaj la militon kaj kiu povis rakonti kaj atesti kion li vidis en Sobiboro. Se iu judo kontraŭstaris la ordonon de nazio, li aŭ ŝi estis krude batita. La grupoj de nudaj judoj estis pelitaj al la konstruaĵo kun la gasĉambroj kutime kun unu nazio ĉe la pinto kaj kelkaj gardistoj ĉe la vosto de la kolono. Antaŭ ol eniri la gasĉambrojn, la judoj preterpasis iun kioskon aŭ budon, kie ili estis devigitaj lasi siajn lastajn valoraĵojn kaj monon. La enirejo al la „duŝejo“ estis ornamita per floroj kaj portis la stelon de Davido kaj havis tabulon kun la surskribo „banejo“. Kiam la gasĉambroj estis plenŝtopitaj de homoj, la respondeca nazio lanĉis la gasumon kaj lia ukraina komplico startis la benzinmotoron. La gaso fluis tra balonoj kaj tuboj en la gasĉambrojn. Kutime nur kiam anstataŭ akvo en la „duŝejo“ venis gaso, la nudaj homoj komprenis la sencon de ilia transportado al ĉi tiu kondamnita loko kaj kio vere okazis kun ili tie. Sed estis tro malfrue. Post 20-30 per la unuaj gasĉambroj kaj post 10-15 minutoj per la novaj, pli efikaj gasĉambroj ĉiuj judoj estis gasumitaj kaj mortaj. Post la fino de la procezo la gasmurditaj judoj estis elprenitaj el la gasĉambroj fare de tie engaĝitaj laborjudoj kaj fortransportitaj en ĉaroj sur reloj al la fosoj kaj bruligejoj.

La *lagro III*, kiu konsistis el la konstruaĵo kun la gasĉambroj kaj la bruligejoj kaj amastombejoj, estis hermetike separita de la lagro II per ŝtaldrato ĉirkaŭvolvita per verdaĵoj por eviti la rigardon al la konstruaĵo kun la gasĉambroj. Sed Gertrude Poppert („Luka“), kiu laboris en la lagro II, povis vidis tra fendoj en la bariloj la nudajn virinojn kuri al la „banejo“, t.e. la gasĉambroj. La lagro III estis alirebla nur laŭ du ebloj: La personaro eniris ĝin tra malgranda, apenaŭ rimarkebla pordo. Sed por la judaj viktimoj ĝi estis enirebla nur laŭ la legendeca „tubo“, nomata ankaŭ „ĉielira strato“, tra la konstruaĵo kun la gasĉambroj, en kiujn ili estis pelitaj de la germanoj kaj sovaĝaj ukrainaj gardistoj. Eliri ĝin eblis nur en gasigita, morta stato. Cinikuloj kutimis diri, ke la judoj kutimas forlasi la lagron III en formo de fumo kaj cindro.

Post la kruela sufoka mortado de la judoj la kadavroj devis esti eltirataj el la gasĉambroj fare de speciala taĉmento de elektitaj laborjudoj, kiuj ĉeestis ekskluzive en la lagro III. La viktimoj, al kiuj oni ankoraŭ elŝiris la orajn dentojn kaj kiujn oni ĝisfunde esploris pri kaŝitaj valoraĵoj, estis enterigitaj en grandegaj fosoj, kaj poste bruligitaj. La judoj de la ceteraj lagroj ne rajtis scii, kio okazas en la lagro III. Nature, la germanoj ne povis tute kaŝi la aferon, ĉar kelkaj laborjudoj de la lagro II sukcesis vidi tra la bariloj, kion oni faras kun la judoj en la lagro III, flarante la specifan dolĉetan odoraĉon pro la bruligo de kadavroj, aŭ vidante la altajn flamojn kaj la fumon. Stanisław Szmajzner kaj Ĥaim Engel venis al la certa konkludo, ke la germanoj uzas gason por mortigi la judojn. Labori en la lagro III kaŭzis al la tieaj judoj altgradan psikan premon, ĉar kunlabori en la neniigo de la propra popolo ne estis eltenebla. Neniu judo, kiu laboris en la lagro III de Sobiboro, postvivis la militon, ĉar ĉiuj pereis surloke, ĉar de tempo al tempo la laborgrupoj estis likviditaj kaj anstataŭigitaj per novaj laboristoj.

La *lagro IV* en la norda parto de la koncentrejo, kiu estis konstruita en somero 1943, servis por purigi kaj reordigi la sovetian municion. Ankaŭ ekster la koncentrejo troviĝis kelkaj instalaĵoj ligitaj kun ĝi.

En la suda parto troviĝis larĝa sabla tereno. En la koncentrejo staris laŭlonge de la dratbariloj pluraj gardoturoj, entute 11, kun altega centra gardoturo nomata „alta sidloko“. Forta lumigo zorgis pri granda heleco dum la nokto. La aspekto de la norda kaj okcidenta teritorioj de la koncentrejo ne povis esti rekonstruitaj. Ekzistas skizaj desegnaĵoj de la koncentrejo, kiujn faris iamaj SS-funkciuloj kaj laborjudoj, kiuj estis malliberigitaj en Sobiboro kaj povis fuĝi kaj postvivis la militon.

La gasĉambroj de Sobiboro estis konstruitaj laŭ la modelo de la gasĉambroj starigitaj en Bełżec. En la komenco temis pri lignaj barakoj, poste oni konstruis ŝtonajn konstruaĵojn kun po 6 gasĉambroj. La konstruaĵon oni kasis per speciala armea kamufla reto por kaŝi la rigardon al aviadiloj, kiuj superflugis la terenon. Sed fornoj mankis, kiel ili ekzistis en Bełżec. La okcilindra motoro, kiu generis la gason (miksaĵo el karbona monooksido kaj karbondioksido), venis el Lembergo. Temis pri peza benzinmotoro de sovetia tanko aŭ lokomotivo. Unue la motoro, kiu troviĝis en apuda aparta dometo, ne funkciis, kaj kiam ĝi finfine tamen ekfunkciis, oni faris eksperimentan gasumon ĉe 30-40 judaj virinoj,

[21] La haroj estis alportitaj en sakoj al Lublino kaj senditaj de la loka administrado de SS al la kompanio Reimann en Breslau, kiu pagis duonan Reichsmark por unu kilogramo.

kiuj estis mortaj post dek minutoj. Poste, kiam la mortiga procezo glate funkciis, miloj da judoj estis industriece gasumitaj en Sobiboro, entute verŝajne kvaronmiliono. Baldaŭ la unuaj tri gasĉambroj, kiuj troviĝis en brika konstruaĵo, ne plu sufiĉis por mortigi tiel multajn homojn. En frua aŭtuno 1942 estis konstruitaj ses novaj gasumaj unuoj, kiuj duobligis la kapaciton de la gasĉambroj. La konstruaĵo mem estis malalta domo kun ebena tegmento. Du metrojn larĝa koridoro kondukis al la ses gasĉambroj. Ilia konstruado estis observata kaj kontrolata de la germanaj teknikistoj Erwin Lambert kaj Lorenz Hackenholt. La novaj gasĉambroj estis 4 x 4 metrojn larĝaj kaj 2,3 metrojn altaj. La muroj estis lakitaj per grizblanka farbo, kiuj estis facile purigebla. La plena akceptokapacito de la novaj gasĉambroj estis proksimume 500-800 homoj en unu fojo. Malgrandajn infanojn oni ĵetis en la ĉambrojn super la kapoj de la plenkreskuloj.[22]

Tra malgranda fenestro oni povis vidi kio okazis en la gasĉambroj kaj kiel la viktimoj aspektis en morta stato. Ekzistas nur malmultaj atestantoj, kiuj vidis perei la judojn en la gasĉambroj. Ekzistas nur unu homo (Rudolf Reder), kiu postvivis la militon, kiu vidis la gasĉambrojn en Bełżec. Alia nomiĝis Kurt Gerstein, kiu vizitis la ekstermejojn de la „Ĝenerala Gubernio“ (Bełżec kaj Treblinka) kiel sanitara inspektoro kaj kiu raportis pri tio al diversaj okcidentaj registaroj, sed neniu volis aŭdi aŭ kredi lin. Ankaŭ planita renkontiĝo kun la nuncio de Vatikano en Berlino ne sukcesis.[23] La publika silentado de papo Pio XII. pri la holokaŭsto estas vaste konata, sed liaj motivoj ne restis tute klaraj. Alia atestanto de la holokaŭsto, kiu vidis parton de la kruelaĵoj de la nazioj en la „oriento“, t.e. la Ĝenerala Gubernio, nomiĝis Jan Karski, sed esence li vidis nur la Varsovian geton kaj la judan urbeton Izbica, kiu funkciis kiel koncentrejo por kolekti judojn el okcidenta Eŭropo, de kie trajnoj kun judoj veturis al Bełżec kaj Sobiboro por mortigi ilin. Do, almenaŭ la sveda, nederlanda, franca kaj usona registaroj estis informitaj pri la tragikaj eventoj de la sistemeca mortigo de la judoj en la Ĝenerala Ĝubernio, same la pola registaro en Londono, sed ili ne reagis kaj silentis, inter ili prezidento Roosevelt mem, al kiu Karski rakontis san historion.[24] La nazioj strikte malpermesis al vizitantoj kaj atestantoj rakonti ekstere pri la ekstermejoj en orienta Pollando, en alia kazo oni minacis ilin per mortpafado. Pluraj nazioj, kiuj ĉeestis la gasumojn, rakontis post la milito dum la tribunalaj procezoj kiel oni mortigis la judojn en Bełżec, Sobiboro kaj Treblinka. En sia libro Jules Schelvis rakontas ĉion detale.

Dum la tempo de la ekzisto de la KC Sobiboro la germana personaro konsistis el entute ĉirkaŭ 70 viroj plej ofte kun SS-rangoj. Eble trideko-kvardeko da ili deĵoris dum unuopaj periodoj. Iuj estis elŝangitaj aŭ anstataŭigtaj, dum aliaj forestis pro feriado, oficvojaĝo aŭ alia kialo. En la diversaj lagroj de la koncentrejo Sobiboro laboris konstante ĉirkaŭ 600 judoj. Grandparto de tiuj „laborjudoj“ estis okupataj en la ordigaj barakoj de la lagro II, kie estis amasigita la tuta havaĵo de la judoj, kiuj alvenis al Sobiboro por esti mortigitaj. En la lagro III laboris en la plej aktiva tempo (t.e. kiam alvenis multaj transpotoj kun miloj da viktimoj) ĉirkaŭ 150 judoj. Neniu el ili rajtis reiri al aliaj partoj de la koncentrejo, do ilia morto estis certa. De tempo al tempo ili estis anstataŭigitaj per novaj laborfortoj, ĉar multaj ne longe entenis tiun laboron en la lagro III. Ĉi tiu diabla lagro servis ankaŭ kiel punejo por „pekantoj“ el aliaj lagroj, kiuj estis kondukitaj ĉi tien, pafekzekutitaj aŭ mortigitaj en la gasĉambroj. Neniu judo revenis viva de la lagro III. Ĝis somero 1942 la lagro III estis kondukata de SS-Oberschargvidanto Kurt Bolender, poste de SS-Oberschargvidantoj Hubert Gomerski kaj Hermann Erich Bauer. De tempo al tempo, iu laboristo de la lagro III sukcesis, tra la ukraina gardistoj, kontrabandi informon al malliberuloj en lagroj I aŭ II, tiel ke la homoj en la aliaj lagroj estis informitaj pri kio okazas en la lagro III. Krom tio de la lagro II oni povis vidi la SS-ulon Erich Bauer kiel li manipulis la gasumon de la tegmento de la „banejo“. Sed ankaŭ pro la enorma odoraĉo kaj vasta fumo ne estis malfacile diveni kion oni faras en la lagro III.

Ĉiuj SS-funkciuloj kaj sovetiaj (ukrainaj) gardistoj portis vipojn, per kiuj la laborjudoj estis konstante kruele batitaj. Kiel plej senskrupulaj batistoj profiliĝis la SS-uloj Wagner kaj Frenzel, kiuj kruele batis la homojn per specialaj vipoj, kiuj entenis ŝtalajn erojn, kiuj kazis al la batitoj gravajn vundojn. La normo estis 10 aŭ 25 batoj, kiujn oni laŭplaĉe kutimis ripeti. Malgraŭ tio, Frenzel diris postmilite antaŭ la tribunalo, ke li bone traktis la judojn. Pro la tikslaj higienaj kaj nutraj kondiĉoj multaj malliberuloj pli malpli frue malsaniĝis. Por eviti la kondukadon en la lagro III, kie troviĝis la

[22] Precipe laŭ Blatt, Sobibor – der vergessene Aufstand, p. 31-39.
[23] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kurt_Gerstein.
[24] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Jan_Karski. Ankoraŭ en 1944 aperis lia libro Historio de sekreta ŝtato.

gasĉambroj, la koncernitaj homoj kutimis kaŝi sian malsanon kaj tamen iris labori. Inter la judoj ekzistis Kapo-j kaj ĉef-Kapoo-j, kiuj estis judoj, sed servis kiel komplicoj de la SS-personaro por observi kaj kontroli la laborjudojn. Ili ĝuis privilegiojn, kiujn ili devis meriti per aparte kruela traktado de la laborjudoj. Kiel en Treblinka ankaŭ en Sobiboro estis tenitaj kelkaj hundoj, kiuj povis esti tre agresemaj kaj danĝeraj, ĉar ili atakis la malliberulojn laŭ spontana ordono de ilia mastro kaj grave vundis iliajn korpojn, pro kio tiuj hundoj estis ege timataj de la malliberuloj. La SS-uloj kutimis ordoni al ili „homo, kaptu la hundon" (anstataŭ „hundo, kaptu la homon") kaj tiel havis sian mordan plezuron kun la viktimoj. Unu el tiuj hundoj nomiĝis Barry.

Preskaŭ ĉiuj homoj, kiuj estis deportitaj al la ekstermaj koncentrejoj kaj aliaj lokoj de la mortigo de la Tria Regno, venis per la trajno (iuj venis per kamionoj kaj ĉaroj). Tiujn „vojaĝojn" organizis la Germana Regna Fervojo, kiu do tiel konscie partoprenis la „finan solvon de la juda demando" kaj do portas parton de la kulpo pri la krimoj. Apud Adolf Eichmann, kiu kunordigis la transportojn de la judoj en la RSHA, flanke de la Regna Fervojo respondecis pri ĝi Albert Ganzenmüller. Ĉar la Regna Fervojo registris ĉiujn movojn en detaloj, oni estas sufiĉe bone informata pri la sistemo de la „specialaj trajnoj por la evakuado de la judoj al oriento", kiel la tuta operaco estis oficiale nomata. Kvankam la judoj plimulte estis transportitaj en var- kaj brutvagonoj (iuj aliaj tamen en normalaj porpersonaj vagonoj), la Regna Fervojo registris ilin kiel normalajn pasaĝerojn, kiuj devis pagi bileton kaj veturis laŭ oficiala horaro, por ŝajnigi normalecon kaj eviti ĉiun suspekton flanke de la viktimoj. La prezo de la veturo estis po kvar pfenigoj por kilometro kaj persono, infanoj sub 10 jaroj pagis la duonon kaj infanoj sub kvar jaroj veturis senpage. La rezervado de la vojaĝo okazis tra iu oficiala vojaĝagentejo. La „pasaĝeroj" veturis en tre malkomfortaj kondiĉoj al „oriento" sen eblecoj normale manĝi, trinki, sidi, lavi sin kaj dormi, En unu vagono povis esti metitaj 55 ĝis 75 personoj en porpersonaj vagonoj (el okcidento) kaj 100 ĝis 180 personoj (el Pollando) en var- kaj brutvagonoj, tiel ke samtempe povis esti transportitaj kelkmil homoj en unu fojo. En somero la varmego kaj en vintro la malvarmego estis apenaŭ elteneblaj. Dum la vojaĝo la vagonoj estis fermitaj, do neniu povis eliri ilin. Ĉar la judoj ne sciis kien ili veturas kaj kia sorto atendos ilin, ili kunportis diversajn varojn, nutraĵojn kaj valoraĵojn, pri kiuj ili esperis, ke ili povos utiligi ilin en la nova loĝloko. Pri Aŭŝvico oni jam aŭdis, sed la nomo Sobiboro estis nekonata. Nu en la getoj oni aŭdis, ke en Sobiboro troviĝas iu „speciala lagro", kiu ne estas destinita por normala laboro kaj de kie neniam venis vivsigno. Dum la milito Sobiboro estis konata nur al kelkaj personoj en Okcidento, ekzemple al la membroj de la juda konsilio de Nederlando, sed oni apenaŭ konsciis, kio tie okazis al la propraj civitanoj post ilia transportado al tiu loko. Albert Konrad Gemmeker, la komandisto de la koncentrejo Westerbork, probable havis pli konkretajn informojn, kvankam dum la postmilita jurproceso li asertis, ke li ne sciis, kio atendis la deportitajn judojn en la naziaj koncetrejoj de okupata Pollando.

Dum en tiu periodo jam veturis trajnoj kun miloj da judoj el Pollando kaj aliaj eŭropaj landoj al Aŭŝvico kaj Treblinka, en Sobiboro okazis ĝenaj prokrastoj. Pro diversaj difektoj de la tereno trajnoj inter julio kaj oktobro 1942 ne povis veturi tra Włodawa kaj do devis estis direktitaj tra Chełm, dum kelkaj trajnoj venis rekte el Zamość. La plej multaj transportoj al Sobiboro venis en la unua fazo (majo ĝis la fino de julio 1942) de la ekzisto de la mortfabriko el Pollando mem (ĉirkaŭ 90-100 mil homoj). Pro terenaj problemoj inter julio ĝis oktobro 1942 trajnoj ne povis veturi al Sobiboro, tiel ke la amasmurdo paŭzis dum kelkaj monatoj. La tempo estis utiligata por grandigi la kvanton de la murdo per aldoni de kvar pliaj gasĉambroj, en kiuj samtempe 600 homoj povis estis mortigitaj, kio duobligis la kapaciton. En tiu tempo estis konstruita ankaŭ la relfervojo por alporti maljunan kaj malsanajn judojn rekte de la ramplo al la amastombejo, kie ili estis ekzekutitaj. La dua fazo de la murdo en Sobiboro komenciĝis en aŭgusto 1943 kaj daŭris ĝis aŭtuno (kiam la neniigejo estis likvidita post la ribelo de la 14a de oktobro). En tiu periodo al Sobiboro estis deportitaj ĉefe el okcidenta Eŭropo, precipe el Nederlando (Westerbork), Francio, Belgio, Germanio, Aŭstrio, Slovakio kaj Sovetunio, pro kio en Sobiboro pereis aparte multaj judoj el tiuj landoj, inter kiuj nur kelkaj travivis la militon, de kiuj nur du virinoj el Nederlando.[25] Apud la porarmeaj transportoj, la „civila" transportado de la judoj en la koncentrejojn devis okazi prioritate por kiel eble plej rapide plenumi la mision. Unu el la problemoj

[25] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Durchgangslager_Westerbork. El Nederlando, t.e. Westerbork, veturis al Sobiboro en 1943 oficiale 19 transportoj kun 34´313 judoj (vd. https://nl.wikipedia.org/wiki/Sobibórtransporten), de kiuj nur 3 homoj postvivis la koncentrejon kaj 2 la militon. Blatt listigis 20 transportojn (de kiuj unu havis nur infanojn). La plej maljuna(j) deportito(j) naskiĝis en 1848 kaj la plej junaj naskiĝis en la koncentrejo.

estis, ke ne estis sufiĉe da vagonoj kaj lokomotivoj je dispono. Mankon de trajnoj kaj interrompon de transportoj kaŭzis en la jarŝanĝo de 1942/43 la feriado de la soldatoj, kiuj rehejmiĝis de la orienta fronto. Dum la veturo iuj vojaĝantoj elĵetis iujn paperetojn kun mesaĝoj en la espero, ke iuj lokaj homoj trovos ilin. Dumvoje oni eksciis iujn onidirojn, ke oni mortigos la judojn en tiuj lokoj, kien ili estas transportitaj. Jam antaŭ la alveno en la koncentrejo la gardistoj forprenis al la pasaĝeroj monon, oron kaj aliajn valoraĵojn, tiel ke ili sentis sin krude priŝtelitaj de tiuj gardistoj. La ĉefo de la Orda Polico („verda polico“), kiu akompanis la transportojn, nomiĝis Kurt Daluege kaj estis rekta kunlaboranto de Heinrich Himmler.

Ne estas certe, ĉu ĉiuj trajnoj, kiuj veturis kun judoj al oriento, estis oficiale anoncitaj. Anoncitaj ja verŝajne estis trajnoj el Germanio, Francio kaj Nederlando en tiuj landoj mem, sed kiom da trajnoj efektive forveturis ekzemple el Varsovio kaj atingis Treblinkan aŭ Sobiboron ne estas konate. Pro la altgrada burokratio de la germana administracio diversaj instancoj kolektis tiajn koncernajn raportojn pri ekveturo de trajnoj. Sed ne ĉiuj telegramoj kaj dokumentoj konserviĝis, ĉar multaj perdiĝis. Por la statistiko estis bezonataj nur nombroj kaj ciferoj, pri kiuj la komandantoj de la koncentrejoj raportis al la berlina centralo, dum la personaj nomoj de la pasaĝeroj kaj viktimoj interesis neniun, sed pli pri la kunportitaj valorhavaĵoj de la deportitoj la germanoj pedante interesiĝis.

En julio 1942 Heinrich Himmler persone vizitis la ekstermejon Sobiboro en akompano de superaj funkciuloj de la SS, inter kiuj troviĝis Adolf Eichmann, por konvinkiĝi pri la glata funkciado de la neniiga procezo. Sed ili restis nur mallonge. Tuj post la alveno ili marŝis al la lagro III, kie troviĝis la gasĉambroj kaj post kiam ili vidis ilin, ili senprokraste forveturis, tiel ke komandanto Reichleitner estis tre seniluziigita.

La dua vizito de Himmler en Sobiboro okazis en februaro 1943 kaj daŭris iom pli longe olla unua vizito. Dum tiu okazo oni alportis pli ol 300 judajn knabinojn el Lublino, kiuj devis atendi en la lagro I, kie ili estis mistraktitaj de Gomerski kaj Wagner. Post la alveno de Himmler la knabinoj devis senvestiĝi kaj oni tondis al ili la harojn. Sekvis ilia gasumo. Poste Christian Wirth montris al Himmler la koncentrejon, kiu faris paroladon, laŭdis ĝian konstruadon kaj kuraĝigis la personaron elteni ĝis la fino. Antaŭ ol forveturi Himmler vespermanĝis en la koncentrejo.

La 4an kaj 6an de oktobro 1943, do dekon da tagoj antaŭ la fama ribelo en Sobiboro, Himmler ankoraŭ prezentis, en Poznano, du sekretajn paroladojn, kiuj estas la unuaj konataj dokumentoj de la tempo de la germana nacisocialismo, en kiuj centra altrangulo de la germana registaro malkaŝe esprimis kaj gloris la ekstermadon de la eŭropaj judoj antaŭ elektita publiko, kaj kiuj pruvas, ke la nazia reĝimo volis, planis kaj efektivigis la holokaŭston tute konscie kaj intence. En tiuj paroladoj li eksplicite menciis la „ekstermadon de la judoj“, kiun li prezentis kiel historian mision de la germana nacisocialismo. En kvin aliaj paroladoj inter decembro 1943 kaj junio 1944 antaŭ estroj de la armeo Himmler ripetis sin tiurilate.[26]

Post la ribeloj kaj parte sukcesa fuĝado de po cento da judaj malliberuloj el la koncentrejoj de Treblinka (aŭgusto 1943) kaj Sobiboro (oktobro 1943) Himmler ordonis likvidi tiujn ekstermejojn kaj forviŝi la spurojn de la krimoj. El Treblinka estis venigitaj 450 laborjudoj por helpi likvidi la ekstermejon de Sobiboro. La centmiloj da kadavroj devis esti elterigitaj el la fosoj per granda dragilo kaj bruligitaj sur grandegaj rostkradoj. La odoraĉo estis neeltenebla kaj flarebla en la tuta ĉirkaŭaĵo, la flamoj estis videblaj eĉ en najbaraj vilaĝoj. La barakoj kaj gasĉamboj estis malkonstruitaj kaj la tuta instalaĵaro kaj materialo estis fortransportita. Post la farita laboro ĉiuj restintaj laborjudoj estis mortigitaj. La tereno estis malplenigita kaj reordigita kaj sur la iama ekstermejo Sobiboro aperis farmdomo, kiu estis loĝata de eksa ukraina gardisto, kiu devis ŝirmi la terenon de nedezirataj (polaj) or-serĉantoj.

Ĉu ekzistis vivsignoj el Sobiboro? Fakte jes, sed ili estis trompaj. La ebleco sendi poŝtkartojn al la patrujo el la koncentrejoj estis jam menciita. En septembro kaj novembro 1943 la juda konsilio de Nederlando ricevis kartojn el la Ĝenerala Gubernio, kies adresoj estis kamuflitaj per malkonkretaj adresoj. Kiel loko devis esti indikita Włodawa, tiel ke ĉiuj spuroj pri la ekzisto de la koncentrejo en Sobiboro estis forviŝita. La „poŝtkartoj“ enhavis kurtajn kaj iom strangajn tekstojn: iliaj sendintoj skribis, ke li/ŝi fartas bone, ricevas sufiĉe da nutraĵoj kaj ke la laboro en la lagro estas agrabla kaj interesa

[26] Detale pri tio legu sub https://de.wikipedia.org/wiki/Posener_Reden.

kaj ke oni traktas la homojn bone kaj korekte. El 19 transportoj de 34 mil homoj al la diversaj koncentrejoj en la Ĝenerala Gubernio, kiuj okazis inter marto kaj julio 1943, estas konataj pli ol 300 tiaj vivsignoj, inter ili 89 devenis el Sobiboro.

### Fuĝado el la koncentrejo kaj la ribelo de la 14a de oktobro 1943 en Sobiboro

Aparte interesa temo, pri kiu ĉefe temas en ĉi tiu kontribuaĵo, estas la provoj fuĝi el la koncentrejo Sobiboro.

En somero 1943 la malliberuloj de la koncentrejo informiĝis pri la malvenko de la germana armeo ĉe Stalingrado kaj pri la ribelo en la Varsovia geto. Oni eksciis ankaŭ la anoncon de Himmler de la 5a de julio 1943 pri la transformado de la ekstermejo Sobiboro al „normala" labor-koncentrejo. Leon Feldhendler, kiu estis deportita al Sobiboro en 1942, timis, ke ĉiuj atestantoj de la amasmurdo estos likviditaj, kaj alvenis al la konkludo, ke nur la opcio de amasfuĝo de ĉiuj arestitoj kondukos al la ebleco eskapi la malliberecon kaj postvivi. Inter mezo de julio kaj malfrua aŭgusto 1943 Feldhendler disvolvis diversajn eskapajn planojn. Unu el ili estis, ke la junuloj en la aĝo de 14 ĝis 16 jaroj mortigu la SS-personaron frumatene por preni ĝiajn armilojn kaj poste transdoni ilin al la plenkreskuloj. En tia kazo la fuĝado devus okazi kune kun la ukrainaj gardistoj de Trawniki. Aliaj planoj estis bruligi la koncentrejon aŭ superi la barojn tra tunelo. Ĉiuj tiuj planoj tamen estis konsiderataj kiel malrealismaj, ĉar mankis homoj, kiuj havis taŭgan, eble armean gvidsperton. Feldhendler fine trovis tian taŭgulon en la nederlanda judo Joseph Jacobs. Tamen lia fuĝplano estis perfidita. La SS provis ekscii la organizantojn per torturo, sed Jacobs restis fidela dirante, ke li volas fuĝi sola. En venĝo de la nazioj li estis pafita kune kun 72 aliaj nederlandaj judoj. Feldhendler fine alianciĝis kun la sovetia oficiro Aleksandro Peĉerskij,[27] kiu estis deportita sl Sobiboro kun granda grupo de sovetiaj militkaptitoj el Belorusio la 23an de septembro 1943, tra kontakto perita de la pola judo Ŝlomo Lajtman. Ili konis unu la alian el la SS-koncentrejo en Minskviro, kie Peĉerskij estis antaŭe retenita. Feldhendler kaj Peĉerskij planis la amasfuĝadon kune kun malgranda grupo de laborjudoj, kiuj devis trakti la peparadon de la operaco strikte sekreta. La 14an de oktobro 1943, post la mortigo de deko da SS-funkciuloj, kelkcent judoj sukcesis fuĝi el la koncentrejo. atingis la barojn. Malgraŭ altaj perdoj ĉirkaŭ 150 arestitoj povis venki la barilojn kaj la minejon kaj forkuri en la proksiman arbaron.[28]

Antaŭ la granda preparita kaj organizita fuĝado de la 14a de oktobro 1943, pri kiu la sekva teksto temas ĉi-sube, okazis diversaj individuaj fuĝoj, kiuj estu ĉi tie kurte menciitaj. La unua fuĝo okazis en majo 1942 mallonge post la ekfunkciigo de la koncentrejo Sobiboro. Temas pri tri judoj, kiuj sukcesis kaŝi sin en la arbustoj antaŭ ol eniri la gasĉambrojn kaj rampi sub la pikdrato al la libereco. Ili reiris al Włodawa, sed pliaj detaloj pri ilia plua sorto ne estas konataj (vd. sub Freiberman kaj Machlies pli sube). Dua fuĝo sukcesis en novembro de la sama jaro al Zyndel Honigman. Sed li estis rekaptita kaj sukcesis fuĝi duan fojon en julio 1943 kun kvar aliaj homoj. En decembro 1942 fuĝis tri judaj virinoj kaj du ukrainaj gardistoj el la koncentrejo Sobiboro (vd. sub Liberman pli sube), sed unu el la virinoj kaj la du ukrainoj pereis post perfido en la pola kaŝejo 30 kilometrojn sudokcidente de Sobiboro. Iu grupo de la arbara taĉmento povis fuĝi en julio 1943. La 20-an de julio 1943 sep homoj jam povis fuĝi de la arbara taĉmento, post kiam Josef Kopf kaj Ŝlomo Podĥlebnik mortigis ukrainan gardiston.[29] En alia kazo 14 malliberuloj sukcesis fuĝi, sed 11 de ili povis esti rekaptitaj. Nature la nazioj reagis ege kruele kaj senkompate kaj senprokraste likvidis ĉiujn rekaptitajn fuĝintojn. Ili eĉ organizis verajn venĝorgiojn kaj kiel puno mortpafis aliajn senkulpajn malliberulojn antaŭ la okuloj de la ceteraj prizonanoj. Ĉi tiu epizodo estis prilborita en la angla filmo *Fuĝo el Sobiboro*, kiu estis produktita en la jaro 1987. Alia sensacia fuĝoprovo konsistis en la konstruado de tunelo sub la koncentrejo eksteren. Sed la projekto estis perfidita de ukraina gardisto kaj la tuta koncernata labortaĉmento, konsistanta el ĉirkaŭ 150 personoj, estis likvidita en la lagro III en aprilo 1943. Sed per tio la mordorgioj ne estis finitaj. La nazioj elektis 70 nederlandanojn, kondukis ilin al la lagro III kaj senkompate mortpafis ilin tie.[30]

---

[27] En la tuta teksto mi aplikas la finaĵon de la origina rusa skribformo -ij.
[28] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Leon_Feldhendler.
[29] Iliaj nomoj estis krom Josef Kopf kaj Ŝlomo Podĥlebnik Simĥa Białowitz, Zyndel Honigman, Ĥaim Kornfeld, Aron Licht kaj Abram Wang.
[30] Laŭ Jules Schelvis, Vernichtungslager Sobibór. Unrast-Verlag Hamburg/Münster 203, p. 11- 166.

Oni estimas, ke en la tri ekstermejoj de la „operaco Reinhardt“ Bełżec, Sobibór kaj Treblinka pereis ĉirkaŭ 1,5-1,7 milionoj da homoj, ĉefe judoj. Laŭ unuopaj ekstermejoj, en Bełżec estis mortigitaj verŝajne 600 mil, en Sobiboro 250 mil[31] kaj en Treblinka pli ol 700 mil judoj.

Krom tio, 360 mil judoj estis mortigitaj en la gasvagonoj en Chełmno, kaj 700 mil judoj mortis en la getoj de Pollando. Sume, en la ekstermejoj de la Ĝenerala Gubernio pereis unu kvarono aŭ eĉ unu triono de la eŭropaj judoj, kiuj estis mortigitaj dum la dua mondmilito, kio estis pli multe ol en Aŭŝvico mem, kie pereis 1,1-1,5 milionoj da homoj, ĉefe judoj, sed ankaŭ poloj, ciganoj, sovetiaj militkaptitoj ka aliaj homgrupoj. Nur ses judoj postvivis la ekstermejon de Bełżec kaj nur du postvivis la gasvagonojn de Chełmno. Pro la ribeloj en Treblinka kaj Sobiboro tiujn ekstermejojn postvivis proksimume 100 judoj kune (iliaj nomoj estas konataj).

Pri la ekstermejoj Bełżec, Sobiboro kaj Treblinka apenaŭ ekzistas aŭtentaj dokumentoj, ĉar ĉiuj dokumentoj pri la „operaco Reinhardt“ estis neniigitaj. Ne-germanaj, ekzemple polaj aŭ judaj fontoj estas same raraj. Pro manko de transportlistoj oni ankaŭ ne konas la nomojn de la deportitaj judoj, kiuj pereis en tiuj mortfabrikoj.

* * *

<u>Originala rakonto</u>

## LA RIBELO EN LA KC SOBIBORO, OKTOBRO 1943

De Jules Schelvis

En somero 1943 cirkulis diversaj onidiroj, ke la koncentrejo ricevos alian funkcion aŭ estu komplete likvidita. La famoj nutriĝis de la fakto, ke la transportoj el la Ĝenerala Gubernio same kiel el Francio kaj Nederlando malpliiĝis signife. La plej lasta franca transporto alvenis fine de marto 1943 kaj la plej lasta el Nederlando fine de julio. Malgraŭ la senespera situacio, en kiu la malliberuloj troviĝis, la perspektivo de ebla likvido de la koncentrejo kaŭzis konsternon. Oni timis suferi la saman sorton kiel la plej lastaj judoj el Bełżec: ekzekuton. Kiam la koncentrejo estis fermita fine de decembro 1942, la restintaj judaj laboristoj en Bełżec estis devigitaj fosi kaj bruligi centmilojn da kadavroj por forviŝi la spurojn de la amasmurdo. Kiam ili ricevis ĉi tiun taskon, oni promesis al ili esti translokitaj al labortendaro. Sed kiel ofte tio evidentiĝis mensogo. Unu el la gvidaj SS-kontrolistoj diris: „Post kiam la bruliga operaco finiĝis, la komandisto de la neniigejo Bełżec, Hering, estis forigita. Mi tiam ricevis de Wirth la ordonon fini la malkonstruon de la neniigejo, kiu estis komencita sub Hering, ebenigi kaj priplanti la terenon. Fine de marto/komence de aprilo 1943 tiu ordono estis plenumita. Por efektivigi tiun laboron estis je dispono: Iu restanta parto de la germana stabo, inter ili Dubois kaj Jührs, la ukrainaj gardistoj kaj 300 ĝis 350 judaj laboristoj. Al tiuj judoj oni certigis, ke ili restos vivaj kaj ke post la malkonstruo de la neniigejo Bełżec ili povus iri al labortendaro de la propra elekto, kvankam ili havis nur la elekton inter la koncentrejoj de Lublin, Trawniki kaj Budzyn. Fakte la aferoj evoluis malsame. Ĉirkaŭ 14 tagoj antaŭ ol la laboroj definitive finiĝis, aperis, frumatene, subite kaj sen antaŭa averto, la inspektisto de la tri neniigejoj, Wirth. Samtempe en la koncentrejo alvenis trajno kun ok aŭ naŭ vagonoj.

[31] La ciferoj pri Sobiboro ege varias, ekzakte kalkulo de la nombroj ne eblas: Dum Hermann Bauer parolis pri 360 mil, Karl Frenzel menciis la nombron de 160 mil. En la tiel nomata telegramo Höfle, per kiu estas raportita la nombro de la murditoj en la ekstermejoj, ĝuste 101.370 judoj estis mortigitaj por Sobibor fine de 1942. En la tiel nomata telegramo de Höfle fine de 1942 estis indikitaj 101´370 mortigitaj judoj en Sobibor. En eldonaĵo de 2011 Dieter Pohl supozas entute 152 mil viktimojn. Surbaze de propraj esploroj Jules Schelvis indikis 180 mil mortigitajn judojn en Sobiboro ĝis aŭtuno 1943. En 2017 Stephan Lehnstaedt prezentis lastatempajn esplorrezultojn de Robert Kuwałek kaj Sara Berger, kiuj supozas minimume 179´618 ĝis maksimume 238´900 viktimojn en Sobiboro. Lau nacioj ekzistas jenaj ciferoj: Pollando: pli ol 158 mil (postvivantoj: 45), Nederlando: pli ol 34 mil (pv: 2), Ĉeĥoslovakio: pli ol 30 mil (pv: 1) , Sovetunio: pli ol 13 mil (pv: 9), Germanio: pli ol 10 mil (pv: 0), Francio: pli ol 5 mil (pv: 1).

Wirth klarigis, ke la judoj nun iros al la tendaroj, kiujn ili elektis, kaj ordonis, ke ĉiuj judoj estu lokitaj en la trajnon.“

Ili estis transportitaj al Sobiboro. Kiam ili alvenis al la ranĝoplaco ekster la koncentrejo, ili jam sciis, kial oni alportis ilin ĉi tien: la nomo estis konata eĉ en Bełżec. Ili decidis, ke ili prefere estu mortpafitaj anstataŭ esti gasumitaj. Ĉar la SS supozis, ke ilia konduto povas kaŭzi grandajn problemojn en kazo de kontakto kun la laboristoj de la koncentrejo, oni decidis mortpafi ilin ankoraŭ sur la ramplo. La anoj de la stacidoma taĉmento devis veturigi la mortpafitajn homojn per relĉaro al la lagro III, kie ili estis transprenitaj de la tieaj laboristoj kaj pluportitaj al la bruligejo. Antaŭ tio la mortintoj estis senvestigitaj; kio estis utiligebla, estis ĵetita en la reordigajn barakojn. La vestaĵoj, kiuj estis truigitaj de kugloj, estis portitaj al speciala fosaĵo por bruligi rubaĵon, kiu troviĝis inter lagro II kaj lagro III.

En la vestaĵoj de la viktimoj estis trovitaj paperetoj, sur kiuj oni povis legi interalie: „Ni laboris unu jaron en Bełżec kaj ne sciis kien oni sendos nin. Oni asertis, ke ni venos al Germanio. Tial ni ricevis panon, konservojn kaj vodkon por tri tagoj. Sed ĉio tio estis mensogo. Ni nun troviĝas en Sobiboro kaj scias, kio atendas nin. Komprenu fine, ke post ni la morto atendos ankaŭ vin. Venĝu nin!“

(…)

Ĉi tiuj eventoj restis neforviŝeble fikstaj en la memoro de la laboristoj de la koncentrejo de Sobiboro kaj ŝvebis ankoraŭ klare antaŭ iliaj okuloj, kiam la onidiroj pri la malfondo de la koncentrejo iom post iom disvastiĝis. Kun la paso de la tempo Ili alkutimiĝis elteni preskaŭ ĉion - kun unu escepto: esti senditaj en la gasĉambron.

La onidiroj daŭris. Iu memoris, ke Johann Klier, unu el la pli moderaj SS-uloj, mallonge antaŭe aludis la fermon de la koncentrejo; do la onidiroj evidente ne estis tute senbazaj. Kompreneble ili ne povis scii, ke la 5an de julio 1943 Himmler skribis sekretan leteron al Oswald Pohl, estro de la Ĉefa Oficejo de la Ekonomia Administracio de la SS en Berlino, kaj al pluraj altrangaj estroj de la SS kaj de la polico kun jena enhavo:

1. La transira lagro[32] Sobiboro en la distrikto Lublin estas transformota al koncentrejo. En la koncentrejo Oni devas starigi malmuntan laborejon por predita municio.

2. Ĉiuj altrangaj estroj de la SS kaj de la polico devas liveri la tutan preditan municion tien, se ĝi ne estas bezonata por la municiado de preditaj kanonoj, kiuj estas en uzado.

3. Metaloj kaj precipe eksplodaĵoj devas esti uzataj prudente.

4. Samtempe en tiu koncentrejo oni devas starigi produktejon por niaj multoblaj ĵetiloj aŭ alia municio.

SS-ĉefgrupestro Pohl, kiu respondecis por la ekonomiaj aferoj en la koncentrejoj, respondis la 15an de julio 1943: „Laŭ via ordono supre, la transira lagro de Sobiboro en la distrikto Lublin estas transformota al koncentrejo. Mi diskutis kun SS-grupestro Globocnik pri tio. Ni ambaŭ proponas al vi rezigni pri la transformado al koncentrejo, ĉar la celo, kiun vi devas atingi, nome: starigi malmuntejon por predita municio, estos atingita ankaŭ sen tia transformo. Ĉio alia laŭ supra ordono povas resti tiel. Mi petas vian aprobon, kiu havas signifon nur por grupgvidanto Globocnik kaj mi.“

Himmler konsentis pri la propono de Pohl kaj sciigis lin en la 24-a de julio tra lia persona adjutanto Brandt: „La Reiĥgvidanto-SS konsentas pri la propono, kiun vi kaj SS-grupestro Globonik faris koncerne la konservadon de la transira lagro Sobiboro en la distrikto Lublin en la nuna stato, laŭ kiu la dezirata celo estos atingita tiamaniere.“

La onidiroj pri ebla likvido de la koncentrejo restis eĉ tiam, kiam dum la somero komenciĝis la konstruado de iuj parte subteraj bunkroj kaj la starigo de barakoj en la norda parto de la koncentrejo, kio signifis konsiderindan grandiĝon de la koncentrejo je ĉirkaŭ 20 hektaroj. La parto ĉirkaŭata de barilo

[32] La germana termino „Durchgangslager“ devis ĉi tie esti tradukita esceptokaze per lagro, ĉar la traduko uzas ĝenerale la vorton „koncentrejo“ por „(Konzentrations)Lager“ kaj la vorton „lagro“ por unuopaj partoj, ekzemple lagro I, lagro II, lagro III ene de la koncentrejo mem. Por Bełżec, Sobiboro kaj Treblinko povas esti uzata la vorto „neniigejo“ aŭ „esktermejo“. La vorton „tendaro“ mi ĝenerale evitis uzi.

kun aldona pikdrato nomiĝis norda lagro aŭ lagro IV. (...) Per tio la premo de baldaŭa likvido, kiu minacis la judajn malliberulojn, estis dume forprenita de ili.

Jam monatojn antaŭ ol la onidiroj komencis cirkuladi, kelkaj deciditaj viroj sekrete kunsidis por diskuti la eblojn kiel eskapi el la koncentrejo kun kiel eble plej multaj samsortanoj. „Ni sciis kun certeco, ke nia fino alproksimiĝas. Ke oni likvidos nin laŭ simila maniero, kiel oni faris tion kun la laboristoj de la neniigejo en Bełżec. La jaro estas 1943 kaj la monato ĉirkaŭ junio. Kelkaj el ni komencis pensi pri organizado de ribelo. Laŭ kiu maniero ili mem ne sciis. Fakte ili pensis laŭte kaj ne kaŝis siajn pensojn al siaj kamaradoj. Ĉar en tiu tempo oni ankoraŭ pensis, ke ĉiu judo, kiu troviĝas en la koncentrejo, havas la saman opinion. Oni estis certa, ke la sperto instruis ilin, ke al ni restis nur unu sola kaj lasta vojo. Tio estis la vojo de la ribelo. Mi estas certa, ke neniu el ili eĉ nur sonĝis pri tio, ke la ribelo povus sukcesi. Ilia deziro estis morti kiel herooj, venĝi sin, eĉ se la venĝo estis nur malgranda.“

Iom post iom kreiĝis subtera komitato, kiu konsistis el dek ĝis dek du homoj. La estro estis Feldhendler el Krasnystaw en Pollando, kiu estis deportita al Sobiboro komence de 1943 – alta, belaspekta viro, kiu postulis respekton de la homoj, kiuj venis en kontakto kun li. Li laboris en la nutraĵbarako, tiel ke li povis bone manĝi kaj havi sufiĉe da energio por pripensi la aferojn kun klara menso.

La leteroj de Bełżec signifis por li la ´mene tekel´[33] por trakti serioze la fuĝajn planojn. Krome la heroa ribelo en la Varsovia geto kaj la eventoj okazintaj dum la ribelo en Treblinka komence de aŭgusto penetris ĝis Sobiboro. Sed al li kaj liaj kolegoj mankis strategia kompreno kaj idea riĉeco por atingi akcepteblan planon. La problemoj, kiuj devis esti konsiderataj kaj solvitaj, estis tro ampleksaj kaj komplikaj. Mankis homo, kiu scipovis konstrui funkciantan reton. Tial ekzistis komence nur kelkaj malprecizaj planoj.

La cirklo ĉirkaŭ Feldhendler devis esti malgranda, ĉar la laboraj malliberuloj en Sobiboro ne formis homogenan grupon, al kiu oni povis blinde fidi. Li devis elekti siajn kunbatalantojn prudente. La plej multaj laboraj malliberuloj estis hazarde selektitaj. Pro la maniero de la selektado nur la plej malmultaj konis unu la alian. Se ĝi ne nepre bezonis fakulojn, la SS elektis junajn kaj sanajn virojn kaj virinojn. Surbaze de tiu procedo la laboraj malliberuloj havis nur unu aferon komuna: ili estis judoj. Tamen ĉi tiu ligo montriĝis tro malforta por kunigi ilin kiel solidan unuon.

Tiuj, kiuj estis selektitaj, ne atendis, ke ili subite estos forlasitaj de la familia rondo. De unu minuto al la sekva ili vidis sin retroviĝi, tute solaj, en mortiga ĉirkaŭaĵo. Ĝenerale validaj normoj evidente perdis sian valoron dumnokte. Ĉiuhore, ĉiutage oni devis batali denove por la propra vivo per ĉiuj rimedoj, kiujn oni posedis. En tio la laboraj malliberuloj ne estis pli bonaj aŭ pli malbonaj ol aliaj, kiuj troviĝis en komparebla situacio. En ĉio, kion ili faris kaj kio okazis, ili havis nur unu penson: Kiel mi povas pluekzisti ĝis morgaŭ, eĉ se tio ne eblas alimaniere aŭ je la kostoj de aliaj. Tial Feldhendler kunvenigis nur malgrandan grupon de konfiduloj. La demando estis kiom longe Sobiboro ankoraŭ ekzistos. La germanoj jam parolis eŭfemisme pri „juda regno“ en la arbaro. Ili sentis, ke la tago, kiam la koncentrejo fermiĝos, pli kaj pli proksimiĝis. La sola demando estis, ĉu la SS ankoraŭ bezonis judojn por ordigi municion en la lagro IV aŭ ne.

Per la alveno de transporto el Sovetunio la 22an de septembro 1943 la situacio subite ŝanĝiĝis. Inter la 2000 judoj el Minsko troviĝis ĉirkaŭ 100 militkaptitoj, el kiuj Aleksandro Peĉerskij estis unu el la plej maljunaj. Li naskiĝis en Kremenĉug, Ukrainio, en 1909, kiel filo de juristo, kaj havis du fratojn kaj unu fratinon. La jida estis parolata hejme, sed li ankaŭ parolis la rusan lingvon. Ĉar liaj gepatroj havis limigitan enspezon, li forlasis la lernejon en la aĝo de 16 jaroj kaj iris labori en komerca entrepreno. En sia libera tempo li frekventis muzikan lernejon kaj ludis en amatora teatro. Poste li verkis teatraĵojn kaj komponis ankaŭ ĝian muzikon. Kiam la milito eksplodis en 1941, iu teatra grupo preparis la prezentadon de unu el liaj teatraĵoj. La sekvan matenon li iris al la fronto en la rango de leŭtenanto. Intertempe li edziĝis kun ne-juda virino; ambaŭ havis filinon, kiun ili nomis Elza. En oktobro 1941 li ricevis la ordonon liberigi la komandanton de sia regimento de germana encirkligo proksime de Vjazma. Dum tiu operaco li estis kaptita kune kun sia unuo. En majo 1942 li provis forfuĝi, sed denove falis en la manojn de la germanoj. Kiel puno li estis sendita al la koncentrejo en Borisovo. Medicina esploro tie

[33] Pri la signifo vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Menetekel.

evidentigis, ke li estis cirkumcidita. La 20an de aŭgusto 1943 li estis sendita kune kun aliaj judaj soldatoj al la fifama SS-prizono ĉe la Ŝeroka-strato en Minsko,[34] kie ili devis fari pezegan laboron. La 18an de septembro, li kaj la aliaj soldatoj estis fortransportitaj kune kun la judoj de la geto de Minsko. La komandisto de la koncentrejo trompis ilin promesante, ke ili iros labori al Germanio kaj, se ili bone laboros, ili povus esti liberigitaj poste. Ili, t.e. 70 ĝis 80 homoj veturis en densaj grupoj dum kvar tagoj sen manĝi aŭ trinki. Iom post iom ili konstatis, ke ilia celo ne estos Germanio. Tra la fenestro de la vagono, ĝuste antaŭ Sobiboro, Peĉerskij vidis kelkajn kamparanojn labori en la proksimeco. Ili sciis, kio okazas en la koncentrejo kaj volis montri tion per adekvataj gestoj ĉe siaj koloj por indiki, ke homoj tie estas mortigitaj. Peĉerskij ne konis la geston kaj ne atentis ĝin. Vespere la 22an de septembro 1943 la trajno haltis ĉe la rangĝplaco de Sobiboro. Ĉar estis tre malfrue, la administrantoj de la koncentrejo ne plu emis „trakti" la transporton kaj decidis, ke la kaptitoj pasigu la nokton en la vagonoj. La sekvan matenon, la parto de la trajno, kiu enhavis militkaptitojn, estis veturigita en la internon de la koncentrejo, senigita de la ceteraj. Kiam ĉiuj estis sur la ramplo, ili estis dividitaj laŭ grupoj kaj alportitaj al la lagro II. Tie Frenzel ordonis, ke ĉarpentistoj kaj lignaĵistoj paŝu el la vico antaŭen. Tiajn li bezonis por povi rapide fini lagron 4. Peĉerskij lernis kiel politika komisaro de la Ruĝa Armeo, ke militkaptitoj devas respekti iujn ne skribitajn leĝojn, t.e. anonci sin, kiam laboristaj estas serĉataj. Tial li estis la unua, kiu proponis sin al Frenzel. Apenaŭ iu el la soldatoj estis ĉarpentisto aŭ lignaĵisto, sed la plej multaj el ili paŝis el la vico antaŭen. Frenzel elektis okdek virojn. La resto, inter kiu troviĝis ankaŭ soldatoj, estis gasumita mallongan tempon poste. Tion Peĉerskij eksciis nur poste.

Li estis la sola el la militkaptitoj, kiuj konservis sian malnovan uniforman jakon. Laŭ ĝi la aliaj povis rekoni, ke li estas oficiro. Por la soldatoj sen aŭ kun subordigita rango li restis ankaŭ en Sobiboro leŭtenanto de la Ruĝa Armeo kaj eĉ en ĉi tiuj cirkonstancoj ilia ĉefo, ne nur pro sia rango. La maniero kiel li elpaŝis kaj liaj konoj pri la homa naturo faris lin homo estimata kaj respektata. Liaj instrukcioj kaj ordonoj estis sekvataj kaj obeataj kvazaŭ ili estis normalaj.

Wagner rekomendis al Frenzel mortigi la rusojn tuj post ilia alveno, sed li argumentis, ke li bezonas ilin en la lagro I.

(...)

Feldhendler kaj la membroj de la komitato rigardis la sovetianojn kiel donacon de la ĉielo. Al tiu malgranda grupo de malinstruitaj viroj, kiuj antaŭe forĝis nur planojn, subite malfermiĝis novaj perspektivoj. De tiu momento kaj per la helpo de tiuj soldatoj, ili eble kapablis realigi, kion ili volis jam delonge: instigi ribelon kaj liberigi sin de la germana jugo. Subite aperis inter ili viroj kun iniciato, militspertoj kaj kuraĝo, kiuj, kiel oni esperis, povas gvidi bone preparitan ribelon.

En la pasinteco jam okazis kelkaj individuaj provoj de fuĝo, sed ili estis nur unuopaj kaj sen la dezirata sukceso. La alveno de la sovetianoj vekis novajn atendojn. Espero disvastiĝis. Gravis nun ne atendi tro longe antaŭ ol fari la necesajn kontaktojn. Freihendler procedis singarde kaj post kelkaj tagoj organizis interparolon en la virina barako, al kiu li invitis krom Peĉerskij ankaŭ kelkajn aliajn rusojn.

Kiam ili renkontiĝis unuafoje, Feldhendler parolis la jidan, kion Peĉerskij apenaŭ komprenis. Tio kaŭzis suspektemon kaj miskomprenojn, ĉar la jida estis karakterizaĵo de la orienteŭropaj judoj. Ili kredis, ke oni ne povas esti judo, se oni ne parolas la jidan. Sed en ĉi tiu kazo tiu supozo montriĝis erara, kiel cetere ankaŭ ĉe la judoj el okcidenta Eŭropo. Sed Feldhendler parolis ankaŭ la rusan, tiel ke la lingvo ne estis baro.

Kvankam virinoj ne apartenis al la komitato, ili estis, sen scii precize kial, kaptitaj de la fakto, ke la koncentrejo nun ankaŭ estis loĝata de kelkdek soldatoj. Intuicie ili sentis sin iom pli bone protektataj kaj pli fortaj kontraŭ la SS. Per la helpo de lia amiko Lajtman ili demandadis Pecerski kaj la aliajn rusojn en la jida pri la evoluo de la milito, la situacio ekster la koncentrejo kaj la antaŭeniro de la Ruĝa Armeo. Ili volis scii, kion li pensas pri atako de partizanoj, kiuj same kiel ĉie en Pollando ankaŭ

---

[34] La 20an de aŭgusto 1942 Peĉerskij estis sendita al la SS-labor-koncentrejo ĉe la strato Ŝeroka (t.e. Ŝirokaja, nuntempe str. Kujbiŝeva) en Minsko. En ĉi tiu prizono de la germanoj estis retenitaj ĉirkaŭ kvincent judoj de la Minska geto, same kiel judaj militkaptitoj. Alia terura koncenrejo trovigis ce la Volodarski-strato. Fine de junio 1944, kelkajn tagojn antaŭ la liberigo de Minsko fare de la Ruĝa Armeo, sur la teritorio de la koncentrejo Trostenec apud Minsko 6500 malliberuloj, alportitaj de la malliberejoj ĉe la stratoj Volodarski kaj Ŝirokaja, estis mortpafitaj kaj poste bruligitaj.

operacis en la ĉirkaŭaĵo de la koncentrejo. Li atentigis ilin, ke la partizanoj unuavice devas plenumi siajn militajn taskojn kaj ne povas riski sian vivon por helpi al kelkcent judoj, precipe se ili scias – kaj kial ili ne sciu tion – ke la koncentrejo estis minita ĉirkaŭe. „Se io okazu, tiam la iniciato devos veni de ni mem. Ni certe scias plej bone, kia estas la situacio ĉi tie.“

La vortoj de Peĉerskij faris impreson, kaj ĉiu komprenis ilian sencon: De homoj ekster la koncentrejo oni povis atendi nenion. Feldhendler volis dume kaŝi la fakton, ke li estis la iniciatinto de subtera organizo, kaj li kaŝis ankaŭ sian identecon, komence ŝajnigante esti Boruĥ, filo de rabeno. Krome li bone enmemorigis la rimarkon de Pecerski: La iniciaton devas havi la malliberuloj mem.

Post kiam li estis informita pri la situacio en la koncentrejo, Peĉerskij unue estis kontrolata de Feldhendler koncerne lian fidindecon, ĉar en Sobiboro, kie regis ĝenerala malfido inter la judoj, la polaj judoj suspektis tiujn el Germanio, Aŭstrio kaj Nederlando. La nederlandanoj, kiuj ne parolis la jidan nek la polan, malfacile povis komprenigi sin. Ili ankaŭ ne estis akceptitaj en la komitaton kaj ne devintus aŭdi pri la preparoj. Precipe kontraŭ la germanaj judoj ekzistis antipatio. La polaj judoj malfidis ilin, ĉar ili opiniis, ke mense ili ne sufiĉe distanciĝis de siaj ekzekutistoj. Ili pensis, ke pro siaj origino kaj lingvo kaj male al la aliaj ili ĝuis ian favoron ĉe la SS. Kun iu „kapo-o“ el Berlino, kiu estis nomata „berlinano“, la malliberuloj faris malbonan sperton. Evidentiĝis, ke li spionis por la germanoj. Pro memprotekto kaj por malhelpi pli da malbono, iuj malliberuloj mortigis lin. Alia „kapo-o“, nomata Spitz, erare estis konsiderata kiel denuncanto.

Ekzistas la riproĉo, ke pro la neadekvata malfido rilate al la nederlandaj judoj, kiuj estis en Sobiboro jam pli longe, okazis, ke la militon postvivis ne pli ol du el ili. La plej multaj ne povis profiti la okazon fuĝi, kiam la ribelo eksplodis, tute neatendite por ili.

La sekvan vesperon la konversacio estis daŭrigita en la virina barako, kaj iom post iom estiĝis konfidenca klimato. La maniero de Peĉerskij paroli, liaj konduto kaj natura aŭtoritato super la aliaj soldatoj konvinkis Feldhendler-on, ke Peĉerskij kapablas konstrui kompletan organizon. Li esperis, ke li povos gvidi ribelon kun posta amasa fuĝado laŭ armeeca maniero kaj sukcesigi ĝin. Li miris, ke la soldatoj, aŭ almenaŭ parto de ili, ne fuĝis jam delonge.

Komence de oktobro, Peĉerskij formis armeecan grupon, kiu inkluzivis Aleksandron Ŝubajev, Boris Cybulskij, Semjon Rozenfeld, Semjon Mazurkeviĉ kaj Ŝlomo Lajtman. Ili estis en konstanta kontakto dum la konstruado de la barako en la norda lagro, same kiel dum la manĝado kaj dormado. Ili diskutis eblecojn de la fuĝo, ĉar ili ne volis atendi la momenton, kiam ili ankaŭ estos senditaj en la gasĉambrojn.

Kiam Feldhendler estis sufiĉe konvinkita pri la fidindeco kaj volemo de Peĉerskij kunlabori, li demandis lin, ĉu li volas aliĝi al la subtera organizo. Feldhendler diris, ke la celo estas fuĝi kun eble plej multaj homoj samtempe. Li diris, ke oni jam ofte pensis pri fuĝado kaj simple ne scias kiel organizi ĝin. Oni obeos al Peĉerskij kiel oficiro de la Ruĝa Armeo. Ekde nun ne plu estu entreprenataj individuaj provoj de fuĝado. Ĉiuj respondecas pri ĉiuj. Se iu fuĝus, la koncentrejo estus certe likvidita kaj ĉiuj malaperus en la gasĉambroj. Oni ne devus riski tion.

Antaŭ ol Peĉerskij volis decidi, Feldhendler devis detale raporti al li, kion oni devas konsideri por la fuĝoplano. Li ricevis informojn pri la minkampo ĉirkaŭ la koncentrejo, la pikdratbarilo, la ŝanĝo de la gvardio, la armado de la ukrainoj, la loko de la armila deponejo kaj pri aliaj gravaj detaloj. Post tiu detala interparolo, Peĉerskij petis tempon por pripensi. Li volis ĉion, kion li aŭdis, unue digesti, orientiĝi kaj ne paŝi sur tro maldikan glacion. Li ankaŭ devis interkonsiliĝi kun sia propra grupo pri la demando, ĉu ĉiuj disponeblaj fortoj alianciĝu. Pri tio ne ekzistis opiniaj diferencoj. La devizo estis: kune ni estas pli fortaj.

Fine de la sekva labortago Peĉerskij vizitis la virinojn denove en ilia barako. Estis interkonsentite, ke tie okazu pluaj diskutoj kun Feldhendler. Por kaŝi, pri kio estis parolata, ili unue parolis pri relative malgravaj temoj en la ĉeesto de la virinoj. Kiam oni traktis la planadon, ili retiriĝis al angulo de la barako, kie ili povis malkaŝe diri, kion ili pensis. Kiel alibio por la virinoj, kiuj estis sen imago pri kio vere okazas, Peĉerskij kontaktis junan virinon, kiun li volis havi proksime post la laboro. Per tio li volis doni la impreson al la aliaj, ke li havas rilaton kun ŝi.

Ŝi naskiĝis en 1914 en Dortmundo. Antaŭ la eksplodo de la milito ŝi fuĝis al Nederlando kune kun siaj edzo kaj patrino, post kiam ŝia patro faris bombatakon. Ŝia fraŭlina nomo estis Gertrude Schönborn; post la edziniĝo kun nederlandano ŝi adoptis la nomon Gertrude Poppert. Ĉar estis pli facile por Peĉerskij, ŝi uzis la rus-sonan nomon „Luka“. Krom la germana kaj la nederlanda ŝi parolis neniun alian lingvon, tiel ke ŝi ne povis sekvi la konversaciojn, kiujn li havis. Tio ankaŭ devis esti tiel, ĉar ĉio, pri kio oni diskutis, devis resti sekreta por ŝi. Dumtage ŝi prizorgis la kuniklojn en la lagro II kaj vidis tra la fendoj en la ligna muro kaj tra la pikdrata barilo, kiu estis plektita per abiaj branĉetoj, kiel la nudaj homoj estis pelitaj en la gasĉambrojn sub laŭtaj ordonoj. Kompreneble ŝi sciis kien ili iras.

Tiun nokton Peĉerskij diskutis ĉion, kion li aŭdis, kun sia amiko Ŝlomo Lajtmann, veninta el Minsko per pli frua transporto. Lajtman estis varsovia judo, kiu fuĝis post la germana invado al Sovetunio kaj dume finiĝis en la sama minska koncentrejo kiel Peĉerskij. Tie ambaŭ interamikiĝis. Sobiboro estis la loko, kie ili denove renkontiĝis. Dum kelkaj noktaj konversacioj ili ellaboris planon, kiu jam estis praktikata en aliaj koncentrejoj kaj kiu ŝajnis esti realigebla: la eskapo tra tunelo. En la lagro III simila projekto jam malsukcesis pro perfido. La plano de Peĉerskij estis fosi 35 metrojn longan koridoron ekde la lignaĵejo en la lagro I, kiu situis proksime de la pikdrata barilo. Por eviti, ke ĝi subakviĝos, oni ne povis fosi tro profunde. Ekster la koncentrejo la tunelo tamen devis esti pli ol 30 centimetrojn sub la tero, ĉar tie minoj estis enterigitaj. La tunelo devis havi diametron de 75 centimetroj, tiel ke ĉe longeco de 35 metroj oni devis movi ĉirkaŭ 20 kubajn metrojn da tero. La elfosita tero devis esti kaŝita ie; devis esti trovita ankaŭ iu solvo koncerne la riskon, ke la tunelo povus disfali, ĉar neniu apoga ligno estis havebla. Laŭ kalkuloj, la konstruado de la tunelo devas daŭri 15 ĝis 20 tagoj.

Tamen ne eblis konstrui la subteran pasejon, ĉar la areo estis tro marĉa; la tunelo ankoraŭ estus pleniĝinta per akvo dum la elfosado. La longeco ankaŭ kaŭzis problemojn. Por ne trafi la areon de la minoj, la tunelo devis esti ĉirkaŭ 50 metrojn longa, kaj eĉ tiam ĝi ne estus fininta en la arbaro. Krome nur limigita nombro da homoj estus povinta rampi tra ĝi en la malmultaj noktaj horoj. Kaj kiu estus volinta decidi pri la vico ? Kiel en ĉiuj koncentrejoj ekzistis pli malpli famaj homoj. Enorma kaoso estus okazinta en malmulta tempo.

Kiel do devis aspekti taŭga anstataŭa plano ? Kiel ĉiuj aŭ almenaŭ kiom eble plej multaj malliberuloj ricevu la ŝancon eskapi en mallonga tempo ?

La loko, kie Peĉerskij kaj lia grupo devis labori en la lagro IV, situis ĉirkaŭ 100 metrojn oriente de la lagro III. Baldaŭ post kiam li komencis labori en la unua tago, li aŭdis en la malproksimo la gakadon de anseroj, kiuj venis de iu stalo en la lagro II kaj estis pelitaj en la lagron III. Nova transporto alvenis. La bestoj estis tenataj por supersoni la kriojn de la viktimoj en la gasĉambroj. El la gakado Peĉerskij aŭdis la vokon de infano: „Panjo, panjo!“ Poste li aŭdis la kriadon de virinoj. Terura timosento kaptis lin. Ne pro la propra vivo, sed pro la senpoveco rilate al ĉiuj teruraj aferoj okazintaj en Sobiboro. En sia menso li vidis la propran filinon Elsa stari tie. En ĉi tiu momento li havis vizion. Subite li komprenis, ke la ribelo ne limigu sin al la eskapo. La SS devis en la vera senco de ĉi tiu vorto esti kontraŭbatalata per la propraj armiloj; ĝi devis esti mortigita por liberigi la vojon por amasa forfuĝo. En ampleksa kaj fulmrapida operaco.

Dum multaj noktoj li traludis kun Lajtman la eblojn. Fino ili elpensis ege komplikan kaj aŭdacan planon, kies kerna punkto estis, ke ili devos logi ĉiujn SS-ulojn en la labor-barakojn aŭ proprajn oficejojn per unuopaj operacoj por silente mortigi ilin tie per tranĉiloj aŭ hakiloj. Ĉi tio devis okazi ene de unu horo, tiel ke la iompostioma malaperado de la SS-personaro ne tuj veku la suspekton de la aliaj. La operaco devis okazi absolute sekrete, tiel ke ĝin ne rimarku ne nur la suspektemaj SS-viroj en la koncentrejo kaj la ukrainoj ekstere, sed ankaŭ la ceteraj malliberuloj. Ankaŭ ĉe ili paniko ne eksplodu. Dum kiam estis mortigitaj kiel eble plej multaj SS-membroj, la plano antaŭvidis, ke en anticipe fiksita loko estu alprenitaj SS-uniformoj, kiujn la sovetianoj surmetu por ŝajnigi en la decida momento, ke ili estas nazioj. La operaco devis disvolviĝi tiel, ke dum la normala apelo inter la ukrainoj ĉirkaŭ la koncentrejo kaj sur la gardoturoj ekestu la impreso, ke nenio speciala okazis. La malliberuloj devis ricevi la ordonon de la maskitaj SS-viroj, ke ili forlasu la koncentrejon laŭorde kaj konforme al la kutimaj reguloj tra la ĉefa pordego por labori ekster la dratbarilo. Kaze ke la ukrainoj tamen fariĝos suspektemaj, la membroj de la komitato esperis, ke ili retenos sin. Por la germanoj ili ĉiam estis necerta faktoro, pro

kio ili ricevis dum sia deĵoro nur malmultajn kartoĉojn. Tamen oni devis enkalkuli, ke la ukrainoj rezistos; ne eblis antaŭdiri, kiun flankon ili elektos.

Neantaŭvideblan riskon prezentis la lagro III: Ne estis eble forlogi la tie ĉeestantajn SS-ulojn kaj la ukrainojn, ĉar tiu parto estis apartigita de la cetera koncentrejo. Se ili ekscius, ke ribelo eksplodis en la aliaj partoj de la koncentrejo, ili sendube alrapidus helpi kaj utiligus siajn pafilojn. La strikte izolitaj laboristoj en la lagro III dekomence ne povis esti savitaj – dolora kaj neeltenebla penso por la organizantoj. Fine oni devis konsideri, ke estos dekoj, eble eĉ centoj da viktimoj, se la operaco ne tute sukcesos. Peĉerskij kaj Lajtman detale pripensis ĉiujn eblajn problemojn. Peĉerskij klarigis en Rostovo en 1984: „Mia celo estis unue mortigi la faŝistojn, kiuj jam murdis tiom da judoj en Sobiboro. Eble tiam nur dek aŭ dek kvin el ni estus povintaj eskapi kaj atingi la liberecon. Por esti honesta mi ne tro fidis mian planon, sed mi ne parolis kun la komitatanoj pri tio. Mi volis doni al ili la impreson, ke ili ne estas senpovaj kaj doni la senton, ke ni kapablas ribeli kaj fuĝi. Por la momento nur mia amiko Lajtman eksciis pri la plano. Mi sciis, ke li estas silentema, forta kaj inteligenta homo. Post longa meditado ni decidis prezenti  la preskaŭ detalan planon al Feldhendler kaj al kelkaj membroj de la komitato. Por la kazo, ke la plano realiĝos, mi starigis firman kondiĉon: Mi postulis, ke la SS-ulojn devos mortigi nur homoj, kiujn mi persone nomis. Mi volis, ke la eliminado estu farata de malgrandaj grupoj de nur kelkaj viroj kaj ke la povon de la komando havos sovetia soldato. Mi postulis tion, ĉar mi konis la karakteron de niaj viroj. Estis klare al mi, ke la tuta ribelo povus fiaski, se en la decida momento ekzistis unusola mano, kiu tremis. Ununura krio povis kaŭzi panikon. Post tio jam ne estas eble restarigi trankvilon en la koncentrejo. Mi ankaŭ faris la jenan kondiĉon: Mi interkonsilos kun vi pri ĉio, kion mi konsideras necesa. Mi konsideros vian opinion, sed mi havas la lastan vorton. Se en la fino mi diros, ke ĝi devas esti farita tiel kaj ne aliel, tiam ĝi devas esti farita tiel."

La komitato kunvenis la 12an de oktobro en la laborejo de la lignaĵistoj. Estis sep homoj: Peĉerskij, Lajtman, Feldhendler – kiun Peĉerskij ankoraŭ konis sub la nomo Boruĥ – kaj la estroj de la tajloroj, ŝuistoj, ĉarpentistoj kaj teknikaj vartistoj. Kelkaj konfidinduloj garde staris apud la barilo de la lagro I por sonorigi alarmon en kazo de neceso. Peĉerskij ekparolis. Unue li klarigis al la ĉeestantoj, ke al la trajtoj de la germanaj avideco kaj akurateco li donis gravan lokon en siaj planoj. Al la avideco, ĉar la SS-uloj akaparis la plej bonajn vestaĵojn kaj ŝuojn, kiujn la viktimoj postlasis kaj kiuj devis estis laŭmezure adaptitaj de taŭgaj metiuloj. Kiam ili iris feriadi hejmen, ili kunportis multajn valizojn kun belaj vestaĵoj kaj ŝuoj por siaj edzinoj. Ilia alia trajto, la akurateco, ankaŭ devis ludi rolon. La germanoj lernis aperi absolute ĝustatempe en interkonsentita renkontiĝo. Krom la elemento de la surprizo, ĉi tiuj du trajtoj estis la esenca bazo de la plano.

La 13a de oktobro 1943 estis decidita kiel tago kiam la ribelo okazos. Oni eksciis, ke en ĉi tiu tago mankos en la koncentrejo ne nur Gustav Wagner, la plej danĝera SS-viro, sed ankaŭ komandanto Reichleitner mem, kiuj forestos kelkajn tagojn, kaj ke Hubert Gomerski, unu el la plej brutalaj SS-viroj, ferios, same kiel Bolender kaj Klier. Antaŭ ĉio la foresto de Wagner, kiu konstante gvidis la koncentrejon kiel ĉefserĝento, ŝajnis tre grava, ĉar li estis ne nur la plej kruela, sed ankaŭ la plej inteligenta el ĉiuj. Frenzel, la anstataŭanta ĉefserĝento, estis same danĝera kaj ne estis malpli brutala ol Wagner. Sed al li klare mankis la inteligenteco. Dank´ al lia altevoluinta kapablo de la observado li estus rimarkinta, ke iu malbono minacas eĉ antaŭ la komenco de la ribelo je la 16a horo. Malgraŭ la malmultaj, kiuj estis informitaj, li estintus la sola el la tuta trupo, kiu rimarkis, ke en la koncentrejo regas nepriskribebla etoso. La foresto de Wagner do pliigis la ŝancojn de la sukceso de la ribelo. Ĉar li devis reveni la 15an de oktobro, la ribelo devis okazi la 13an aŭ plej malfrue la 14an (kiam cetere estis Sukoto laŭ la juda kalendaro).

La efektiva fuĝo, kiel estis decidite, devis komenciĝi je la kvina horo vespere, je la fino de la labortago kaj en la momento, kiam oni vokas al la apelo. Ĉi tiu tempo estis elektita, ĉar baldaŭ poste komenciĝos la mallumo kaj tiel la proksima arbaro estus al la fuĝintoj je dispono kiel provizora, sed taŭga kaŝejo. La unuaj agoj de la operaco devas komenciĝi je la 16a horo. Peĉerskij devis doni al ĉiu, kiu ricevis la taskon likvidi membrojn de la SS, la komencan signalon. Antaŭ tio la horloĝoj devis esti ŝtelitaj de la deponejo, ĉar ili estis necesaj por indiki al ĉiuj la precizan horon. Ŝubajev, Lerner kaj Vajspapir estis taskitaj mortigi du SS-virojn kaj unu ukrainon en la tajlorejo en la lagro I. Sinsekve devis esti mortigitaj la vickomandanto Johann Niemann, poste Siegfried Graetschus (ankaŭ konata kie Greischütz), la estro de la gardistoj, kaj fine Rai Klatt, la „nacigermana" ĉefgardisto.

Ĉirkaŭ la sama tempo en la lagro I Frenzel devis esti logita sub falsa preteksto en la laborejon de la lignaĵistoj, kie li devis esti mortigita de Rozenfeld. La samo estis planita en la ŝuejo kun la SS-gardistoj Vallaster, Konrad kaj Wolf. Cybulski kaj Kapo-o Griŝa havis la taskon ekzekuti ilin. En la sama parto de la koncentrejo, en la arbara domo, troviĝis la administrejo. Tie Beckmann kaj Steffl devis esti maldanĝerigitaj. Ĥaim Engel kaj la frato de Kapo-o Pożycki estis taskitaj fari tion. Kaj tiel plu aliaj SS-anoj staris sur la listo. Da hakiloj, marteloj kaj laboriloj de la lignaĵistoj ekzistis sufiĉe, ĉar la ĉarpentistoj en la lagro IV bezonis ilin por sia laboro. Krome la viroj en la forĝistejo produktis akrajn tranĉilojn el malgrandaj pecoj de fera lado. En la reordigaj barakoj estis sekrete flankenmetitaj aro da tranĉiloj.

Grava parto de la plano estis la posedo de pafiloj. Peĉerskij supozis, ke la pistoloj de la mortigitaj SS-viroj fariĝos posedaĵo de la sovetrusaj soldatoj, kiuj bone scipovis utiligi armilojn. Ili estis severe gardataj de SS-Oberschargvidanto Dubois en la armila deponejo de la antaŭlagro malantaŭ pikdrato. Gomerski, kiu tiutempe kontrolis krom Dubois la armilan ĉambron, feriis dum kelkaj tagoj, tial do nur unu SS-viro devis esti venkita. Tamen, proksimiĝi al la armila deponejo, enpenetri ĝin kaj akiri armilojn kaj municion signifis por la rusoj enorman defion. Unue, tamen, Dubois devis esti maldanĝerigita, kio estis tre riska operaco, sed rigarde al la urĝa misio akiri la fusilojn ankoraŭ antaŭ la komenco de la ribelo, Peĉerskij konsentis pri la propono de Szmajzner. Tio devis okazi kiel eble plej malfrue, antaŭ ol iu rimarkis, ke kelkaj homoj el la ukraina barako malaperis. La risko esti malkovrita mallonge antaŭ la 16a horo estis plej malgranda. Szmajzner plej multe taŭgis por ĉi tiu tasko, ĉar kiel ĉeflaboristo de la ripara sekcio li rajtis libere moviĝi en la koncentrejo, krom en la lagro III.

Tuj kiam la plej gravaj kaj plej danĝeraj SS-anoj estis eliminitaj, Kapo-oj Pożycki kaj Genjek devis doni la signalon por la apelo kiel kutime en ĉiu tago. Poste, en akompano de rusoj en SS-uniformo, ili devis marŝi en fermitaj vicoj al la ĉefa pordego. Pożycki devis iri antaŭe, survoje iuj rusoj devis eniri la armilan deponejon por akiri pli da pafiloj, kaj fine la posteno ĉe la enirejo devis esti maldanĝerigita. La celo estis forlasi la koncentrejon laŭorde tra la senmina ĉefpordego. La organizantoj esperis, ke ĉe la ukrainoj sur la gardoturoj ne aperos suspekto, pro tio ke la rusoj en uniformo devis doni la ordonojn en germana lingvo. En la kazo, ke la operaco ne disvolviĝos laŭplane, kelkaj viroj de la lignaĵista laborejo devis tranĉi la pkidraton en la lagro I kiel eble plej proksime de la antaŭlagro. Ĉi tiu loko estis fiksita, ĉar tie la risko de minoj estis plej malgranda. Peĉerskij supozis, ke en la intereso de la sekureco de la SS-viroj malantaŭ la SS-barakoj troviĝas malmultaj aŭ neniuj minoj.

La membroj de la komitato aŭskultis la planon de Peĉerskij kun granda aprobo. Ili trovis ĝin genia. Tiel ĝi devas funkcii, kiel aliel? Alternativo ne ekzistis.

Nekalkulebla faktoro estis la konduto de la multaj neinformitaj malliberuloj. Kiel ili reagos, se ili rimarkos, ke parto de la SS estis murdita ? Ĉu pro la surpriza malkovro ili panikos aŭ eĉ ĝojkrios kun la sekvo, ke la sukceso de la ribelo estos en danĝero ? Ĉi tiu necerta faktoro ne ŝanĝis la decidon okazigi la ribelon en la sekva tago. Tio estis la plano.

Feldhendler kaj Peĉerskij sondis ĉe kelkaj viroj, kiuj ankoraŭ ne ricevis taskon en la preparado de la ribelo, ĉu ili pretus transpreni la elŝaltadon de la elektro kaj telefono. De proksima telefona masto ekster la koncentrejo ekzistis konekto al la domo de la komandanto kaj al la administracio en la arbara domo. Ĝi devis esti eksfunkciigita ankoraŭ antaŭ ol la ribelo komenciĝis. Ili taskis du elektrikistojn, de kiuj unu nomiĝis Schwarz, por tranĉi la dratojn je la 16a horo 30 kaj samtempe malŝalti la elektroprovizon, kiu estis generita de agregaĵo. Kurt Thomas estis petita okupiĝi pri Kapo-o Spitz, al kiu oni ne tute fidis, tiel ke li ne havis okazon por veki suspekton. Viroj de la ripara grupo kaj de la laborejo de la lignaĵistoj ricevis la instrukcion pretigi eskalojn, tenajlojn kaj toporojn, por ke ili estu je dispono en la kazo, ke la operaco ne disvolviĝos laŭdezire, por povi eskapi super aŭ sub la dratbarilo.

Kapo-o Pożycki, kiu devis prepari la apelon, ricevis la taskon, post la mortigo de la SS-homoj, doni la signalon per sia fajfilo ĉirkaŭ la kvina horo, kvazaŭ temus pri normala apelo. Tiel la malliberuloj devis veni el ĉiuj partoj de la koncentrejo kaj kolektiĝi sur la placo de la apelo, same kiel ĉiutage. Nur tiam ĉiuj devis ekscii, ke membroj de la SS estis mortigitaj kaj ke okazas ribelo. La komitato devis akcepti, ke en ĉi tiu grava momento ne ĉiuj povos kompreni la kritikan situacion, en kiu ili troviĝas. Tuj kiam oni troviĝos ekster la koncentrejo, ĉiuj strebos forkuri, dum la rusoj provos eksplodigi la minojn por krei fendostrion al la arbaro. Se la ukrainaj gardistoj rimarkos la ribelon pli frue ol antaŭvidite kaj

komencos pafi, la rusoj devos repafi. La nombro de patronoj, kiujn ĉiu ukrainano havis, estis limigita. Dum la ŝanĝo de la deĵorado oni observis, ke la gardisto, kiu estis ŝanĝita, transdonis la patronojn al sia anstataŭanto. Tial Peĉerskij konkludis, ke la gardistoj ne havas municion, kiam ili ne deĵoras.

Estis antaŭvideble, ke ne ĉiuj riskos partopreni en la ribelo kaj preferos resti sur la placo de la apelo, ĉar ili estis tro malcertaj aŭ tro timemaj por retroviĝi en alia, apenaŭ pli sekura mondo, en kiu oni parolis nur la polan lingvon, kiu havis nenian similecon kun la franca, germana aŭ nederlanda. La milito ankoraŭ furoris plej vehemente kaj la Ruĝa Armeo ankoraŭ estis centojn da kilometroj for de Sobiboro, tiel ke la liberiĝo atendis ankoraŭ longe. Aldoniĝis, ke la polaj judoj ne povis fidi al ĉiuj partizanoj. Multaj el ili jam suĉis la antisemitismon per sia patrina lakto.

Je la fino de la tago estis informitaj tiuj, kiuj ricevis taskon. Ĝis la kvina horo de la venonta tago ili devis konservi la grandan sekreton por si mem. Ili ne rajtas rakonti pri la preparado al siaj frato, edzino aŭ amiko. Nur kelkaj virinoj estis informitaj, ĉar la komitato bezonis ilian helpon. Aliaj virinoj ne estis konsiderataj kiel fidindaj, ĉar la membroj de la komitato timis, ke ili ne povis konservi la sekreton por si mem. La koncernaj virinoj laboris en la lagro IV, kiu ankoraŭ ne estis finita kaj en kiu oni dume komencis reordigi kaj purigi rusan municion, kiu estis postlasita sur la batalkampo. Ili estis informitaj pri la projekto kiel eble plej malfrue kaj petitaj organizi mangrenadojn kaj municion, kiujn ili devis kontrabandi en la lagron I. En la plej lasta momento, la virinoj retiris sian komencan devontigon ĉar ili timis korpan traserĉadon ĉe la enirejo de la lagro I. Por la organizo tio estis grava rebato. Ilona Safran raportis pri la sekreteco de la plano: „Mi ne rajtis rakonti, ĉar en la pasinteco iuj provoj fuĝi malsukcesis. Ĉiutage mi devis vesti min varme. Mi ankaŭ ne parolis prie. Mi havis amikon el Nederlando (Selma Wijnberg) kiu kuŝis en la barako pro tifo. Ke tie ŝi povis kuŝi eblis tuj antaŭ la ribelo, ĉar oni apenaŭ plu laboris. Ŝi volis morti en libereco. Mi ne rakontis al ŝi pri mia sekreto, ĉar mi timis, ke ŝi povos paroli pri tio en sia febro. Estis onidiroj, ke ekzistas kontaktoj inter la partizanoj kaj la malliberuloj de la koncentrejo. Mi ne sciis precize, kiam la ribelo okazos."

Sed Selma Wijnberg jam konis la sekreton. Ĥaim Engel, kiu venis el Pollando, mallongan tempon estis blokestro en la virina barako en la lagro I kaj amikiĝis kun ŝi. Ili geedziĝis poste. Li informis ŝin pri la planoj. Ŝi nenion diris al sia amikino Ilona Safran pri la sekreto, ĉar ŝi kredis, ke Selma scias nenion pri ĝi. La 14an de oktobro Selma kuŝis en la barako, sed ĝustatempe povis fuĝi kun Ĥaim, post kiam li mortigis la SS-kontroliston Rudolf Beckmann en la lagro II: „Mia edzo estis unu el la informitoj. Pro tio mi sciis, ke la plano estis preparita de polaj kaj rusaj malliberuloj. Ĉar nur malgranda grupo sciis, kio okazos, la 14an de oktobro regis trankvilo."

La ĉeĥo Kurt Thomas, kiu estis altirita nur en la plej lasta stadio de la preparoj, restis silenta al la nederlandanino Minny Cats el Harlemo, kun kiu li amikiĝis. Tamen li diris al ŝi, ke ŝi surmetu altajn botojn kaj klarigis, ke la vetero malboniĝos. Li esperis, ke post la eksplodo de la ribelo ŝi venos al la lagro I por fuĝi kun li. Kelkajn tagojn antaŭ la ribelo ŝi demandis al Kurt, ĉu entute ili iam forlasos la koncentrejon. Li respondis al ŝi: „Mia racia menso diras ne, sed mia koro diras jes." Tamen, ĉar li ne fiksis klaran rendevuon kun ŝi, ili neniam plu renkontiĝis. Ŝi ne travivis la ribelon.

Ankaŭ Szmajzner informis kelkajn virojn pri la preparoj de la ribelo. Temis pri kvar homoj el lia proksimeco: Lia frato, la franco Leono, kiu batalis en la Hispana Enlanda Milito, Abrahamo, juna pola judo, kiu fabrikis infanajn biciklojn por la SS, kaj lia nevo Nojeĥ. Ĉi-lasta ricevis de la germanoj la ordonon serĉi kaŝitan oron en la postlasitaj vestaĵoj de la viktimoj. La viktimoj kaŝis en siaj vestaĵoj oron kaj juvelojn, se ili entute ankoraŭ posedis tiajn kiel plej lastan posedaĵon por povi certigi siajn aktualajn vivbezonojn dum iom da tempo per interŝanĝo. Krom la amasego falinta en germanajn manojn, nun ankaŭ la malliberuloj feliĉe povis profiti de ĝi.

Szmajzner komisiis sian pli junan nevon Nojeĥ ŝteli oron kaj juvelojn kaj konservi ilin en saketo en sekreta loko. Tuj kiam la momento venis, ĉiu el ili devis enmeti unu saketon, ĉar oro multe utilos post sukcesa fuĝo en kontaktoj kun la ekstera mondo. Sed ĝi ankaŭ estis la kaŭzo – tio poste montriĝos – por kvereloj inter la fuĝintaj malliberuloj kaj iuj antisemitismaj partizanaj grupoj same kiel kun aliaj homoj, kiujn ili renkontis survoje.

Peĉerskij, kiu devis gvidi per ekzempla konduto, nenion diris pri la ribelo al Luka, al kiu li enamiĝis kaj kiun li utiligis kiel alibion por trompe veki la impreson de persona rilato kun ŝi. Sed laŭ la

farataj konversacioj ŝi povis kompreni, ke okazos io aparta. La tagon antaŭ la ribelo ŝi donacis al li ĉemizon, kiun ŝi faris mane. Ŝi diris, ke li surmetu ĝin, ĉar ĝi alportos al li bonŝancon.

La sekvan matenon, la 13an de oktobro, en la tago kiam la ribelo devis komenciĝi je la kvara posttagmeze, subite aperis per aŭtomobiloj, ĉirkaŭ la 10a horo 30, grupo de SS-personaro. Temis pri gardistoj de la koncentrejo en Osowa, malgranda loko dek kilometrojn sudokcidente de Sobiboro. La viroj neniam antaŭe estis vidataj ĉi tie. La estroj de la subtera komitato opiniis, ke la planoj tralikiĝis kaj ke oni sendis plifortiĝon. Sed kiam la grupo baldaŭ poste malaperis en la manĝejo por dediĉi sin al la alkoholo kaj retiriĝi kun junaj ukrainaj virinoj al la barako, evidentiĝis, ke ilia alveno estas pura koincido. Ĉar neniu sciis kiom longe ili restos en la koncentrejo, la ribelo estis prokrastita. Iam dum la tago ili reiris al Osowa.

La sekva tago, la 14a de oktobro, estis tago kiel ĉiu alia por la plimulto de la malliberuloj. Vekiĝi, manĝi, ordigi, tranĉi lignon kaj fari ĉion ceteran, kio ankoraŭ estis farenda, kiam transporto ne alvenis, kio estis la kazo jam dum kelkaj tagoj. Tiu kondiĉo estis deviga por la konspirantoj, ĉar ribelo estintus preskaŭ malebla, se la „priservado“ de transporto estus alarminta la koncentrejon.

Seeble tuj antaŭ la ribelo, inter la 16a kaj la 16a horo 30, Szmajzner devis fari provon ŝteli fusilojn de la ukraina barako. Por tio li plej taŭgis, ĉar li ekzakte konis la strukturon de la barako. Peĉerskij fidis al la juna Szmajzner kaj tial aprobis ĉi tiun riskan operacon. Se oni estus kaptinta lin ĉe la freŝa faro, la ribelo ne estus povinta okazi pro la grandskalaj reprezalioj, kiuj estus sekvintaj. Sed fusiloj en la manoj de la ribelantoj estis tiel esencaj por sukcesi, ke sen ili amasa ribelo estis preskaŭ neebla.

Do Szmajzner iris kun fornotubo sub la brako kaj kun iuj laboriloj en la poŝo ĝis la barako en la antaŭlagro. Li salutis la ukrainan gardiston ĉe la enirejo konforme al la regularo kaj anoncis, ke li devos ŝanĝi la fornan tubon kaj tial unue devos grimpi sur la tegmenton. Post kiam li suprengrimpis, li iomete manipulis la tubon, reiris malsupren kaj diris al la ukraino, kiam li preterpasis lin, ke li ankoraŭ devas kontroli la fornon en la barako mem. Tiu ne havis suspekton, ĉar Szmajzner estis konata kiel riparisto por malgrandaj aferoj. Nun li povis iri al la loko, kie troviĝis la deponejo de la pafiloj. En tiu momento neniu estis proksime, tiel ke li povis servi sin sen esti rimarkita.

Li tranĉis la ĉenon, kiu ligis la fusilojn, per tenajlo kaj poste forprenis unu fusilon. Sed li ne sukcesis kaŝi ĉi tiun fusilon en la fornotubo, ĉar ĝi elstaris tro multe. Li remetis ĝin kaj kuris en la dormoĉambron, kie du knaboj, uzataj de la germanoj kiel servistoj kaj ´knabinoj por ĉio´, purigis la botojn de la ukrainoj. Sen perdi tempon li kaptis litkovrilon kaj reiris al la deponejo de la fusiloj. Li ĵetis tri fusilojn en la kovrilon kaj metis kelkajn kartoĉojn, kiujn li trovis en iu skatolo, en sian poŝon. Ĉar estis tro danĝere forlasi la barakon preter la ukraino, li kuris reen en la dormoĉambron kaj petis la knabojn helpi lin. En telegrama stilo li ordonis al ili puŝi la pakaĵon eksteren tra la fenestro, kie li reprenos ĝin de ili. Kiam ili rimarkis, ke temas pri fusiloj, ili morte teruriĝis. Ili ekploris, dirante, ke ili timas, kaj volis forkuri. Ne estis la ĝusta momento por Szmajzner diskuti kun ili kaj klarigi siajn intencojn al ili. Tranĉilo, kiun li tiris el sia jako, impresis. Li nun ordonis al ili fari tion, kion li diris, sen pliaj demandoj. Li forlasis la barakon kaj iris al la fenestro, kie la pakaĵo estis donita al li. Kun la rabaĵo sur la ŝultro li kuris ekstere trankvile, sed interne kun elĉerpitaj nervoj al la kuirejo en la lagro I. Survoje li vidis plurajn labor-taĉmentojn reveni de la laboro.

Peĉerskij kaj iuj kamaradoj atendis lin en la kuirejo de la lagro I. Ili estis ravitaj de la sukceso de la unua operaco kaj volis akapari la tri fusilojn, kiuj havis rusan originon. Kiu povis pli bone trakti ilin ol la sovetianoj ? Sed Szmajzner, kiu ŝtelis la fusilojn kun granda risko, postulis unu por si mem. Li diris, ke li rabis tri kaj fuĝos el la koncentrejo kun unu fusilo. Ili provis persvadi lin cedi ĉiujn fusilojn kaj kartoĉojn, ĉar laŭ ili li tute ne havis pafsperton. En la manoj de rusaj soldatoj trejnitaj por trakti ilin, la batoforto de la ribeluloj pligrandiĝus. Sed li insistis pri sia postulo. Ĉar ili havis malmultan tempon por perdi kaj ne estis la ĝusta momento por solvi konfliktojn, ili cedis. Ili rapide montris al li kiel ŝarĝi la fusilon kaj premi la ĉanon. Tiam Szmajzner disdividis la municion.

La 14an de oktobro 1943, je la 4a horo, Peĉerskij donis la startsignalon por la operacoj. SS-Untersturmgvidanto Johann Niemann estis la unua, kiu devis esti mortigita en la lagro I. En la foresto de Reichleitner li mem estis la deĵoranta komandanto en tiu tago. La komitatanoj volis unue likvidi lin

kiel plej altan rangulon, ĉar per lia morto ĉia centra gvido ĉesos, kio eble povis havi la sekvon, ke la subordigitaj gardistoj ne tuj petos helpon. Oni atendis, ke la nazioj unue kverelos pri la demando, kiu havu la gvidpovon. Ĉi tio prokrastus la alaramadon de la eksteraj postenoj. Je la 16a horo 30, kiel antaŭe interkonsentite, la telefona kablo kaj la telegrafa linio estis tranĉitaj tiel, ke la interna komunikado same kiel tiu kun la ekstera mondo kolapsis.

Nun temis pri tio, ke ĉiuj, kiuj partoprenis en la konspiro, majstras la taskon, kiun ili ricevis, per la plej granda precizeco. Ili ĵuris iri ĝis la ekstremo. Ili volis fari ĉion, kio estis en ilia potenco, por doni al la murdistoj de milionoj, al la sinjoroj, kiuj sentis sin superaj, neforgeseblan lecionon. Ilia unua celo estis retrovi la liberecon. Ili – iuj post jaro kaj duono en Sobiboro – volis montri, kiuj ili vere estas. Ne plu humile submetiĝema kaj en la polvo rampanta abomenaĵo, kiu, laŭ la kapricoj de la SS, esperis resti viva ankoraŭ unu tagon pli longe. De nun ili ne plu volis esti tretataj kiel parazitoj kaj esti prikriataj kiel „pugotruo“, „damnita porko“ aŭ „malbenita judo“, por respondi en korekta maniero kun la ĉapelo en la mano kaj en plej afabla tono laŭorde: „Jes, sinjoro Unterschargvidanto.“ Ili volis pruvi, ke ilia ĉiutage montrata obeado ĝis nun estis parto de longtempa traviva strategio. La unuan fojon en Sobiboro ili estis fiksintaj la daton kaj la horon. Ili celis montri al la murdistoj, kiuj disponis pri senprecedenca potenco, siajn energion kaj spritecon, siajn kuraĝon kaj aŭdacon, same kiel siajn plankapablojn. Ili volis montri, ke ilia forto por kontraŭbatali la ĉefan malamikon estis nerompebla. Ili volis batali kaj mortigi por si mem kaj por ĉiuj judoj, tiel venĝante centmilojn da murditaj homoj en Sobiboro.

Por allogi Niemann en la barakon de la tajloroj, unu el la kurierknaboj mesaĝis al li iom antaŭ la 15a horo 30, ke li vizitu la tajlorejon, ĉar Moŝe Hoĥman, la ĉeflaboristo de la tajlorejo, diris, ke li havas belegan ledan jakon por li en preparado. Niemann unue provu la jakon, antaŭ ol li povu daŭrigi prilabori ĝin.

Niemann, kiu havis pasion por belaj vestaĵoj kaj bonordaj uniformoj, promesis veni kiel eble plej baldaŭ. Kvaronan horon poste, preninte sian ĉevalon el la stalo, li venis rajdante kun la vipo elegante enŝovita sub la brako. Kiam en la proksimeco de la barako li grimpis de sia ĉevalo, li rimarkis la bakiston Skrulek. Li ordonis al li teni la ĉevalon ĉe la kondukiloj ĝis kiam li revenos. Niemann malrapide paŝis en la tajlorejon kun la manoj sur la dorso kiel kutime. Enirinte ĝin, la viro ĉe la pordo kriis laŭorde: „Atenton!“, post kio ĉiuj eksaltis kaj alprenis ekzemplan sintenon. Kiel kutime, Niemann respondis: „Daŭrigu!“

La metiejo en la barako konsistis el tri ĉambroj kaj malgranda kuirejo. En unu ĉambro oni dormis, la alia servis kiel ĉambro, en kiu la ´sinjoroj´ estis akceptitaj por provi vestaĵojn. Ankaŭ en la kuirejo oni foje laboris,  kaj en la tria ĉambro troviĝis la ĉapelisto. En la ĉambro, kie la jako de Hoĥman devis esti alĝustigita, pendis spegulo. La viroj, kiuj devis plenumi la ekzekuton, staris pretaj kun toporo en la ĉambro de la ĉapelisto. Ili sciis, ke Niemann aperos en kelkaj sekundoj kaj estos kondukita de Hoĥman al la ĝusta angulo. Kiam li eniris la ĉambron por provi la jakon, lia avida okulo tuj trafis la belegan ledan pecon, kiu kuŝis sur la tablo. Hoĥman modeste demandis: „Ĉu vi bonvolus surmeti la jakon, se ĝi plaĉas al vi, sinjoro Untersturmgvidanto. Ĝi tutcerte bone taŭgos por vi.“

En tiu ĉi momeno Ŝubajev faris hastan paŝon antaŭen. Niemann ekvidis lin kun la toporo en la mano kaj demandis, „Kion ĉi tiu viro faras ĉi tie?“ Hoĥman respondis, ke li devas ripari ion ĉe la tablo de la ĉapelisto.

Niemann malligis la zonon kaj demetis la uniforman jakon. Kun la revolvero en la ingo, li metis la zonon sur la tablon. La buko portis la SS-moton: „Nia honoro signifas lojalecon“. Hoĥman helpis lin eniri la jakon kaj Niemann vidis, ke ĝi vere estas tre bela. La tajloro tiam petis lin turni sin por vidi, ĉu io mankas ĉe la dorso. Kiam Niemann plenumis la peton, li staris en la dezirata pozicio. En ĉi tiu momente Ŝubajev ĵetis sin sur lin kun la toporo. La enorma frapo trafis la kapon de Niemann. Niemann ekkriis, sed dume li jam ricevis la duan – mortigan baton. La kadavro estis rapide puŝita sub la tablon. La unua SS-ulo estis forigita tute laŭplane.

Peĉerskij volis esti kiel eble plej proksima al la loko, kie la nazioj estis mortigitaj. Li estis en la barako de la lignaĵistoj, kie li kaŝiĝis malantaŭ unu el la fenestroj kaj povis observi, kiu eniris kaj forlasis la barakon. En la momento, kiam Niemann ekkriis, li vidis heni kaj baŭmi la ĉevalon, kiu ŝajnis forkuri. Tio estis kritika momento, ĉar la henado povis havi sekvon por la aliaj du ĉevaloj en la stalo, kiu siavice

estus povinta kapti la atenton de la SS-funkciuloj. Sed la bakisto Skrulek tuj kontrolis la kondukilojn kaj rekondukis la ĉevalon en la stalon laŭ ordono de unu el la konspirantoj.

Necesis urĝi, ĉar la sekva SS-homo – kiu devis esti Frenzel – povis esti atendita ĉiun minuton en la lignaĵistejo. Oni petis la junan kurieron Josef Drescher logi lin tien. Kiam li vane serĉis lin, li aŭdis, ke Frenzel estas en la duŝejo. Por la organizantoj kaj la plua evoluo de la ribelo tio estis rebato, ĉar kune kun Wagner kaj Gomerski Frenzel apartenis al la plej danĝeraj SS-viroj.

Ankaŭ Arkadij Vajspapir estis elektita de Peĉerskij por mortigi membrojn de la SS, antaŭ ol la amasa fuĝado el la koncentrejo povis komenciĝi. Lia tasko estis elŝalti Graetschus-on. SS-Oberschargvidanto Graetschus, membro de la SS ekde la 20a de decembro 1935, estis dungita en 1940 en la operaco „T4“, ĉefe en la „eŭtanazia“ instalaĵo en Bernburgo. Poste li estis transdonita al la komandostabo en Sachensenhausen. Liaj murdaj aktivecoj kadre de la operaco „Reinhardt“ komenciĝis en la neniiga koncentrejo Treblinka. Post sia translokiĝo al Sobiboro li transprenis unu el la plej gravaj funkcioj de la koncentrejo, nome la komandon pri la malfacile gvidebla kaj malfidinda kompanio de la ukrainoj. Pro siaj meritoj tiurilate li estis levita al la sufiĉe signifa rango de SS-Untersturmgvidanto.

Arkadij Waispapir raportis pri la elimino de Graetschus: „Lerner kaj mi kaŝis nin malantaŭ iu kurteno. Tiam la ĉefo de la gardistoj, SS-ulo Graetschus, venis en la laborejon. Li haltis ĉe la pordo kaj surmetis la jakon, kiu estis farita por li en la tajlorejo. Mi elpaŝis de malantaŭ la kurteno, kuris preter la oficiro por ŝajne eliri, sed turnis min kaj frapis lian kapon per la akra rando de la toporo. Graetschus ekkriis, sed li ne tuj falis sur la plankon, sed ŝanceliĝis antaŭen, ĉar la bato evidente ne sufiĉe forte frapis lin. Tiam Lerner venis el la kaŝejo kaj frapis lian kapon per sia toporo duan fojon. Nun Graetschus falis sur la plankon kaj elĉerpiĝis. Mi eltiris lian Walther-pistolon kune kun la rezerva municio el la ingo kaj prenis ankaŭ liajn paperaĵojn el la interna poŝo. La pistolon mi prenis kaj kovris lin per amaso da vestaĵoj.“

Por Ĥaskiel Menĥe, la ĉeflaboristo de la ĉapelistoj, tio ne sufiĉis. Li eltiris tranĉilon kaj komencis pripikadi la korpon de Graetschus. Finfine li povis fari tion, pri kio li ĉiam revis: venĝi sin. Blinde li pikadis kontraŭ Graetschus, kriante ĉe ĉiu piko: „Tiu ĉi estas por mia patrino kaj tiu ĉi por mia edzino kaj tiu ĉi por mia infano kaj tiu ĉi por la tuta popolo de Izraelo!“

En 1983 li atestis: „Tiel mi venĝis min. Ŝtono falis de mia koro pro tio, ĉar mi staris en ilia sango.“ Menĥe devis esti rapide fortrenita de la ĉirkaŭstarantoj, ĉar li svenis de ekscitiĝo kaj la sekva viktimo jam anoncis sin: Klatt, la ´nacigermana´ ĉefgardisto de la ukrainoj. „Baldaŭ poste la ukraino envenis. Li puŝiĝis kontraŭ la amaso da vestaĵoj, sub kiuj la kadavro de Graetschus estis kaŝita. Li kliniĝis kaj demandis pri kio temas. Mi kuris de malantaŭe kaj batis per mia toporo sur lian kapon. Tiam Lerner donis al li kroman baton per sia toporo. La gardisto falis sur la plankon. Post kiam ni certigis nin, ke li mortis, ni same tiris lian pistolon el la ingo. Lerner prenis ĝin. Poste Lerner kaj mi forlasis la barakon. Mi iris al Peĉerskij kaj raportis al li, ke mia tasko estas plenumita.“

La operaco disvolviĝis laŭplane – krom la mortigo de Frenzel. Niemann, Graetschus kaj unu ĉefgardisto estis mortigitaj. La viroj anoncis sin ĉe Peĉerskij kun tri revolveroj. Nun ne plu eblis retroiri. Ĉu ili volis aŭ ne, la operaco ne plu povis esti haltigita.

En la administrejo en la lagro II ĉio iris laŭ plano. Ĉi tien estis senditaj Ĥaim Engel kaj unu frato de Kapo-o Pożycki por finkalkuli kun Beckmann kaj Steffl. Ili estis kaptitaj malantaŭ siaj skribotabloj kaj mortigitaj per tranĉiloj. La organizaĵo povis aldoni du pliajn pistolojn al sia arsenalo.

La SS-membrojn Fritz Konrad, Josef Vallaster kaj Josef Wolf tiam atingis la sama sorto. Konrad kaj Vallaster en la laborejo de la ŝuistoj, Wolf en la ordigaj barakoj. Ĉi tie estis la rusoj Cybulski kaj Griŝa, kiuj efektivigis la mortkondamnon. Denove tri SS-viroj estis elŝaltitaj. En la metiejo de lignaĵistoj pereis Gaulstich per la toporo de Lajtman. Ĝis tiam la operaco pasis nerimarkite. La neinformitaj malliberuloj kaj la ankoraŭ vivantaj SS-viroj havis neniun imagon pri tio, kio okazis en ilia proksima ĉirkaŭaĵo. Sed tiam la sorto frapis ilin.

Hazarde unu el la iniciatintoj estis en la garaĝo, kiam SS-Unterschargvidanto Walter Ryba surprize eniris ĝin. La viro, kiu restis nekonata, verŝajne subite konsciis, ke Ryba komprenis, ke io ne estas en ordo. Li volis riski nenion. Antaŭ ol Ryba povis kompreni kio okazis, li estis pikmortigita.

Pri la incidento oni tuj raportis al Peĉerskij. En antaŭaj diskutoj li klare emfazis, ke estas malpermesite mortigi SS-ulojn aŭ ukrainojn spontane kaj en lokoj antaŭe ne interkonsentitaj, ĉar estis danĝere, se la kadavroj estis malkovritaj tro frue. Dum la preparado de la operaco estis determinite detale, kie la kadavroj devas esti kaŝitaj, tiel ke la SS-personaro nenion rimarkos pri la baldaŭa ribelo, se ĝi subite vizitas unu el la barakoj, kaj tial ankaŭ ne sonorigos alarmon. La mortigo de Ryba estis ago de afekcio, kiu deviis de la planado. En la garaĝo nun troviĝis unu el la kadavroj, kiu povis esti malkovrita de la SS en la vid-al-vide situanta poŝtejo en ĉiu momento. Peĉerskij tuj komprenis la danĝeron, kiu ekestis, kaj ordonis senprokraste lanĉi la apelon. Estis kvarono antaŭ la kvina, do ĉirkaŭ 15 minutoj pli frue ol kutime. Kapo-o Pożycki blovis sian fajfilon. Mallongan tempon poste unu el la ukrainaj gardistoj veturis per sia biciklo en la lagron I. Iuj viroj, kiuj apartenis al la informitoj, puŝis lin malsupren kaj komencis prilabori lin per tranĉiloj. Li forte sangis kaj forpasis. Kurt Thomann, kiu observis la incidenton, volis eviti, ke la ukrainoj faros alarmon sur la gardoturoj. Kune kun iu alia li trenis la kadavron al iu loko inter du barakoj ĉe la orienta flanko de la lagro I, tiel ke ĝi ne plu estis videbla de la turoj. Nun troviĝis du mortintoj en lokoj antaŭe neinterkonsentitaj: unu SS-viro kaj unu ukraina gardisto.

La judoj, kiuj revenis de sia ĉiutaga laboro en kaj ekster la koncentrejo, elpaŝis, tute ne sciante, kio okazis, antaŭ sia barako kaj iris kiel kutime al la placo de la apelo. Sed Frenzel, kiu kutime staris tie kun aliaj SS-anoj ĉirkaŭ la kvina horo por rigardi, kiel la Kapo-oj nombris la malliberulojn kaj poste registris la rezultojn en la „inventara registro“, ne ĉeestis. Li konsciis nenian danĝeron, li sekigis sin tute trankvile en la duŝejo kaj sentis neniun urĝon. Plej multaj de la aliaj estroj jam estis mortaj.

Sed la plimulto de la malliberuloj same ne sciis tion kiel Frenzel. La anticipe konvokita apelo signifis malobservon de la normala kurso de la eventoj: Frenzel mankis, la SS ne estis videbla kaj la apelo estis kunvokita dek minutojn tro frue. Tio vekis la suspekton de la malliberuloj. Ili hezitis viciĝi kiel kutime. Kiam tio okazis tro malrapide, unu el la ukrainoj kuris al ili por instigi ilin al laŭorda apelo. Kelkaj tro petolaj homoj vokis: „Homo, la milito finiĝis!“ Tiam li bruske respondis al ili en la ukraina lingvo, ke ili senprokraste viciĝu laŭorde. La sekvan momenton li estis mortigita. Multaj subite ekkomprenis, ke la atako ne estis izolita fenomeno. La subita mortigo de gardisto estis komplete realecfremda afero por la sensciaj judoj, kiuj opiniis, ke ili halucinas. Sed ili estis rapide forŝiritaj de sia sonĝo, kiam oni kriis de diversaj flankoj, ke ribelo eksplodis.

Iom poste Erich Bauer veturis per kamiono en la koncentrejon. La veturilo estis ŝarĝita per iuj materialoj. Kiam ĉe la forstista domo li eliris el la kabino de la ŝoforo kaj serĉis laboristojn por malŝarĝi la kamionon, li vidis per unu rigardo, ke la malliberuloj diskuradis kaj ke unu mortinta ukraino kuŝis sur la tero. Li ne hezitis dum unu sekundo tiri sian pistolon kaj pafis kontraŭ ĉio, kio moviĝis. Jakob Biskubicz estis preskaŭ trafita de kuglo.

Ĉiuj ekkuris. En ĉi tiuj kelkaj sekundoj iuj certe opiniis, ke la milito finiĝis kaj ke nun gravas serĉi la liberecon kiel eble plej rapide, antaŭ ol la germanoj venĝos sin. Sed ili trompiĝis.

La pafoj de Bauer alarmis la SS-virojn, kiuj ankoraŭ vivis. Ili reagis senprokraste. Unue ili kredis, ke partizanoj atakis la koncentrejon. Ankaŭ la ukrainoj sur la gardoturoj komencis pafi. La kaoso estis kompleta. Szmajzner celis per sia ĵus konkerita fusilo la turojn. Estis la unua fojo en lia vivo, ke li pafis. Li hezitis momenton, premis la ĉanon kaj trafis unu ukrainon. Poste li diris, „Ne mi faris tion, sed Dio.“

La amaso povis fuĝi nur en unu direkto, nome al la pordego inter la lagro I kaj la antaŭlagro. Alveninte tie, malgranda grupo apartiĝis kaj senzorge suprensaltis la pikdraton kaj transgrimpis ĝin. Sed malantaŭ ĝi troviĝis kaŝitaj minoj, tiel ke multaj homoj pereis pro la eksplodoj. La alia grupo kuris tra la ĉefa pordego eksteren.

La laborkomandejo de la norda lagro, kiu konsistis el dek virinoj kaj 50 viroj, kunvokiĝis iom pli malfrue ol kutime por marŝi de tie al la placo de la apelo en la lagro I. Kiam la grupgvidantoj Müller kaj Rewald aŭdis la pafojn, ili pafadis kontraŭ la grupo per la helpo de la ukrainaj gardistoj. Neniu de la 60 judoj havis la ŝancon fuĝi. Ili estis ekzekutitaj ankoraŭ en la sama nokto.

En la eksplodinta paniko Feldhendler kaj Peĉerskij ankoraŭ provis krii al la homamaso: „Eliru, eliru, eliru!“ La rusoj kriis: „Antaŭen! Laŭ Stalin!“ Kaj la polaj judoj kriis: „Hurao!“ Peĉerskij aŭdis, ke

grupo de virinoj rekuris al la barako pro granda timo. Li kuris tien por instigi ilin eliri kaj fuĝi. Sed ili estis tro timemaj por fari la neantaŭviditan paŝon kaj postrestis tie.

Post kiam pluraj grupoj de malliberuloj sukcesis trovi la vojon al la antaŭlagro, ili antaŭeniris en la direkto de la ĉefa pordego, kie la SS ne dismetis minojn je la propra sekureco. Preterirante, la rusoj sturmis la deponejon de la armiloj, kio nur parte sukcesis. Survoje ili renkontis la SS-viron Dubois kaj iujn ukrainojn, kiuj deĵoris tie. Dubois poste povis memori: „La pordo estis malfermata. Mi vidis grupon de judaj malliberuloj portantaj hakilojn alproksimiĝi al la deponejo de la armilaro. Mi supozis, ke temas pri laborista taĉmento. Tiu kvin- ĝis sespersona grupo komence preterpasis la armilan deponejon. Ili ĉirkaŭiris kaj poste eniris ĝin. Ili batis min per la hakiloj. Mia kranio estis fendita de hakila bato. Pliaj hakilaj batoj trafis miajn manojn. Malgraŭ tio mi povis liberigi min kaj fuĝi eksteren. Post ĉirkaŭ 10 metroj pafo trafis mian pulmon kaj mi perdis la konscion. Iuj ukrainaj gardistoj traktis min per vodko, tiel ke mi revenis al mia konscio. Nun mi eksciis, ke ribelo eksplodis kaj ke mi estis la sola SS-viro, kiu travivis ĝin."

Intertempe Frenzel forlasis la duŝejon por pretiĝi por la apelo. Li jam estis en la manĝejo por trinki ion, kiam li aŭdis la pafojn. Li kaptis maŝinpafilon kaj forkuris eksteren. Kun la dorso al la muro la alkuranta homamaso signifis simplan celon por li. Unu el la vunditoj estis Kathy Gokkes, amikino de Ilona Safran. Ŝi estis trafita de kuglo ĉe la kruro, sed tamen enkalkulis ŝancojn atingi la alian flankon de la pikdrato kune kun Ursula kaj Eda Liĥtman. Peĉerskij tiris la revolveron, kiun Ŝubajev donis al li, kaj repafis el distanco de kvindek metroj, sed Frenzel ne estis trafita. Li poste agnoskis, ke li estis tro nervoza kaj hektika por celi precize.

La homoj, kiuj sukcesis preteriri Frenzel-on, pasis la ĉefan pordegon, kiu krevis sub la premo de la amaso. La ukraina gvardio ĉe la pordego estis tro malforta kaj ne preta por atendi amasan fuĝon, tiel ke la fuĝintoj havis malmultajn problemojn forlasi la koncentrejon.

La resto de la germanoj kaj ukrainoj nun pafis de ĉiuj flankoj, dum la rusoj komencis repafi per siaj pistoloj kaj fusiloj, kiujn ili ĵus akiris.

En la lagro I postrestis kelkaj lignaĵistoj kun la tasko provizi ŝtuparojn kaj tranĉi la pikdraton. La rimedo montriĝis utila, ĉar ĉi tiu vojo por fuĝi estis urĝe bezonata. La plurajn metrojn alta barilo estis haste traborita per toporoj kaj tenajloj. Iuj ne havis la paciencon kaj ne ĝisatendis la momenton, sed provis rampi sub la barilo aŭ transgrimpi sen iloj. Tion sukcesis fari nur malmultaj. La plej multaj estis kaptitaj en la pikdrato, dum ili estis pripafitaj. Kiam la truoj en la barilo estis sufiĉe grandaj, ĉiuj forkuris, kiuj povis. Ĉar la SS-gvidantoj konfidis nur kelkajn kartoĉojn al la ukrainoj, la pafado iom post iom malpliiĝis.

Jakob Biskubicz fuĝis en la direkto de la norda lagro, kie li povis kaŝiĝi dum kelkaj horoj. Post kiam li zorgeme distiris la pikdraton, li povis trarampi ĝin kaj forlasi la koncentrejon laŭ tiu maniero. Thomas Blatt atingis kun malgranda grupo alian punkton de la pikdrato en la lagro I, kie iuj jam klopodis fari truon en la barilo. Senpacience kaj antaŭ ol la momento venis por forkuri, multaj provis grimpi super la pikdrato ankaŭ ĉi tie. Ĝuste kiam Blatt volis fuĝi, la pikdrato falis sur lin. Tio estis lia bonŝanco. Nur kelkajn metrojn for li vidis, kiel viroj kaj virinoj estis disŝiritaj de la eksplodantaj minoj. Post kiam li pene liberigis sin mem (de sia mantelo), li rapide preterkuris super la mortintoj en la konscio, ke la minoj nenion povos fari al li. Li certe atingis la arbaron, en kiu li poste renkontis la grupon de Peĉerskij.

Dum la plimulto kuris kiel frenezuloj al la ĉefa pordego kaj iuj provis eskapi trans la pikdrato, Kurt Thomas kuris al la provizora ambulanco en la lagro I. Tie li restis por momento por akiri bildon pri la situacio. Li provis iom ordigi siajn pensojn kaj pripensis kiel plej bone forlasi la koncentrejon. Iom pli fore li ekvidis improvizitan eskalon, kiu estis apogata kontraŭ la pikdrato kaj super kiu kelkaj malliberuloj provis fuĝi. Sed ĉar tiom da homoj antaŭenpuŝiĝis, li decidis atendi pli longe. Li rimarkis gardiston, kiu jam pretis pafi per sia fusilo; sed antaŭ ol li povis pafi, Szmajzner pripafis lin mem. Tamen li ne trafis lin. La ukraino tiam metis sian fusilon laŭ la kolbo sur la plankon. Tio estis la momento por la ĉeĥo por kuri al la pikdrato. Tie kuŝis juna knabino, kiun li konis laŭ la nomo Mira, fatale trafita. Li rapide grimpis trans la barilo. Sekvis lin alia viro – li estis Szmajzner.

La plej multaj minoj intertempe eksplodis. Thomas kaj Szmajzner ekkuris inter ĉiuj mortintoj. Ankoraŭ antaŭ ol atingi la arbaron, ili vidis kiel Josef Siegel stumblis. Li estis nur 16-jaraĝa kaj estis

nomata Jossel. Kurt Thomas konis Jossel-on bone, ĉar li estis unu el la viroj, kiujn li povis kaŝi dum kelka tempo en la barako kiel sanitariston por savi lin de la certa morto en la lazareto. Liaj piedfingroj frostiĝis, tiel ke li ne povis labori. Estis miraklo, ke Jossel ankoraŭ sukcesis fuĝi. En la jida lingvo li vokis kiam ili preterpasis lin: „Kurt, lojf!“ [Kurt, kuru]. Sed Kurt ne tiel rapide sukcesis iri kaj revokis: „Jossel, ich bin a frajer mensh un ich lojf nisht mer!“ [Jossel, mi estas libera homo kaj mi ne plu povas kuri tiel rapide].

SS-Unterschargvidanto Franz Wolf, kies frato Jozefo estis mortigita dum la ribelo, apenaŭ eskapis la morton. „En la tago de la ribelo mi estis kun Willi Wendland en la arbaro, komandante la eksteran laboron. Inter la 16a30 kaj la 17a horo, Wendland kaj mi revenis al la koncentrejo kun la juda labortaĉmento. Wendland transdonis la judojn al la lagro I kaj veturis per ĉevalo al la lagro II, kie situis la ĉevalaj staloj kaj la garaĝo por la ĉaroj. En tiu tago mi ankoraŭ havis la taskon repreni la judajn laboristinojn el la ĝardeno post la laboro. Tial mi disiĝis de Wendland kaj iris en la ĝardenon, kiu troviĝis inter la lagroj I kaj II. Kiam mi revenis de tie kun la judinoj, mi aŭdis subite pafadon. Mi troviĝis inter la tiel nomata forstista domo kaj la lagro I. En la komenco de la pafado mi vokis al la judoj: ´Kuru en la bunkron!´ Mi rekuris al la skriboficejo, kiu estis en la forstista domo. Beckmann kaj alia membro de la regula personaro intertempe estis mortigitaj. Mi kuris reen kaj volis trairi la korton de la lagro II al la reordigaj barakoj por atingi mian fraton. Mi vidis neniun survoje. Ankaŭ la pordo, kiu disigis la korton de la reordigaj barakoj, estis ŝlosita. Post kiam la pafado malpliiĝis, mi kuris al la gvardio de la antaŭlagro. Krom pluraj mortintoj tie kuŝis ankaŭ Werner Dubois, kiu estis grave vundita. Mi tiam daŭrigis trovi mian fraton, sed mi ne sukcesis. Nur en la sekva mateno oni diris al mi, ke li estis trovita morta en iu reordiga barako.“

* * *

### Post la ribelo

La 14an de oktobro 1943 Sobiboro estis okupata de ĉirkaŭ 550-600 malliberuloj (sen la malliberuloj en la lagro III). Ĉar la ĝusta nombro ne plu estas determinebla, ĉi tie temas pri proksimuma nombro, kiu baziĝas sur la taksoj de Engel (600 ĝis 700), Lerer (600), Liĥtmann (600), Margulies (600), Peĉerskij (500 ĝis 600), Szmajzner (500 ĝis 600) kaj Thomas (500 ĝis 600). La nombro de judoj en la lagro III ne povis esti taksita, ĉar tiu parto estis tute apartigita de la cetera koncentrejo. La nombro de malliberuloj laborantaj tie, kiuj devis cindrigi la bruligitajn korpojn, supozeble reduktiĝis de 150 al 50, ĉar mallonge antaŭ la eksplodo de la ribelo novaj transportoj ne plu alvenis aŭ estis atenditaj. Malgraŭ la atendita ĉesigo de la gasumado – la plej lasta konata transporto alvenis en Sobiboro la 23-24-ajn de septembro el Vilno kun 5000 homoj – la administracio de la koncentrejo ne estis interesata redukti la fortojn engaĝitajn en la koncentrejo, ĉar la perspektivo daŭrigi la laboron en Sobiboro estis pli alloga ol deĵori ĉe la militfronto. En la tago de la ribelo en la lagro IV laboris 60 malliberuloj – 10 virinoj kaj 50 viroj. Reveninte de la stacidomo de Sobiboro, kie li petis helpon al diversaj institucioj telefone, Frenzel konstatis, ke ĉiuj 60 malliberuloj de la lagro IV estis mortpafitaj de Bauer, Wendland, Müller kaj Rewald.

La respondo al la demando, kiom da malliberuloj povis fuĝi, povas esti parte respondita surbaze de la datumoj de la raporto de la komandanto de la ordopolico en Lublino. Ĉi tiu raportis al Krakovo la 16an de oktobro 1943, ke du tagojn pli frue 200 judoj estis mortigitaj kaj 25 arestitaj en Sobiboro, dum ankaŭ la arestitoj mem trovis sian tujan morton. Ĉi tio signifas, ke de origine 650 malliberuloj, minus tiuj el la lagroj III kaj IV kaj la 225, kiuj estis raportitaj al Krakovo, ĉirkaŭ 365 sukcesis fuĝi. De tiuj ĉirkaŭ 200 povis atingi la ĉirkaŭan arbaron, dum la resto estis vundita per kugloj aŭ mortigita dum la ribelo en la koncentrejo aŭ en la apuda areo aŭ pereis pro eksplodintaj minoj. Laŭ aliaj ciferoj, el 550 malliberuloj 350 fuĝis el la koncentrejo, 130-150 ne partoprenis aŭ ne povis partopreni en la ribelo kaj restis en la KC (ĉar parto de ili estis en la lagro III, de kiu ne eblis fuĝi), ĉirkaŭ 70-80 pereis dum la fuĝo, dum 150-170 estis kaptitaj de la germanoj dum la vastskala serĉado en la regiono tuj post la fuĝado. Post novembro 1943 ĝis la liberigo de Pollando ankoraŭ proksimume 90 fuĝintoj de la KC Sobiboro estis mortigitaj de polaj naciistoj (partizanoj, banditoj, kamparanoj, Armia Krajowa) aŭ transdonitaj al la germanoj fare de lokaj loĝantoj.

Devis esti ĉirkaŭ la oka horo vespere, kiam Frenzel vokis helpon per telefono aŭ telegramo. Unue, li kontaktis la SS-on en Lublino, kiu redirektis lin al la plej proksima respondeca unuo en Chełm, kie skadro de la SS-polickavalerio loĝis en kazerno. Unu el la skadraj komandantoj, kiu deĵoris tie, atestis en 1961, kion li vidis, aŭdis kaj scias. La skadro alvenis en Sobiboro kelkajn horojn post la amasfuĝo per trajno (la malfruo estis kaŭzita de difektitaj reloj, kiuj estis detruitaj de partizanoj), kie du germanaj membroj de la armila SS informis ĝin pri la incidento. Ĉar la ribelo okazis kelkajn horojn antaŭ la alveno de ĉi tiu skadro kaj la ordo en la koncentrejo estis restarigita de la resto de la tiea gardistaro, specialaj kontraŭrimedoj ne devis estis prenitaj. La skadro retiriĝis al la barakoj en la antaŭlagro por atendi ordonojn. Oni ne povis scii, ĉu okazos atako de partizanoj de ekstere aŭ ĉu ekzistis aliaj armataj judaj grupoj en la koncentrejo.[35]

Post kiam Wirth, la plej lasta komandanto de Bełżec, alvenis la saman vesperon, li ordonis ekzekuti la rusojn, kiuj ne estis fuĝintaj. La venontan matenon alvenis aliaj altrangaj SS-funkciuloj, inkluzive de Jakob Sporrenberg, la posteulo de Globocnik kiel estro de la „operaco Reinhardt“, Hermann Höfle kaj Georg Michalsen, ambaŭ superaj oficialuloj de la operaco, kaj la „T4“-funkciulo Dietrich Allers. Ili informiĝis pri la aktuala situacio, pri kiu ili ne kalkulis. Sporrenberg donis la ordonon tuj ekzekuti ĉiujn judojn, inkluzive de la 50 kaptitoj, kiuj estis en la lagro III. Kiel Frenzen memoris antaŭ la tribunalo post la milito, li petis Sporrenberg-on rezigni pri la mortpafado de la judoj, Ĉar ili ankoraŭ estis bezonataj por la laboro. Sed Sporrnberg insistis pri la ekzekutado kaj donis la koncernan ordonon al alia SS-ulo, kiu akompanis lin. Ĉi-lasta tiam efektivigis la ekzekuton fare de ukrainaj gardistoj, kiu okazis en la lagro III.

Do ne ekzistis judaj atestantoj, kiuj povintus raporti pri la okazaĵoj en la koncentrejo tuj post la ribelo. Sed oni bezonas malmmultan fantazion por imagi, kiuj scenoj okazis. La ribelo venis tute neatendite por la granda plimulto de la malliberuloj kaj la nazioj mem. Multaj judoj ne povis scii kio okazos kun ili, se ili restos en la KC. Ĉiu devis preni sian propran decidon – aŭ forkuri aŭ resti en la KC, kio probable signifis la certan morton. Kiam la unua kadavro de SS-ulo estis malkvrita de la nazioj, ekregis paniko en la vicoj de la SS-dungitaro, kiu komencis pafadi, ĉar neniu el ili atendis tian ribelon flanke de la judaj malliiberuloj, ĉar la koncentrejo estis bone protektata kaj interne kaj kontraŭ atakoj de ekstere. La SS povis imagi, ke la judoj povus akiri armilojn. Frenzel, kiu ne estis mortigita dum la ribelo, subite devis batali por sia vivo. Li certe serĉis sian kolegon Niemann, kiu regis la koncentrejon dum la foresto de Reichleitner. Sed li baldaŭ devis konstati, ke la duono de la SS-taĉmento ne plu funkciis: Beckmann, Bree, Graetschus, Gaulstich, Konrad, Nowak, Ryba, Steffl, Stengelin, Vallaster kaj Josef Wolf estis mortaj. Dubois estis serioze vundita. Fine li trovis ankaŭ Niemann senviva en la barako de la tajloroj. Tiam li devis interkonsiliĝi kun la SS-kamaradoj, kiuj ankoraŭ estis vivaj: Bauer, Foss, Wendland, Richter kaj Franz Wolf.

Entute 10 aŭ 12 de 17 germanaj SS-funkciuloj estis mortigitaj de la judoj, krome deko da ukrainaj gardistoj, kiuj entute estis 120, estis mortigitaj kaj pli ol dek vunditaj. La ĉerkoj de la mortigitaj SS-uloj estis transportitaj al Chełm, inter ili la ukraino Klatt. La funebra ceremonio okazis en la armea tombejo ekster Chełm.

De la 540 laborjudoj, kiuj tiam troviĝis en la lagro I, 365 instinkte postkuris la aliajn fuĝantojn, dum la ceteraj 175 ŝajne hezitis aŭ ne povis aŭ ne volis forkuri. Dum la nokto kaj eĉ jam en la vesperaj horoj iuj judoj, kiuj forkuris, libervole revenis al la koncentrejo. La atestanto ne povis diri kio okazis al ĉi tiuj judoj post ilia reveno. Post la kvieta nokto membroj de la SS-skadro traserĉis la arbaron en la proksimeco de la KC en la sekva mateno, sed neniuj fuĝintaj judoj estis trovitaj. En ĉi tiu tago komisiono de pli altrangaj SS-funkciuloj el Lublino, konsistanta el ĉirkaŭ 10 homoj, alvenis en la KC per aŭtomobiloj. En raporto de la skadro por ĉi tiu periodo oni skribis, ke el 300 eskapintaj kaptitoj kaj kunlabore kun la germana armeo kaj landlimaj gardistoj, ĉirkaŭ 100 judoj povis esti neniigitaj. Sekve ekestis kverelo inter diversaj germanaj instancoj pri tio, ĉu la armeo estu utiligata por kontraŭbatali la fuĝintojn, kion pli altrangaj armeaj reprezentantoj de la Ĝenerala Gubernio neis. Alia raporto parolis pri 200 judoj mortigitaj dum la forkuro. Kaj en tria raporto estis konstatite, ke la 17an kaj 18an de oktobro

---

[35] En la densa arbaro de Parczew (Parĉev) kaŝiĝis judaj partizanoj, kiuj batalis kontraŭ la germanoj (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Parczew-Partisanen). Post sia fuĝo el la koncentrejo Sobiboro pluraj judoj aliĝis al tiuj partizanoj. En la fina ĉapitro de sia romaneca dokumenta libro *Fuĝo el Sobiboro* Richard Rashke interese rakontis la historion de tiuj partizanoj.

44 fuĝintaj judoj denove estis neniigitaj kaj 15 arestitaj en la areo ĉirkaŭ Sobiboro kaj Różanka. Kvara raporto indikis, ke granda parto de la judoj transiris la riveron Bug, dum alia parto disiĝis laŭ ĉiuj direktoj. El aliaj lokoj venis la novaĵo, ke unuopaj judoj estis kaptitaj aŭ mortigitaj. Kvina raporto de la 25a de oktobro deklaris, ke 5 judoj el la koncentrejo de Sobibor estis mortpafitaj de la germana armeo. Krome, inter la 21a kaj 23a de oktobro en Sawin, 15 km norde de Chełm, germanaj armeanoj kaptis ses aliajn judojn el la koncentrejo de Sobiboro kaj mortpafis ilin dum ilia provo eskapi. Ĉar la germanoj estis ege interesataj trovi kiel eble plej multajn fuĝintajn judojn, ĉar ili timis, ke ili povus rakonti al la mondo, kio okazis en Sobiboro. Tial estis vokitaj taĉmentoj kun hundoj kaj aviadiloj por postĉasi tiujn judojn, kiuj ankoraŭ liberis. La germanoj povis kalkuli pri la subteno de antisemitismaj polaj kamparanoj kaj partizanoj. Alian minacon por la rifuĝintaj judoj reprezentis la membroj de la Armia Krajowa, la kontraŭgermana naciisma pola subtera armeo, kiu embuskis judajn fuĝintojn. La grupo de Szmajzner renkontis 20 armitajn banditojn, kiuj rabis kaj mortigis kelkajn judojn. Dum la ampleksaj serĉoj de la germanoj ukrainaj gardistoj de la koncentrejo ne estis engaĝitaj, ĉar la SS timis, ke ili malaperos en la arbaro por aliĝi al la partizanoj. La ukrainoj, kiuj ne plu estis bezonataj en Sobiboro, estis resenditaj al Trawniki. Aleksandro Peĉerskij, la rusa ĉeforganizinto de la ribelo, sukcesis eskapi el la koncentrejo kun granda parto de malliberuloj. Postlasinte la pikdraton kaj la minejon, ili klopodis atingi la arbaron kiel eble plej rapide trans la larĝa kalva kampo, kie tiom da fuĝintoj perdis la vivon pro eksplodintaj minoj kaj pafoj. Peĉerskij, kies strategio estis ĝis nun sukcesa, decidis, ke liaj grupanoj ne restu en la arbaro, sed disiĝu en pli malgrandaj grupoj kaj malaperu en diversaj direktoj. La sovetianoj moviĝis orienten por atingi la riveron Bug kiel eble plej rapide por eniri la sovetian teritorion. En la nokto de la 19a ĝis la 20a de oktobro la rusoj transiris ĉe la vilaĝo Stawki, 1500 metrojn de la rivero,[36] la riveron Bug por atingi la sovetian teritorion, kie ili renkontis sovetiajn partizanojn proksime de Brest. Peĉerskij kaj la aliaj rusoj havis pistolojn, kiujn ili forprenis de la germanoj dum ili ankoraŭ estis en la koncentrejo. La nederlandanoj sentis sin senhelpaj, ĉar ili ne konis la areon kaj komencis vagadi. La areo prezentis iujn topografiajn malfacilaĵojn. Dum la tago la judoj kaŝis sin en la arbustoj por resti nevideblaj. La grupo de Stanislaw Szmajzner ankaŭ volis transiri la riveron, sed apenaŭ povis fari tion sen la rusoj. Do, li decidis daŭrigi memstare kun kelkaj samsortanoj. Ili perdiĝis en marĉoj ĉirkaŭ Sobiboro, kio protektis ilin de la germanoj, renkontis banditojn kaj fine trovis ŝirmejon ĉe pola kamparano.[37] Iuj judoj kiel Haim Engel kaj Selma Wijnberg, same kiel Ŝlomo Szmajzner povis kaŝiĝi ĉe iuj iuj polaj kamparanoj, kvankam por ili tio estis altgrada risko. Sed survoje la grupo de Szmajzner estis murdita de polaj partizanoj, kiuj estis timataj de la judaj fuĝintoj pro ilia kontraŭjuda sinteno. Katty Gokkes, unu el malmultaj nederlandaninoj, kiuj sukcesis fuĝi el la koncentrejo Sobiboro dum la ribelo de la 14a de oktobro, dum semajnoj vagadis tra la kampoj, ĝis kiam ŝi fine trovis la judajn partizanojn en la densa arbaro de Parczew, sed en septembro 1944 ŝi trovis la morton pro malsaniĝo je tifo, kiel Selma Wijnberg komunikis. Pli da bonŝanco havis Kalmen Wewryk, kiu dum multaj monatoj senespere vagadis tra la orientpola regiono en granda danĝero esti trovita kaj mortigita de germanoj, poloj aŭ ukrainoj, kiuj plej ofte tre panike kaj agreseme reagis, kiam ili vidis kaj kaptis judojn en la arbaro aŭ vilaĝoj.[38] Ankaŭ estas konata kaj priskribita la sorto de iuj aliaj Sobibor-rifuĝintoj, kiuj postvivis la militon. Iuj ekzemploj troveblas en la libro de Jules Schelvis kaj en la romano de Richard Rashke kaj estas inkluzivitaj en la sekvaj mallongaj biografioj.

La raporto pri la ribelo kaj la morto de la SS-personaro, kiu sendube atingis Berlinon post kelkaj horoj, eble kaŭzis konfuzon kaj tumulton tie. La tuta okazaĵo devis esti konsiderata kiel granda, embarasa bato por la nazioj. Himmler havis nur unu respondon. Li decidis rezigni pri la KC Sobiboro kiel bazon por purigi rabitan municion. Ĝi devis esti fermita, likvidita kaj ebenigita kun la tero kiel eble plej rapide.

Konklude: La ribelo de la 14a de oktobro 1943 havis enorman signifon en la historio de la naziaj koncentrejoj dum la dua mondmilito. Estis la unua fojo, kiam en iu tia germana koncentrejo aŭ ekstermejo grandparto de la deĵorantaj SS-funkciuloj kaj du germandevenaj gardistoj estis mortigitaj de simplaj kaj mizeraj judaj rezistanoj, kiuj ankoraŭ ne perdis la kuraĝon, kvankam ili troviĝis en senespera

[36] Stawki situas kelkajn kilometrojn norde de Różanka, do la grupo de Peĉerksi fuĝis en norda direkto, tra Włodawa. La saĝa fuĝstrategio de Peĉerskij ekde ĝia preparado en la koncentrejo, kiu en si mem estas unika kaj admirinda, do plene sukcesis.
[37] Laŭ Jules Schelvis, Vernichtungslager Sobibór. Unrast-Verlag Hamburg/Münster 203, p. 199-224
[38] Vd. lian apartan rakonton aperintan en germana lingvo, kiu ankaŭ imprese atestas la krudan polan antisemitismon de la dum- kaj postmilita tempo en aliaj regionoj de la lando, kie li restadis.

situacio, despli ke la Ruĝa Armeo, kiu devis liberigi ilin, ankoraŭ troviĝis mil kilometrojn for de Sobiboro, kaj kompetente, prudente kaj en plena konscio pri ebla sukceso preparis tiun ribelon en kunlaboro kun militspertaj sovetiaj soldatoj, kiuj neatendite alvenis al la koncentrejo en septembro, kvazaŭ kiel donaco de la ĉielo. Unuafoje judaj malliberuloj de iu nazia koncentrejo mortigis germanajn SS-funkciulojn. Pluraj faktoroj, kiuj kunludis, estis respondecaj por la sukceso de la ribelo (kvankam en ĝi nature pereis tro multaj homoj, sed tio ŝajne ne estis evitebla): La disciplino kaj kuraĝo de la judaj malliberuloj, la saĝa organiza talento de la sovetiaj soldatoj, precipe de leŭtenanto Peĉerskij, la plumpa senzorga konduto de la senzorgaj SS-funkciuloj, kiuj kredis, ke al ili nenio malbona povas okazi kaj tute ne rimarkis la preparadon de la ribelo kaj kies avideco kondukis ilin en la kaptilon, kaj la limigita agpovo de la ukrainaj gardistoj, al kiuj mankis atento- kaj reagokapablo kaj sufiĉa municia provizo. Ankaŭ la tago de la ribelo estis ĝuste elektita, kaj ankaŭ la ĝenerala feliĉo kiel la foresto de centraj SS-funkciuloj kiel Gustav Wagner ludis esencan rolon.

Kiel menciite, post la ribelo kaj fuĝado, la KC Sobiboro estis fermita kaj malkonstruita laŭ ordono de Himmler. La 19an de oktobro oficiale finiĝis la „operaco Reinhardt“, la programo por ekstermi la eŭropajn judojn. Ĝia estro, Odilo Globocnik, raportis, ke 12 milionoj da Reiĥmarkoj estis elspezitaj por ĝia efektivigo, kaj la totala profito estis 179 milionoj da Reiĥmarkoj.

La germana SS-personaro de la KC Sobiboro estis sendita al Italio por daŭrigi la persekutadon, deportadon kaj mortigadon de la lokaj judoj.

Finfine estas konataj 47 postvivantoj, inkluzive la kvin virojn, kiuj povis fuĝi de la arbara taĉmento en pli frua tempo antaŭ la ribelo. [Listigon de iliaj nomoj kun konciza biografio vd. je la fino de ĉi tiu parto]. La plej lasta postvivanto de la ekstermejo Sobiboro, Semjon Rozenfeld, mortis la 3an de junio 2019 en Israelo.

* * *

## La postvivantoj

1 La judaj malliberuloj de la koncentrejo Sobiboro

La ekzakta nombro de Sobibor-postvivantoj estas nekonata. Laŭ la listo de Thomas Toivi Blatt en la libro *Sobibór – der vergessene* Aufstand (2004) ekzistis entute 62 postvivantoj de Sobiboro: 53 de la ribelo de la 14a de oktobro 1943, 7 de la fuĝo el la arbara taĉmento de la 20a de julio 1943 kaj 2 aliaj de unuopaj fuĝoj.[39] Krom tio ekzistas la rakonto pri la fuĝo de tri aliaj judoj en majo 1942 (vd. sub Freiberman, Szama). Por honori ankaŭ tiujn homojn, al la suba listo estas aldonitaj ankaŭ la nomoj de kelkaj konataj fuĝintoj el la KC Sobiboro, kiuj probable pereis mallonge post la ribelo de la 14a de oktobro 1943 aŭ kiuj ne postvivis la militfinon.

**ALSTER, Ŝlomo,** nask. 1908 en Chełm, „Kongresa“ Pola Reĝlando. Li estis deportita de Chełm al Sobiboro en novembro 1942 kun Kalmen Wewryk. En la koncentrejo, kie li estis devigita konstrui barakojn kiel ĉarpentisto kaj ankaŭ laboris en la stacidoma taĉmento, li estis unu el la pli maljunaj edziĝintaj viroj. En 1946 li elmigris al Israelo. Mortis en marto 1992.

**BAĤIR, Moŝe,** nask. kiel **SZKLAREK** en 1927 en Płock, Pollando. En majo 1942 li venis el Zamość al Sobiboro per unu el la fruaj transportoj. Kun kvindek aliaj judoj li estis selektita por labori en la koncentrejo, unue en la stacidoma taĉmento, poste en la nutraĵ-barako kaj poste li funkciis ankoraŭ kiel harfrizisto (aŭ -tondisto). Post la milito li elmigris al Israelo kaj estis atestanto ĉe la proceso de Eichmann en Jerusalemo en 1961. Mortis en novembro 2002.

[39] La listoj, sur kiuj baziĝas la sekvaj biografioj, estas troveblaj sub https://www.sobiborinterviews.nl/en/the-revolt/survivors-of-the-revolt, https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_survivors_of_Sobibor, https://www.holocausthistoricalsociety.org.uk/contents/sobibor/sobiborsurvivorsandescapees.html, en la libro de Jules Schelvis, p. 273-286 kaj en la libro de Chris Webb, ĉap. XIII. Unuopaj biografioj estas kompletigitaj per biografioj publikigitaj en Vikipedio sub aparta retadreso.

**BARDAĤ, Antonius,** nask. 1909 en Lviv, Aŭstrujo-Hungarujo, alvenis al Sobiboro per la 53a transporto el Drancy, Francio. El la mil deportitoj li kaj Josef Duniec estis la solaj postvivantoj. Post la milito li elmigris al Belgio. Mortis en 1959.

**BIALOWITZ (**pollingve **BIAŁOWICZ), Philip (Fiszel),** nask. 1929 en Izbica, Pollando. Dek tri-jaraĝa li estis inter la okcent judoj, kiuj estis deportitaj per kamiono de Izbica al Sobiboro en aprilo 1943, kune kun sia 30-jara frato Simĥa. Ankaŭ iliaj fratinoj estis deportitaj al Sobiboro, kie ili pereis en la gasĉambroj. Ambaŭ fratoj deklaris sin farmaciistoj kaj estis selektitaj por labori en la koncentrejo, kune kun 45 aliaj deportitoj. Li laboris en la nutraĵ-barako kaj en la ordigaj barakoj, kie li devis serĉi kaŝitan monon kaj juvelojn en la vestaĵoj de la viktimoj. Poste li devis tranĉi la harojn de la virinoj antaŭ ol ili eniris la gasĉambrojn. Li ankaŭ laboris en la stacidoma taĉmento, kiu devis malplenigi la trajnojn post ilia alveno kun judoj kaj veturigi maljunajn kaj malsanajn judojn sur la ĉara relvojo ĝis la lagro III, kie ili estis mortigitaj. Bialowitz aktive partoprenis en la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Lia tasko estis embuski diversajn SS-virojn unu post la alia por mortigi ilin fare de kamaradoj. Post la ribelo Bialowitz kaj lia frato, kiu fuĝis kune kun li, povis kaŝiĝi ĉe bonvola pola kamparana familio. Post la milito Bialowitz unue fariĝis dentisto en Germanio, sed poste li elmigris al Usono, kie li ŝanĝis sian nomon al Philip kaj kie li laboris kiel juvelisto en Novjorko ĝis sia pensiiĝo. Li rakontis al studentoj kaj parolis en muzeoj kaj sinagogoj pri la tempo de la holokaŭsto. En la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj li atestis ĉe la Sobibor-procesoj en Hagen, kie li priskribis siajn spertojn kiel laborjudo de la stacidoma taĉmento, kiu devis akcepti trajnojn kun judoj el Galicio. Krome li atestis, kun Thomas Toivi Blatt (ambaŭ funkciis ankaŭ kiel akompanaj plendantoj), ĉe la proceso kontraŭ John Demjanjuk en 2010, kvankam li ne povis konkrete memori lin en Sobiboro, sed almenaŭ li povis rakonti kiel la SS-personaro pelis la judojn en la gasĉambrojn. En 2011 la monumento en Sobiboro devis esti fermita pro manko de mono. En oktobro 2013 Bialowitz skribis al la prezidanto de la Bundestago, Norbert Lammert, kun la propono aŭ postulo, ke la germana parlamento aranĝu financan kontribuon de Germanio por konstrui novan monumenton en la iama KC Sobiboro. Okaze de la 70a datreveno de la ribelo en la KC Sobiboro en 2013, Bialowitz, kiu tiam vizitis la lokon, estis premiita de la prezidento de la Pola Respubliko, Bronisław Komorowski, per la „Oficira Kruco de la Merit-Ordeno de la Pola Respubliko“. Por nova kaj pli inda monumento honore al la viktimoj de Sobiboro estis budĝetitaj tri milionoj da eŭroj. Male al Germanio, Pollando, Nederlando, Slovakio kaj Israelo konsentis subteni la projekton kun entute du milionoj da eŭroj. Li estis la aŭtoro de la memorlibro *Promeso ĉe Sobibor: Rakonto pri Ribelo kaj Postvivado de Juna Knabo en Nazia Okupata Pollando* (University of Wisconsin Press, 2010), tradukita al la pola lingvo de Piotr Kowalik kaj eldonita de la eldonejo Nasza Księgarnia sub la titolo *Ribelo en Sobiboro: rakonto pri la postvivado en Pollando okupata de la germanoj*. Bialowitz forpasis en aŭgusto 2016 en Delray Beach, Florido, Usono.[40]

**BIALOWITZ, (**pollingve **BIAŁOWICZ)**, **Simĥa,** nask. 1912 en Izbica, „Kongresa“ Pola Reĝlando, estis deportita al Sobiboro kun sia frato Filipo en aprilo 1943, kie li devis labori en la apoteko de la koncentrejo. SS-ulo Gustav Wagner elektis lin al la ege timata arbara taĉmento. Kune kun sia frato li sukcesis fuĝi dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Post la milito li elmigris al Israelo. Mortis en februaro 2014 (102-jara!).

**BISKUBICZ, Jakob,** nask. 1926 en Hrubieszów, Pollando. Jakob Biskubicz, tiam 15-jara, liaj gepatroj kaj parencoj alvenis en majo 1942 per transporto de du aŭ tri mil judoj en junio 1942 al Sobiboro. El tiu amaso okdek homoj estis selektitaj por labori en la koncentrejo, inter alie Jakob Biskubicz kaj lia patro, kiu estis poste mortpafita en la KC. Jakob Biskubicz devis bruligi vestaĵojn kaj dokumentojn, kiuj estis deponitaj de la viktimoj. SS-ulo Wagner ordonis, ke li disĵetu la cindron de la viktimoj en la legomĝardeno de la koncentrejo. Li laboris ankaŭ kiel ĉarpentisto kaj pasigis naŭ monatojn en la stacidoma taĉmento. Bialowitz povis fuĝi el la lagro IV dum la nokto de la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Li aliĝis al la partizanoj kaj poste al la pola armeo. En 1949 li elmigris al Israelo, kie li atestis dum la proceso kontraŭ Eichmann en 1961 kaj kie li forpasis en marto 2002.

**BLATT, Thomas (Toivi),** nask. 1927 en Izbica, Pollando. Post diversaj antaŭaj fuĝprovoj, kiuj devis konduki lin for de Izbica, kie li kaŝiĝis, Thomas Blatt estis transportita, kune kun tri cent aliaj judoj de Izbica, per kamiono al Sobiboro en aprilo 1943. Dum lia familio (patro Leon, patrino Fajgele kaj la 10-

[40] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Philip_Bialowitz.

jara frato Herŝ) pereis post la alveno en la gasĉambroj, li estis unu el kvardek junaj viroj, kiuj estis selektitaj de Karl Frenzel por labori en la koncentrejo, kie li devis purigi la botojn de SS-ulo Karl Frenzel kaj plifortigi la barilaron ĉirkaŭ la koncentrejo. Li ankaŭ estis devigita tondi la hararon de la judoj en la koncerna barako, ordigi kaj bruligi la vestaĵojn kaj personajn havaĵojn de la viktimoj. Blatt aliĝis al la subtera juda grupo, kiu preparis la ribelon de la 14a de oktobro 1943. Post la preskaŭ fiaskinta fuĝo kaj mallonga kunestado kun la sama grupo de Aleksandr Peĉerskij en la arbaro,[41] Blatt reiris al la ĉirkaŭaĵo de Izbica, kie li trovis protekton kaj spertis persekuton kaj preskaŭ pereis, ĉar poloj volis mortigi lin. Nur dank´ al miraklaj hazardoj, ekstrema singardemo kaj granda bonŝanco li restis viva. Pollando kaj precipe Izbica, kiu restis sen judoj kaj kie vivis liaj polaj malamikoj kaj diversaj fremduloj, kiujn li ne konis, povis doni al li neniujn vivperspektivon. En 1957 Blatt forlasis komunisman Pollandon, kiu estis venenita de agresema antisemitismo, kaj elmigris tra Israelo al Usono, kie li laboris kiel ĵurnalisto kaj aŭtoro, verkante la libron *El la Cindroj de Sobiboro. Rakonto pri postvivado,* kiu estis unue publikigita en 1982. En 1979 li vizitis Aleksandron Peĉerskij en Rostov-na-Donu (Sovetunio) kaj faris interparolon, kiu estis publikigita en lia libro *Sobiboro – la forgesita ribelo* (2004). En intervjuo de 1983 kun Karl Frenzel post ties liberiĝo el la malliberejo (kiu aperis en lia libro *Nur la ombroj restas*, 2009), Blatt provis esplori la motivojn de la industria mortigo de la judoj en Sobiboro. Ĝi restis unu el la solaj diskutoj inter SS-respondeculo de la KC Sobiboro kaj lia viktimo post la holokaŭsto. Krom tio, li okazigis memorajn eventojn kaj prelegojn pri la holokaŭsto. La filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987), en kiu Blatt estis ludita de Jason Norman, baziĝas sur lia libro kaj la scenaro ellaborita kun Stanisław Szmajzner, alia postvivanto de la KC Sobiboro, dum Blatt servis kiel teknika konsilanto.[42] Sekvis du memorlibroj: *El la Cindroj de Sobiboro. Rakonto pri postvivado.* (Northwestern University Press, Evanston, Illinois 1997) traktas lian vivon en Izbica ĝis la deportado de lia familio al Sobiboro, la restadon en tiu nazia ekstermejo kaj la tempon post lia fuĝo okaze de la ribelo de la 14a de oktobro 1943. La germana traduko aperis sub la titolo *Nur la ombroj restas. La ribelo en la koncentrejo Sobiboro*. (Berlino 2000). La dua libro sub la titolo *Sobiboro. La forgesita ribelo. Raporto de postvivanto,* verkita kun lia filo Leon, aperis en 1997 kaj priskribas pli detale la aferoojn de la KC Sobiboro ĝis la ribelo de oktobro 1943. La germana traduko de tiu libro aperis en Hamburgo en 2004. En majo 2009 Blatt estis aŭdita kadre de la antaŭenketoj kontraŭ John Demjanjuk en Munkeno kiel postvivanta atestanto pri siaj spertoj en la koncentrejo Sobiboro. Dum la proceso kontraŭ Demjanjuk en januaro 2010 antaŭ la Regiona Tribunalo de Munkeno li faris prian deklaron. Kiam eblis denove viziti Pollandon, Blatt regule revizitis la lokojn de Izbica kaj Sobiboro.[43] En oktobro 2013 Blatt elpaŝis en iu sinagogo en Lublino (Pollando)s kaj prelegis pri la travivaĵoj en la KC Sobiboro. Thomas Blatt forpasis en Santa Barbara, Kalifornio, fine de oktobro 2015 en la aĝo de 88 jaroj kiel unu el la plej lastaj postvivantoj kaj atestantoj de la KC Sobiboro.[44]

**BORNSTEIN, Moŝe.** Li fuĝis dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Biografiaj detaloj ne estas konataj.

**CU(C)K(I)ERMAN, Herŝel,** nask. 1893 en Kurów, „Kongresa“ Pola Reĝlando. La transporto, kiu alportis lin, liajn edzinon kaj familion tra Opole kaj Nałęczów al la KC Sobiboro en majo 1942, konsistis el 2500 homoj. Kvankam li estis ĝardenisto, li kaj lia juna filo Josef laboris en la kuirejo de la lagro I.

---

[41] Blatt apartenis, i.a. kun S. Szmajzner, al la grupo de Peĉerskij, kiu konsistis el 57 homoj. Por ne esti malkovritaj la fuĝintoj dividiĝis, laŭ konsilo de Peĉerskij, en pli malgrandajn grupojn kaj iris laŭ diversaj itineroj. Kvankam li promesis reveni al la grupo post esplorado de la situacio, Peĉerskij kaj liaj homoj forlasis la grupon de Szmajzner, kiu devis mem elturniĝi sen armiloj, kiujn la sovetianoj forprenis de ili. En 1979 Blatt demandis Peĉerskij pri la kialoj de lia tiama decido forlasi la grupon sub iu preteksto, kvankam la judoj fidis al li, sen diri la veron. Peĉerskij respondis kun jenaj argumentoj, ke li konsideris sian tasko liberigi la judojn el la KC Sobiboro plenumita. Kiel sovetia soldato li konsideris sian devon reiri al Sovetunio kaj lasi la polajn judojn sur pola teritorio. Li ne riskis diri la veron al ili, ĉar ili estus alkroĉiĝintaj al li, kio povintus signifi la finon por ĉiuj fuĝintoj. La reformiĝo laŭ malgrandaj grupoj, kion Peĉerskijs konsilis al la judoj, laŭ li pli forte garantiis la pluvivadon por ĉiuj. Krome Peĉerskij klarigis al Blatt, ke en tiu momento gravan rolon ludis la bazaj instinktoj de la homo, kiuj estis esencaj kaj necesaj por la pluvivado. La impreso pri trompado de la ceteraj fuĝintoj aperis en situacio de altgrada tumulto kaj paniko, en kiu Peĉerskij kaj la sovetiaj soldatoj decidis agi kiel ili agis. (Vd. Blatt, 2004, p. 159-60).

[42] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Escape_from_Sobibor.

[43] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=5T7cYiTPFdE.

[44] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Blatt, https://www.youtube.com/watch?v=PZ2jfdiWi80, https://www.youtube.com/watch?v=3eUNIxlEuIY, https://www.youtube.com/watch?v=PAFeCzqEp7A, https://www.youtube.com/watch?v=0cO7LeH_jX4, https://www.youtube.com/watch?v=WzCk8g-cSEU, https://www.youtube.com/watch?v=PyPL0O5zhvQ.

Dum sia tempo en Sobiboro li postvivis 100 vipajn batojn en unu fojo. Dum la ribelo de la 14a de oktobro li sukcesis fuĝi kune kun sia filo Josef. Dank´ al sia bonega memoro li povis identigi multajn SS-funkciulojn laŭ fotoj post la milito. En la fruaj 1950-aj jaroj li elmigris al Usono, kie li forpasis en julio 1979. En la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987) „Zuckerman" estis ludita de Jack Chissick.[45]

**CU(C)K(I)ERMAN, Josef,** nask. 1930 en Kurów, Pollando. En la KC Sobiboro la 12-jara Jozefo, filo de Herŝel Cu(c)kiermann, devis labori kun sia patro en la kuirejo kaj manĝejo de la lagro I kaj purigi la botojn de la SS-uloj. Dum la ribelo de la 14a de oktoro li sukcesis fuĝi kune kun sia patro Herŝel. Post la milito li unue ekloĝis en Stuttgarto kaj poste translokiĝis al Karlsruhe (Germanio). Mortis 33-jara en junio 1963.

**CYBULSKIJ, Boris (Цыбульский, Борис)** estis 54-jara stiristo de kamionoj el Donbaso (Ukrainio, Sovetunio) kaj do estis unu el la pli malljunaj malliberuloj en la KC Sobiboro. Li estis unu el la 80 selektitaj sovetiaj militkaptitoj, kiuj estis deportitaj al la KC Sobiboro en septembro 1943. Li ludis ŝlosilon rolon dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 en la organiza komitato de A. Peĉerskij. Li mortigis la SS-ulon Josef Wolf en la barako de la vestaĵoj. Li sukcesis fuĝi, transiri la riveron Bug kaj aliĝis al la Voroŝilov-partizanoj, sed li baldaŭ perdis sian vivon iam dum la batalo kontraŭ la germanoj.

**CYMIEL, Leon,** nask. 1924, el Chełm en Pollando. Forpasis en 1997.

**DRESCHER, Josef** estis 13-jaraĝa purigisto, kiu en la tago de la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kontribuis per tio, ke li tenis la kondukilojn de la ĉevalo de la SS-ulo Johann Niemann, kiam tiu ĉi vizitis la barakon de la tajloroj, kie li estis mortigita. Kaj li helpis al S. Szmajzner ŝteli fusilojn en la armila deponejo de la ukrainaj gardistoj. Drescher sukesis fuĝi el la koncentrejo, sed iel li peres iam poste.

**DUNIEC, Josef,** nask. 1912 en Kievo, Ukrainio, Ruslanda Imperio. En 1932 li elmigris al Francio por studi kemion. En marto 1943 li estis transportita de la transira koncentrejo Drancy al Majdanek/Lublin. Ĉar la mil homoj de tiu transporto ne povis esti loĝataj ĉi tie, la trajno pluveturis al Sobiboro. Li estis unu el 31 malliberuloj, kiuj estis selektitaj por labori en la koncentrejo, inter alie en la arbara taĉmento kaj en la ordigaj barakoj. Kune kun Antonius Bardaĥ li estis la sola deportito el Francio, kiu postvivis la ribelon kaj la koncentrejon. Post la milito li establis sin en Israelo. Li mortis pro koratako unu tagon, antaŭ ol li volis veturi al Hagen por atesti ĉe la Sobibor-proceso de la jaro 1965, nome la 1an de decembro 1965 en Hajfo, Israelo.

**ENGEL, Ĥaim,** nask. 1916 en Brudzew, Pollando. Post kiam liaj patro kaj duonpatrino estis deportitaj al Sobiboro en junio 1942, el Lublino, kie la familio vivis, Ĥaim Engel kaj lia frato estis deportitaj el Izbica al la KC Sobiboro, kie ili estis selektitaj por labori en la koncentrejo: ordigi vestaĵojn, labori en la stacidoma taĉmento, tranĉi la harojn de judaj virinoj, kontroli la virinan barakon k.a. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 li kaj Kapo-o Pożycki mortigis la SS-ulojn Rudolf Beckmann kaj Thomas Steffl. Kune kun sia koramikino Selma Wijnberg, kun kiu li poste edziĝis (vd. WIJNBERG-ENGEL, Selma), li povis esti kaŝita de polaj kamparanoj dum naŭ monatoj, ĝis kiam li estis liberigita de la Ruĝa Armeo proksime de Chełm la 23an de junio 1944. Tra Odeso kaj Marsejlo ili atingis la liberigitan Nederlandon. Ĉar li ne estis nederlanda civitano, li devis kaŝiĝi en Amsterdamo dum kelka tempo; la paro poste translokiĝis tra Israelo al Usono. Engel, kiu servis kiel atestanto dum la Sobibor-proceso kontraŭ Karl Frenzel, forpasis en julio 2003 en New Haven, Usono. Liaj raportoj servis kiel bazo por la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987).[46]

**FAJGENBAUM, Jakub** fuĝis dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 en la KC Sobiboro. Biografiaj detaloj ne estas konataj.

**FELDHENDLER, Leon**, nask. 1910 en Zółkiewka, „Kongrea" Pola Reĝlando. Filo de rabeno, iama membro de la juda konsilio de Zółkiewka, estis transportita al Sobiboro komence de 1943. Li estis selektita por labori en la nutraĵ-barako kaj foje devis helpi en la stacidoma taĉmento. Dum sia tuta restado en la koncentrejo li fariĝis atestanto de pluraj fuĝprovoj de malliberuloj, al kiuj la nazioj reagis per venĝaj operacoj. Kune kun Aleksandro Peĉerskij li organizis kaj gvidis de la ribelon de la 14a de oktobro 1943 kaj sukcesis fuĝi el la koncentrejo kun ĉirkaŭ 150 malliberuloj kaj kaŝi sin en la proksima

---

[45] Foton vd. sub https://sobibor.de/hershel-und-josef-cukierman.
[46] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Chaim_Engel, https://www.sobiborinterviews.nl/en/component/content/article/65; https://www.youtube.com/watch?v=hEirhkQnUkc, https://www.youtube.com/watch?v=3eUNIxlEuIY.

arbaro. Post la liberiĝo de Lublino en julio 1944 li dividis domon en la Kowalska-strato 4 kun du kunvivaj loĝantoj, kiuj kaŝis sin en tiu domo dum la milito. Dum iu pafado de antisemitoj aŭ polaj naciistoj Feldhendler estis grave vundita, sed la cirkonstancoj de lia morto, kiu okazis la 2an de aprilo 1945, ne estas klaraj, ĉar ekzistas diversaj versioj. En la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987) Feldhendler estis ludita de Alan Arkin. Feldhendler estis premiita postmorte de la prezidento de la Pola Respubliko, Andrzej Duda, la 14an de oktobro 2018 per la „Kruco de la Komandanto de la Ordeno de Polonia Restituita" okaze de memora ceremonio de la 75a datreveno de la ribelo en la KC Sobiboro. Krome li estis premiita postmorte de la prezidento de Rusio, Vladimir Putin, per la „Ordeno de la Kuraĝo" de la Rusa Federacio la 17an de julio 2019. La premio estis transdonita de Putin al la grandnevino de Leon Feldhendler, Nitza Ŝahaham, en Jerusalemo okaze de la ceremonio de la Kandela Memoro pri la viktimoj de la Leningrada sieĝo en januaro 2020. En la brita televida filmo *Fuĝo el Sobiboro* de la jaro 1987 Feldhendler estis ludita de Alan Arkin. La vivo de Feldhendler en Lublino estas menciita en la libro „Wyjątkowo długa linia" de Hanna Krall de 2005.[47]

**FELDMAN-ZIELINSKI, Regina (Rivka)**, naskita 1924 en Siedliszcze, Pollando. La 20an de decembro 1942 ŝi venis el la labor-koncentrejo Staw-Nowosiólki per ĉevalĉaro kun 800 judoj al Sobiboro, kie ŝi estis selektita kun 11 aliaj junaj virinoj kaj devis triki kaj kudri ŝtrumpetojn, labori en la lavejo kaj semĉambro kaj ordigi municion en la lagro IV. SS-funkciulo Gustav Wagner iam batis ŝin tiel forte per sia vipo, ke post la milito unu el ŝiaj renoj devis esti forigita pro troa difekto. Post la fuĝo dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 ŝi unue trovis protekton ĉe pola kamparano, kiu gardis ŝin dum unu semajno. Ŝi reiris al sia naskiĝloko Siedliszcze kaj daŭrigis tra Chełm al Lublino, kie ŝi bonŝance trapasis iun kontrolon sen esti rimarkita, ke ŝi estas judino fuĝinta el Sobiboro. Havante falsajn dokumentojn je dispono, kiujn ŝi akiris en Chełm de iu konatino, ŝi anoncis sin ĉe la laboroficejo, kie ŝi klarigis, ke ŝi deziras labori en Germanio. Ricevinte iun taŭgan dokumenton tiucele, ŝi iris al la centro, kie kolektiĝis la libervoluloj por labori en Germanio. Per la taŭga bileto ŝi veturis la venontan tagon al Germanio kaj atingis, tra Berlino, Frankfurton, kie ŝi anoncis sin ĉe la laboroficejo, kiu donis al ŝi la adreson de la familio, ĉe kiu ŝi devis labori kiel servistino, sen ke iu rimarkis, ke Regina estis judino, kaj kie ŝi lernis la germanan lingvon. Post kiam la usonanoj 1,5 jarojn pli poste liberigis Frankfurton, Regina malkaŝis al la dommastro sian veran identecon kaj rakontis sian historion. Ŝi forlasis lin kaj trafis al iu centro por judaj rifuĝintoj en Wetzlar. Sen hejmo ŝi decidis resti en Germanio kaj laboris ĉe iu usona administracio (UNRRA). En Wetzlar ŝi konatiĝis kun sia onta edzo, kiu estis pola katolika armea oficiro (Kazimierz Zielinski), kiu postvivis la militon kiel militkaptito, kaj kun kiu ŝi edziniĝis en decembro 1945. En aŭgusto 1949 ili elmigris al Sidnejo en Aŭstralio. Pli poste ŝi vivis en la ŝtato Viktorio kaj rakontis al multaj lernejaj klasoj pri siaj travivaĵoj en Sobiboro. Ŝi forpasis en septembro 2014. Ŝia filo verkis la libron *Konversacioj kun Regina*, kiu inter alie rakontas ŝiajn spertojn kiel postvivanto de la holokaŭsto.[48]

**FELENBAUM-WEISS, Hella,** nask.1924 en Lublin, Pollando. En decembro 1942 ŝi estis deportita kun du fratoj kaj aliaj judoj de la labor-koncentrejo Staw-Nowosiólki sur ĉevala ĉaro al Sobiboro. Dum la veturado la fratoj povis fuĝi, sed la unua estis tuj mortpafita kaj la dua pereis poste. En Sobiboro ŝi estis selektita kiel gladistino kaj laboris en la vestordiga barako, kiel trikistino de ŝtrumpetoj por la ukraina kaj SS-personaro kaj kiel ĝardenistino, kie ŝi devis provizi la SS-personaron per floroj. Post la ribelo de la 14a de oktobro 1943, en kiu ŝi sukcesis fuĝi el la koncentrejo kun Zelda Metz kaj Estera Raab kaj resti viva, aliĝante al la Parczew-partizanoj kaj al la Ruĝa Armeo, de kiu ŝi ricevis altajn distingojn pro heroa batalado kontraŭ la germanoj. Post la milito Felenbaum, kiu estis unu el sep virinoj, kiuj postvivis la koncentrejon Sobiboro, edziniĝis kun iu soldato en Ĉeĥoslovakio kaj translokiĝis kun li al Israelo, kie ŝi forpasis en decembro 1988.[49]

**FISCHER-LICHTMAN, Eda** (aŭ **Ada**), nask. 1915 en Jaroslau (pl. Jarosław), Galicio, Aŭstrujo-Hungarujo. Kiam la milito eksplodis ŝi vivis kun sia edzo en Wieliczka kaj ili iris al Mielec, de kie ŝi estis transportita al Berdychów kaj Dubienka ĉe la rivero Bug. De tie ŝi estis deportita tra Hrubieszów al la KC Sobiboro, kie ŝi alvenis en junio 1942 kaj en kiu ŝi devis labori en la lavejo kaj gladejo de la

---

[47] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Leon_Feldhendler.
[48] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Regina_Zielinski, Jules Schelvis: Vernichtungslager Sobibór. Unrast, Hamburg, Münster 2003, p. 216-218; https://www.youtube.com/watch?v=KRRHaDF_2UA, https://www.youtube.com/watch?v=3eUNIxlEuIY.
[49] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Hela_Felenbaum-Weiss.

lagroj I kaj II, ludante socian rolon inter la virinoj. En la KC ŝi konatiĝis kun Itzhak Lichtman. Post sia fuĝo dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 ŝi aliĝis al la partizanoj de Parczew. En 1950 ŝi migris kun Itzhak Lichtman al Israelo, kie ili geedziĝis. Ŝi elpaŝis kiel atestantino dum la proceso kontraŭ Josef Eichmann en Jerusalemo (1961) kaj kunlaboris kun Jad Vaŝem. En la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987) ili estis reprezentitaj de Jack Shepherd kaj Patti Love, Krom tio ŝi donis intervjuon al la franca dokumentisto Claude Lanzmann (1979/2017). Ŝi forpasis en 1993.[50] (Vd. ankaŭ LICHTMAN, Itzhak)

**FREIBERG, Berl (**aŭ **Berek** aŭ **Dov),** nask. 1927 en Varsovio, Pollando. En aŭtuno 1941, kiam la kondiĉoj en la varsovia geto malbonigis kaj dekmiloj da ĝiaj loĝantoj mortis aŭ estis mortigitaj, tio instigis lin forlasi la geton per la helpo de kontrabandisto. Freiberg eskapis al la fora urbeto Turobin en la distrikto de Lublino, kie la judoj, inkluzive la familion de la patro, loĝis en relativa trankvilo. La 17an de majo 1942 la urbo estis subite ĉirkaŭita de la SS en akompano de lokaj helpantoj kaj ukrainoj. La plimulto de la judoj de la vilaĝo estis, kune kun la judoj de aliaj proksimaj urboj, brutale deportitaj el Krasnystaw al la koncentrejo de Sobiboro. Kiel selektita laborjudo li estis devigita fosi fosaĵojn por bruligi rubon, ordigi la vestaĵojn de la deportitaj kaj mortigotaj judoj, purigi la botojn de la ukrainaj gardistoj kaj tranĉi la harojn de la judaj virinoj, antaŭ ol ili iris al la gasĉambroj. Post 17 monatoj da kruela traktado kaj malsato li sukcese partoprenis la ribelon de la 14a de oktobro 1943 kaj kaŝiĝis en la proksimaj arbaroj, kie li aliĝis al la juda partia unuo de Joseph Serĉuk en la regiono de Lublino ĝis la sovetia armeo liberigis la regionon en julio 1944. Post la milito Freiberg translokiĝis al Lodzo, Pollando, por mallonga periodo, kaj de tie daŭrigis al Germanio, kie li aliĝis al trejna grupo konsistanta el postvivantoj de la holokaŭsto. Tie li renkontis sian estontan edzinon – Sarah, kiu estis rifuĝintino el Sovetunio. Ĉi tiu grupo provis vojaĝi en somero 1947 per ŝipo al Palestino, sed la veturado estis haltigita de la britoj kaj la grupo resendita al Germanio. En 1948, kune kun la trejna grupo, Freiberg tamen sukcesis ekloĝi en Israelo, kie li laboris en kibuco, kie li ricevis militan trejnadon kaj batalis en la sendependeca milito de Israelo. Dum lia militservo naskiĝis liaj filinoj Rivkah kaj Jael. Dum la proceso kontraŭ Eichmann en Jerusalemo en 1961 li rakontis pri la hororo en la KC Sobiboro. Kvar jarojn poste li estis invitita al Germanio por atesti ĉe la proceso en Hagen, kie SS-funkciuloj estis akuzitaj pro krimoj faritaj en Sobiboro. Krom tio Freiberg fariĝis ŝatata preleganto, kiu ofte rakontis antaŭ studentoj, soldatoj, oficiroj kaj edukaj organizaĵoj pri la holokaŭsto. Dufoje li vojaĝis kun junularaj delegacioj al Pollando kiel postvivanto. Li ankaŭ estis invitita de la israela ĉefministro Jichak Rabin por partopreni en oficiala vizito al Pollando. En 1986 Freiberg atestis ĉe la proceso kontraŭ John Demjanjuk en Israelo, pledante kontraŭ lia liberigo, ĉar laŭ lia opinio la ukraina nazia helpanto devis esti juĝita pro siaj krimoj en la KC Sobiboro. La edzino de Freiberg, Sarah, mortis fine de 2007, kaj li mem forpasis kelkajn monatojn poste en marto 2008 en Ramla, Israelo. Freiberg verkis kvar librojn: *Relikto de Sobiboro* (1988), kiu rakontas la historion ekde la eksplodo de la dua mondmilito, de la holokaŭsto, de la kontraŭleĝa enmigrado al Israelo sur la nomita ŝipo ĝis la tago de la alveno en Israelo. La libro ricevis grandan atenton kaj aperis en ok hebreaj eldonoj, same kiel la angla traduko *Postvivi Sobiboron*. Alia libro, *Vojaĝo al la Pasinteco kun Gefen Shibolim*, estis publikigita en 1993 kaj priskribas la spertojn kun la kampanjo farita de grupo de mezlernejaj studentoj en 1991; la vojaĝo inkluzivis la unuan viziton de Freiberg al la KC Sobiboro 48 jarojn post sia restado tie. *Esti unu persono* estis publikigita en 1996. Ĝi priskribas la vivon kiel postvivanto de la holokaŭsto, la vivon en Israelo kaj lian atestadon ĉe la proceso kontraŭ Eichmann. La libro *Inter Du Mondoj* estis eldonita en 2001 kaj priskribas la ambiguan vivon inter la tempo de la holokaŭsto kaj la mondo, kiu sekvis.[51]

**FREIBERMAN, Szama** devenis el Włodawa kaj estis unu el la fuĝintoj el la KC Sobiboro kune kun Szmul Maĥles kaj Matys, kiuj, irante nudaj kaj al la gasĉambroj, sukcesis kaŝi sin en la arbustoj kaj rampi sub la pikdrato al la libereco. Ili reiris en majo 1942 al Włodawa, sed pliaj detaloj pri ilia plua sorto ne estas konataj.

**GERSTENBERG, Herman,** nask. 1909 en Ljuboml, Volhinio, Ruslanda Imperio. Laŭ propra deklaro Gerstenberg alvenis en Sobibor el Chełm en marto 1943. En la koncentrejo li laboris kiel ĉarpentisto.

[50] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ada_Lichtman.
[51] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Dov_Freiberg. Vd. ankaŭ la apartan raporton de Berek Freiberg en la libro *Nach dem Untergang*.

Post la milito li ŝanĝis sian nomon al Posner kaj elmigris al Usono, kie li forpasis en junio 1987 en Nov-Jorko.

**GOKKES, Catharina (Kathy),** nask. 1923 en Den Haag, Nederlando, kie ŝi laboris kiel oficistino. En aprilo 1943 ŝi estis deportita tra Vught kaj Westerbork al Sobiboro. Dum la ribelo de la 14 de oktobro 1943 ŝia kruro estis trafita de pafo de Frenzel, sed ŝi sukcesis fuĝi en la arbaron kun Ursula Stern kaj Eda Lichtman kaj aliĝis al la lokaj partizanoj. Laŭ Ursula Stern ŝi pereis en septembro 1944 dum pafado kun germanoj, kio estas plej verŝajna, dum Selma Wijnberg sciigis, ke ŝi mortis pro tifo ankoraŭ antaŭ la fino de la milito.

**GOLDFARB, Mordeĥai (Moŝe),** nask. 1920 en Piaski, Pollando. Goldfarb alvenis kun sia frato en Sobiboro en novembro 1942 per la sama transporto kiel Kurt Thomas. Kiel desegna pentristo li pentris la nomojn kaj adresojn sur la valizojn de la SS-uloj, kiuj foriris al feriado. Dank´ al unu el ĉi tiuj etikedoj Kurt Thomas sukcesis ĉasi la SS-ulon Karl Frenzel post la milito. Lia frato estis mortigita en la koncentrejo. Post la ribelo de la 14a de oktobro 1943 Goldfarb aliĝis al la sama partizana grupo (de Parczew) kiel Jehuda Lerner. Li forpasis en junio 1984 en Hajfo, Israelo.

**HANNEL, Salomea** estis deportita de Ustrzyki Dolne al Sobiboro, de kie ŝi sukcesis fuĝi okaze de la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kaj kaŝiĝi en la arbaro, antaŭ ol daŭrigi la vojon al Krakovo.

**HERSZMAN, Josef,** nask. 1925 en Żółkiewka, Pollando. De Chełm li estis deportita al Sobiboro per unu el la fruaj transportoj. Tie li laboris en la ordigaj barakoj, en la stacidoma kaj arbara taĉmentoj. Post la milito li elmigris al Israelo, kie li forpasis en 2005.

**HOCHMAN, Moŝe.** Fine de printempo 1942 Hochmann kaj lia familio estis deportitaj de Żółkiewka al Krasnystaw kaj de tie al Sobiboro, kie li laboris en la barako de la tajloroj. Estis li, kiu igis la SS-ulon Johann Niemann viziti la barakon de la tajloroj por esti mortigita en la tago de la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Post sukcesa mortigo Hochmann envolvis la kadavron en kovrilon kaj kaŝis lin. Li sukcesis fuĝi dum la ribelo kaj kaŝis sin en iu farmbieno en Papierzyn ĝis la liberigo fare de la Ruĝa Armeo en 1944.

**HONIGMAN, Zyndel,** nask. 1910 en Kievo, Ukrainio, Rusland Imperio. En novembro 1942 li atingis Sobiboron el Gorzków ĉe Izbica, kie li estis selektita por deviga laboro. Du tagojn poste sia alveno li nokte rampis sub la pikdrato kaj sukcesis forkuri tra la lagro II. En aprilo 1943 li estis kaptita kaj denove deportita al Sobiboro, ĉi-foje tra Trawniki. Li ŝajnigis esti viandisto kaj iĝis laboristo en la kuirejo. Duan fojon li eskapis, ĉi-foje kiel unu el la kvin membroj de la arbara taĉmento, kiu sukcesis forkuri la 20an de julio 1943 kaj aliĝi al la partizanoj de Parczew. Post la milito li elmigris al Usono, kie li forpasis en julio 1989. En decembro 1965 li atestis ĉe la Sobibor-proceso en Hagen.

**ICKOVITCH, Miĥail** estis membro de la grupo de A. Peĉerskij, kiu fuĝis dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 en la KC Sobiboro kaj aliĝis al la partizanoj.

**KATZ, Serka** estis deportita de Dubena tra Hrubieszów al Sobiboro kune kun Eda Lichtman kaj Bella Sobol en junio 1942. Tie ŝi laboris kiel purigistino en la barako de la SS-personaro. Ŝi fuĝis okaze de la ribelo de la 14a de oktobro 1943, sed probable ŝi pereis en la arbaro.

**KELBERMAN-METZ, Zelda**, nask. 1925 en Siedliszcze, Pollando, estis unue deportita kun sia familio al la labor-KC de Staw-Nowosióli. Kune kun la kuzino(j?) Regina Zielinski kaj Esther Raab, Zelda alvenis en Sobiboro la 20an de decembro 1942 per transporto de ĉaroj tiritaj de ĉevaloj kun 800 aliaj judoj. En la koncentrejo ŝi devis triki ŝtrumpetojn kaj puloverojn por la soldatoj kaj labori en la lavejo kaj gladejo. En somero 1943 ŝi devis helpi la konstruadon de la nova lagro IV. Post la ribelo de la 14 de oktobro 1943, dum kiu ŝi fuĝis kun la menciitaj virinoj, ŝi kaŝiĝis ĉe polaj kamparanoj. Ŝajnigante sin „arja“ katolika knabino nomata Janina, ŝi laboris kiel infan-vartistino en Lembergo/Lviv. En 1946 ŝi elmigris al Usono, kie ŝi forpasis en 1980. Dank´ al sia bona memorkapalo ŝi povis bone rekoni sur fotoj submetitaj al ŝi multajn SS-virojn kaj povis kontribui al la identigo de naziaj krimuloj de Sobiboro.[52]

[52] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zelda_Metz-Kelbermann.

**KOHN, Abraham,** nask. 1910 en Lodzo, „Kongresa“ Pola Reĝlando. La transporto, per kiu li alvenis al Sobiboro en majo 1942, konsistis el kelkcent judoj el Wisocka. Li kaj lia frato estis inter la okdek viroj selektitaj por labori en la koncentrejo, nome en la ordigaj barakoj, la kuirejo kaj en la arbara taĉmento. Post la milito li elmigris al Aŭstralio. Li rifuzis atesti en la proceso de 1983 kontraŭ Karl Frenzel, ĉar li ne ricevis monkompenson. Li forpasis en januaro 1986 en Melburno, Aŭstralio.

**KOPF, Josef,** nask. en Biłgoraj, Pollando (dato nekonata). Li estis inter la unuaj judoj, kiuj alvenis al Sobiboro. Kiam en julio 1943 li ricevis la ordonon akiri akvon por la membroj de arbara taĉmento, li kaj Ŝlomo Podĥlebnik mortigis akompanan ukrainan gardiston proksime de la vilaĝo Żłobek, kio ebligis al ili forfuĝi. Kopf estis mortigita en aŭgusto 1944 de polaj antisemitoj.

**KORENFELD, Ĥaim,** nask. 1923 en Izbica, Pollando. Li alvenis en aprilo 1943 al Sobiboro per la sama transporto kiel Thomas (Toivi) Blatt. Laŭ unu el du versioj, Zyndel Honigman kaj Abraham Wang deklaris, ke la 20an de julio 1943 la tri forfuĝis de la arbara taĉmento. Korenfeld tamen deklaris, ke li restis en la koncentrejo ĝis la ribelo de la 14 de oktobro 1943. En 1949 li elmigris de Italio al Brazilo kaj forpasis en aŭgusto 2002.

**KOSTMAN, Fredek** estis tiam 21-jaraĝa kaj originis el Krakovo. En la tago de la sobibora ribelo de la 14a de oktobro 1943 li fuĝis kun sia amiko Szmul Wajcen kaj renkontiĝis kun Thomas (Toivi) Blatt en la arbaro. Apud Izbica ili dume estis kaŝitaj de pola kamparano nomata Bojarski por kvin kaj duono da monatoj. Sed en aprilo 1943 liaj komplicoj pafis kontraŭ la judoj en ties kaŝejo. Dum Kostmann estis mortigita, Wajcen kaj Blatt estis nur vunditaj kaj povis forfuĝi en la arbaron. En sia memuaro Blatt detale priskribis la okazaĵojn.

**LEJST (**aŭ **LAJST), Ĥaim,** nask. en 1906 aŭ 1911 en Żółkiewka, Pollando, estis deportita en aprilo 1943 al Sobiboro. Post la milito li elmigris al Brazilo. En la fino de la sesdekaj jaroj li iris al Israelo, kie li mortis en oktobro 2005.

**LAJTMANN, Samuel-Ŝlomo** estis lignaĵisto el Varsovio, kiu fuĝis al Sovetunio post la germana invado, kie li estis enkarcerigita en la fifama SS-prizono ĉe la Ŝeroka-strato en Minsko, Belorusio, kie li konatiĝis kun Aleskandr Peĉerskij, kun kiu li amikiĝis. Ŝlomo alvenis en Sobiboro per la unua transporto el Minsko en septembro 1943 kun Boris Taborinskij kelkajn tagojn antaŭ Peĉerskij. Kiel membro de la organiza komitato, kiu preparis la ribelon de la 14a de oktobro 1943, Lajtman mortigis SS-Unterschargvidanton Friedrich Gaulstich en la barako de la ĉarpentistoj. Dum la ribelo li vundiĝis kaj elĉerpiĝis post kiam li preskaŭ atingis la arbaron. La specifa tragiko de lia sorto konsistis en tio, ke li rifuzis esti savita de la aliaj fuĝintoj, kiuj volis kunporti lin. Ludita de Emil Wolk, Lajtman reprezentis unu el la ĉefaj figuroj en la filmo *Fuĝo el Sobiboro* de Jack Gold (1987).[53]

**LERER, Samuel,** nask. en 1922 en Żółkiewka, „Kongresa“ Pola Reĝlando. En majo 1942 Lerer estis transportita al Sobiboro, kie en la lagro II li devis okupiĝi pri ĉevaloj, kokidoj kaj anasoj. En 1949 li kaj Esther Raab rekonis la SS-viron Hermann Erich Bauer en Berlino, kiu okupiĝis pri la gasumado de la judoj en Sobiboro, kio rezultigis lian areston. Vivante en Berlino dum kelkaj jaroj, Lerer poste migris al Usono, kie li fariĝis taksiisto en Brooklyn. Li forpasis en marto 2016.

**LERNER, J(eh)uda,** nask. 1926 en Varsovio, Pollando. En somero 1942 Lerner estis deportita kun sia familio al la KC Treblinka, dum Jehuda estis sendita al la flughaveno de Smolensko en Ruslando/Sovetunio por deviga laboro dum tri monatoj kadre de la „Organizo Todt“. Li povis fuĝi en septembro 1942, sed li estis kaptita kaj sendita al la geto de Minsko. De tie li estis transdonita al la SS-koncentrejo ĉe la Ŝeroka-strato en Minsko. En septembro 1943 li estis veturigita al la KC Sobiboro. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 li kaj Arkadi Vajspapir mortigis la SS-funkciulon Siegfried Graetschus kaj la ukrainan gardiston Ivan Klatt en la barako de la ŝuistoj. Kune kun Moŝe Goldfarb li aliĝis al la partizanoj de Parczew. De januaro ĝis somero 1945 li funkciis kiel vickomandanto de la polico en Radom. Tra Germanio li migris en 1949 kun sia edzino Manja al Israelo, kie li laboris por la polico en Hajfo. Li forpasis en 2007.

**LIBERMAN, Pesia** estis unu el la tri judoj, kiuj forfuĝis de la KC Sobiboro en la nokto de la 25a de decembro 1942 kune kun du ukrainaj gardistoj (Viktor Kisilev kaj Emil Zischer). En la arbaro la du

[53] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Schlomo_Lajtman.

judoj disiĝis kaj iris laŭ sia propra vojo, dum Liberman restis kun la du ukrainoj, kiuj estis armitaj. Kvin tagojn poste ili estis perfiditaj de pola farmisto, kiu kaŝis ilin en la vilaĝo Kozia Górka. Tie ili estis mortpafitaj de tri polaj policistoj (kies nomoj iĝis konataj).

**LICHT, Aron** forfuĝis la 20an de julio 1943 de la arbara taĉmento en la KC Sobiboro. Biografiaj detaloj ne estas konataj.

**LICHTMAN, Itzhak**, nask. en 1908 en Żółkiewka, Pollando. Li kj lia familio estis deportitaj piede de Żółkiewka al la stacidomo de Krasnystaw, kie ili estis metitaj en brutvagonojn kaj veturigitaj al la KC Sobiboro, kie ili alvenis meze de majo 1942 kune kun du mil aliaj judoj. Dum la familanoj estis gasumitaj, li estis selektita kiel laborjudo. Ĝis la ribelo li laboris en la ŝuista barako de la lagro I kune kun lia kuzo Berel Lichtman. En la koncentrejo li konatiĝis kun Eda Fischer, kun kiu li fuĝis kaj al kiu li poste edziĝis. Dum la ribelo li kaj Scholem Fleischacker mortigis la SS-ulon Josef Vallaster. En decembro 1943 li aliĝis al la partizanoj de la arbaro de Żuków kaj en junio 1944 servis en la pola armeo. En 1950 li migris kun Eda Fischer al Israelo, kie ili geedziĝis. Li mortis en 1992.[54] (Vd. ankaŭ FISCHER-LICHTMAN, Eda)

**LITVINOVSKIJ, Jefim Vladimiroviĉ,** nask. 1921 en Smela/Smila, gubernio Kremenĉug, Ukraina SSR. En la sama jaro, lia familio transloĝiĝis al Samara, Ruslando, Sovetunio. La vivo en la apudvolga urbo montriĝis malfacila. La familio spertis du ondojn de malsato ĉi tie - en la jaroj 1920 kaj 1930. En la aĝo de 14 jaroj, Jefim fariĝis orfo. Fininte la sepan lernejan klason, li lernis la profesion de frizisto. En 1939 li estis rekrutita de la Ruĝa Armeo. Li deĵoris en la Fora Oriento, komence de la milito li estis translokita okcidenten, kie li estis kaptita kaj sendita al la fifama SS-prizono ĉe la Ŝeroka-strato en Minsko. De tie li estis deportia en septembro 1943 al Sobiboro kune kun la unuaj sovetiaj militkaptitoj de la grupo de A. Peĉerskij. Post la fuĝo el la koncentrejo kadre de la ribelo de la 14a de oktobro 1943 li kaŝiĝis en la arbaro kun Cadik Levin dum du monatoj, ĝis kiam ili trafis al partizana taĉmento de polaj judoj. Poste li aliĝis al la regula sovetia armeo. En 1944 Litvinovskij estis vundita kaj estis transportita al la rusa urbo Kujbyŝev (Samara), kiun li neniam plu forlasis kaj kie li forpasis en januaro 1993. En majo 2019 en la Kujbyŝev-strato n-ro 44 estis inaŭgurita memorŝildo honore al Jefim Litvinovskij. La memoro pri li estas flegata de la „Fondaĵo por la memoro de Aleksandro Peĉerskij" kaj subtenata de la administracio de Samara.[55]

**MACHL(I)ES, Szmul** devenis el Włodawa kaj estis unu el la fuĝintoj el la KC Sobiboro kune kun Szama Freiberman kaj Matys, kiuj, irante nudaj kaj al la gasĉambroj, sukcesis kaŝi sin en la arbustoj kaj rampi sub la pikdrato al la libereco. Ili reiris en majo 1942 al Włodawa, sed pliaj detaloj pri ilia plua sorto ne estas konataj.

**MARGUL(I)ES, Abraham**, nask. 1921 en Żyrardów, Pollando. Jam en 1940 li estis devigita labori en labor-KC proksime de Bełżec, kie li devis konstrui kontraŭtankajn defendajn fosaĵojn (t.n. „Otto-linioj“) proksime de la rusa limo. Fine de majo 1942 li estis deportita al Sobiboro per transporto de du mil judoj el Zamość. Li estis unu el kvindek viroj, kiuj estis selektitaj por labori en la koncentrejo, inter alie en la stacidoma taĉmento, kuirejo kaj ordigaj barakoj. Li amikiĝis kun Hella Weiss kaj pasigis multan tempon kune ŝi dum kaj post la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Post la milito li elmigris al Israelo, kie li laboris kiel presisto, kaj forpasis en 1984. Dank´ al sia bona memorkapalo li povis bone rekoni en 1962 sur fotoj submetitaj al li multajn SS-funkciulojn kaj povis kontribui al la identigo de naziaj krimuloj de Sobiboro.

**MAZURKIEVITCH, Semjon** estis unu el la anoj de la grupo de sovetiaj militkaptitoj ĉirkaŭ Aleksandr Peĉerskij, kiu sukcesis fuĝi dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kaj aliĝi al la partizanoj. Detaloj pri lia plua sorto ne estas konataj.

**MENĤE, Ĥaskiel**, nask. 1910 en Koło, „Kongresa“ Pola Reĝlando. En 1937 li edziĝis al Hella Podĥlebnik, fratino de Ŝlomo Podĥlebnik, kiu fuĝis el la KC Sobiboro. Kune kun du mil aliaj judoj li estis transportita al Sobiboro tra la getoj Izbica kaj Lublino en junio 1942. Selektita por labori, li estis engaĝita en la ordigaj barakoj kaj la barako de la tajloroj kiel produktisto de ĉapoj. Li fuĝis dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kaj kaŝiĝis en la arbaro de Parczew. Ĉar post la milito li kredis, ke li estas la

[54] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Itzhak_Lichtman.
[55] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Литвиновский,_Ефим_Владимирович.

sola Sobibor-postvivanto kaj pro manko de atestantoj kaj por sukcesigi sian peton pri kompenso, li asertis, ke li estis malliberigita en la KC Gross-Rosen. En aprilo 1949 li elmigris tra Germanio al Aŭstralio, kie li forpasis en 1985 en Melbourne.

**MENDEL** nomiĝis alia malliberulo de la KC Sobiboro, kiu fuĝis dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kaj pereis en la arbaro.

**MERENSZTAJN, Mojzesz** aŭ **Moŝe)**, nask. 1899 en Pollando. Mortis en 1985.

**PEČERSKIJ, Aleksander (Saŝa) Aronoviĉ**, nask. 1909 en Kremenĉug, gubernio de Poltava (Ukrainio), Ruslanda Imperio, kiel filo de juda advokato. En 1915 lia familio translokiĝis al Rostov-na-Donu. En 1925 li lernis ludi pianon en iu muzika lernejo. Antaŭ la dua mondmilito li servis en la armeo (1931-33), profesie laboris kiel elektrikisto en fabriko, kiu riparis lokomotivojn. Krom tio li studis muzikajn kaj teatrajn sciencojn, kiujn li finis per diplomo kaj sekve funkciis kiel direktoro de diversaj t.n. kulturaj centroj, en kiuj li organizis amatorajn teatraĵojn, en kiuj li mem ludis kaj por kiuj li verkis la muzikon. En 1936 li funkciis kiel inspektoro en la Financ-ekonomia instituto de Rostovo. En 1933 li edziĝis kun kristana virino kaj havis filinon. Post la germana atako kontraŭ Sovetunio en junio 1941 li estis vokita servi en la Ruĝa Armeo; en septembro li fariĝis leŭtenanto. Monaton poste li estis arestita de germanaj trupoj en la batalo ĉe la rivero Vjazma. En la mallibereco li malsaniĝis je tifo, sed postvivis ĝin. En majo 1942 li klopodis fuĝi el la germana mallibereco, sed la provo malsukcesis kaj li estis sendita al punkoncentrejo en Borisov kaj de tie al iu koncentrejo en Minsko, Belorusio. Kiam dum medicina esploro oni rimarkis lian judan devenon, SS ĵetis lin en iun bunkron, kie li sidis dek tagojn en plena malhelo. En augusto 1942 la germanoj translokis lin al la fifama SS-laborprizono ĉe la Ŝirokaja-strato en Minsko. En tiu mallibereo trovigis ĉirkaŭ 500 judoj el la minska geto kaj ankaŭ judaj militkaptitoj. Kiam la germanoj retiriĝis, en septembro 1943 la SS komencis „evakuadi“ la judojn el la regiono de Minsko. La SS-komandanto (Waks) de la prizono ĉe la Ŝirokaja-strato, en kiu Peĉerskij troviĝis, anoncis al la judaj malliberuloj, ke ili estos transportitaj al Germanio por labori. Sed anstataŭ al Germanio, ĉirkaŭ 1500 malliberuloj estis deportitaj, la 18an de septembro, per trajno al Sobiboro, kiu estis atingita la 23an de septembro 1943. Sur la ramplo Peĉerskij estis selektita kiel unu el 80 sovetiaj judoj por fari riparajn laborojn en la koncentrejo. La resto de la grupo estis mortigita en la gasĉambroj ankoraŭ en la sama tago, en kiu Peĉerskij komprenis, ke li troviĝas en eksterma KC de la germanaj nazioj, kie okazas amasmurdo al la eŭropaj judoj. Baldaŭ la laborjudoj eksciis pri la malvenko de Stalingrado kaj ankaŭ informiĝis pri la ribelo de la judoj en la Varsovia geto en aprilo 1943. Komence de julio 1943 Heinrich Himmler ordonis, ke Sobiboro estu transformita de eksterma KC al ´normala´ labor-koncentrejo, kio igis la judajn malliberulojn timi, ke ĉiuj atestantoj de la amasmurdo povus esti likviditaj. Sub la gvido de Leon Feldhendler la malliberuloj komencis elpensi taŭgan planon por sukcesa amasfuĝado. La grupo de Peĉerskij alvenis en Sobiboro, kiam la malliberuloj ankoraŭ troviĝis sub la impreso de la murdo al sepdeko da nederlandaj judoj, kiuj preparis fuĝon el la KC. La 80 selektitaj sovetiaj judoj devis anstataŭi la murditajn nederlandanojn por konstrui barakojn. La alveno de tiuj sovetiaj militkaptitoj, inter kiuj Aleksandr Peĉerskij estis la plej maljuna, en Sobiboro, komplete ŝanĝis la perspektivojn de la malliberuloj en la koncentrejo. Peĉerskij, kiu estis oficiro kaj havis militan sperton kaj konis aliajn koncentrejojn, scipovis uzadi armilojn, posedis strategian pensadon kaj organizan kapablon kaj ankoraŭ ne estis tiel senkuraĝigita kiel multaj aliaj judoj, kiuj perdis siajn familianojn en la ekstermejo. La plano de Peĉerskij, kiu maturiĝis ene de ses semajnoj, antaŭvidis la likvidon de la ĉefa SS-personaro per akaparitaj kaj memfaritaj armiloj kaj la interrompon de la komunikado de la gvidstrukturo de la KC. Pri ĉi tiu plano informiĝis nur relative mamultaj malliberuloj por eviti perfidon. Legendeca fariĝis la amikaj rilatoj de Peĉerskij kun la juna germana judino „Luka“ (vd. POPPERT, Gertrude), kiu kaŭzis reciprokan intimecon kaj kiun li utiligis kiel rimedon de kamuflado. La tagon antaŭ la fuĝo, „Luka“ donacis al Peĉerskij memfaritan ĉemizon, dirante ke li surmetu ĝin „por bonŝanco“.

En la tago de la ribelo, je la 16a horo de la 14a de oktobro 1943, la laborantaj malliberuloj sukcesis mortigi dek unu SS-funkciulojn en diversaj barakoj. Post la signalo de la ribelo ĉirkaŭ 365 el la 600 malliberuloj de la KC atingis la barilojn. Tamen nur ĉirkaŭ 150-200 fuĝintoj, inter ili Peĉerskij kaj kelkaj de liaj sovetiaj kamaradoj, sukcesis eskapi la kuglaron de la ukrainaj gardistoj, kiuj pafis kontraŭ ili dum la fuĝado, kaj la minojn sur la kampo post la bariloj ĉirkaŭ la KC, kaj atingis la proksimajn arbarojn. Per la helpo de pola kamparano, kiu montris la vojon, en la nokto de la 19-20aj de oktobro 1943 lia grupo de naŭ fuĝintoj transiris la riveron Bug ĉe la vilaĝo Stawki norde de Włodawa/Różanka kaj atingis

la sovetian teritorion, kie ili aliĝis al partizanaj taĉmentoj nomataj laŭ Ŝĉors kaj Frunze. Sabotado de provizaj vojoj kaj celtrafaj atakoj kontraŭ malgrandaj germanaj bazoj estis inter liaj ĉefaj taskoj en la sekvaj monatoj. Post la reunuiĝo kun taĉmentoj de la Ruĝa Armeo Peĉerskij estis arestita kaj transdonita al iu sturma bataliono, kiu evidente estis punbataliono, al kiu estis senditaj sovetiaj soldatoj, kiuj estis dum ioma tempo militkaptitoj de la germanoj kaj suspektataj, ke ili kunlaboris kun la malamiko. Batalante en la vicoj de la 15a atakbataliono kadre de la unua balta fronto, dum la ofensivo kontraŭ la urbo Bausk la 20an de aŭgusto 1944, Peĉerskij estis garve vundita ĉe la femuro per ero de mino. Post kvar monatoj da kuracado en hospitaloj li fariĝis handikapulo. En la hospitalo proksime de Moskvo Peĉerskij renkontis sian duan edzinon Olga Ivanovna Kotova. La bataliona komandanto, majoro Andreev, estis tiel impresita de la rakonto de Peĉerskij pri Sobiboro, ke, malgraŭ malpermeso forlasi la batalionon, li rajtigis li iri al Moskvo por viziti la „Komisionon por la esploro de la kruelaĵoj de la german-faŝismaj invadantoj kaj iliaj komplicoj." En tiu komisiono la verkistoj Pavel Antokolskij kaj Veniamin Kaverin aŭskultis la raporton de Peĉerskij, surbaze de kiu aperis la eseo „La Ribelo en Sobiboro", kiu estis publikigita en la revuo *Znamja*, n-ro 4/1945 kiel unu el la plej fruaj sovetiaj atestoj pri la KC Sobiboro.[56] Post la milito, la raporto estis inkluzivita en la mondfaman kolekton sub la titolo „Nigra Libro [de la genocide al la sovetiaj judoj]", redaktita de la famaj sovetiaj verkistoj Vasilij Grossman kaj Ilja Erenburg. Sed la kolekto estis malpermesita de la stalinisma cenzuro por publikigo en Sovetunio en 1947.[57]

Post la militfino Peĉerskij revenis al Rostov-na-Donu, kie li loĝis antaŭ la milito. Li laboris kiel administranto ĉe la Muzika Komedia Teatro. Li iris al Ukrainio, kie li revidis sian filinon, kiu tie estis kaŝita en sekureco, kaj li denove edziĝis, post divorco de la unua unua edzino, kiu forpasis en 1945.

En 1945 Peĉerskij verkis siajn originajn memorojn pri la ribelo en la KC Sobiboro en la jida lingvo, kiuj aperis en 1947 en moskva eldonejo en eldonkvanto de 12 mil ekzempleroj. Pro sia braveco en la batalo, en majo 1949 Peĉerskij estis nomumita por la „Ordeno de la Patriota Milito", IIa grado; poste la major-generalo Safonov de la Regiona Milita Komisaro de Rostov ŝanĝis la premion al la „Medalo por Milita Merito". Lia korespondadado kun postvivantoj de la KC Sobiboro, kiuj loĝis en la Okcidento, kaŭzis suspekton de la sovetiaj aŭtoritatoj, kiuj riproŝis al li „ligojn kun imperiismaj ŝtatoj". En multaj fontoj estas skribite, ke dum la jaroj de la lukto kontraŭ „kosmopolitismo" Peĉerskij estis eksigita de sia laboro, ne povis trovi laboron dum kelkaj jaroj antaŭ la morto de Stalin kaj dependis de sia edzino. Fakte ekzistis dekreto n-ro 270 de la 16a de aŭgusto 1941, laŭ kiu sennombraj ruĝarmistoj, kiuj revenis el la germana militkaptiteco, estis suspektataj pro kunlaboro kun la nazioj kaj pro tio persekutataj kaj severe punitaj en Sovetunio parte per multjara malliberigo, kio estis grandega maljusteco. Tamen malsama bildo aperas el la alia malkovrita arkiva dosiero pri Peĉerskij. Laŭ tiu, post la milito li laboris kiel teatra administranto, sed en 1952 li estis juĝita pro „bagatela misuzo", estis kondamnita al unujara deviga laboro kaj eksigita el la komunisma partio. Samtempe li ne restis sen laboro, ĉar li ŝanĝis de la teatro al la forĝa kaj mekanika metio. Poste li laboris en la fabriko ĝis la emeritiĝo. Kaj dum tiu tuta tempo li daŭre kolektais kaj distribuis materialojn pri la tempo pasigita en Sobiboro. En 1961 Peĉerskij farigis deputito de la Kirova rajona komitato de Rostovo. Li tamen daŭrigis vivi modestan vivon en mizera loĝejo (kiel milionoj da samaj malriĉaj sovetianoj).

Kiam la postvivantoj de la holokaŭsto en diversaj landoj komencis esplori pri Peĉerskij kaj konfirmis la verecon de lia historio, la rilatoj de la sovetiaj aŭtoritatoj al Peĉerskij kaj al la temo mem tamen ŝanĝiĝis, kvankam ĝi restis ambigua, pro la malsincera rilato de la sovetia historiografio al la holokaŭsto kaj la historio de la judoj mem, kaŭzita de la tradicia kerna antisemitismo kaj oficiala anticionismo en la sovetia politiko. En Sovetunio ĉiu iom signifa historia temo estis traktita en rigida ideologia kaj politika kadro, kiu estis definita de la komunisma partio, plej ofte en antagonismo al la kutimaj ´normoj´ validaj en Okcidento. Tiu siaspeco percepto kaŭzis, ke la historio estis manipulita kaj parte falsita. La juda

[56] Post la liberigo de orienta Pollando fare de la Ruĝa Armeo, aperis pli kaj pli da informoj kaj artikoloj pri la KC Sobiboro en la centra sovetia gazetaro, precipe en *Komsomolskaja Pravda* (ekzemple la 2an de septembro 1944 pri „La Mortfabriko en Sobibur", en 1945 pri „La ribelo en la koncentrejo – Sobibur", en 1962 pri „La fino de Sobibur") aŭ en *Krasnaja Zvezda/ Ruĝa Stelo* (en 1963 pri „La terura ombro de Sobibur"). Pri temaj artikoloj aperis ankaŭ en lokaj gazetoj de Rostovo kaj eble aliaj sovetiaj urboj. Do, oni ne povas aserti, ke Sovetunio postmililte prisilentis la okazaĵojn en Sobiboro, sed certe la temo ne estis ĉefa kaj krom tio ĝi estis malvolonte traktata, cetere ankaŭ en aliaj landoj kiel en Pollando kaj en la Okcidento.

[57] Pri la posta sorto de tiu libro vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ilja_Grigorjewitsch_Ehrenburg#Das_Schwarzbuch, https://en.wikipedia.org/wiki/The_Black_Book_of_Soviet_Jewry, https://ru.wikipedia.org/wiki/Чёрная_книга_(Холокост).

holokaŭsto ne estis ekskluzive traktita de la sovetia historiografia kiel en Okcidento. Konforme al tiu normo, Peĉerskij neniam estis eksplicite honorigita, kio koncernis lian specifan rolon dum la ribelo en la KC Sobboro. Kvankam oni ne povas aserti, ke en sia urbo Rostov Peĉerskij ne estis konata kiel organizinto aŭ partopreninta de la ribelo de Sobiboro, grandan bruon pri ĉi tiu temo oni ne faris, ĉar tiu temo estis publike evitata same kiel ĝenerale ankaŭ la historio kaj sorto de la judoj mem, kiu koncernis kaj interesis ĉefe ilin mem. Tamen, en la 60aj jaroj la temo komencis aktualiĝi. Tiel, en 1962 Peĉerskij fariĝis akuz-atestanto ĉe la fermita proceso kontraŭ dek unu gardistoj de la KC Sobiboro en Kievo, kiu kondukis al gravaj punoj por la kondamnitoj (ĉefe mortpunoj). En 1963 la postvivantoj de la ribelo de la KC Sobiboro komencis organizi renkontiĝojn, kiuj poste okazis regule, jen ĉe A. Peĉerskij en Rostovo, jen ĉe alia kamarado de la grupo. Kvankam Peĉerskij estis invitita al okcidentaj landoj plurfoje en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj por rakonti aŭ atesti, la sovetiaj instancoj neniam permesis al li veturi al eksterlando. Laŭ la iniciato de Peĉerskij, la sep sovetiaj partoprenintoj en la ribelo, kiuj tiam vivis, komencis renkontiĝi ĉiun kvinan jaron ĉe li en Rostov-na-Donu aŭ ĉe unu el liaj kamaradoj. En januaro 1970 Thomas (Toivi) Blatt el Usono sukcesis viziti lin en Rostovo. En 1980 li povis esti vizitita de Jules Schelvis el Nederlando. En 1987 li fine ricevis eliran vizon por veturi al Okcidento, sed li ne povis akcepti la inviton, ĉar li estis jam sufiĉe malsana. Aleksandro Aronoviĉ Peĉerskij forpasis la 19an de januaro 1990 kaj estis entombigita en la norda tombejo de Rostov-na-Donu.

En 2013 liaj memoroj, kiuj origine aperis en la jida lingvo, aperis en la rusa lingvo. Germana versio eldoniĝis libroforme en 2018. Krom tio Peĉerskij partoprenis en diversaj film-projektoj por dokumenti la memoron pri la ribelo kaj estas menciitaj en diversaj libroj, kiuj rakontas pri ĝi. Jules Schelvis intervjuis lin en la 80aj jaroj en Rostovo. Krom tio estis produktitaj du ludfilmoj pri la ribelo en Sobiboro, en kiu Peĉerskij ludas la cefan rolon (1987 kaj 2018). En la brita filmo de 1987 li estis interpretita de la konata nederlanda aktoro Rutger Hauer.

En 2007 sur la fasado de la domo en Rostovo, kie Peĉerskij vivis, estis muntita memorŝildo honore al la gvidanto de la ribelo de Sobiboro. En diversaj urboj stratoj ricevis la nomon de Peĉerskij: Rostovo (2015), Kremenĉug (2016) kaj Moskvo (2018). En Ruslando estis planitaj aŭ efektivigitaj diversaj projektoj por memori kaj honorigi la heroecon de Peĉerskij, krom tio li postmorte ricevis iujn honorajn ordenojn kaj medalojn oni planis kaj postulis fari tion, precipe lige kun la 70a datreveno de la ribelo en 2013. En 2018 monumento honore al Peĉerskij estis solene inaŭgurita en Rostovo, kaj iu moskva strato ricevis la nomon de la heroo, eĉ unu el la aviadiloj de Boenig 737 de Aeroflot portas(is) lian nomon. Ankaŭ strato en Israelo portas lian nomon, same kiel iuj monumentoj en Bostono, Usono, kaj Tel-Avivo, Israelo.[58]

**PELC, Josel,** ĉarpentisto el Tyszowice, masonisto el Chełm, Pollando, sukcesis forfuĝi el la KC Sobiboro meze de la nokto, tranĉante la pikdraton kaj evitante la minojn kaj la gardistojn. Pliaj detaloj mankas.

**PIATNICKIJ, Naum** respondecis por ataki la armilan deponejon dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Pliaj detaloj ne estas konataj. Laŭ la rusa nomo kaj lia tasko dum la ribelo li probable apartenis al la juda grupo de la sovetiaj militkaptitoj de A. Peĉerskij.

**PLOTNIKOV, Ĥaim** apartenis al la juda grupo de la sovetiaj militkaptitoj en la KC Sobiboro, kiu ricevis la taskon konduki unu el la fuĝantaj kolonoj de malliberuloj al la ĉefa pordego kaj sturmi la armilan deponejon. Li mem sukcesis fuĝi al la arbaro.

**PODĤLEBNIK, Ŝlomo**, nask. 1907 en Koło, „Kongresa“ Pola Reĝlando. Li estis deportita al la KC Sobiboro en aprilo 1943 kun sia edzino kaj du infanoj kaj 270 aliaj judoj, i.a. Thomas (Toivi) Blatt. En la KC li retrovis sian bofraton Ĥaskiel Menĥe, kiu ankaŭ estis deportita tien. Ĉar li estis devigita fosi fosaĵojn, li ofte havis la okazon iri ekster la koncentrejon. La 20an de julio 1943 li kaj Josef Kopp mortigis ukrainan gardiston, dum ili iris preni akvon en najbara vilaĝo (Zlobek), kio permesis ilin forfuĝi de la arbara taĉmento. Post la milito li elmigris al Usono, ŝanĝante sian nomon. Li forpasis en februaro 1973 en Nov-Jersey, Usono.

[58] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Aronowitsch_Petscherski; Blatt (2004), p. 155-157; https://histrf.ru/lenta-vremeni/event/view/vosstaniie-v-sobiborie; https://www.youtube.com/watch?v=qhtPjWplzes; https://www.youtube.com/watch?v=5bXlqKjuJyw,

**POPPERT, Gertrud**, nask. kiel **SCHÖNBORN** en 1914 en Dortmund, Germanio. Filino de germana juda komunisto. Kvankam ŝi ne postvivis la militon, ŝiaj nomo kaj historio estas aparte menciinda en rilato kun la ribelo de la 14a de oktobro 1943 en la KC Sobiboro. Gertrude Schönborn kaj ŝia edzo Walter Poppert elmigris al Amsterdamo en Nederlando en la 1930-aj jaroj. De tie ili kune kun sia patrino kaj du fratoj estis deportitaj tra la KC Westerbork al la KC Sobiboro en majo 1943. La fratoj kaj la patrino estis tuj mortigitaj surloke, dum ŝi mem kaj ŝia patro estis selektitaj por labori en la KC. Pro du konservitaj salutkartoj, kiujn ili subskribis kaj sendis al Nederlando, oni scias, ke Gertrude laboris en la lagro II, kie ŝi okupiĝis pri la kunikloj, dum Walter estis grupestro (Kapo-o) en la arbara taĉmento. Aleksandr Peĉerskij, leŭtenanto de la Ruĝa Armeo, kiu alvenis en septembro 1943 al la KC Sobiboro, konatiĝis kun Gertrude, nomata „Luka", en la virina barako por utiligi ŝin kiel kamuflaĵon por planadi la ribelon de la 14a de oktobro 1943, sed la du malliberuloj ankaŭ persone ekŝatis unu la alian. Al Thomas Blatt Peĉerskij diris en 1979, ke ŝi „inspiris" lin. „Luka" ne scipovis la rusan nek la polan lingvon kaj do ne komprenis, pri kiuj temoj Peĉerskij diskutis kun la aliaj. La tagon antaŭ la ribelo Gertrude donacis al Peĉerskij memfaritan ĉemizon, dirante ke li surmetu ĝin „por bonŝanco". Peĉerskij konservis la ĉemizon ĝis la fino de sia vivo (poste ĝi konserviĝis en iu sovetia muzeo). Dum la ribelo Peĉerskij perdis ŝin kaj ne estas klare, kio vere okazis kun ŝi. Germanio oficiale konfirmis la 30an de oktobro 1943 kiel ŝian mortodaton. Ŝia edzo Walter forpasis la 31an de oktobro 1943, sed ne estas klare, ĉu tio okazis en aŭ ekster la koncentrejo. La esploroj, kiujn Peĉerskij faris pri „Luka" post la milito, restis senrezultaj. En la brita filmo *Fuĝo el Sobiboro* „Luka" estis interpretita de la pola aktorino Joanna Pacuła. En la rusa filmo „Sobiboro" (2018) la rolon de „Luka" ludis Felice Jankell. En aprilo 2006, ŝtono estis metita sur la teritorio de la iama KC Sobiboro memore al Gertrude kaj Walter Poppert. En aŭgusto 2010 la artisto Gunther Demnig surmetis, kadre de la projekto Stumbling Stones, memorŝtonojn memore al Gertrude kaj Walter Poppert en Dortmund antaŭ la domo, kie loĝis la familio de Gertrude Schönborn. En junio 2013, kiel parto de la projekto „Trajno de la memoro", ekspozicio okazis en la fervoja stacidomo de Dortmund pri la deportado de la judoj el Nederlando dum la holokaŭsto. Inter la ekspozicioj estis montrataj materialoj pri Gertrude Poppert kaj la ribelo de Sobiboro.[59]

**POWROZNIK, Ĥaim (POSNER, Herman)**, nask. 1911 en Ljuboml, Volhinio, Ruslanda Imperio. Arestita en 1939, li estis liberigita kaj poste sendita al iu labor-KC en Chełm. En marto 1943 li estis deportita al Sobiboro, kie li estis selektita de Gustav Wagner kiel ĉarpentisto. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 li sukcesis fuĝi kaj kaŝiĝi en Chełm. Post la milito li transloĝiĝis al Usono.

**POŻYCKI, Jankel**, estis ŝuisto kaj la patro de Hersz kaj Symon, kiuj same troviĝis en la KC Sobiboro. Li sukcesis fuĝi dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kaj postvivis la militon.

**ROZENFELD, Semjon Mojseeviĉ**, nask. 1922 en Ternivka, Ukraina SSR, Sovetunio, estis unu el la sovetiaj militkaptitoj, kiu estis malliberigita de la germanoj dum la servado en la sovetia armeo kaj sendita al la KC Sobiboro en septembro 1943, ĉar li estis judo, kune kun Aleksandr Peĉerskij. En la KC li laboris en la norda lagro IV por porti brikojn. Post la ribelo de la 14a de oktobro 1943, dum kiu li sukcesis fuĝi, li aliĝis al la sovetia armeo kaj finis sian militan ´karieron´ en Berlino, kie li lasis la vortojn „Baranowitz-Sobibór-Berlin" sur la muroj de la Reiĥtago. Li restis en Sovetunio antaŭ ol elmigri al Israelo meze de la 1980-aj jaroj. En 1990 li rehejmiĝis al Ukrainio, sed poste revenis al Israelo, kie li forpasis en junio 2019 kiel plej lasta postvivanto de la KC Sobiboro.[60]

**ROTENBERG, Ajzik**, nask. 1925 en Włodawa, Pollando, alvenis en majo 1943 piede al la KC Sobiboro kiel unu el la plej lastaj homoj de sia komunumo. Kun sia frato li estis selektita de Karl Frenzel por labori en la KC, kie li devis ordigi la vestaĵojn de la viktimoj kaj alporti ilin repakitaj al la ramplo por forsendo per trajno. Dum lia frato mortis dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943, li sukcesis fuĝi kun aliaj judaj malliberuloj kaj estis kaptita de la Schutzpolico, kiu alportis ilin al Adampol, kie ili estis retenitaj per ĉenoj en iu stalo. Sed ili sukcesis liberigi sin kaj aliĝis al grupo de judaj partizanoj. Post la milito li elmigris al Israelo, kie li estis mortigita de du palestinaj teroristoj en 1994.

---

[59] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Gertrude_Poppert.

[60] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Semjon_Rosenfeld, https://www.bbc.com/news/world-middle-east-48509422, https://sputniknews.com/society/201904121074057989-israel-rosenfeld-sobibor-nazi-death-camp-survivor. Intervjuon kun li vd. sub http://getuigenverhalen.nl/interview/overlevenden-interview-02-semion-rozenfeld; https://www.youtube.com/watch?v=6jChUn0jl7w; https://www.youtube.com/watch?v=WRAnnJ0RNTo.

**SCHELVIS, Jules**, nask. 1921 en Amsterdamo, Nederlando. Li mem, lia edzino Raĥel kaj aliaj familianoj estis arestitaj en majo 1943 en Amsterdamo de la germana polico. Sekvis ilia deportado el la nederlanda por-juda KC Westerbork al Sobiboro per transporto de pli ol 3000 homoj en brutvagonaro. Dum liaj familianoj estis senprokraste mortigitaj en la gasĉambroj, Schelvis estis unu el 81 viroj, kiuj estis (laŭ propra peto) selektitaj kiel laboristaj malliberuloj kaj tiel eskapis la morton en la sama tago de la alveno. Sed Schelvis estis nur kelkajn horojn en tiu KC, ĉar kiel selektita laboristo li estis plutransportita al la fifama SS-laborkoncentrejo Dorohucza apud Trawniki, kie la malliberuloj devis fosi torfon sub ege mizeraj vivkondiĉoj. Ankaŭ tie li eskapis la certan morton, ĉar kelkajn tagojn poste li estis veturigita, denove laŭ propra peto, al la koncentrejo „Lublin, Malnova flughaveno", kie la judaj malliberuloj devis plenumi pezan laboron. De tie li havis la bonŝancon, kiel oni povus preskaŭ diri, esti translokita al la geto de Radom, kie la vivo estis kompare pli eltenebla, kvankam la judoj vegetis ankaŭ tie kaj neniam sciis, kiam ili estis deportitaj al alia KC. Post unu jaro li tamen estis devigita iri al la labor-KC Radom Szkolna. Post tiu epizodo sekvis la translokado de la judoj de la geto Radom per longa piedmarŝo, kiu finiĝis en Tomaszów, de kie Schelvis pluveturis al Aŭŝvico, kie li denove mirakle eskapis la morton per gasumado dum neatendita selekto. La reston de la milita tempo Schelvis pasigis en la koncentrejoj Vaihingen/Enz kaj Unterriexingen en suda Germanio, kie li devis fari pezan laboron sub ege mizeraj kondiĉoj, en la konstruado de subtera fabriko, kaj kie li malsaniĝis je tifo kaj preskaŭ pereis. En marto 1945 Schelvis estis liberigita de francaj trupoj kaj reveturis al Nederlando, kie atendis lin tre malvarma akcepto. Dum la holokaŭsto Schelvis perdis 41 parencojn. Lia patro pereis en la koncentrejo Oranienburg. Liaj patrino kaj fratino estis savitaj de grafo Bernadotte kaj veturigitaj al Svedio, kie ili estis sekuraj. Post la milito Schelvis kolektis informojn pri la koncentrejoj de la holokaŭsto por dokumenti ĝin. En la 80aj jaroj li faris intervjuon kun Aleksandro Peĉerskij en Rostov-na-Donu kaj kompilis siajn konojn kaj spertojn por du gravaj kaj ege legindaj verkoj: *Ekstermejo Sobiboro* (aperis en 1993 en la nederlanda lingvo, germanaj eldonoj sekvis en 1998 kaj 2003) kaj *Vojaĝo tra la Malhelo* (nl. 1995, germ. 2005). Fine de junio 2014 Jules Schelvis denove veturis per trajno de Amsterdamo al Sobiboro en akompano de muzikistoj de la Nederlanda Nacia Simfonio kaj Ĉambra Orkestro sen pago. Krom tio li organizis koncertojn kaj legajn aranĝojn en Amsterdamo, Berlino kaj Lublino (Pollando). Jules Schelvis forpasis en aprilo 2016 en Amstleveen, Nederlando.[61]

**SCHWARZ, Walter** estis germana judo ĉirkaŭ 35-jaraĝa, kiu estis elektrikisto kaj respondecis pri la generatoro en la KC Sobiboro. Post la fuĝo dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 li apartiĝis de la grupo de Thomas Blatt en la arbaro. Lia plua sorto ne estas konata, sed verŝajne li pereis en la arbaro. La sama sorto verŝajne trafis alian judon el Lodzo, nomatan **Sender**, kiu sukcesis fuĝi dum la ribelo, sed probable pereis en la arbaro.

**SERC(Z)UK, Joseph**, nask. 1919, mortis en 1993, estis pola judo.

**SERC(Z)UK, David**, mortis en 1948, estis pola judo.

**SIEGEL, Josel** estis ĉirkaŭ 16-jaraĝa judo el Siedliszcze kaj laboris en la ordigaj barakoj de la KC Sobiboro. Li estis rememorigita en la libro *A Promise At Sobibór* de Philip Bialowitz. Li sukcesis fuĝi dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943, sed li pereis verŝajne ankoraŭ en la sama tago, ĉar li estis grave vundita kaj perdis multe da sango.

**SOBOL, Bajle** estis, laŭ la libro *Hell in Sobibór*, 24-jara judino el Dubienka, kiu estis deportita kun Eda Lichtman kaj Serka Katz tra Hrubieszów al la KC Sobiboro meze de junio 1942. Ŝiaj edzo kaj malgranda filino estis gasumitaj post la alveno en la neniigejo. Bajle mem estis engaĝita en la lavejo. Ŝi sukcesis fuĝi el la koncentrejo dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943, sed ŝi verŝajne pereis en la arbaro. En la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987) Bajle Sobol estis ludita de Judith Sharp.

**SOBELMAN, Cvi.** Biografaj informoj mankas.

**STERN-SAFRAN, Ursula (Ilona)**, nask. 1926 en Hessen, Germanio. Ŝia patro Albert Stern estis membro de la nederlanda rezista movado, sed li estis kaptita de la nazioj kaj deportita kun sia edzino al Aŭŝvico, kie ili pereis. Ursula kaŝiĝigis ĉe iu familio, sed la kaŝejo estis malkovrita kaj Ursula estis

[61] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Jules_Schelvis, https://www.youtube.com/watch?v=GNO0kKQNoyM, https://www.youtube.com/watch?v=dIiyaiCIPRM, https://www.youtube.com/watch?v=GvoQA22SmdA, https://www.youtube.com/watch?v=ahSdNb9Q8b8.

sendita al prizono kaj poste al la koncentrejo Vught, kie ŝi konatiĝis kun Kathy Gokkes, Selma Wijnberg kaj Minny Cats. En aprilo 1943 ili estis transportitaj al Westerbork kaj Ursula estis deportita al Sobiboro per la sama trajno kiel Selma Wijnberg. Ŝi laboris plejparte en la ordigaj barakoj kaj en la arbara taĉmento kaj devis purigi municion en la norda lagro IV. Kune kun Kathy Gokkes ŝi fuĝis dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kaj atingis la arbaron, kie ili revidis Eda Lichtman. Ŝi batals kun la partizanoj, dum Gokkes perdis la vivon. En 1945 ŝi fariĝis komisaro de la civila milico en Lublin. Ŝi agis kiel atestanto ĉe la Sobibor-proceso de Hagen en 1964. Post vivado en Nederlando dum multaj jaroj ŝi elmigris al Israelo, kie (Aŝdod) ŝi mortis en 1985 kiel Ilona Safran.

**SZKLAREK, Moŝe „Baĥir“.** Informoj mankas.

**SZMAJZNER, Moŝe** estis deportita al la KC Sobiboro en majo 1942 kun aliaj familianoj. Tie li estis selektita kiel juvelisto kaj funkciis kiel asistanto de sia frato Stanisław. En sia libro S. Szmajzner rakontis, ke lia frato sukcesis fuĝi kun sia amatino okaze de la ribelo de la 14a de oktobro 1943, sed li estis mortigita de polaj antisemitoj en la urbo Lubartów.

**SZMAJZNER, Stanisław-Ŝlomo**, nask. 1927 en Puławy, Pollando. La 12an de majo 1942 Szmajzner alvenis al Sobiboro per transporto de du mil judoj el Opole Lubelski kaj kun siaj patro, patrino kaj fratino, kiuj estis gasumitaj post la alveno en la neniigejo. Deklarante sin juvelisto, li estis selektita de Gustav Wagner kun siaj frato Moŝe kaj kuzo Nojeĥ kiel laboristo en la koncentrejo, kie li produktis orajn kaj arĝentajn juvelojn por la SS-viroj kaj insignojn por iliaj vipoj, per kiuj la malliberuloj estis batitaj. La oro parte originis de rabita oro de la judoj kaj de oraj dentoj de surloke gasumitaj judoj. Poste, kiam Franz Stangl transprenis la gvidon de la KC, Szmajzner fariĝis estro de la grupo de la riparaj mekanikistoj. En tiu pozicio li havis aliron al ĉiuj partoj de la KC, krom al la lagro III (kie troviĝis la gasĉambroj kaj bruligejoj). Li estis parto de la komitato, kiu organizis la ribelon de la 14a de oktobro 1943. Li havis la taskon ŝteli armilojn el la deponejo por armigi la sovetiajn malliberulojn. Li mem sukcesis fuĝi el la KC ĝis la proksima arbaro, sed liaj frato kaj kuzo ne postvivis la ribelon. Li apartenis al la grupo de Peĉerskij, kiu konsistis el 57 homoj. Por ne esti malkovritaj la fuĝintoj dividiĝis, laŭ konsilo de Peĉerskij, en pli malgrandajn grupojn kaj iris laŭ diversaj itineroj. Kvankam li promesis, ke li revenos post esplorado de la situacio, Peĉerskij kaj liaj homoj forlasis la grupon de Szmajzner, kiu devis mem elturniĝi.[62] Szmajzner trovis protekton ĉe iu pola kamparano en Tarnawa Duża. En 1947 li elmigris al Brazilo, kie li verkis la libron *Infero en Sobiboro – La tragedio de juda junulo* en la portugala lingvo, kiu aperis en 1968 en brazila eldonejo. En 1978 li rekonis la SS-ulon Gustav Wagner, kiu fuĝis al Brazilo, en la policejo de São Paolo. Post la milito li ankaŭ atestis kontraŭ Franz Stangl, kiu same migris en 1951 al Brazilo. En la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987) Szmajzner estis ludita de Simon Gregor. Szmajzner forpasis per suicido en marto 1989 en Goiânia, Brazilo.[63]

**SZYMIEL (**aŭ **CYMIEL), Leon.** Informoj mankas.

**ŜUBAEV, Aleksandr Miĥajloviĉ**, nask. 1917 en Ĥasavjurt, Dagestano, Ruslanda Imperio. Diplomito de la Rostova Instituto de Fervojaj Inĝenieroj. Edziĝis. Li loĝis en la laborista vilaĝo Kotelnikovskij, regiono Stalingrado (nun urbo Kotelnikovo, regiono Volgogrado). En 1940 li estis rekrutita al la Ruĝa Armeo. Dum la dua mondmilito li estis kaptita de la germanoj (supozeble en aŭgusto 1942). En septembro 1943 li estis deportita de Minsko al la KC Sobiboro, kie li alvenis kune kun Aleksandr Peĉerskij kaj aliaj sovetiaj militkaptitoj. Konata li estis inter la judoj de la KC per la kromnomo „Kalimali“. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943, kiun li preparis kun Peĉerskij, li mortigis la vickomandanton de la KC, Johann Niemann, en la barako de la tajloroj kaj tiel startis la eliminadon de la SS-viroj, kiuj servis en la KC. Post sukcesa fuĝo kune kun la grupo de Peĉerskij li transiris kun ĝi la riveron Bug kaj aliĝis al la belorusa partizana taĉmento nomata laŭ M. Frunze. Li pereis en 1944 en la batalo kontraŭ la germanoj. En la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987) „Kalimali“ estis ludita de Irfan Mensur. En 2018 en Ĥasavjurt estis inaŭgurita memorŝildo je lia honoro.[64]

**TABORINSKIJ, Boris,** nask. 1917 en Minsk, Belorusio. En septembro 1943 li alvenis al Sobiboro per la transporto de sovetiaj militkaptitoj kaj du mil judoj el Minsko kune kun Ŝlomo Lajtman, kun kiu li estis selektita por labori kiel ĉarpentisto en la KC, kvankam ili ne havis tian profesion. Tie li devis fari

---

[62] Pri tio vd. piednoton 37.

[63] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Stanisław_Szmajzner, https://www.youtube.com/watch?v=0cO7LeH_jX4.

[64] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Шубаев,_Александр_Михайлович.

tegmentajn kovrilojn por la barakoj en la lagro IV. Li sukcesis fuĝi dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kaj aliĝis al la partizanoj. Lia mmortodato ne estas konata.

**TERNER-RAAB, Estera**, nask. 1922 en Chełm, Pollando, alvenis en la KC Sobiboro kun 800 aliaj judoj el la KC Staw-Nowosiólki en decembro 1942 per transporto de ĉaroj tiritaj de ĉevaloj, kun Regina Feldman kaj Zelda Kelbermann. Ŝi laboris kiel trikistino dum kelkaj monatoj kaj poste estis engaĝita en la vestordiga barako. Dum la ribelo de la 14a de okobro 1943 ŝi estis vundita ĉe la kapo, sed sukcesis fuĝi kun Hella Felenbaum kaj Zelda Kelbermann. Post la milito ŝi rekonis kun Samuel Lerer la SS-viron Erich Bauer en Berlino, kio kaŭzis lian areston. En la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987) Esther Terner-Raab estis ludita de Dijana Krzanic. Ŝi elmigris al Usono, kie ŝi forpasis en aprilo 2015.[65]

**THOMAS, Kurt** (**TICHO, Kurt**), nask. 1914 en Boskovice aŭ Brno, Moravio, Aŭstrujo-Hungarujo. Post la okupado de Ĉeĥio fare de la germanoj, li kaj lia famlio (patro, patrino, fratino) estis deportitaj en aprilo 1942 el la geto de Theresienstadt al la transira geto Piaski en Pollando, de kie liaj famlianoj estis transportitaj al Sobiboro en junio 1942. Thomas sekvis ilin en novembro kune kun 3000 aliaj judoj. Post laborado en la ordigaj barakoj li fariĝis sanitaristo. Post la fuĝo el Sobiboro okaze de la ribelo de la 14a de oktobro 1943 Thomas trovis protekton ĉe pola kamparano en la vilaĝo Siedliszczki okcidente de Trawniki, ĉe kiu li povis resti ĝis la 26a de julio 1944, kiam li estis liberigita de la rusoj (kiuj volis sendi lin al Siberio, ĉar ili kredis, ke li estas germana spiono). Kiam li sukcesis eskapi el tiu vilaĝo, li migradis okcidenten, ĝis kiam en majo 1945 li fine reatingis sian naskiĝlokon Boskovice en Ĉeĥoslovakio. Memore pri la nederlandanino Minny Cats, kun kiu li amikiĝis en la koncentrejo, en 1946 li verkis raporton pri Sobiboro por la Nederlanda Ruĝa Kruco. Post la milito li elmigris al Usono kaj iniciatis la procesojn kontraŭ la SS-viroj Gomerski kaj Klier en Frankfurto. En la 1990aj jaroj li verkis novan raporton pri la spertoj faritaj en Sobiboro. Li forpasis en junio 2009 en Ohio, Usono.[66]

**TRAGER, Ĥaim** (aŭ **Israel, Ŝrulke**), nask. 1906 en Chełm, „Kongresa“ Pola Reĝlando. En marto de 1943 li estis transportita de Chełm al Sobiboro. Tie li funkciis kiel masonisto, helpis konstrui bakejon kaj ankaŭ estis ano de la stacidoma taĉmento. Kiel unu el malmultaj malliberuloj li havis la okazon vidi tion, kio okazis en la lagro III, kie troviĝis la gasĉambroj kaj bruligejoj, de la tegmento de la barako, kie li laboris sur la kamentubo. Li sukcesis fuĝi dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Post la milito li elmigris al Israelo kaj forpasis en aŭgusto 1969 en Tel-Avivo.

**VAJSPAPIR, Arkadij Moiseeviĉ**, nask. 1921 en la juda agrikultura kolonio Bobrovy Kut de la Ĥersona Distrikto, Ukrainio, kiu tiam estis kontrolata de la sovetia potenco. En 1937 li diplomiĝis kun honoroj en dekjara juda lernejo. En 1938 lia patro, Moisej Leiboviĉ Vajspapir, estis mortpafita de la stalinistoj kadre de la „Granda Teroro“. Post laboro dum unu jaro kiel inĝeniero en traktora brigado, en junio 1941 Vajspapir partoprenis la Grandan Patrolandan Militon, kiel la dua mondmilito en Sovetunio estis nomata. Dum la defendo de Kievo la serĝento estis grave vundita, kondukita al medicina bataliono kaj en septembro 1941 militkaptiĝis. Restante en la medicinaj unuoj de Ĉernigov, Gomel kaj Minsko, en marto 1942 lin trafis la karcero de la fifama SS-laborprizono ĉe la Ŝirokaja-strato en Minsko, post kiam oni malkovris, ke li estas judo. Tie li konatiĝis kun Aleksandr Peĉerskij, kun kiu en septembro 1943 li estis deportita al la KC Sobiboro, kie li estis selektita kun okdek aliaj judaj sovetiaj militkaptitoj por konstrui barakojn en la lagro IV. Kun la scio, ke la ceteraj kamaradoj el Minsko estis mortigitaj en la gasĉambroj de Sobiboro, li komencis plani ribelon kun Peĉerskij. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 Vajspapir mortigis kun Jehuda Lerner du naziajn funkciulojn per hakilo, nome SS-Unterschargvidanton Siegfried Graetschus kaj la grmandevenan ukrainan gardiston Ivan Klatt en la barako de la ŝuistoj. Post la fuĝo el la KC li sukcesis kun la grupo de Peĉerskij transpasi la riveron Bug kaj aliĝi al la partizanoj nomataj laŭ M. Frunze en Brest-Litovsk kaj fariĝis maŝinpafisto. La milito finiĝis por li kiel suboficiro de spiona kompanio en Wismar (Germanio). Post la milito li eksciis, ke lia pli maljuna frato pereis ĉe la fronto kaj ke lia 5-jara fratino Basja kaj ŝia patrino Raisa Iosifovna estis mortigitaj de la nazioj kaj iliaj komplicoj kune kun aliaj judoj de la naskiĝvilaĝo Bobrovy Kut. Post la milito Vajspapir diplomiĝis kun honoroj en la Industria Instituto de Zaporoĵe. Li laboris kiel ĉefinĝeniero en fabrikoj de Lugansk kaj Artiomovsk. Poste li laboris kiel fakestro en la administracio de la Konsilio de la Nacia Ekonomio (Sovnarĥoz) en Doneck. En 1963 li komencis organizi renkontiĝojn

---

[65] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Estera_Raab, https://www.youtube.com/watch?v=3eUNIxlEuIY.
[66] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=3eUNIxlEuIY.

de postvivantoj de la ribelo en la KC Sobiboro, kiuj poste okazis regule, jen ĉe A. Peĉerskij en Rostovo, jen ĉe alia kamarado de la grupo. Li ĉeestis la funebran ceremonion por A. Peĉerskij en januaro 1990 en Rostov-na-Donu. En 1994 li translokiĝis kun sia familio al Kievo, kie li mem forpasis en januaro 2018. Li ricevis plurajn sovetiajn honorajn medalojn.[67]

**VAJCEN, Aleksej Angeloviĉ**, nask. en 1922 en Grigoriw, Ukrainio. Kun la familio li translokiĝis al la urbo Ĥodorov ne malproksime de Lviv, kie li fariĝis bona kaj konata juna futbolisto. En 1940 li eniris mezlernejon, kio jam okazis post la aneksado de Okcidenta Ukrainio fare de Sovetunio. Forlasinte la lernejon, li laboris kiel sekretario en la loka prokurorejo. En februaro 1941 li estis rekrutita de la Ruĝa Armeo, en kiu li deĵoris ĉe la limo proksime de la urbo Rava-Russkaja. En junio 1941 li estis vundita en batalo kaj estis kaptita de la germanoj, sed li baldaŭ eskapis la malliberecon. Monaton poste li estis denove arestita kaj estis deportita al la malliberejo de Ternopil. Antaŭ la tribunalo en Doneck li neis, ke li estas judo. Denove li forkuris. Tri tagojn post sia fuĝo Vajcen estis denove kaptita de la germanoj, kiuj konstatis lian judecon. En aŭtuno 1943 li estis deportita per transporto de 2500 judoj el Ternopol al al KC Sobiboro. De tiu transporto li estis unu el tridek viroj, kiuj estis selektitaj por labori en la koncentrejo, por plejparte ordigi la vestaĵojn de la viktimoj. La 14an de oktobro 1943 li sukcesis fuĝi en la ribelo organizita en la koncentrejo. Kun la grupo de Aleksandr Peĉerskij Vajcen transiris la riveron Bug kaj aliĝis al la sovetiaj partizanoj. Unue li servis en la partia taĉmento nomata laŭ K. Vorosîlov kaj poste en la taĉmento nomata laŭ M. Frunze, en kiu li batalis ĝis aprilo 1944. Ekde aŭgusto 1944 li batalis en la vicoj de la aktiva armeo kiel parto de la 22a infanteria divizio, estante la komandanto de la departemento de la sekreta servo. La milito finiĝis por li en printempo 1945 en Orienta Pruslando. Neniu el lia familio postvivis la holokaŭston: liaj gepatroj, fratoj kaj fratinoj estis mortpafitaj en Ĥodorov dum la okupacio en 1942, kaj lia pli juna frato Ŝmul pereis dum la ribelo en Sobiboro. Vajcen restis en la armeo en Pskov, poste en Rjazan, kaj finis sian militservon en la rango de kapitano de la paraŝutaj trupoj en 1966 (li saltis entute 998 fojojn). Ankaŭ liaj filo kaj plej aĝa nepo fariĝis armeaj paraŝutistoj. Post sia eksiĝo el la armeo li laboris por la entrepreno „Rjazanenergo“ dum tridek jaroj kaj emeritiĝis en 1996. Waizen agis kiel atestanto en la jura proceso kontraŭ la gardisto de Sobiboro, Ivan Demjanjuk. Liaj atestoj fariĝis parto de la ĉefaj pruvoj de la kulpigo de Demjanjuk. Vajcen, kiu ricevis multajn sovetiajn kaj polajn ordenojn, medalojn kaj honorigojn kaj estis ligita kun diversaj dokumentaj kaj ludfilmoj, mortis en Rjazan en januaro 2015 en la aĝo de 92 jaroj. En 2018, memorŝildo honore al Alexej Vajcen estis inaŭguritaa en tiu urbo.[68]

**VAJCEN, Ŝmul** estis engaĝita en la KC Sobiboro kiel bruligisto de paperaj dokumentoj de la gasumotaj judoj. Li sukcesis fuĝi dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 kaj kaj dume kaŝiĝi kun Thomas (Tovi) Blatt kaj Fredek Kostman en la arbaro kaj ĉe la farmisto Bojarski en Izbica. En aprilo 1944 li postvivis atakon de liaj komplicoj, kiuj pafis kontraŭ li, sed ne sukcesis mortigi lin. Li fuĝis en la arbaron, kie li poste estis tamen mortigita.

**VAN STRATEN, Rosette,** nask. 1919 en Amsterdamo, Nederlando, kune kun sia ĝemela fratino Serline. Dum la okupacio ŝi estis kudristino. La cirkonstancoj de ŝia morto, kiu oficiale okazis la 31an de oktobro 1943, ne estas konataj.

**WAKS, Berl.** Informoj mankas.

**WANG, Abraham**, nask. 1921 en Izbica, Pollando, de kie li estis deportita en aprilo kun 280 aliaj judoj al Sobiboro per kamiono. Li estis unu el la kvardek viroj, kiuj estis selektitaj por labori en la koncentrejo, kie li devis ordigi la vestaĵojn de la viktimoj kaj labori en la arbara taĉmento, el kiu li kaj kvin aliaj judaj malliberuloj sukcesis fuĝi la 20an de julio 1943. Li postvivis la militon kaj migris al Israelo, kie li forpasis en 1978 en Rehovot.

**WEWRYK, Kalmen**, nask. 1906 en Chełm, „Kongresa“ Pola Reĝlando, en tradicia ortodoksa juda familio. Lia patro estis simpla grena komercisto. Li havis fraton kaj du fratinojn. La frato pereis dum la unua mondmilito. Kalmen elektis la profesion de ĉarpentisto kaj malfermis vendejon por teksaĵoj. Li edziĝis al sia amikino Joĥeved kaj en 1934 naskiĝis ilia filo Jossele kaj en 1939 ilia filino Peŝa. Dum iu germana operaco en la geto en 1942 li estis arestita kaj liaj edzino kaj du malgrandaj infanoj forportitaj

[67] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Вайспапир,_Аркадий_Моисеевич; https://www.youtube.com/watch?v=WJqtuzBp5jE, https://www.youtube.com/watch?v=1HlbsrSfq7o, https://www.youtube.com/watch?v=XillqOf-t4o.
[68] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Вайцен,_Алексей_Ангелович.

kaj probable mortigitaj de la germanoj, tiel ke li neniam plu revidis ilin. Lia fratino kaj ties infanoj estis kruele mortigitaj de mordemaj hundoj de la nazioj. En aŭtuno 1942 Wewryk mem estis deportita de Chełm al Sobiboro kune kun Ŝlomo Alster, kie li estis selektita kaj laboris kiel ĉarpentisto. En Sobiboro estis mortigita la plimulto de la 12 mil judoj de Chełm. Post la ribelo de la 14a de oktobro 1943, dum kiu Wewryk sukcesis fuĝi, li unue restis kun la grupo de Peĉerskij dum mallonga tempo kaj post la disiĝo de tiu grupo revenis al Chełm, kie la ukraina konato, kiun li estis taskinta dume gardi siajn varojn, minacis lin transdoni al la Gestapo. Li reiris en la arbaron por kaŝi sin antaŭ la germanaj, polaj kaj ukrainaj persekutantoj, sencele migrante dum monatoj de loko al loko por trovi protekton, kaŝejojn kaj nutraĵojn, preskaŭ pereante pro malsato, malvarmo kaj mortigo de banditoj. Finfine li aliĝis al grupo de sovetiaj partizanoj. Dum forpermeso li revenis al Chełm post ĝia liberigo fare de la sovetianoj, kie li renkontis ruinigitan judan kvartalon kaj konstantis, ke ankaŭ lia loĝejo estis detruita. Kiam li aŭdis la onidiron, ke la poloj intencas mortigi la reston de la judoj, li iris al Vroclavo, kie troviĝis amaso da judaj postvivantoj. Kiam li volis publike komercadi, li estis arestita kaj krude traktita de la pola polico, kiu plej agreseme esprimis sian antisemitisman sintenon, sed li ĝuis ioman protekton de la lokaj NKVD-funkciuloj, ĉar li povis prezenti sovetiajn partizanajn dokumentojn. Post la liberigo de la urbo en 1945 li iris al Lodzo por ricevi la oficialajn personajn dokumentojn, per kiuj li volis forlasi Pollandon, sed li ne sukcesis ricevi ilin. Ĉi tie li renkontis postvivantinon de Aŭŝvico, Perla Laja Fuchs. Dume li translokiĝis al Biała-Kama por labori kaj kie ili geedziĝis unu jaron poste. En 1947 naskiĝis ilia filo, en 1950 ilia filino. Sed la novaj regantoj daŭre ĉikanis judajn komercistojn, tiel ke Wewryk povis labori nur kiel ĉarpentisto en Biała-Kama. En 1952 li reiris al Vrocalvo, kie li daŭrigis labori kiel ĉarpentisto. Post longe atendita ricevo de la personaj dokumentoj en 1956 la paro translokiĝis al Parizo en Francio kaj en 1968 migris al Montrealo en Kanado, kie li daŭrigis labori kiel ĉarpentisto ĝis la pensiiĝo. En 1984 Wewryk, kiu forpasis kvin jarojn poste, ankoraŭ verkis sian aŭtobiografion en la jida lingvo, kiu rakontas pri la apenaŭ imagebla persekutado de la judoj en Chełm kaj pri la teruraj spertoj faritaj de la aŭtoro en la KC Sobiboro kaj post la fuĝo okaze de la ribelo. Ĝi estis tradukita al la angla lingvo kaj publikigita sub la titolo *Al Sobibor kaj revene. Raporto de atestanto* en 1999 en Kanado. En 2020 la teksto aperis libroforme en la germana lingvo.[69]

**WIJNBERG-ENGEL, Selma (Saartje)**, nask. 1922 en Groningen, Nederlando, estis deportita de Westerbork al Sobiboro en aprilo 1943 per transporto kun 2020 judoj. En la koncentrejo ŝi laboris ĉefe en la vestordiga barako de la lagro II kaj fojfoje en la arbara taĉmento. En la koncentrejo Wijnberg renkontis sian estontan edzon, Ĥaim Engel (1916-2003), polan judon el Brudzew, kiu estis ses jarojn pli maljuna. Ili povis interkomuniki en la germana lingvo. Li modele helpis al ŝi, ekzemple kiam ŝi malsaniĝis je tifo. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 Wijnberg kaj Engel sukcesis fuĝi kune sub pafado tra la ĉefa pordego en la arbaron. (Wijnberg estis la sola nederlandanino, kiu postvivis la ribelon de Sobiboro kaj unu el nur du nederlandaj judinoj, kiuj postvivis la koncentrejon Sobiboro.) Ili trovis protekton ĉe bonvolaj polaj kamparanoj, kiujn ili pagis por kaŝi ilin. Ili vivis naŭ monatojn sur la planko de ilia grenejo, ĝis kiam la nazioj retiriĝis el okupata Pollando en junio 1944 dum la operaco „Bagration“, kiel nomiĝis la kontraŭ-ofensivo de la Ruĝa Armeo. La 23an de junio 1944 Ĥaim kaj Selma estis liberigitaj de la Ruĝa Armeo proksime de Chełm. Tiutempe Selma estis graveda. La paro geedziĝis kaj vagadis tra la regiono, ĝis kiam ĝi atingis la faman arbaron de Parczew (kie kaŝiĝis judaj partizanoj), kie naskiĝis ilia filo Emiel. Tra Ĉernivci kaj Odeso (Ukrainio) ili forveturis de la kondamnita oriento per ŝipo al Marsejlo en Francio. Dum la vojaĝo ilia infano malsaniĝis, mortis ene de 24 horoj kaj devis esti entombigita en la maro. De Marsejlo la paro vojaĝis per trajno al Zwolle en Nederlando kaj revenis al la hejmo de la gepatroj de Selma, hotelo Wijnberg. En Nederlando Ĥaim kaj Selma konfirmis sian geedziĝon en septembro 1945. La polico de Zwolle decidis, ke pro sia edziniĝo kun la polo Engel Selma perdis sian nederlandan civitanecon kaj fariĝis pola ŝtatanino. Sed la paro ne povis reiri al Pollando, ĉar la tiama pola registaro rifuzis iamajn polajn civitanojn, kiuj forfuĝis al fremdaj landoj. Nederlandaj oficistoj tamen decidis, ke la paro Engel ne estu internigita en centro por eksterlandanoj, ĉar tiu en la proksimeco de Valkenswaard estis plena. Dum la paro loĝis en Zwolle, naskiĝis du pliaj infanoj, filo kaj filino. La geedzoj malfermis komercan aktivecon por velaj teksaĵoj kaj modo. En 1951 la familio

[69] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kalmen_Wewryk, http://migs.concordia.ca/memoirs/wewryk/wewryk.html, https://www.sobiborinterviews.nl/en/overlevenden-vertellen/kalmen-wewerik, https://de.wikipedia.org/wiki/Datei:Wewerik,_Familie_v.K.jpg, https://bildungswerk-ks.de/news/kalmen-wewryk-nach-sobibor-und-zurueck.

formigris al Israelo, kie Engel ne sentis sin bone. En 1957 ili decidis elmigri al Usono. Ili ekloĝis en Branford, Konektikuto. Ili revenis al Eŭropo nur por atesti kontraŭ la naziaj krimuloj de Sobiboro. Nederlandon ili revizitis, kiam en aprilo 2010 ministro Ab Klink pardonpetis al Engel-Wijnberg dum iu memor-ceremonio en Westerbork, nome de la nederlanda registaro, pro la malbona traktado post la milito. Malgraŭ la malakcepto de la pardonpeto, Engel-Wijnberg almenaŭ akceptis la registaran honorigon kiel kavaliroj en la Ordeno de Oranje-Nassau. En la filmo *Fuĝo el Sobiboro* (1987) Selma Wijnberg estis ludita de Ellis Van Maarseveen. Selma Engel-Wijnberg forpasis en Branford, Konektikuto, en decembro 2018 en la aĝo de 96 jaroj.[70] (Vd. ankaŭ ENGEL, Ĥaim)

**ZISS, Meier**, nask. 1927 en Lublin, Pollando. En majo aŭ junio 1942 li atingis Sobiboron, kie li laboris en la ordigaj barakoj kaj kiel frizisto. Kun Ŝmul Vajcen li devis bruligi la dokumentojn postlasitajn de la judaj viktimoj. Li sukcesis fuĝi el la koncentrejo dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Inter 1956 kaj 1961 li loĝis en Venezuelo, de kie li elmigris al Israelo. Li forpasis en 2003.

Aliaj nomoj de deportitaj judoj ligitaj kun la KC Sobiboro, kiuj pereis tie aŭ kies sorto ne estas klara, estas listigitaj en la libro de Chris Webb pri Sobiboro.

**La ĉefaj germanaj nazioj de la KC Sobiboro (prezento de la plej signifaj, interesaj kaj konataj kazoj):**

**BAUER, Hermann Erich**, nask. 1900 en Berlino, Germana Regno, kiel filo de remburisto kaj dekoraciisto. Post la baza lernejo li ektrejniĝis kiel tornisto. Sen tamen fari la profesian ekzamenon li estis vokita al la militservo dum la unua mondmilito. Li batalis kiel soldato en Francio ĝis septembro 1918 kaj poste estis malliberigita de la francoj, kiuj liberigis lin nur komence de 1920. Post tio li unue laboris kiel nekvalifikita laboristo. Fininte taŭgan trejnadon, de 1923 li laboris kiel ŝoforo. De 1933 li estis dungita kiel tramkonduktoro en Berlino. En la sama jaro li aliĝis al la SA, kie li havis la rangon de „Schargvidanto“. Iom poste li estis akceptita de la NSDAP. Post la komenco de la dua mondmilito Bauer estis komence dungita kiel ŝoforo kadre de la eŭtanazia „operaco T4“. Post ĝia fino komence de 1942 li estis atribuita al la polico kiel Oberwachtmeister kaj sendita al Lublino en la „Ĝenerala Gubernio“, okupata de la germanoj. Kelkajn tagojn poste li venis al la komando de la SS, al kiu apartenis la ekstermejo Sobiboro kadre de la „operaco Reinhardt“. Tie li ricevis la rangon de SS-Oberschargvidanto. Nomata kiel „la gasmastro de Sobiboro“, Bauer estis rekte envolvita en la gasmortigo de miloj da judaj deportitoj. En la lasta fazo, kiam la transportoj ĉesis alveni, li funkciis kiel kamionisto. Post la ribelo de la 14 de oktobro 1943, dum kiu li evitis la morton kaj kiel unua rimarkis la ribelon kaj komencis pafi kontraŭ la fuĝanta amaso, li transportis la ĉerkojn de 8 mortigitaj nazioj al Chełm. Post kiam la koncentrejo de Sobiboro estis fermita kaj likvidita, Bauer revenis al sia polica unuo en Lublino en decembro 1943 kaj tiam estis atribuita al la „Speciala Sekcio Operaco R" de la t.n. „Adriatika Marborda Operaca Zono“ en Triesto, Italio, kien estis senditaj la plimulto de la SS-funkciuloj de la koncentrejoj de la „operaco Reinhardt“ por daŭrigi la persekutadon kaj deportadon de la judoj kaj kie li laboris kiel ŝoforo. Fine de la milito li estis arestita de la usonanoj en Karintio, Aŭstrio, kiuj liberigis lin en 1946. Antaŭ la sennaziiga komisiono li prisilentis sian laboron en la koncentrejo de Sobibro, tiel ke li estis komence klasifikita kiel senŝarĝita. Kiam en 1946 li laboris en okcidenta Berlino, forigante la ruinojn de la detruita urbego, li estis rekonita de la eksaj malliberuloj Samuel Lerer kaj Estera Raab, kiuj povis fuĝi el la KC Sobiboro kaj venis al Berlino fine de la milito, kie Bauer povis esti anoncita al la polico. Bauer estis arestita en aŭgusto 1949. La 8an de majo 1950 li estis kondamnita al morto de la Landa Tribunalo der Berlino pro krimoj kontraŭ la homaro, t.e. pro siaj agoj en Sobiboro. La juĝo reliefigis la apartan brutalecon de la iama nazio en la koncentrejo. Post kiam la mortpuno estis abolita en FRG kaj Okcidenta Berlino, la verdikto de 1971 estis ŝanĝita al dumviva aresto en malliberejo. Bauer forpasis en februaro 1980 en la malliberejo de Berlin-Tegel.[71]

**BECKMANN, Rudolf**, nask. 1910 en Osnabrück, Germana Regno. Komence de sia nazia agado li funkciis kiel bruliganto de kadavroj kadre de la eŭtanazia „operaco T4“ en la mortigaj centroj de

[70] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Selma_Engel-Wijnberg, https://www.youtube.com/watch?v=hEirhkQnUkc, https://www.youtube.com/watch?v=Tin3E-AbQKQ, https://www.youtube.com/watch?v=5ojxRsE4uAg.
[71] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Erich_Hermann_Bauer.

Grafeneck kaj Hadamar, kie la malsanuloj estis gasumitaj. Por la „operaco Reinhardt“ li venis al la KC Sobiboro, kie li estis ĉefe dungita en la rango de SS-Oberschargvidanto en la lagro II kiel estro de la taĉmento, kiu ordigis la vestaĵojn de la mortigitaj judoj kaj kie li respondecis pri la ĉevaloj. Kun Paul Groth Rudolf Beckmann ŝtopis ĉiujn paperaĵojn, dokumentojn kaj ceterajn objektojn de la mortigitaj judoj en sakojn kaj alportis ilin al la bruligejo. Sed Beckmann funkciis ankaŭ kiel administrestro en la tiel nomata arbarista domo. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 estis planite de la laborjudoj, ke Beckmann kaj Steffl estu likviditaj tie. Fakte ambaŭ estis surprizitaj de neatenditaj judaj vizitantoj malantaŭ siaj skribotabloj kaj mortigitaj per tranĉiloj de Ĥaim Engel kaj Kapo-o Pożyczki, kiuj prenis iliajn pistolojn. Kiel la aliaj mortigitaj SS-membroj Beckmann estis entombigita kun militaj honoroj en la armea tombejo de Chełm.[72]

**BOLENDER, Heinz Kurt**, nask. 1912 en Duisburg, Germana Regno. Laŭprofesie kontrolisto de fero, membro de la NSDAP kaj SS, li venis al la SS-Totenkopf-divizio en 1939. Baldaŭ poste li estis sendita al la eŭtanazia „operaco T4“ kaj dungita kiel bruliganto de kadavroj en diversaj mortigaj centroj (Hartheim, Hadamar, Brandenburg kaj Sonnensteinen) la rango de SS-Oberschargvidanto. En vintro 1941/42 Bolender estis translokita al la orienta fronto en Sovetunio por transporti la vunditojn. En printempe 1942 li aliĝis al la „operaco Reinhardt“ por mortigi la eŭropajn judojn en la „Ĝenerala Gubernio“ (sudorienta parto de la germane okupata Pollando). Kune kun Franz Stangl, Karl Frenzel, Hubert Gomerski kaj aliaj Bolender alvenis al Sobiboro la 22an de aprilo 1942. Tie li komence estris la lagron III, kie oni gasmortigis kaj bruligis la judojn, kaj kontrolis la judajn labortaĉmentojn, kiuj purigis la gasĉambrojn kaj forportis la kadavrojn post la gasumado. En aŭtuno 1942 li transprenis la gvidadon de la Trawniki-gardistoj en Sobiboro. En decembro 1942 Bolender estis kondamnita de iu SS-tribunalo en Krakovo al arestpuno en SS-prizono en Matzkau apud Danzig, ĉar en iu privata divorc-proceso li instigis iun atestantinon al falsa ĵuro. Post la ribelo de la 14a de oktobro 1943 li estis reenpostenigita en Sobiboro kiel likvidanto de la koncentrejo. Sekve li estis dungita en la SS-labor-KC Dorohucza apud Trawniki kaj en iu alia germana instalaĵo. Verŝajne komence de 1944 li estis transdonita al la „Speciala Sekcio Operaco R“ en Triesto en la t.n. „Adriatika Marborda Operaca Zono“, kiu servis al la „ekstermado de judoj“, la konfisko de judaj posedaĵoj kaj la batalo kontraŭ partizanoj, do kies tasko estis la daŭrigo de la persekutado kaj deportado de la judoj. En januaro 1945 Bolender ricevis la duaklasan Feran Krucon. Kadre de la baldaŭa militfino la unuoj de la „operaco R“ retiriĝis de norda Italio fine de aprilo 1945 kaj tiel Bolender revenis al Germanio. Post la milito li unue kaŝis sin sub la falsa nomo „Heinz Brenner“, poste li akiris falsitajn dokumentojn en Karintio laŭ la nomo de „Wilhelm Kurt Vahle". Lia fianĉino, iama dungitino de la „operaco T4“, kun kiu li loĝis proksime de Hamburgo de novembro 1945, deklarigis lin (kiel Kurt Bolender) oficiale morta. Malgraŭ tio, komence de la 1950-aj jaroj li estis registrita en Hamburgo, kie li ricevis identigilon laŭ la nomo de „Vahle“ kaj poste pasporton laŭ tiu nomo. Pro kamuflaj kialoj kiel loko de lia naskiĝo estis indikita iu loko en Orienta Prusujo. En la 1950-aj jaroj Bolender, alinome Vahle, laboris en la Hamburga Hofbräuhaus kaj en alia trinkejo kiel pordisto. Sed la policaj aŭtoritatoj povis malkaŝi lian identecon kaj trovi la lokon de lia restado kaj aresti lin en majo 1961. En sia loĝejo la polico eĉ trovis lian vipon kun la arĝentaj inicialoj K.B., faritaj de la postvivanto de Sobiboro Stanisław Szmajzner. En la proceso pri Sobiboro, kiu okazis de la 6a de septembro 1965 ĝis la 20a de decembro 1966 antaŭ la Landa Tribunalo en Hagen, Bolender estis akuzita pro helpa partopreno en la kolektiva murdo al almenaŭ 86 mil homoj kaj unuopa mortigo en almenaŭ 360 kazoj. Nur en malfrua fazo de la proceso li konfesis siajn krimojn en Sobiboro. La postvivanto Moŝe Bahir priskribis Bolender kiel ekstreme brutalan kaj sadisman homon. Antaŭ ol la juĝo estis proklamita, Bolender pendigis sin en la prizono la 10an de oktobro 1966.[73]

**BREDOW, Paul**, nask. 1902 en Koźliny, tiama posedaĵo de Prusujo, Germana Regno (nuntempe Pomeranio, Pollando). Kiel multaj aliaj partoprenantoj en la „operaco T4“, kadre de kiu li deĵoris en la centroj de Grafeneck kaj Hartheim, li estis transdonita al la stabo de la „operaco Reinhardt“ kaj venis al Treblinka kune kun Franz Stangl en la unua grupo de la germana SS. En aprilo 1942 (aŭ 1943) li estis translokita al Sobiboro, kie li kontrolis la ordigajn barakojn, kie la judoj devis lasi siajn vestaĵojn. Sed li ankaŭ deĵoris en la „lazareto“ en la lagro III, kie oni likvidis malsanajn kaj maljunajn judojn post ties

[72] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Beckmann_(SS-Mitglied).
[73] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Kurt_Bolender.

alveno en la KC, kiuj mem ne ne kapablis marŝi al la gasĉambroj,. Krom servado en la „lazareto“ Bredow kontrolis la germanan kuirejon kaj la kazinon de la oficiroj de la koncentrejo. Moŝe Bahir, unu el la postvivantoj de Sobiboro, memoris, ke SS-Oberschargvidanto Bredow montris esceptan kruelecon. Post la likvido de la KC Bredow migris al la KC de San Sabba en Triesto (Italio), antaŭ ol la milito finiĝis. Poste li revenis al Germanio kaj laboris kelkajn monatojn kiel ĉarpentisto kune kun sia SS-amiko Karl Frenzel en Giessen ĝis novembro 1945. En decembro 1945 li estis mortigita en aŭtomobobila akcidento en la regiono de Göttingen.[74]

Ĉar la biografio de Ivan (John) Demjanjuk estas nekutime interesa kaj tragika, ĝi estu pli detale rakontita ĉi tie.

**DUBOIS, Werner Karl**, nask. 1913 en Langenfeld/Wuppertal, Germana Regno, kiel filo de libropresisto. Post la baza lernejo li komencis metilernadon kiel produktanto de penikoj, kiun li tamen ne finis. Post pli frua metilernado en la agrikulturo li laboris en tiu branĉo en Frankfurto/Odro. Aliĝinte al la SA en 1933 kaj sep monatojn da laboro favore al la regno, li revenis al la agrikulturo. Meze de la 1930-aj jaroj li aliĝis al la Nacisocialisma Motorveturila Korpuso (NSKK). Post la fino de kurso kiel helpstiristo sekvis malsukcesa kandidatiĝo kiel helpstiristo ĉe la „Leibstandarte SS Adolf Hitler“. En 1936 li aliĝis al la motorsporta lernejo „Ostmark“ kaj estis utiligata de la komenco de januaro 1937 en la motorveturila stabo de la „SS-Totenkopfverband Brandenburg“. En ĉi tiu agadkampo li estis dungita kiel ŝoforo kaj mekanikisto en la komando de la grupo Oranienburg kaj ekde marto 1938 en la koncentrejo Sachsenhausen, kie li ankaŭ laboris kiel gardisto de la sekureca servo. Jam en 1937 li membriĝis al la NSDAP kaj fariĝis SS-Schargvidanto. En 1939 Dubois estis translokita al la „operaco T4“ kaj laboris en la eŭtanaziaj centroj de Bernburg, Hadamar, Brandenburg kaj Grafeneck kiel bruligisto de kadavroj kaj ŝoforo de la busoj por transporti kadavrojn kaj urnojn. En 1941 li edziĝis kun la T4-dungitino Edith Fischer, kies patrino ankaŭ estis dungita de T4. La geedzoj, kiuj divorcis en 1951, havis du infanojn. Transdonita al la „operaco Reinhardt“, Dubois estis sendita al la ekstermejo Bełżec en aprilo 1942. Tie li plenumis servon ĉe la gasĉambroj kaj respondecis kiel ŝoforo pri la transporto de manĝaĵoj. Post kiam la la neniigejo Bełżec estis likvidita, Dubois estis translokita al la KC Sobiboro en junio 1943. Ĉi tie li deĵoris ĉe la ramplo, en la „lazareto“, ĉe la fosoj, kie oni mortpafis judojn kaj en la arbara taĉmento. Kiam kvin malliberuloj de la arbara taĉmento sukcesis fuĝi, Dubois respondecis pri la koncerna taĉmento. Okaze de la ribelo de la 14a de oktobro 1943 Dubois estis grave vundita en la armila deponejo kiel rezulto de hakilaj kaj tranĉilaj atakoj kaj pafoj, sed li postvivis la atencon kaj resaniĝis en la lazareto de la urbo Chełm. Post la fino de la „operaco Reinhardt“ en januaro 1944 Dubois estis, same kiel la plej granda parto de ĝia personaro, translokita al la „Adriatika Marborda Operaca Zono“ en Triesto, kie li fariĝis membro de la „Speciala Sekcio Operaco R“, kiu servis al la neniigo de judoj, la konfisko de judaj posedaĵoj kaj la batalo kontraŭ partizanoj. Fine de aprilo 1945 Dubois revenis al Germanio. Post la fino de la milito li estis retenita en usona mallibereco de majo 1945 ĝis decembro 1947. Poste li laboris kiel seruristo. En la fruaj 1950-aj jaroj li edziĝis denove, sed la geedzeco restis seninfana. En la proceso pri Bełżec la kazoj de Dubois kaj sep aliaj akuzitoj estis traktitaj de la Munkena Landa Tribunalo ekde aŭgusto 1963. Kvankam li konfesis, ke li persone mortigis ses homojn per belga pistolo, li estis liberigita de la proceso en januaro 1964 pro la putativo kaŭzo, kvankam li deklaris dum la tribunalo, ke li ne estis sub minacata de la mortigo. Tamen li diris, ke Christian Wirth devigis lin mortpafi ses judojn, kiuj ne plu povis marŝi. En la proceso pri Sobiboro de 1966 Dubois estis fine kondamnita al trijara malliberigo pro la partopreno en la kolektiva murdo de almenaŭ 15 mil homoj. Dubois forpasis en oktobro 1971 en Münster, Germanio.

**FRENZEL, Karl August Wilhelm**, nask. 1911 en Zehdenick/Havel, Brandenburgo, Germana Regno, kiel filo de trakforkisto ĉe la germana fervojo kaj membro de la socialdemokratia partio, por kiu li plenumis oficon en la loka grupo. Sian junaĝon Karl Frenzel pasigis en Grünenberg ĉe Ruppin (Brandenburg). La lernejon li vizitis en Oranienburg. Li lernis la profesion de ĉarpentisto, sed pro la ĝenerala senlaboreco li ne trovis laborlokon. Li membris en la komunisma unuiĝo de la ĉarpentistoj. Anstataŭ tio li laboris en la kamparo kaj fariĝis ŝoforo de buĉisto, gajnante sian monon ankaŭ per kontraŭleĝa komercado. Lia unua amikino estis judino. Lia frato studis teologion kaj lia familio vizitadis

[74] Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Paul_Bredow.

la preĝejon. La 1an de aŭgusto 1930 Karl Frenzel aliĝis al la NSDAP kaj membriĝis en la SA, kie li trovis laboron. Kiel SA-gvidanto li laboris en iu municia fabriko en Grüneberg kaj fariĝis dommastro en la administracio de iu kastelo. Li edziĝis kaj havis 5 infanojn. Poste Frenzel havis diversajn okupojn, inter alie en la armeo. Li estis prezentita al Hitler persone, de kiu li ricevis honoran ponardon. Sekve Frenzel konatiĝis kun la ´projekto´ T4 de la eŭtanazio kaj unue estis sendita al Grafeneck kiel gardisto, poste al Bernburg kaj Hadamar, kie li gasumis malsanulojn, bruligis iliajn kadavrojn kaj kolektis iliajn orajn dentojn. En aprilo 1942 li estis sendita al Lublin, kie li estis nomita kiel SS-Oberschargvidanto por servi al la „operaco Reinhardt". La 28an de ĉi tiu monato li alvenis en Sobiboro, kie li partoprenis la organizadon de la gasumado de judoj kaj funkciis kiel anstataŭanto de Gustav Wagner (kiu estis vickomandanto sub Franz Reichleitner) okaze de ties foresto. En Sobiboro Frenzel, kiu havis laŭtan altrudan voĉon kun tipa berlineca parolmaniero, profiliĝis per sia eksterordinara krueleco rilate al la judaj malliberuloj, kiujn li ĉikanis, turmentis kaj bategis per sia vipo sen havi skrupulojn, sed inter kiuj li ankaŭ protektis kelkajn, kiuj utilis al li. Li funkciis kiel komandanto de la lagro I, kiel estro de la stacidoma taĉmento kaj kiel kontrolisto de la lagro II, kie la judinoj senvestiĝis kaj kie oni tondis iliajn harojn antaŭ ol eniri la gasĉambrojn. Postvivantoj de la koncentrejo Sobiboro bone memoris lin kaj abunde rakontis en siaj memuaroj pri la ekscesaj fiagoj plenumitaj de Frenzel, kiu mem taksis, ke en Sobiboro estis gasumitaj ĉirkaŭ 160 mil judoj (kvankam oni ĝenerale supozas, ke tie estis gasumitaj 250 mil homoj). Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1843 en la KC Sobiboro Frenzel, kiu laŭ la plano de la organizantoj same kiel la aliaj SS-funkciuloj devis esti mortigita kaj logita en la lignaĵistejon, restis viva. Oni vane serĉis lin kaj aŭdis, ke li estas en la duŝejo. Intertempe li forlasis ĝin por pretiĝi por la apelo kaj rimarkis nenian danĝeron. En tiu momento la plimulto de liaj kamaradoj jam estis mortigitaj de la konspirintaj laborjudoj. En la anticipe konvokita apelo, kiu devis okazi je la kvina horo, Frenzel ne ĉeestis. Li ankoraŭ estis en la manĝejo por trinki ion, kiam li aŭdis la pafadon. Kalmen Wewryk vidis lin alproksimiĝi al la lagro I, kie li haltis kaj returnis, kio estis nekutima reago. Ĉu Frenzel aŭ Bauer unue rimarkis la ribelon kaj komencis pafi ne estas klare. La malliberuloj jam komencis forkuri al la direkto de la ĉefa pordego, kie Frenzel pafadis kontraŭ la fuĝanta amaso per maŝinfusilo kaj tiel mortigis multajn judojn. Peĉerski poste mem rakontis, ke li tiris la revolveron, kiun Ŝubajev donis al li, kaj repafis el la distanco de kvindek metroj, sed ke li ne sukcesi trafi Frenzel-on. Poste Frenzel urĝis al la stacidomo de Sobiboro por peti helpon al diversaj institucioj telefone, kaj li estis konstatonta, ke granda parto de la judoj forfuĝis kaj liaj kamaradoj estis mortigitaj. Post la ribelo kaj la malkonstruado de la koncentrejo, kiun li gvidis, en oktobro 1943 Frenzel estis translokita al Italio kaj subigita al la ordonoj de Odilo Globocnik. Kiel ĉefa polica gardisto li estis atribuita al la stabo de la „operaco R" en Triesto kaj Fiume, kie li daŭrigis persekuti la judojn, helpante konfiski la loĝejojn kaj posedaĵon de la deportitaj judoj, kaj kontraŭbatalis partizanojn. En printempo 1944 li suferis motorciklan akcidenton kaj longe kuŝis en la malsanulejo en Udine. Fine li estis premiita per la „milita meritkruco de la dua klaso". Kiam la usona armeo liberigis Germanion, li estis internigita en iu usona koncentrejo en la ĉirkaŭaĵo de Munkeno. En majo 1945 li estis liberigita, sed devis labori por la usonanoj en la kuirejo. En novembro 1945 li revenis al Löwenberg, kie lia edzino ĵus mortis je tifo, kio laŭ Frenkel okazis post seksa perfortado fare de rusa(j) soldato(j). Liaj du fratoj pereis en la milito. Laboron li trovis en iu filmateliero (!) en Göttingen, kie li konatiĝis kun nova kunulino. En aprilo 1949 Kurt Thomas, unu el la postvivantoj de Sobiboro, havigis al la Landa Tribunalo en Frankfurt ĉe Majno liston de 13 SS-funkculoj de Sobiboro, inter kiuj estis menciita ankaŭ la nomo de Karl Frenzel, kiu kune kun Wagner kaj Gomerski estis priskribitaj kiel la plej sadismaj kaj brutalaj SS-funkciuloj de la KC Sobiboro. Atestanto Herŝel Cuckierman karakterizis lin kiel „murdiston sen konscienco". Jules Schelvis donis jenan pritakson de la psika stato de Frenzel: „Lia avido al potenco por regi la sendefendajn homojn estis respegulita de la same granda bezono plaĉi al siaj superuloj. Dum lia potenco kreskis, ankaŭ lia volo blinde plenumi ordonojn kaj fari pli multe pliiĝis. Li volis esti rigardata de siaj superuloj kiel la perfekta SS-viro. Iam homo kun malmulta signifo, en Sobiboro li ĝuis sian pozicion kiel unu el la plej gravaj viroj. La konstato, ke li estas la mastro de la laborjudoj, ke ili estas je lia dispono, ke li povas fari kun ili laŭplaĉe kion li volas, vekis en li la plej malaltajn instinktojn: establi personan teroran reĝimon humiliganta kaj torturanta la malliberulojn, batante ilin ĝis kiam ili mortis, pro kio li tre ĝojis." La serĉado de tiu eksa nazio daŭris 13 jarojn. En marto 1962 iu tribunala en Düsseldorf eldonis la ordonon aresti lin kaj akuzis lin kaj cent aliajn kamaradojn pro murdado de minimume 250 mil judoj per gaso kaj pro aliaj mortigoj per pafado, laŭ paragrafoj 211, 47 kaj 74 de la germana punkodo. La 22an de marto li estis arestita. Dum la proceso Frenzel deklaris, ke li sentas sin kulpa kaj ke la mortigo de la judoj estis krimo, kiun li bedaŭras.

Kvankam li ne plu interesiĝis pri politiko, la tiaman politikon de Hitler li ŝajne daŭre subtenis, krom la murdo al la judoj. En septembro 1965 li estis akuzita, ke li mortigis 42 judojn kaj partoprenis en la (kolektiva) murdo al almenaŭ 250 mil judoj. En decembro 1966 Frenzel estis kondamnita kadre de la Sobibor-proceso de la Landa Tribunalo Hagen al dumviva arestpuno pro la mortigo de ses judoj, pro neordonita mortigo de 9 judoj kaj pro la partopreno en la (kolektiva) murdo al almenau 150 mil judoj. En decembro 1976 li povis forlasi la malliberejon, sed de majo 1980 ĝis septembro 1981 li estis denove arestata. En revizia proceso li sentis sin „ne kulpa“. La mortigo de iu juda junulo en Sobiboro, ĉar li portis (aŭ ŝtelis) fiŝkonservon, ne estis denove traktita. La verdikto estis nuligita en 1982 pro formala eraro. En interparolo de aprilo 1983 kun la postvivanto Thomas Toivi Blatt, kiu devis purigi liajn ŝuojn en Sobiboro, Frenzel persone senkulpiĝis ĉe li kaj la aliaj viktimoj-atestantoj, klarigante al li, ke li ne aprobas, kio okazis kun la judoj, ke lia tiama laboro en Sobiboro estis lia devo, ke la tempo estis terura kaj ke li ne estis antisemito. En la intervjuo li ankaŭ klarigis, ke li ne sciis, kio atendis lin en Sobiboro, ĉar oni diris al li, ke la laboro estos gardi laborkoncentrejon, kaj ke li ne estis membro de la SS. La ofico en Sobiboro estis sekreta kaj oni eĉ ne rajtis rakonti al familianoj pri la laboro, kiun oni plenumas en Sobiboro. Al Blatt li certigis, ke „li estis ĉiam justa kaj punis neniun, kiu faris nenion malĝustan”. En la revizia proceso, kiu komenciĝis en novembro 1982 kaj finiĝis en oktobro 1985, Frenzel estis kondamnita denove al dumviva malliberigo, kio praktike signifis la konfirmon de la unua puno por la krimulo, kiu intertempe estis 74-jaraĝa. La verdikto estis konfirmita de la Federacia Kortumo en majo 1987. Sed pro alta aĝo kaj malbona sanstato, Frenzel, kiu pasigis entute 16 jarojn en la malliberejo, ne devis plenumi la punon kaj estis liberigita el la arestado en novembro 1992. La lastajn vivojarojn Frenzel pasigis en iu maljunulejo en Garbsen apud Hanovro, kie li forpasis en septembro 1996.[75]

**FUCHS, Erich Fritz Eerhard**, nask. 1902 en Berlino, Germana Regno, kiel filo de fabrikinspektoro, kiu finis sian lernadon kiel aŭtomekanikisto post frekventado de la baza lernejo kaj trapasis la ekzamenon kiel mastro de motorveturiloj en 1928. Kiel lia patro, aktiva SPD-funkciulo, li ankaŭ estis membro de SPD de 1927 ĝis 1933. En 1934 li aliĝis al la NSDAP kaj SA kaj poste ankaŭ al la SS, kie li havis la rangon de „Schargvidanto“. Li laboris kiel ŝoforo por diversaj firmaoj ĝis 1935, kiam li ekoficis kiel ŝoforo por la „Nacisocialisma Popola Bonfarto“. Komence de la milito li laboris por kaŝorganizaĵo de la ministerio de la aviado kaj poste kiel ŝoforo por iuj entreprenoj. En 1940 Fuchs ekagadis por la eŭtanazia „operaco T4“ same kiel ŝoforo. Komence li estis dungita en la nazia mortiga centro de Brandenburg kaj poste en Bernburg. Post sia translokiĝo al la „operaco Reinhardt“ kun dek aliaj membroj de la T4-kunlaborantaro de Bernburg, Fuchs estis sendita al la ekstermejo Bełżec komence de januaro 1942 sub la gvido de Christian Wirth. La viroj konsistigis la unuan personaron de la ekstermejo en Bełżec, kie Fuchs dum sia ses-semajna restado helpis instali la teknikan ekipaĵon por la gasumado de la judoj. En aprilo 1942, kune kun Erich Hermann Bauer, li instalis la benzinmotoron, kiu originis de sovetia tanko, kiun li ricevis en Lembergo kaj kiu devis produkti la gason por la ekstermado de la judoj en Sobiboro. Fuchs, kiu instruis al Bauer kiel funkciigi la gasuman instalaĵon, respondecis por la provgasumado de 30 judinoj kaj por la posta gasumado de almenaŭ tri transportoj kun centoj aŭ miloj da viktimoj. Krom tio Fuchs ricevis la taskon instali la saman teknikan sistemon en la ekstermejo de Treblinka, kion li faris kune kun Bauer. Tial Fuchs kaj Bauer akiris la fifaman reputacion de „gasmastroj“ de la „operaco Reinhardt“. Fine de 1942, Fuchs estis retranslokita al Bernburg kaj en decembro 1942 al la sanatorio Wiesloch. Post kelkaj malsukcesaj provoj kaj per la helpo de konato li sukcesis forlasi la „operacon T4“ en februaro 1943. En printempo de tiu jaro li estis rekrutita en Riga (Latvio) kiel ŝoforo de la naftokompanio „Ostland“ kaj restis tie ĝis la evakuado de la urbo en septembro 1944. Li tiam estis sendita al kontraŭtanka divizio de la Waffen-SS en Potsdamo kaj grave vundiĝis dum bombatako kontraŭ Hameln. Fine de la milito li restadis en lazareto en Magdeburgo. Post la militfino li unue troviĝis en rusa malliberejo dum kvar semajnoj kaj poste en usona malliberejo en okcidenta Germanio. La brita armeo dungis lin kiel ŝoforon kaj mekanikiston en la KC Bergen-Belsen ĝis 1946. Sekvis okupoj kiel laboristo en la agrikulturo, kiel kamionisto, mekanikisto kaj aŭtovendisto. Poste li laboris por la teknika inspektado (TÜV) en Koblenz, sed forlasis la laboron en 1962 pro malsano kaj emeritiĝis. Fuchs laŭdire edziĝis kvar fojojn, du geedzecoj estis divorcitaj kaj du edzinoj mortis. En

---

[75] Laŭ la biografio en Schelvis, 2003, p. 296-301, vd. ankaŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Frenzel_(SS-Mitglied). La interparolo de Frenzel kun Blatt aperis germanlingve en la libro Nur die Schatten bleiben, 4/2009, p. 328-334. Pli detale Blatt rakontis pri sia renkontiĝo kun Frenzel en sia libro Sobibor, der vergessene Aufstand, 2004, p. 172-180.

marto 1963 Fuchs estis arestita kadre de la proceso pri Sobiboro en Hagen kaj kondamnita al kvarjara malliberigo pro helpo kaj instigo al la kolektiva murdo al almenaŭ 79 mil homoj. Ĉi tiu juĝo estis konfirmita de la Federacia Kortumo en marto 1971. Dum la proceso li klarigis, ke li instalis duŝajn ajutojn en la gasĉambroj. La ajutoj ne estis konektitaj kun akvotubo, ĉar ili celis nur kamufli la gasĉambrojn. La trompitaj judoj devis kredi, ke ili devas esti banitaj kaj desinfektitaj. En la proceso pri Bełżec Fuchs kaj sep aliaj akuzitoj estis traktitaj de la Munkena Landa Tribunalo ekde aŭgusto 1963. Li estis liberigita de la proceso pro la putativa kaŭzo, ĉar li povis kredinde klarigi, ke li timis pri sia korpa sano, kiun Christian Wirth povus difekti. Fuch forpasis en julio 1980 en Koblenz, Germanio.[76]

**GLOBOCNIK, Odilo**, nask. 1904 en Triesto, Aŭstrujo-Hungarujo. Filo de poŝta komizo. La familio devenis de Neumarktl (Tržič), Slovenio. Lia patrino originis el Vršac, Banato. La patro estis komence kariera oficiro kaj poste transiris al la poŝta servado. En 1914 la familio translokiĝis de Triesto al Lanschütz/Bernolákovo, Slovakio. Post la frekventado de la baza lernejo en sia hejmurbo Globocnik aliĝis al la armea mezlernejo en Sankt Pölten en 1915. Li estis priskribita kiel „tre talenta“ kaj „tre laborema“ junulo, havante „tre decajn kaj agrablajn tratojn“ kaj ĉiam kondutis „modele. Post la fino de unua mondmilito li adoptis la aŭstran civitanecon en novembro 1918 kaj translokiĝis kun sia familio al Klagenfurt, Aŭstrio, kie li frekventis la superan ŝtatan komercan lernejon de aŭtuno 1919 ĝis julio 1923, finante ĝin per la abiturientiĝo. Sian unuan laboron Globocnik ricevis kiel konstruteknikisto en 1923 en iu karintia entrepreno kaj estis dungita en la konstruado de akvocentraloj ĝis 1930. Li estis arestita plurajn fojojn pro nacisocialismaj agadoj post la NSDAP-malpermeso en Aŭstrio, sed en 1933 li tamen povis fari la ekzamenon por fariĝi konstruestro. Ĝis januaro 1934 li daŭrigis labori en iu konstrua entrepreno en Klagenfurt, sed poste li ne plu rajtis praktiki sian profesion kaj fariĝis plentempa funkciulo de la NSDAP, kies membro li estis de marto 1931. En 1933 Globocnik iĝis anstataŭanto de la Gau-estro de Karintio, Hubert Klausner. En 1932 aŭ 1934 Globocnik aliĝis ankaŭ al la SS. En somero 1935 li provizore gvidis la partion en Budapeŝto. En 1936 li provizore transprenis la gvidon de la NSDAP en Karintio kaj poste funkciis kiel ĝia stabestro. Pro interna konflikto Globocnik perdis siajn partiajn funkciojn en aŭtuno 1936 kaj en novembro 1937 li estis informita pri sia eksigo el la partio. Sed ĉar li ĝuis la personan favoron de Hitler, Globocnik estis reengaĝita en gvida funkcio de la partio. Post la anekso de Aŭstrio al la Germana Regno en marto 1938 Globocnik estis nomita kiel ŝtata sekretario en la aŭstra registaro gvidata de Arthur Seyß-Inquart, kiu ekzistis nur kelkajn semajnojn. Post la parlamentaj elektoj de aprilo 1938 en la Germana Regno li membriĝis kiel deputito de Aŭstrio. En majo li fariĝis SS-Standartengvidanto kaj estis nomita de Hitler kiel Gau-estro de Vieno. Sed en tiu ĉi ofico li tute malsukcesis kaj ne estis populara ĉe la viena loĝantaro. En Vieno Globocnik respondecis ĉefe por la forpelo, misuzo kaj eksproprietigo de la loka juda loĝantaro. Kiam en septembro 1938 la financa administracio de Globocnik estis forte kritikita, lia financa suvereneco estis forprenita de li. Globocnik postlasis financan kaj organizan kaoson en Vieno kaj estis forigita de la ofico de Gau-estro fine de januaro 1939. Je la komenco de la dua mondmilito en 1939 li partoprenis en la atako kontraŭ Pollando en la rango de SS-Unterschargvidanto (kiu egalis al suboficiro de la armeo). En novembro 1939 Globocnik estis nomita de Reiĥgvidanto SS Heinrich Himmler kiel SS- kaj Polica Gvidanto (SSPF) de la distrikto Lublin en la „Ĝenerala Gubernio“ (sudorienta Pollando). Samtempe li estis altigita al la rangoj de SS-brigadestro kaj generalmajoro de la polico. Aldone al sia funkcio kiel SSPF li ankaŭ estis la ĉefa registara reprezentanto de la Germana Regno por la transloĝigo de la volhiniaj germanoj. En tio li ricevis kompetencojn de Himmler, kiuj superis la funkcian kampon de SSPF kaj plifortigis lian pozicion rilate al la civila administrado de la lublina distrikto, kie la loka NSDAP estis subigita al li anstataŭ al la distrikta administracio. Kvankam formale lia rekta ĉefo estis Friedrich-Wilhelm Krüger, Globoncik regadis grandparte aŭtonome en la distrikto, ĉar li ĝuis la personan favoron de Himmler. La skandaleca regadostilo de Globocnik estis karakterizita per aparta brutaleco rilate al la civila loĝantaro, inter kiu liaj lokaj etne germanaj unuoj aranĝis diversajn masakrojn. Dum la t.n. „operaco AB“ eĉ Hans Frank, la ĉiopotenca estro de la Ĝenerala Gubernio, priskribis liajn trupojn kiel „bandon de murdistoj“. En novembro 1941 Globocnik perforte senhomigis sep vilaĝojn en la distrikto Zamość por reloĝigi etnajn germanajn familiojn tie. De novembro 1942 ĝis marto 1943 110 mil poloj estis perforte transloĝigitaj dum la „operacio Zamość“. Kiam en oktobro 1941 Globocnik ricevis de Himmler la ordonon likvidi la judaron de la Ĝenerala Gubernio kaj tiucele fariĝis estro de la „operaco Reinhardt“

[76] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Erich_Fuchs_(SS-Mitglied).

en printempe 1942, la fanatikajn ambiciojn de Globocnik sentis ankaŭ la judoj en lia influtereno, ĉar li komencis senprokraste persekutegi ilin. Li estis unu el la unuaj SS-policestroj, kiuj starigis labor-koncentrejojn por judoj, sekve al kio estiĝis vasta reto de koncentrejoj por deviga laboro por judaj deportitoj kaj malliberuloj. En marto 1943 la unuopaj labor-koncentrejoj de la lublina distrikto estis integritaj en la nove fonditan SS-firmaon „Orienta Industrio SklR" (OSTI), kies administraj direktoroj estis Globocnik mem kaj Max Horn de la „Ekonomia kaj Administra Ĉefoficejo de la SS". Li jam kontrolis la konstruadon de la KC Majdanek kaj nun organizis ankaŭ la funkciigon de la ekstermejoj Bełżec, Sobibor kaj Treblinka. Al liaj ĉefaj kunlaborantoj en la stabo apartenis Hermann Höfle kaj Christian Wirth. Sed ankaŭ en Lublino Globocnik havis pli kaj pli da konfliktoj kun diversaj nazigermanaj institucioj kiel ili kutime okazis en la nazia polikratio. Tiu ĝena situacio igis Himmler-on al la decido translokigi lin. Komence Globocnik ricevis la funkcion de la reprezentanto de la HSSPF por Centra Rusujo, sed probable li neniam reale okupis ĉi tiun postenon. Meze de aŭgusto 1943 Jakob Sporrenberg anstataŭis lin en la oficejo de la SSPF en Lublino. Post la armistico de la itala Badoglio-registaro kun la usonaj kaj brtaj aliancanoj komence de septembro 1943 en Cassibile kaj la posta okupado de la lando fare de la Germana Armeo,[77] Globocnik estis nomita kiel Supera SS- kaj Polica Gvidanto (HSSPF) en la „Adriatika Marborda Operaca Zono" kun sidejo en Triesto, kien li kunportis siajn kamaradojn de Lublino, inkluzive Christian Wirth, Franz Stangl kaj lian stabestron Ernst Lerch. En Triesto, kie estis instalita la polica malliberejo Risiera di San Sabba, tiuj SS-uloj okupiĝis pri la batalo kontraŭ partizanoj, sed ankaŭ pri la persekutado, deportado kaj mortigo de judoj kaj pri la konfiskado de ilia posedaĵo, same kiel pri temoj rilataj al trans- kaj reloĝigo, etnoj kaj malplimultoj. Kadre de la tiel nomata „batalo kontraŭ bandoj" sub la gvido de Globocnik okazis interalie la masakro de Lipa fine de aprilo 1944, en kiu estis mortigitaj 269 homoj inkluzive virinojn kaj infanojn. Sed Globocnik li ne vere sentis sin bone en tiu ofico, ĉar li ne plu povis okupiĝi pri siaj ambiciaj planoj kiel en Lublino, kvankam ankaŭ ĉi tie li provis agi sendepende. En julio 1944 Globocnik ricevis alian funkcion. Post kiam li ricevis la Germanan Krucon en arĝento, baldaŭ poste oni donis al li ankaŭ la Germanan Krucon en oro pro lia sukceso en la „batalo kontraŭ bandoj". En la lastaj monatoj de la milito la oficejo de Globocnik ne plu troviĝis en Triesto, sed en Cividale del Friuli, ĉar tiu loko estis pli sekura por la germanaj okupantoj. De tie li reiris al Aŭstrio kaj fine fuĝis tra Klagenfurto al la Möslacher Alpo en la regiono de Weissensee, kie li renkontis malnovajn samideanojn. La 31an de majo 1945 la grupo Rainer/Globocnik estis arestita de brita taĉmento, kiu kondukis ĝin al Paternion apud Villach. Post lia unua esplordemandado Globocnik mortigis sin per kalia cianido. Lia korpo estis anonime entombigita en komunuma kampo proksime al la vilaĝo Kamering/Drau (Karintio).[78]

**GOMERSKI, Hubert**, nask. 1911 en Schweinheim (Aschaffenburg), Bavario, Germana Regno, kiel filo de produktisto de laboriloj kun ok gefratoj. Fininte la lernejon, li lernis la metion de la fera tornisto. En 1929 aŭ 1931 li fariĝis membro de la NSDAP kaj en 1931 de la SS. Post la eksplodo de la dua mondmilito en 1939 li ricevis soldatan trejnadon ĉe la SS-kraniuloj kaj en januaro 1940 estis sendita al la berlina polico. En printempo de tiu jaro Gomerski devis servi en la nazia eŭtanazia centro de Hartheim kadre de la „operaco T4", kie li plenumis oficejan laboron kaj poste laboris kiel bruligisto de kadavroj. Intertempe li estis translokita al la centra oficejo de T4, ĉar li sentis sin malbone dum la kremaciado. Poste li estis translokita al la nazia mortiga centro en Hadamar, kie li denove okupiĝis pri la kremaciado de la gasumitaj viktimoj. Post kiam la mortigoj ĉesis en Hadamar, en aprilo 1942 Gomerski estis transdonita al la stabo de la eksterma KC Sobiboro kadre de la „operaco Reinhardt". Tie li kontrolis la arbaran taĉmenton, sed li devis ankaŭ kontroli la ukrainajn gardistojn kaj la lagron III. De la laborjudoj li estis konsiderata same danĝera kiel Wagner kaj Frenzel kaj karakterizita kiel nekutime kruela, ĉar li senhezite mortigis homojn per bastono, kiu enhavis najlojn. Kiam la judaj transportoj alvenis, li kutime troviĝis ĉe la ramplo kaj selektis invalidojn kaj malsanulojn por sendi ilin al la „lazareto" en la lagro III, kie ili estis senprokraste likvditaj kaj ĵetitaj en la foson. Sed li kutimis apliki ankaŭ jenan ludon: Starigi viktimon kun botelo sur la kapo al la muro kaj pafi kontraŭ la botelo, kvankam li plej ofte trafis lian kapon. Pro siaj specialaj „meritoj" li ricevis en kristnasko 1942 la rangon de la SS-Unterschargvidanto. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 Gomerski forestis de Sobiboro, ĉar li feriis. Post la fino de la „operaco Reinhardt" Gomerski estis translokita al la „Adriatika Marborda Operaca Zono" en Triesto,

[77] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Waffenstillstand_von_Cassibile.
[78] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Odilo_Globocnik.

same kiel la plimulto de la personaro de tiu operaco. Kiel membro de la „Speciala Sekcio Operaco R“ li okupiĝis pri la persekutado de judoj, konfiskante ilian posedaĵon, kaj batalis kontraŭ partizanoj. Post kiam la sekcio forlasis nordan Italion fine de aprilo 1945, Gomerski revenis al Germanio. En la tiel nomata Hadamar-proceso de la 21a de marto 1947 Gomerski, kiu neis, ke li konas lokon kun la nomo Sobiboro, estis konsiderata senkulpa rilate la „eŭtanaziajn murdojn“ en Hadamar, pro kio la 2an de julio 1947 li estis liberigita de la esplora aresto. Li tiam laboris kiel ŝoforo, edziĝis kaj fariĝis patro de du infanoj. Surbaze de deklaro de alia membro de la eŭtanazia programo, la prokurorejo de Frankfurto enketis pri Gomerski. La koncerna proceso antaŭ la Landa Tribunalo de Frankfurto ĉe Majno finiĝis en aŭgusto 1950 per lia kondamno al dumviva malliberigo pro murdo en senfina nombro da kazoj. Sed li postulis revizion, tiel ke en decembro 1972 komenciĝis nova proceso. La verdikto estis nuligita de la Federacia Kortumo, ĉar Gomerski ne povis persone sekvi la proceson. Post lia liberigo en 1977 la ĵurio de Frankfurto ĉe Majno reduktis la akuzon kontraŭ Gomerski al „helpado kaj instigo al kolektiva murdo“. Sed ankaŭ ĉi tiu juĝo estis nuligita de la Federacia Kortumo. Tria procesa sesio estis provizore suspendita en 1981 pro la malkapablo de Gomerski ĉeesti la proceson kaj finfine definitive ĉesigita en 1984. En la proceso kontraŭ Frenzel Gomerski eldiris kiel atestanto. Gomerski forpasis en decembro 1999 en Frankfurto ĉe Majno.[79]

**GRAETSCHUS (**ankaŭ konata kiel **Greischütz), Siegfried**, nask. 1916 en Tilsit, Orienta Prusujo, Germana Regno, estis kamparano laŭ profesio, de 1935 membro de la SS kaj de 1936 de la NSDAP. Unue li okupiĝis pri oficeja laboro en la nazia eŭtanazia mortiga centro de Bernburg en 1940/41. Poste li venis al la komandejo de la KC Sachsenhausen. Kiam li estis dungita en la veturila floto de la KC Buchenwald, Graetschus estis sendita kun Lorenz Hackenholt, Josef Oberhauser kaj Werner Dubois al la regna kancelierejo en Berlino, kie ili kaj ses aliaj SS-uloj estis informitaj pri la sekreta „operaco T4“. Sekve Graetschus funkciis kiel bruligisto de kadavroj en la naziaj mortigaj centroj de Grafeneck, Brandenburg kaj Bernburg. Post tio Grateschus estis transdonita al la „operaco Reinhardt“. En la ekstermejo Bełżec li partoprenis eksperimentojn en gaskamionoj sub la gvido de Christian Wirth. Post mallonga labor-periodo en la ekstermejo de Treblinka en aŭgusto 1942 li estis translokita al la ekstermejo de Sobiboro, kie li havis diversajn okupojn en la rango de SS-Untersturmgvidanto kaj kiel komandanto de la 90 ĝis 120 ukrainaj Trawniki-gardistoj kiel posteulo de Erich Lachmann (kiu estis alkoholulo, ŝtelisto kaj mense limigita malbonulo). Okaze de la ribelo de la 14a de oktobro 1943 Graetschus estis mortigita de la judaj malliberuloj Arkadij Vajspapir kaj Jehuda Lerner, kiam li vizitis la barakon de la tajloroj por provi jakon, kiun ili estis speciale farintaj por li.[80]

**GRÖMER, Ferdinand**, nask. 1903 en Aŭstrujo-Hungarujo, venis al Sobiboro kiel kuiristo kaj poste laboris en la lagro III, kie li okupiĝis pri la gasumado de la judoj kaj la forigo de iliaj kadavroj. Samtempe li kontrolis aŭ inspektis la fosojn, en kiuj la judoj estis ĵetitaj. Fojfoje li kontrolis ankaŭ la arbaran taĉmenton. Laŭ priskribo de atestantoj li estis unu el la pli primitivaj, sovaĝaj kaj kruelaj nazioj en la koncentrejo. Lia kamarado Hermann Bauer karakterizis lin kiel „drinkulon“, kiu kapablis senprokraste frapi kaj bati aliajn. Pro sia alta alkohola konsumo li estis eksoficigita de Reichleitner. Lia plua sorto ne estas konata.

**HERING, Gottlieb**, nask. 1887 en Warmbronn/Leonberg (Württemberg), Germana Regno. Laŭprofesie li estis kamplaboristo en la Leonberg-distrikto. De 1907 ĝis 1909 li plenumis siajn trijaran milit-servon en la Ulana regimento 20 en Ulm kaj tiam volontulis por pliaj tri jaroj. Li aliĝis al la komuna polic-trupo en Heilbronn en 1912. Dum la unua mondmilito Hering apartenis al la maŝinpafila kompanio de la 123-a grenadista regimento kaj servis ĉe la okcidenta fronto en norda Francio ĝis la armistico en 1918. Pro militaj meritoj li estis premiita per la Fera Kruco de la unua klaso. Post la milito Hering daŭrigis la polican laboron, kiun li komencis ĉe la polico en Heilbronn. En 1919 li eklaboris por la kriminala polico en Göppingen. En 1926 li fariĝis detektiva inspektoro, poste ĉefdetektivo kaj estro de la kriminala polico de Göppingen. Kiel estro de speciala komisiono por kontroli radikalajn politikajn partiojn kaj simpatianto de SPD li pledis por drastaj rimedoj kontraŭ membroj de la NSDAP, SA kaj SS, pro kio li estis nomata „manĝanto de nazioj“. Post la akaparo de la povo fare de la nacisocialistoj en 1933, malgraŭ

[79] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Hubert_Gomerski kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.
[80] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Siegfried_Graetschus.

la kontraŭstaro de la nazioj, kiuj memoris lian antaŭan malamikecon kontraŭ ili kaj dank´ al la subteno de la NSDAP-membro Christian Wirth, kiun li konis ekde 1912, li povis resti en la polica servo, nun en la polica ĉefsidejo en Stutgarto. En majo 1933 li aliĝis al la NSDAP. Post la eksplodo de la dua mondmilito en 1939, li estis sendita al Gdingen/Gdynia kun la tasko translokadi etnajn germanojn el la sovetia zono al la „novaj germanaj orientaj teritorioj“. Post la fino de sia tiea laboro li plenumis diversajn funkciojn en la kunteksto de la „operaco T4“ en la „eŭtanaziaj“ centroj de Bernburg, Hadamar kaj Sonnenstein. En julio 1942 Hering venis al la KC Bełżec por labori kadre de „operaco Reinhardt“. La 1an de aŭgusto 1942 li anstataŭis Christian Wirth kiel komandanton, ĉar li estis nomita kiel inspektoro de la ekstermejoj de la „operaco Reinhardt“. Laŭ ordono de Hering, tiuj, kiuj estis tro malfortaj por iri en la gasĉambron, estis kondukitaj al la lagro II kaj murditaj per pafo en la nukon. Hering estis komandanto de la KC Bełżec ĝis decembro 1942, post kio li prizorgis la likvidon de la KC kaj kontrolis la bruligon de la kadavroj de la amastomboj. Poste Hering taskis la restantan KC-personaron forviŝi ĉiujn spurojn de la neniigejo. En printempo 1943 Hering fariĝis komandanto de la KC Poniatowa, kie estis internigitaj judaj malliberuloj. La kulminon ĉi tiu KC atingis okaze de la t.n. „operaco Rikolta Festo“ en la komenco de novembro 1943, kadre de kiu almenaŭ 14 mil malliberuloj estis mortpafitaj je la fino de la „operaco Reinhardt“.[81] Post la fermo de ĉi tiu KC Hering denove kontrolis la bruligon de la mortintaj malliberuloj. En oktobro 1943 li okupiĝis pri la likvido de la KC Sobiboro. De Heinrich Himmler Hering estis laŭdita kiel unu el la plej kapablaj kaj meritplenaj viroj de la „operaco Reinhardt“. Malgraŭ lia nemembreco en la SS, en 1943 li estis nomita, laŭ instigo de Odilo Globocnik, kiel SS-Hauptsturmgvidanto. Fine de 1943 Hering estis transdonita al la „operaco R“ en Triesto, same kiel la plimulto de la personaro, kiu deĵoris kadre de la „operaco Reinhardt“, kie li daŭrigis la persekutadon de la judoj kaj okupiĝis pri la batalo kontraŭ partizanoj. Tie Hering funkciis i.a. ankaŭ kiel komandanto de la KC Risiera di San Sabba en Triesto, kie ĝis 5000 judaj malliberuloj kaj partizanoj estis murditaj. Dine de aprilo 1945 lia unuo retiriĝis de norda Italio kaj Hering revenis al Germanio. Post la milito Hering laŭdire mallonge estris la kriminalan policon en Heilbronn denove. Li forpasis en oktobro 1945 pro ia malsano sub neklarigitaj cirkonstancoj. Ĉar oni konsideris, ke Hering havas neniun kulpon lige kun la neniigo de la judoj pro tio, ke liaj funkcioj kaj agadoj en la diversaj naziaj koncentrejoj ne estis konataj aŭ menciitaj, lia vidvino restis protektita de la atendata konfiskado de la posedaĵo kaj de la perdo de la pensiaj rajtoj.[82]

**ITTNER, Alfred Jakob**, nask. 1907 en Kulmbach (Bavario), Germana Regno. Laŭprofesie komerca oficisto, Ittner fariĝis membro de la NSDAP en februaro 1926, forlasis la partion en somero 1927 kaj realiĝis al ĝi post kiam la nacisocialistoj ekregis la landon (en 1933). En 1936 li aniĝis en la SA kiel „Schargvidanto“. Post plenumo de ofico kiel librotenisto ĉe NSDAP / AO en 1934 li akceptis pli bone pagitan postenon kiel librotenisto en la ĉefsidejo de la „operaco T4“ en Berlino, kie li laboris ĝis printempo 1942. Fine de marto / komence de aprilo 1942 Ittner kaj aliaj (kiel Karl Frenzel, Erich Hermann Bauer, Kurt Bolender, Herbert Floss, Hubert Gomerski, Ferdinand Grömer, Hermann Michel, Hans-Heinz Schütt, Karl Steubl kaj Josef Vallaster) estis sendita al Lublino, kie atendis lin Odilo Globocnik. De la fino de aprilo 1942 ĝis la fino de julio 1942 li estis engaĝita kiel SS-Oberschargvidanto en la ekstermejo de Sobiboro, kie li respondecis pri la konfiskado de la valoraĵoj de la judaj viktimoj, kiuj devis, survoje al la gasĉambroj, preterpasi la „giĉeton“, kie sidis Ittner (aŭ Hans-Heinz Schütt aŭ Herbert Floss), kiu enkasigis iliajn valoraĵojn. Post malsamaj opinioj kun la komandanto Franz Stangl pri la uzado de la ŝtelitaj valoraĵoj Ittner estis translokita al la lagro III, kie li devis kontroli la taĉmenton de laborjudoj, kiuj devis eltranĉi la orajn dentojn de la mortigitaj judoj kaj ĵeti ilin en la tombojn, kiujn la laborjudoj devis elfosi. Dume li vane klopodis ĉe Stangl povi forlasi ĉi tiun postenon. Nur post interveno ĉe Friedrich Lorent, la ĉefa ekonomia administranto de la centra oficejo de la „operaco T4“, Ittner povis reveni en junio 1942 al sia iama posteno en la ĉefsidejo de T4 en Berlino. Post la milito Ittner laboris kiel nekvalifikita laboristo kaj estis arestita por esplorado en la fruaj 1960-aj jaroj. En la proceso pri Sobibor en Hagen en 1966 Ittner estis kondamnita al kvarjara malliberigo pro helpo en la kolektiva murdo al almenaŭ 68 mil homoj. Ittner forpasis en Kulmbach en novembro 1976.[83]

---

[81] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion_Erntefest.
[82] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Gottlieb_Hering.
[83] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Alfred_Ittner kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.

**JÜHRS, Robert**, nask. 1911 en Frankfurt ĉe Majno, Germana Regno. Post frekventado de elementa lernejo li finis metilernadon kiel pentristo, pri kiu li devis rezigni en 1934 pro okula vundo. En 1930 li aliĝis al NSDAP kaj SA. En 1935 li ŝanĝis de SA al SS. Ekde la mezo de la 1930-aj jaroj li laboris por la Frankfurta Urba Teatro, la Vintra Helpa Organizo kaj la Landa Laboroficejo de Hesio. Jührs edziĝis dufoje kaj havis du infanojn. Lia servo por la „operaco T4" komenciĝis en junio 1941. En la eŭtanazia centro en Hadamar Jührs estis dungita kiel farbisto kaj arkivisto. De junio 1942 ĝis marto 1943 li estis engaĝita kiel SS-Unterschargvidanto en la ekstermejo Bełżec, kie li laboris en diversaj funkcioj, i.a. elfoado kaj bruligado de kadavroj, kaj ankaŭ partoprenis en la mortpafado de judoj. En marto 1943 li estis translokita al la KC Dorohucza, de kie li gardis la judojn al Trawniki, kie ili estis mortpafitaj okaze de la „operaco Rikolta Festo" komence de novembro 1943.[84] Tiam li troviĝis en la ekstermejo Sobiboro, kie li devis gardi la 450 „laborjudojn", kiuj estis prenitaj de la KC Treblinka por likvidi la KC Sobiboro post la ribelo de la 14a de oktobro 1943, kaj ĝis decembro 1943. estis envolvita en la pafado de la lastaj judaj malliberuloj. Post tio li estis translokita al la „Operaca Zono R" en Triesto en la „Adriatika Marborda Operaca Zono", kiu servis al la persekutado de la judoj, la konfisko de iliaj posedaĵoj kaj la batalo kontraŭ partizanoj. Antaŭ la militfino li estis arestita de la usonanoj la 1an de majo 1945, kiuj liberigita lin en aŭgusto 1945. En Frankfuto li denove estis arestita, kondukita al la interniga koncentrejo de Dachau, akuzita kaj absolvita en la proceso pri Hadamar. Post sia reveno al Frankfurto ĉe Majno li laboris kiel laboristo, disdonanto de gazetoj kaj hotela portisto. Post okupiĝo kiel memstara komercisto de rubaĵo, li laboris kiel dommastro. En la Bełżec-proceso Jührs estis akuzita pro la helpo kaj instigo al kolektiva murdo en 360 mil kazoj kaj la 30an de januaro 1964 estis suspendita de jura persekutado pro la neceso obei ordonojn. En la Sobibor-proceso en Hagen Jührs estis akuzita pro kunkulpeco en la kolektiva murdo al 30 homoj, sed la 15an de januaro 1965 li estis suspendita de la jura persekuto denove pro la neceso obei ordonojn kaj ĉar la juĝistoj ne povis pruvi al li lian partoprenon en la mortpafado de judoj. En decembro 966 li estis absolvita de ciu kulpo fare de la ĵurio en Hagen. Pri lia plua vivo nenio estas konata nek pri la dato kaj loko de la morto.[85]

**KLIER, Johann**, nask. 1901 en Stadtsteinbach (Hesio), Germana Regno. Post la metilernado kiel bakisto Klier fariĝis bakmastro en 1931. De 1933 li estis membro de la NSDAP kaj SA. De 1934 ĝis 1940 li estis dungita en la kuprofabriko de Heddernheim. Post la eksplodo de la dua mondmilito li devis labori en la nazia mortiga centro de Hartheim kiel parto de la „operaco T4", kie li prizorgis la hejtadon. Tiam Klier estis translokita al la eksterma KC de Sobiboro en aŭgusto 1942 kadre de la „operaco Reinhardt", kie li administris kiel SS-Unterschargvidanto la bakejon kaj respondecis pri la deponejo de la ŝuoj de la judaj viktimoj en la ordigaj barakoj. Klier ne ĉeestis en la KC dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943. Post kiam la „operaco Reinhardt" finiĝis, Klier estis transdonita al la „Adriatika Marborda Operaca Zono" en Triesto fine de 1943, same kiel la plimulto de la alia personaro de la „operaco Reinhardt". Ĉi tie li estis funkciis kadre de la „Speciala Departemento Operaco R", kiu servis al la persekutado de la judoj, konfiskado de judaj posedaĵoj kaj la batalo kontraŭ partizanoj. En majo 1945 li estis arestita en Italio kaj liberigita meze de junio 1945. Li tiam estis internigita denove de decembro 1945 ĝis februaro 1949. Surbaze de deklaro de Josef Hirtreiter, kiu estis arestita en 1946 sekve al la enketo pri mortigo de handikapuloj en la eŭtanazia centro de Hadamar kaj kondamnita al dumviva malliberigo en la unua Treblinka-proceso en 1951, la prokurorejo de Frankfurto enketis Klier kaj Hubert Gomerski pri ilia engaĝo en Sobiboro. La proceso antaŭ la Landa Tribunalo de Frankfurto ĉe Majno inkluzivis la partoprenon en amasaj mortigoj, la selektadon de deporitataj judoj alvenintaj per fervojaj transportoj kaj la mistraktadon kaj mortpafadon de judoj. La proceso finiĝis en aŭgusto 1950 per la proklamo de la malkondamno de Klier, dum Gomerski ricevis dumvivan punon pro murdo al nedifinita nombro da homoj. Klier, kiu estis priskribita de postvivantoj de Sobiboro kiel unu el la malpli brutalaj SS-uloj, mortis en februaro 1955 en Frankfurto ĉe Majno.[86]

**LACHMANN, Erich Gustav Wili**, nask. 1909 en Liegnitz, Malsupra Silezio, Germana Regno. Laŭprofesie masonisto, Lachmann laboris por diversaj firmaoj ĝis la komenco de la dua mondmilito. De 1933 li estis membro de la „Stahlhelm", kiu estis la unuiĝo de la frontsoldatoj, kaj post kiam ĉi tiu

[84] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion_Erntefest.
[85] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Robert_Jührs kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.
[86] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Klier.

organizaĵo transiris al SA, li ankaŭ fariĝis membro de ĝi por mallonga tempo, sed li neis, ke li estis membro de la NSDAP. Post la eksplodo de milito Lachmann estis rekrutita de la helpa polico kaj, malgraŭ malsukceso en la ekzameno, ricevis la rangon de ĉefserĝento. En septembro 1941 li estis instruisto en la SS-trejnejo de Trawniki por la ukrainaj volontuloj (t.e. sovetiaj militkaptitoj), ĝis somero 1942. Li mem asertis, ke li ĉeestis en la KC Sobiboro ekde aŭgusto 1943, kie li gvidis la gardistojn de Trawniki ĝis aŭtuno 1942, sed verŝajne li alvenis jam multe pli frue al Sobiboro, nome plej malfrue en junio 1942. La nova komandanto Franz Reichleitner, kiu opiniis, ke Lachmann estas nekapabla por tiu laboro, resendis lin al Trawniki. Erich Hermann Bauer priskribis lin kiel alkoholulon kaj ŝteliston. La Sobibor-postvivantoj Margulies kaj Lichtman vidis lin seksperforti junajn knabinojn. Jichak Arad komentis, ke Lachmann estis traktita de la aliaj SS-uloj kiel „fremda korpo", ĉar, male al ili, li ne estis veterano de „operaco T4". Lia plua sorto ne estas klara. Lachmann mem asertis, ke li dizertis de Trawniki kun sia pola amatino fine de 1942 aŭ komence de 1943. Li estis kaptita de la polico en Varsovio ses semajnojn poste. La SS- kaj Polica Kortumo en Lublino kondamnis lin al sesjara arestado en malliberejo, kiun li pasigis en diversaj prizonoj, precipe en Dachau. En marto 1945 li estis liberigita el tiu KC kaj transdonita al iu punkompanio. Post ses semajnoj da milita trejnado li estis engaĝita en la regiono de Brandenburgo kiel soldato kontraŭ la Ruĝa Armeo. Post kiam li estis arestita de la sovetianoj en majo 1945, li estis kondamnita al 25-jara deviga laboro pro supozata sabotado. En 1950 li estis ĝuis amnestion kaj estis liberigita. Sekve li ekloĝis en Untergriesbach en Bavario kaj reprenis la masonistan profesion. Okaze de la juraj esploroj en la fruaj 1960-aj jaroj Lachmann estis arestita. Dum la demandado li neis sian respondecon pri la krimoj faritaj en la KC, substrekante, ke „mi ne sentas min kulpa pri la morto de judoj en Sobiboro, ĉar mi ne gasumis ilin". En la Sobibor-proceso de 1966 li estis liberigita de la akuzo pri la kolektiva murdo al almenaŭ 150 mil homoj pro la putativa kaŭzo, ĉar la atestoj donitaj de la postvivantoj de Sobiboro ne permesis pruvi sen dubo, ke li persone faris krimojn. De la tribunalo en Hagen li estis karakterizita kiel „mense /aŭ intelekte/ konsiderinde limigita" homo, kio konfirmis la konkludon, ke li vidis neniun eblecon ne obei la ordonojn (putativa kaŭzo). Li forpasis en Wegscheid en januaro 1972.[87]

**MICHEL, Hermann**, nask. 1906 aŭ 1909 en la vilaĝo Heegermühle (Eberswalde/Brandenburgio), Germana Regno. Meze de la 1930-aj jaroj li laboris kiel flegisto en iu medicina centro en Berlino. Fine de la 1930-aj jaroj li laboris kune kun Franz Stangl kaj Christian Wirth kiel flegistino en la eŭtanaziaj centroj de Hartheim kaj Grafeneck, kie la korpaj kaj mensaj handikapuloj estis mortigitaj per gaso aŭ injekcio kadre de la „operaco T4". Kiam en aprilo 1942 Franz Stangl estis nomita kiel komandanto de la KC Sobiboro, SS-Oberschargvidanto Hermann Michel estis nomita kiel lia anstataŭanto kaj engaĝita en la „operaco Reinhardt". Michel estis priskribita kiel alta kaj belaspekta viro kun delikataj trajtoj kaj plaĉa voĉo, kiu povis alloge paroladi, pro kio li ricevis la kromnomon „predikisto". Kiel tia li plenumis tre specifan taskon en la lagro II de la KC Sobiboro, nome fari al la novaj alvenintoj ´bonvenigan´ paroladon kun klarigoj pri ilia situacio kaj la sekvaj paŝoj farendaj en la loko, kie ili troviĝis. Starante sur malgranda tablo, portante blankan kitelon por doni la impreson al la homoj, ke li estas kuracisto, kaj parolante en tre ĝentila tono, Michel klarigis al ili, ke ili troviĝas en „transira koncentrejo" kaj alvokis ilin trankviliĝi, ĉar ĉio estas en ordo. Li klarigis al la judoj, ke ili devos transdoni siajn valoraĵojn, senvestiĝi kaj ke oni tondos ilian hararon. Li promesis al ili, ke post la banado, kiu servas al la desinfektado por eviti la disvastiĝon de malsanoj, ĉiuj iliaj havaĵoj estos redonitaj al ili kaj ke ili povos daŭrigi sian vojaĝon al Ukrainio, kie ili vivos kaj laboros. Tiu alparolado vekis fidon kaj entuziasmon ĉe la deportitaj viktimoj, kiuj kredis la klarigojn de Michel kaj spontane aplaŭdis lian paroladon kaj foje eĉ dancis kaj kantis pro ĝojo, kiel Ada Lichtman, postvivantino de Sobiboro, raportis post la milito. SS-Oberschargvidanto Kurt Bolender, komandanto de la lagro III, konfirmis tiun ateston kaj donis aldonajn klarigojn pri la funkciado de Michel. Moŝe Bahir, alia postvivanto de Sobiboro, memoris, ke Michel traktis siajn servistojn dece kaj la viktimojn brutale. Laŭdire li ankaŭ kolektis surloke grandan nombron da horloĝoj, ringoj kaj aliaj valoraĵoj ŝtelitaj de la murditaj judoj. Ne estas tute klare, ĉu en novembro 1942 Michel vere estis translokita al Treblinka aŭ ĉu, laŭ alia raporto, post la ribelo de la 14a de oktobro 1943, kiun Michel postvivis, sendita al Triesto, Italio, por daŭrigi la persekutadon de la judoj kaj

[87] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Erich_Lachmann kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.

kontraŭbatali partizanojn. Post la milito li perdiĝis senspure. Stangl asertis en 1971, ke Michel fuĝis al Egiptio. Laŭ iuj fontoj Hermann Michel forpasis en aŭgusto 1984, sed pruvo por tio ne ekzistas.[88]

**NIEMANN, Johann**, nask. 1913 en Völlen (Leer/Malsupra Saksio), Germana Regno. Laŭprofesie pentristo kaj domfarbisto, li fariĝis membro de la NSDAP en 1931 kaj ankaŭ aliĝis al la SS. Li estis Unterschargvidanto de la „Leibstandarte SS Adolf Hitler". Inter 1934 kaj 1941 li estis engaĝita en la KC-oj Esterwegen kaj Sachsenhausen. Li okupiĝis pri la kadavroj en la eŭtanazia centro de Bernburg kadre de la „operaco T4". Kadre de la „operaco Reinhardt" li estis engaĝita en la ekstermejo de Bełżec ĝis li estis definitive transdonita al la KC Sobiboro, kie li portempe okupis la funkcion de deĵoranta komandanto. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 Niemann alvenis rajdante sur ĉevalo laŭ mendo al la laborejo de la tajloroj por provi sian novan uniformon kaj estis la unua kaj plej altranga SS-funkciulo, kiu estis mortigita per du hakilaj batoj de la rusa malliberulo Arkadij Ŝubajev. Niemann dokumentis sian karieron en la SS en du foto-albumoj, de la KC Esterwegen ĝis la laboro por la „operaco T4" kaj la „operaco Reinhardt" en Bełżec kaj Sobiboro. En 2015 privata kolekto de pli ol 300 bildoj el la posedo de la familio Niemann estis donacita al iu organizaĵo en Kassel (vd. sobibor.de). Ĝi estis publikigita kiel libro en januaro 2020. Laŭdire, sur tiuj fotoj estas videbla ankaŭ la ukraina gardisto Ivan Demjanjuk, kiu evidente troviĝis en Sobiboro.[89]

**NOWAK, Walter**, nask. 1912 en Dresdeno, Saksio, Germana Regno. Nowak estis membro de la NSDAP kaj SS en la rango de „Schargvidanto". Li estis flegisto kaj transportisto en la eŭtanazia mortiga centro de Sonnenstein. Post tio li estis sendita al la ekstermeja KC Sobiboro, kie li respondecis kun Erich Hermann Bauer pri la glata funkciado de la barako, en kiu oni tranĉis la hararon de la judinoj. Walter Nowak aperadis ankaŭ sur la placo, kie la judoj devis senvestiĝi, por rapide liberigi ĝin por la venonta grupo de viktimoj. Nowak ankaŭ gvidis la eksteran kaj la arbaran taĉmentojn, kiu faligis lignon por la bruligo de la kadavroj. Nowak ofte aperis ankaŭ en la lagro III. Laŭ la postmilta atesto de Paul Rost (vd. sube), li plej laste renkontis lin en la usona internigejo proksime al Garmisch-Partenkirchen. Sed post 1947 la serĉado de Nowak restis malsukcesa. Laŭ Stanisław Szmajzner, Nowak estis mortigita de la judaj malliberuloj dum la ribelo de 14a de oktobro 1943. En septembro 1960 tiu fakto estis konfirmita de Erich Hermann Bauer en Berlino.[90]

**REICHLEITNER, Franz Karl**, nask. 1906 en Ried/Traunkreis, Aŭstrujo-Hungarujo. Reichleitner laboris ĉe la kriminala polico en la rango de kriminala sekretario kaj post la germana anekso de Aŭstrio en marto 1938 li estis sendita al la Gestapo en Linz, kie li renkontis Franz Stangl, la postan estron de la ekstermejoj Sobibor kaj Treblinka. Reichleitner estis membro de la NSDAP kaj SS. En la SS li okupis la rangon de „Hauptsturmgvidanto". Kadre de la „operaco T4" li estis engaĝita printempe 1940 en la administrado de la eŭtanazia centro Hartheim proksime de Linz. En novembro 1940 lia polica kolego Franz Stangl ankaŭ estis translokita al Hartheim, kun kiu li dividis la saman ĉambron. La programo estis gvidata de Christian Wirth. Post kiam Wirth estis nomita kiel inspektoro de ĉiuj institucioj de la eŭtanazia programo, Stangl fariĝis lia posteulo kiel oficeja administranto en Hartheim kaj Reichleitner estis lia anstataŭanto. Liaj devoj ampleksis krom la oficeja administrado, la laboro de ĉefo de la speciala geedziga oficejo, la tenado de la registro de mortintoj kaj la prizorgado de la korespondado, ankaŭ la lokajn policajn taskojn. Reichleitner edziĝis al Anna Baumgartner el Steyr, kiu estis amikino de la edzino de Stangl Theresa. Kadre de la „operaco Reinhardt" Stangl fariĝis en majo 1942 komandanto de la KC Sobiboro. Kiam li transprenis la gvidon de la KC Treblinka en septembro 1942, Reichleitner sekvis lin kiel nova komandanto de la KC Sobiboro kiel SS-Obersturmgvidanto, kie li estis respondeca por la perforta morto de pli ol cent mil judoj. Post la vizito de Himmler en la KC en februaro 1943 Reichleitner estis nomita SS-Hauptsturmgvidanto. Kompare kun tiu de Stangl, la reĝimo de Reichleitner estis multe pli severa, kvankam li ĉeestis en la KC nur malofte. Lin ankaŭ ne tro interesis kio tie okazis, li ĉeeestis nur unufoje, kiam alvenis transporto kun deportitaj judoj, li ne havis rektan kontakton kun la judaj malliberuloj, sed la likvida procezo funkciis glate kaj efike dum lia regado. Li ĉiam aperis vestita per eleganta uniformo kaj portis blankajn gantojn. Moŝe Bahir fariĝis atestanto, kiam Reichleitner

---

[88] Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Hermann_Michel.
[89] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Niemann.
[90] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Walter_Nowak_(SS-Mitglied) kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.

mortpafis ĉe la stacidomo maljunan judon, kiam tiu frapis Karl Frenzel (la sceno estas montrita en la filmo *Fuĝo el Sobiboro,* 1987). Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 li forestis. Post la likvido de la KC Sobiboro li estis sendita al norda Italio kadre de la „operaco R“, gvidata de Odilo Globocnik, por persekuti judojn kaj batali kontraŭ partizanoj. La 3an de januaro 1944 Reichleitner estis mortpafita de partizanoj proksime de Fiume (Rijeka). Post la milito li, Christian Wirth kaj Gottfried Schwarz, anstataŭanto de Wirth en la KC Bełżec, estis entombigitaj en la germana milita tombejo Costermano en la provinco Verona. En 1988 la nomoj de la tri SS-funkciuloj estis eliminitaj el la „honora libro“ de la tombejo kaj iliaj oficrangoj estis forigitaj de la tomboŝtonoj, sed la ostoj ne estis tuŝitaj.[91]

**ROST, Paul**, nask. 1904 en Deutschenbora (Saksio), Germana Regno. Naskita kiel filo de ŝuvendisto, en 1908 la familio translokiĝis al Meissen, kie Rost post la frekventado de la baza lernejo lernis la metion de buĉisto/viandisto. De 1925 li frekventis la polican lernejon en Meissen kaj estis akceptita de la saksa polica servo en 1926. De 1935 li laboris por la sekureca polico. En 1937 li estis akceptita kiel membro de la NSDAP. Al la Ĝenerala SS li aliĝis en decembro 1940 kiel „Untersturmgvidanto“. En majo 1940 li estis disponigita kiel policestro de la saksa Ministerio de la internaj aferoj por speciala tasko, kiu konsistis en la administrado de la polica taĉmento en la eŭtanazia centro de Sonnenstein/Pirna, kiu estis oficiale malfermita en junio 1940 kaj kie li devis ankaŭ gvidi la transporton de malsanuloj de aliaj institucioj. Post la fino de la „operaco T4“ en aŭgusto 1941 Rost dume restis en Pirna kaj komence de 1942 estis transdonita al la stabo de la „operaco Reinhardt“ en Lublino. En somero 1942 li aliĝis al la gvida personaro de la KC Sobiboro, kie pro sia polica edukado li estis utiligita sur la kampo de la batalo kontraŭ korupto kaj ŝtelado kaj devis kontroli la personaron. Komence li komandis la koncentrejon antaŭ ol lin sekvis Floss kaj Niemann. Post la ekfunkciado de la ekstermejo li kontrolis la judan ordigan taĉmenton en la lagro II kaj estis vokita al la ramplo, kiam transportoj de deportitaj judoj alvenis. En marto 1943 li translokiĝis al Treblinka. Post la fino de la „operaco Reinhardt“ Rost kaj la plej granda parto de la personaro de Sobiboro estis transdonita al la „Adriatika Marborda Operaca Zono“ al Triesto en decembro 1943. Sub Christian Wirth, kiu tiutempe estis inspektoro de la „Speciala Sekcio Operaco R“ sub la gvido de Odilo Globocnik, Rost funkciis kiel membro de la ekonomia polico. En 1945 Paul Rost estis arestita en Aŭstrio kaj mallonge internigita en la Post sia liberiĝo Rost reiris al sia familio en Dresdeno. Baldaŭ poste, en 1946, la sovetia armeo arestis lin. En 1971 GDR rifuzis aŭdi la ateston de Rost lige kun la proceso de la landa kortumo de Frankfurto ĉe Majno kontraŭ la direktoro de la mortiga centro Sonnenstein, Horst Schumann. Post sia liberiĝo el la esplora prizono en septembro 1946 Rost laboris kiel konstrua helplaboristo en Dresdeno. Paul Rost, kiu estis edzo ekde 1931 kaj havis kvar infanojn, forpasis en Dresdeno en marto 1984.[92]

**STANGL, Franz**, nask. 1908 en Altmünster, Aŭstrujo-Hungarujo. Stangl, kiu estis edukita laŭ militeca stilo, forlasis la lernejon en la aĝo de 15 jaroj kaj komencis metilernadon en teksejo. Tri jarojn poste li sukcese finis ĝin kaj fariĝis la plej juna teksa mastro en Aŭstrio. En 1931 li ŝanĝis sian laboron pro sanaj kialoj kaj kandidatiĝis por la polica servo. Sian trejnadon li trapasis en la polica kazerno en Linz. Post unu jaro li estis dungita en la trafika polico, poste en la kriminala polico. En aŭtuno 1935 li estis translokita al la politika sekcio de la kriminala polico en Wels. En oktobro 1935 li edziĝis kaj havos tri filinojn. En marto 1938 Stangl aliĝis al la NSDAP kaj SS. En januaro 1939 la politika sekcio estis transprenita de la Gestapo kaj translokita al Linz. Stangl estis nomita kiel ĉefasistanto de la kriminala polico kaj dungita en la prijuda fako. Samjare li forlasis la katolikan eklezion laŭ peto de siaj estroj. En 1940 li estis translokita al la ĉefsidejo de la „operaco T4“ en Berlino. Tie li ricevis postenon kiel gvidanto de la administracio kaj oficejo de la eŭtanazia centro Hartheim en la rango de ĉefleŭtenanto de la uniformita polico, sub la gvido unue de Christian Wirth kaj poste de Franz Reichleitner. En oktobro 1941 li estis transdonita al la eŭtanazia centro de Bernburg. En februaro 1942 Stangl revenis al Hartheim por reanonci sin ĉe T4 en Berlino. Tie li ricevis la ordonon anonci sin ĉe la reprezentanto de la „operaco Reinhardt“, Odilo Globocnik, en Lublino, Ĝenerala Gubernio, kiu nomis lin, kun la aprobo de Himmler, unua komandanto de la KC Sobiboro (ekde la 28a de aprilo), kiun li devis transformi al ekstermejo, laŭ la modelo de Bełżec. Sub Stangl, kiu havis la rangon de SS-Obersturmgvidanto, en la gasĉambroj de Sobiboro estis mortigitaj proksimume 100 mil judoj. Inter judaj malliberuloj Stangl estis konsiderata

[91] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Reichleitner kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.
[92] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Rost kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.

kiel unu el la „moderuloj“ de la KC-personaro. Stangl evitis rilati kun siaj viktimoj kaj li ankaŭ malofte estis vidata en la koncentrejo krom kiam li ´bonvenigis´ la alvenantajn transportojn kun deportitaj judoj. Post la milito Stanisław Szmajzner memoris, ke Stangl, havante eternan rideton sur la vizaĝo, estis aroganta viro, kiu sendube trovis plezuron pri sia laboro kaj sia situacio, kiu iusence estis specife kreita por li. En septembro 1942 Stangl anstataŭis la aŭstran komandanton Irmfried Eberl en Treblinka, ĉar tiu deklaris sin malkapabla digesti la grandajn judajn transportojn. Kompare kun sia antaŭulo Stangl montriĝis la perfekta organizanto de la amasmurdo. Post kiam Himmler vizitis la ekstermejojn en la Ĝenerala Gubernio, Stangl ricevis la rangon de SS-Hauptsturmgvidanto. Baldaŭ post la ribelo de la 2a de aŭgusto 1943 en la KC Treblinka Stangl kaj la plej granda parto de la personaro de la „operaco Reinhardt“ estis translokita al la „Adriatika Marborda Operaca Zono“ por batali kontraŭ partizanoj kaj persekuti kaj deportadi la italajn judojn. Post la morto de Wirth en majo 1944 Stangl respondecis pri la „Unuo R II“ en Fiume/Rijeka. Krom tio li partoprenis en iu SS-konstruprojekto en la Valo de Po kun centmiloj da italaj devigitaj laboristoj. Fine de aprilo 1945 la unuoj de la „operaco R“ retiriĝis de norda Italio al Germanio. Post la militfino Stangl estis arestita de la usona armeo en Attersee kaj internigita kiel SS-membro en la KC Glasenbach, kvankam nenio estis konata pri lia rolo en la tiamaj ekstermejoj. Li ankaŭ estis pridemandita de la usona milita spionservo CIC en la prizono en Bad Ischl, sed oni nur eksciis pri liaj agadoj en la batalo kontraŭ partizanoj en Italio. Post du jaroj kaj duono da internigo Stangl estis transdonita al Aŭstrio en 1947, kie li estis arestita en Linz pro lia partopreno en la „operaco T4“. La t.n. Hartheim-proceso komenciĝis en Linz en 1948. Kiam Stangl eksciis de sia edzino, ke iama ŝoforo de la dungitaro de Hartheim estis kondamnita al kvarjara malliberigo, li kaj Gustav Wagner, kiu estis proksima kunlaboranto kaj persona amiko de Stangl ekde ilia tempo en Hartheim kaj Sobibor, forfuĝis de la pli malpli malferma esplorprizono fine de majo 1948. Stangl fuĝis piede tra Graz, Merano kaj Florenco al Romo, kie episkopo Alois Hudal akiris por li pasporton de la Ruĝa Kruco kaj vizon por Sirio, kein Stangl sukcesis eskapi. En Damasko li trovis laboron komence kiel teksisto en iu firmao perita de Hudal kaj de decembro 1949 kiel maŝinisto en alia firmao. En majo 1949 li venigis sian familion al Sirio. En 1951 la familio Stangl migris al Brazilo, kie li laboris denove kiel teksisto kaj poste ĉe la firmao Volkswagen, dum la edzino trovis laborlokon ĉe la firmao Mercedes-Benz. Nur en 1961 la nomo de Stangl aperis sur la serĉlisto de la aŭstra kriminala polico, kvankam oni sciis, ke li parte respondecis pri la morto de preskaŭ unu miliono da homoj en diversaj koncentrejoj. En 1965 la familio translokiĝis al iu distrikto de São Paŭlo, kie ĝi vivis sub la vera nomo de Stangl, kiu estis konata al la aŭstra konsulejo. Stangl estis, same kiel Gustav Wagner, trovita, rekonita kaj identigita de la postvivanto de la KC Sobiboro, Stanisław Szmajzner, kiu same vivis en Brazilo. Laŭ instigo de Simon Wiesenthal[93] la brazilaj aŭtoritatoj arestis lin en februaro 1967. En junio de tiu jaro Stangl estis transdonita al la aŭtoritatoj de Federacia Respubliko Germanio, kie la proceso kontraŭ li komenciĝis en majo 1970. En decembro 1970 la Landa Tribunalo en Düsseldorf kondamnis lin al dumviva malliberigo pro la kolektiva murdo al almenaŭ 400 mil judoj en unu el la procesoj pri Treblinka. Stangl ankoraŭ apelaciis kontraŭ la verdikto, sed li mortis pro korinfarkto fine de junio 1971 en la malliberejo. Gitta Sereny, kiu faris en 1971 intervjuon kun Stangl en la prizono, publikigis la rezulton de la interparoloj en libro kun la titolo *Into that Darkness. An Examination of Conscience.* (London 1974; la germana eldono aperis en 1995).[94]

**THOMALLA, Richard**, nask. 1903 en Sabina bei Annahof (Supra Silezio, nune Sowin), Germana Regno. En 1932 la inĝeniero aliĝis al la SS kaj NSDAP. Li militservis en Falkenberg kaj Oppeln. En 1935 li edziĝis. Fine de la 1930-aj jaroj li deĵoris en SS-unuoj en Wohlau (Wołów) kaj Breslau (Vroclavo) kaj estis transdonita al la Ĝenerala Gubernio en septembro 1939, kie al li estis konfiditaj administraj taskoj ĉe la SS-helppolico en Częstochowa kaj Radom. En aŭgusto 1940 Thomalla estis transdonita al la oficejo de la SS- kaj Polica Gvidanto Odilo Globocnik en Lublino. Inter aŭgusto kaj oktobro 1940 li estris konstruan brigadon en la regiono de Bełżec por sekurigi la landlimajn fortikaĵojn (t.n. „Otto-liniojn“). Sekve li estis okupata pri la starigo de policaj kaj SS-bazoj en Starokostjantyniw, Zwiahel (Nowohrad-Wolynskyj) kaj Kievo (germane okupata Ukrainio) kiel parto de la Ĝenerala Plano Orienta. En 1941 grupo de inĝenieroj gvidataj de Thomalla ricevis la taskon trovi la plej favoran lokon por starigi koncentrejon. En novembro 1941 Thomalla transprenis la centran konstru-administradon de

[93] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Simon_Wiesenthal.
[94] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Stangl kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.

la SS en Zamość kaj estis nomita respondeca por la efektivigo de la konstruado de koncentrejo proksime de la vilaĝo Bełżec kadre de la „operaco Reinhardt“ sub la gvido de Josef Oberhauser. Komence de marto 1942 proksime al la vilaĝo Sobiboro SS-Hauptsturmgvidanto Thomalla kaj SS-Gruppengvidanto Alois Moser, ambaŭ arkitektoj, ricevis la taskon esplori kaj mezuri la areon por komenci la konstruadon de koncentrejo je kelkaj kilometroj de la vilaĝo, kaj Thomalla estis nomumita respondeca por tio. Thomalla estis nelonge la unua komandanto dum la konstrua fazo de la KC Sobiboro (marto ĝis aprilo 1942) kaj Treblinka (majo ĝis junio 1942). Fine de la dua mondmilito li estis sendita al la militservo en la germana protektorato Bohemio kaj Moravio. En majo 1945 li estis identigita, arestita de kontraŭspionaj agentoj de Sovetunio kaj, laŭ nekonfirmitaj informoj, ekzekutita de NKVD en Jičín (Ĉeĥoslovakio) en majo 1945. Thomalla estis deklarita morta en Ulm en 1957.[95]

**UNVERHAU, Heinrich**, nask. 1911 en Vienenburg (Malsupra Saksio), Germana Regno. Post la frekventado de la baza lernejo li komencis metilernadon kiel tubisto, pri kiu li devis rezigni pro akcidento dum la laboro, en kiu lia dekstra okulo blindiĝis. En Königslutter li finis kvarjaran muzikan trejnadon kaj ekde 1930 ludis en iu „Stahlhelm“-musikgrupo. En la fruaj 1930aj jaroj li provizore estis senlabora. Poste li finis trejnadon kiel flegisto en la Provinca Sanatorio kaj Flega Institucio Teupitz. Fininte ĉi tiun trejnadon, Unverhau laboris en la hejmo Neu-Ruppin de 1938. Li edziĝis en 1938 kaj havis du infanojn. En 1937 li aliĝis al la NSDAP. En januaro 1940 komenciĝis lia servado por la „operaco T4. Unverhau estis dungita kiel flegisto kaj akompananto de transportoj en la eŭtanaziaj centroj de Grafeneck kaj Hadamar. Liaj taskoj estis doni trankviligajn injekciojn kaj akompani viktimojn al la gasĉambro. Post la oficiala fino de la eŭtanazia programo Unverhau transprenis de la fino de 1941 ĝis marto 1942 por la „Organizo Todt“ transportojn de soldatoj vunditaj ĉe la orienta fronto. De junio 1942 li estis engaĝita en la ekstermejo Bełżec. Post malsaniĝo je tifo li devis iri al la lazareto en Tomaszów por strikta gardo, ĉar oni timis, ke li povus malkaŝi en siaj febraj sonĝoj konfidencajn informojn pri Bełżec. Dum tiu restado li perdis la dekstran okulon, sed li revenis al Bełżec post sia resaniĝo en marto 1943. En tiu momento la KC estis likvidita kaj la elfositaj kadavroj estis bruligitaj. En junio 1943 li estis transdonita al la KC Sobiboro. Kiel SS-Unterschargvidanto li kontrolis la senvestigon de la judaj viktimoj, estis dungita en la arbara taĉmento kaj ankaŭ en la reordigaj barakoj. Li postvivis la ribelon de la 14a de oktobro 1943 kaj post la likvido de la koncentrejo li estis nelonge utiligita por la renaturigo kaj replantado de la KC Bełżec, kie estis konstruita farmbieno por forviŝi ĉiujn spurojn de la amasmurdo. Poste tio li estis transdonita al la „Speciala Sekcio Operaco R“ en Triesto en la „Adriatika Marborda Operaca Zono“ por persekuti kaj deportadi judojn, konfiski iliajn posedaĵojn kaj por kontraŭbatali partizanojn. Unverhau forlasis la organizon T4 en aprilo 1944 kaj deĵoris en la Germana Armeo ekde julio 1944. Antaŭ la militfino li fariĝis militkaptito en aprilo 1945, de kio li estis liberigita en septembro 1945. Li denove laboris kiel muzikisto ĝis kiam en marto 1949 li estis arestita pro sia T4-aktiveco en Grafeneck kaj Hadamar. En somero 1950 Unverhau estis liberigita de la arestado en la esplorprizono sen kondamno. De 1952 li laboris kiel flegisto en la urba hospitalo de Königslutter. En la Bełżec-proceso li estis akuzita pro helpo kaj instigo al kolektiva murdo en 360 mil kazoj kaj estis juĝita fine de januaro 1964, sed li ne estis jure persekutata pro la putativa kaŭzo. En la Sobibor-proceso Unverhau estis akuzita pro helpo kaj instigo al kolektiva murdo en 72 mil kazoj, sed en januaro 1965 li estis denove metita ekster jura persekutado pro la putativa kaŭzo. Unverhau estis la sola SS-funkciulo, kiu libervole atestis pri sia partopreno en la „operaco Reinhardt“. Pri lia plua vivo nenio estas konata.[96]

**VALLASTER, Josef**, nask. 1910 en Silbertal (Vorarlberg), Aŭstrujo-Hungarujo. En la aĝo de ses jaroj Vallaster perdis sian patron, kiu pereis kiel soldato dum la unua mondmilito en rusa mallibereco. Post la baza lernejo li laboris dum kelka tempo en la montara bieno de sia duonpatro en Silbertal kaj ankaŭ dungigis sin kiel porokazan laboriston, jen kiel lignaĵiston, paŝtiston aŭ farman helplaboriston. Post kiam la NSDAP estis malpermesita kiel partio en junio 1933, Vallaster, kiu simpatiis kun la nacisocialismo, forlasis sian patrujon en aŭgusto kaj fuĝis al Germanio. Tie li estis akceptita de la Aŭstra Legio kaj venis de Munkeno al la centra deponejo de la Legio en Bad Aibling. En septembro 1933 li perdis sian aŭstran civitanecon „pro kontraŭleĝa transiro de la limo al Germanio“. Post la malsukcesa nacisocialisma puĉo en Aŭstrio en julio 1934 la Legio perdis sian signifon kaj ĝiaj membroj kaj Vallaster fariĝis germanaj

95 Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Thomalla, vd. ankaŭ la rusan version.
96 Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Unverhau kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.

civitanoj. Ĉar Vallaster ne disponis pri reala profesio, li laboris denove kiel laboristo en diversaj konstruejoj. Post la germana anekso de Aŭstrio en marto 1938 li plurfoje vizitis sian naskiĝlokon Silbertal. En majo Vallaster estis akceptita kiel membro de NSDAP. De aprilo 1940 Vallaster estis engaĝita kadre de la „programo T4“ en la eŭtanazia centro de Hartheim kiel laboristo por renovigaj laboroj kaj por konstrui fornon por bruligi la viktimojn de la operaco. De majo 1940 li mem partoprenis en la gasumado de korpaj kaj mensaj handikapuloj. Inter alie li devis elrompi la orajn dentojn de la viktimoj kaj bruligi ilin. En septembro 1940 li edziĝis kun Elisabeth Gust, flegistino de la mortiga personaro. La atestantoj de la geedziĝo estis Gertrude Blanke, flegistino en la sanatorio kaj flegejo Niedernhart en Linz kaj samtempe flegistino en la eŭtanazia centro Hartheim, kaj Christian Wirth, estro de la administra oficejo de la eŭtanazia centro Hartheim. Laŭ postaj raportoj de ilia filo, lia patrino devis akompani la viktimojn al la mortiga centro kaj senvestigi ilin antaŭ ol ili estis gasumitaj. De 1942 Vallaster estis engaĝita kadre de la „operaco Reinhardt“ en la Ĝenerala Gubernio, kie en la komenco li ricevis trejnadon en la ekstermejo Bełżec. Ekde tiam li portis SS-uniformon kaj havis SS-rangon de Schargvidanto, kvankam la dato de lia aliĝo al la SS ne estis konfirmita. Povas esti, ke li kaj aliaj T4-kunlaborintoj devis formale porti SS-uniformon kun formala rango en la neniigejoj de la Ĝenerala Gubernio. En la KC Sobiboro Vallaster laboris, sub la komando de Franz Reichleitner, kiun li konis de la T4-programo en Hartheim, kiel kontrolisto kaj partoprenis la amasmurdon kontraŭ la judoj de Eŭropo en la lagro III, kie oni gasumis kaj bruligis ilin. Interalie Vallaster priservis kiel „maŝinisto“ la mallarĝspuran fervojan lokomotivon kaj respondecis por tiuj vagonoj, kiuj estis uzataj por transporti mortintojn, malsanulojn kaj maljunulojn al la ekzekutejo tuj post la alveno de la transportaj trajnoj al la neniigejo. Eĉ Karl Frenzel karakterizis Vallaster kiel kruelan tipon. Dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 en Sobiboro Vallaster estis mortigita de la judaj malliberuloj, kiuj logis lin, por ke li provu siajn novajn botojn en la ŝuista laborejo. Tie li estis likviditita per hakilo de la Itzhak Lichtman kaj Ŝolem Fleischacker. Vallaster estis entombigita kun militaj honoroj en la milita tombejo de Chełm la 17an de oktobro 1943.

En 1988 Peter Witte malkovris en la aŭstria Silbertal memorŝtonon honore al la viktimoj de la milito, sur kiu estis engravurita ankaŭ la nomo de Josef Vallaster. La unuaj historiografaj studoj kaj publikaĵoj pri ĉi tiu temo aperis en la fruaj 2000-aj jaroj, kiuj kritike traktis la regionan historion de Silbertal dum la nazia tempo kaj la konduton de lokaj soldatoj dum la milito. Publika diskuto pri la naziaj krimoj de Josef Vallaster el Silbertal komenciĝis en 2007, kiam la amaskomunikiloj reprenis la kazon. La komunumo Silbertal starigis historiografian verkejon sub la direkto de la historiisto de Montafon Bruno Winkler, kiu estis subtenata de pluraj institucioj kaj subtenata de la historiisto Wolfgang Weber de la Ŝtata Arkivo de Vorarlbergo. Weber publikigis sian libron *De Silbertal al Sobiboro* en novembro 2008, en kiu li raportis pri Vallaster kaj du aliaj naziaj krimuloj de la regiono Montafon. Ĉar Vallaster estis anoncita kiel „falinto“ post sia entombigo en sia patrujo, li estis inkluzivita en la liston de la falintaj soldatoj sur la militmonumento de la loko. La laboro de la historiografia verkejo renkontis vastan intereson en Aŭstrio, pri kiu la gazetaro kaj la televido raportis. En 2009 la komunumo Silbertal decidis anstataŭigi la lokan militmonumenton per memorejo por omaĝi ne nur pri tiuj, kiuj pereis en la du mondmilitoj, sed ankaŭ pri la rifuĝintoj, devigitaj laboristoj kaj viktimoj de la „eŭtanazio“. La kontestata monumento estis forigita de la komunumo Silbertal en junio 2009 post minacoj flanke de novnazioj kontraŭ la komunumo kaj unuopaj personoj. La historiografia verkejo Silbertal finis sian esploran laboron pri ĉi tiu ĉapitro de la historio kaj en novembro 2009 prezentis sian koncepton por la nova memorejo. Ĉe la loko de la eksa militmonumento troviĝis informtabulo, kiu atentigis pri la baldaŭa rekonstruado de la memorejo. En novembro 2010 estis inaŭgurita nova memorplaco. Interese estas, ke Josef Vallaster estis menciita sur aparta ŝtona plado. Alia ŝtonplado listigas la soldatojn de la unua mondmilito, dua la soldatojn de la dua mondmilito, kaj tria ŝtona tabuleto nomis aliajn viktimojn de la dua mondmilito, inkluzive de pluraj devigitaj laboristoj, rifuĝintoj kaj du viktimoj de la eŭtanazia programo. Alia interesa evento okazis sur nacia nivelo. Post kiam Harald Walser, deputito de la Verda Partio en la Nacia Konsilantaro de Aŭstrio, anoncis en majo 2012, ke la nomo de Vallaster estas listigita en la libroj de la mortintoj en la Kripto de la Heroa Pordego en Vieno, la ministro pri defendo Norbert Darabos ordonis la forigon de la nomo de Vallaster de la libroj de la mortintoj. La ordonon sekvis enketo de spertuloj, kiuj devas decidi, ĉu aliaj militkrimuloj estas listigitaj en la mortolibroj.[97]

[97] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Josef_Vallaster kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.

**WAGNER, Gustav**, nask. 1911 en Vieno, Aŭstrujo-Hungarujo. Wagner estis profesia mekanikisto. En 1931 li fariĝis membro de la NSDAP en Vieno, kiu ankoraŭ estis malpermesata en Aŭstrio. Li estis arestita pro kontraŭleĝaj grafitioj (svastikoj) kaj reklamaj afiŝoj kaj iris al la Germana Regno en 1934 por eviti plian areston. En Germanio Wagner unue fariĝis membro de la SA, poste aliĝis al la SS je la fino de la 1930-aj jaroj. De ĉirkaŭ 1940 li estis administra oficiro de la Gestapo en la eŭtanazia mortiga centro de Hartheim proksime de Linz, kie li partoprenis en la likvido de korpaj kaj mensaj handikapuloj kadre de la „operaco T4". Tie li respondecis por la bruligo de la kadavroj de la murditaj viktimoj. Tie li ankaŭ konatiĝis kun Franz Stangl, kiu tiam estis la estro de la administracio en Hartheim. Wagner estis elektita por la deĵoro en la KC Sobiboro precipe surbaze sia persona dosiero en Hartheim. Surbaze de ĉi tiuj spertoj Wagner estis komence nomita kiel anstataŭanto de Franz Stangl en marto 1942, kaj poste de septembro 1942 li funkciis kiel vickomandanto sub Franz Reichleitner en la rango de SS-Oberschargvidanto ekde februaro 1943. Wagner profiliĝis pli kaj pli kiel reala gvidanto de la KC kun enorma potenco pri vivo kaj morto de la judaj malliberuloj, kontrolante la selektojn ĉe la ramplo okaze de la alveno de la deportitaj judoj. Inter la laborjudoj Wagner estis konsiderata kiel inteligenta tipo, sed kiel eksterordinare brutala sadisto, kiu havis neniujn skrupulojn plenumi ajnan fiagon, inkluzive senliman batadon per vipo kaj la mortigon de iu ajn homo sen kialo kaj averto, kiu laŭ li faris iun eraron. Sed li alte estimis korekte plenumitajn taskojn. Li vagadis kiel ombro tra la KC kaj aperis neatendite kaj nerimarkeble en ajna angulo por kontroli la laboron de la judaj malliberuloj kaj severe puni ilin, se li kredis tion necesa. Ĉiuj malliberuloj nepre evitis lian proksimecon, kiu ofte promesis nenion bonan, ĉar lia ĉeesto signifis konstantan minacon. Pro tio Gustav Wagner ankaŭ estis konata sub la nomoj „ekzekutisto de Sobiboro", „buĉisto de Sobiboro", „ridetanta anĝelo de la morto" kaj „Welfel" (jida vorto por lupeto). Heinrich Himmler estis tiel kontenta pri lia laboro, ke li donis al li la Feran Krucon, priskribante lin kiel unu el la „plej meritplenaj" viroj de la „operaco Reinhardt". Post la ribelo en Sobiboro de la 14a de oktobro 1943, dum kiu li forestis de la koncentrejo (kio esence kontribuis al la sukcso de la ribelo) li ricevis la ordonon fermi la koncentrejon kaj likvidi la laborjudojn, kiuj estis venigitaj el Treblinka, kaj estis translokita kiel ĉiuj ceteraj ankoraŭ vivantaj SS-funkciuloj de Sobiboro al Italio, kie kadre de la „operaco R" li plu laboris por la „fina solvo de la juda demando". Fine de la milito li restis en Jugoslavio, poste li estis arestita de la usonanoj, de kiuj li povis fuĝis. Post la milito Wagner laboris sub falsa nomo kiel konstrulaboristo en Graz, Aŭstrio. Kiel Stangl kaj per la helpo de la Vatikano ili unue sukcesis eskapi al Sirio, poste al Brazilo. Tie li ricevis konstantan loĝrajton en aprilo 1950 kaj vivis senĝene sub la kaŝnomo „Günther Mendel", perlaborante sian monon kiel domprizorganto. Fine de majo 1978 li estis arestita, post kiam Simon Wiesenthal, la aŭstra juda „ĉasisto de nazioj" povis trovi lian spuron. Li estis identigita en policejo en São Paŭlo, Brazilo, fare de Stanisław Szmajzner, unu el malmultaj postvivantaj judaj malliberuloj de la KC Sobibro, kiuj sukcesis fuĝi dum la ribelo de la 14 de oktobro 1943. Tie Wagner konfesis, ke fakte li estas la serĉata nazio de Sobiboro. Israelo, Aŭstrio kaj Pollando petis transdoni lin, sed Brazilo, t.e. la brazila ĝenerala prokuroro, rifuzis la petojn. Poste ankaŭ la okcidentgermana registaro petis transdoni lin, sed ankaŭ la germana peto estis malakceptita de la brazila Supera Kortumo en junio 1979. En intervjuo kun la BBC ne bedaŭris siajn krimojn, dirante: „Mi ne sentis tion ... Ĝi estis nur ia laboro por mi. Post la laboro ni neniam parolis pri nia laboro, sed ni trinkis kaj ludis kartojn." Laŭ la (parte pridubata) deklaro de lia advokato, Wagner mortigis sin la 3an de oktobro 1980 en São Paŭlo. La ekzaktaj cirkonstancoj de lia morto ne estas klaraj.[98]

**WIRTH, Christian**, nask. 1885 en Oberbalzheim (Alb-Donau-distrikto, hodiaŭ Baden-Württemberg), Germana Regno. La filo de barelfaristo lernis la metion de segisto post la frekventado de la baza kaj plikleriga lernejoj. Inter 1905 kaj 1910 li estis infanteriano en la armeo de Virtembergo, kiun li forlasis kiel suboficiro de la rezervo. En 1910 Wirth jam laboris ĉe la urba polico de Heilbronn, sed baldaŭ li translokiĝis al Stuttgarto, kie li laboris ĉe la kriminala polico. Laŭ propra deziro li partoprenis en la unua mondmilito ekde septembro 1914 kaj estis vundita ankoraŭ en la sama jaro. De 1917 li estis uzata kiel armea policano en Stuttgarto. Wirth estis premiita per la „Fera Kruco de la 1a kaj 2a klasoj" kaj per la „Ora Virtemberga Meritmedalo". En junio 1919 li revenis al la kriminala polico kaj fariĝis polica serĝento mallongan tempon poste. En 1932 li atingis la postenon de kriminala inspektoro. Wirth estis politike aktiva en la ŝtata asocio de la policistoj en Virtembergo, kiu estis nepartia polica sindikato. De 1922 ĝis la partia malpermeso en 1923 kaj poste denove de januaro 1931 Wirth estis membro de la

[98] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Gustav_Wagner_(SS-Mitglied) kaj laŭ la biografio en Schelvis, 2003.

NSDAP. En junio 1933 li aliĝis al la SA. De decembro 1937 li estis volontula dungito de la Sekureca Servo (SD). En aprilo 1939 li ŝanĝis de la SA al la SS kaj ricevis la rangon de SS-Obersturmgvidanto. En januaro 1940 li ricevis la ordonon de la Regna Oficejo por la Kriminala Polico aliĝi al la eŭtanazia centro en Brandenburgo por kunlabori en la „operaco T4“, kie en januaro li partoprenis en „provmortigo“ de 18 ĝis 20 „mensmalsanaj“ pacientoj. En la sekva tempo Wirth gvidis la oficejajn sekciojn de la mortigaj centroj de Brandenburgo kaj Grafeneck kaj de printempo 1940 estis en Hartheim. En 1941 li ankaŭ laboris kiel gvida oficisto en Hadamar. En ĉi tiu funkcio li respondecis por la sekureco de la eŭtanaziaj institucioj kaj ties laboro, pri la dungitoj kaj la murda procezo. Verŝajne meze de 1940 Wirth estis nomita kiel inspektoro de ĉiuj institucioj de la eŭtanazia programo. Post ĝia ĉesigo en aŭgusto 1941 Wirth, kiel multaj aliaj dungitoj de la „operaco T4“, ŝanĝis al la „operaco Reinhardt“ en la Ĝenerala Gubernio, kiu estis gvidata de la SS- kaj Polica Gvidanto por Lublino, Odilo Globocnik, por starigi koncentrejojn por ekstermi la judojn de Eŭropo. Wirth fariĝis la unua komandanto de la ekstermejo Bełżec, kiu estis konstruata ekde novembro 1941 kaj ekfunkciis en marto 1942. Detala priskribo de la gasumado de la judoj estis donita en la raporto de la SS-oficiro Kurt Gerstein, al kiu Wirth montris en la 18a de aŭgusto 1942 la amasmortigon de 700 ĝis 800 homoj pere de benzina motoro. Kiel inspektoro de la tri ekstermejoj de la „operaco Reinhardt“ fare de Odilo Globocnik Wirth reorganizis la ekstermejojn de Bełżec, Treblinka kaj Sobiboro surbaze de siaj spertoj en Bełżec, ordonis konstrui pli grandajn gasĉambrojn kaj engaĝis konatajn spertulojn de la „operaco T4“ en tiuj koncentrejoj por plibonigigi la maŝinojn de la ekstermado. De la fino de 1942 / komenco de 1943 Wirth respondecis por la vesta fabriko de la flughavena magazeno en Lublino, kie „laborjudoj“ ordigis la vestaĵojn, valoraĵojn kaj aliajn rikoltaĵojn de la murditaj viktimoj, por ke ili poste povu esti uzataj de la SS. La 15an de januaro Wirth fariĝis kriminala konsilisto. En letero de la interna ministerio de la Regno estis notite, ke Wirth ĝuas la „apartan protekton de la Gvidanto“ (t.e. Hitler). En aŭgusto 1943 li estis altrangigita rekte kiel SS-Sturmbanngvidanto, preterlasante la rangon de la SS-Hauptsturmgvidanto. Probable en septembro 1943 Wirth estis translokita al Triesto kune kun aliaj funkciuloj de la „operaco Reinhardt“, kie li ricevis novajn funkciojn kadre de la „Adriatika Marborda Operaca Zono“. Wirth fariĝis komandanto de la „sekcio R“ (por Reinhardt), kiu estis speciala fako ligita al la oficejo de Globocnik, al kies respondeco apartenis la koncentrejo Risiera di San Sabba, kiu estis starigita por koncentri, malliberigi kaj deportadi judojn kaj partizanojn. Sub Christian Wirth estis organizita la deportado de la judoj de Venecio. Komence de novembro 1943 Wirth denove estis en Lublino, kie li kontrolis la „operacon Rikolta Festo“, en kiu ene de du tagoj estis mortigitaj ĉirkaŭ 42 mil judaj, kiuj funkciis kiel devigitaj laboristoj de la lokaj naziaj koncentrejoj.[99] La 26an de majo 1944 Christian Wirth estis mortigita survoje de Triesto al Rijeko dum atako de partizanoj aŭ eble pro kuglo, kiun li ricevis de la propraj homoj, kiel oni rakontis. Lia posteulo en Triesto fariĝis Dietrich Allers, kiu estis administra direktoro de la „operaco T4“ ekde 1941. Post la milito Wirth estis entombigita kune kun Franz Reichleitner, la dua komandanto de la ekstermejo Sobiboro, kaj Gottfried Schwarz, la anstataŭanto de Wirth en la ekstermejo Bełżec, en la germana milittombejo de Costermano en la provinco Verona (Italio). En 1988 la nomoj de la tri SS-uloj estis eliminitaj el la „honora libro“ de la tombejo kaj iliaj oficrangoj estis forigitaj de la tomboŝtonoj, sed la ostoj ne estis tuŝitaj. Christian Wirth estis priskribita kiel ekzemplo de aparte brutala kaj senkompata SS-funkciulo, kiu eĉ estis timata de la propraj homoj. Li portis la moknomojn „Kristiano la Kruela“, „La sovaĝa Kristiano“ kaj „Stuka“ (germana ĉasaviadilo). En la Nurenberga proceso la SS-juĝisto Konrad Morgen priskribis Wirth-on, kiu probable estis fanatika antisemito, kiel viron, kiu same fieris pri siaj spertoj kolektitaj dum la „operaco T4“ kiel pri sia kontribuo al la plibonigo de la proceduro de la amasmurdoj de la „operaco Reinhardt“.[100]

**WOLF, Franz**, nask. 1907 en Krummau (Bohemio), Aŭstrujo-Hungarujo. Post trejnado kiel arbaristo Wolf laboris en la foto-komerco de sia patro ĝis 1939. Fine de la 1920-aj jaroj kaj denove nelonge en aŭtuno 1938 li estis ano de la ĉeĥoslovaka armeo. En 1936 li fariĝis membro de la Sudetgermana Partio (SdP). Post la anekso de la Sudeta Lando fare de la Germana Regno en aprilo 1939 li estis rekrutita de la germana armeo. Post la komenco de la dua mondmilito li partoprenis la germanajn militirojn en Pollando kaj ĉe la okcidenta flanko. En januaro 1940 Wolf estis vokita al Berlino de la oficejo de la Gvidanto por servi kadre de la „operaco T4“, de kie li estis translokita al la eŭtanazia mortiga centro de

[99] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion_Erntefest.
[100] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Christian_Wirth.

Hadamar en aŭtuno 1940. Kiel fotisto li fotis la mensmalsanulojn antaŭ ol ili fariĝis viktimoj de la eŭtanazio. En aŭtuno 1941 li estis sendita reen al Berlino, kie li daŭrigis sian laboron kiel fotisto por la „operaco T4". De somero 1942 ĝis printempo 1943 li estis dungita kiel fotisto en la universitata hospitalo de Heidelbergo. En marto 1943 SS-Unterschargvidanto Wolf estis sendita al Lublino, kie li ekservis kadre de la „operaco Reinhardt" en la KC Sobiboro en la ordigaj barakoj. Kun sia pli maljuna frato, SS-Unterschargvidanto Josef Wolf (nask. 1900 en Krummau), kiu akompanis lin al Sobiboro, Wolf havis la taskon kolekti la vestaĵojn de la judoj, kiujn ili devis fordoni antaŭ ol iri en la gasĉambrojn. En la barakoj Wolf kutimis moki pri la judaj virinoj, al kiuj li diris: „Dalli, dalli, miaj damoj, laboro faras la vivon dolĉa!" Sed ankaŭ en la barako, kie on tondis la harojn de la judinoj, Wolf estis ofte vidata, kaj de tempo al tempo li kontrolis ankaŭ la arbaran taĉmenton. Wolf, kiu estis konata pro sia submetiĝa sinteno rilate al siaj superuloj kaj, alfilanke, pro sia cinika-sarkasma konduto rilate al la malliberuloj, estis timata pro sia vipo, per kiu li senkompate batis la homojn. Dum Josef estis mortigita dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943, Wolf postvivis ĝin kaj estis sendita post la fino de la „operaco Reinhardt" al la „Adriatika Marborda Operaca Zono" en Triesto en novembro 1943, kie li estis parto de la „operaco R", kiu servis al la „ekstermado de la judoj", la konfiskado de iliaj posedaĵoj kaj al la batalo kontraŭ partizanoj. Post la malvenko de la Germana Regno li fuĝis al Aŭstrio, kie li estis arestita de la usona armeo kaj transportita al la internigejo proksime de Weiden. Post sia liberiĝo li laboris kiel fotisto por la usona armeo ĝis majo 1946. Poste Wolf loĝis en Eppelheim kaj estis arestita por esplori lian kazon en la fruaj 1960-aj jaroj. En 1966 li estis akuzita en la proceso pri Sobiboro kaj kondamnita al okjara arestpuno en malliberejo pro sia partopreno en la murdo al almenaŭ 39 mil homoj.[101]

### La Sobibor-procesoj

Juraj procesoj kontraŭ iamaj naziaj funkciuloj de la KC Sobiboro okazis en  la 1950aj, 60aj, 70aj kaj 80aj jaroj en Germanio. Kontrau *Erich Bauer*, la t.n. „gasmajstro" de Sobibor, kiu estis rekonita de postvivanto de la KC Sobiboro kaj anoncita al la polico, kiu arestis lin. La distrikta juĝejo de Berlino, antaŭ kiu li estis akuzita, kondamnis lin al morto en la 8a de majo 1950 pro krimoj kontraŭ la homaro, pro amasmortigo de judoj kaj mistraktado kaj mortpafado de unuopaj malliberuloj surbaze de la Leĝo n-ro 10 de la Kontrola Konsilio. La mortopuno transformiĝis al dumviva puno en malliberejo, ĉar la Baza Konstitucio de okcidenta Germanio ne antaŭvidas la mortpunon.

Surbaze de deklaro de Josef Hirtreiter, kiu estis arestita jam en 1946 kiel rezulto de la enketo pri la mortigo de handikapuloj en la „eŭtanazia" instalaĵo de Hadamar kaj kondamnita al dumviva arestpuno en malliberejo okaze de la unua Treblinka-proceso en 1951, la prokurorejo de Frankfurto ĉe Majno identigis iujn komplicojn, kiuj estis engaĝitaj en Sobiboro. La proceso antaŭ la Landa Tribunalo de Frankfurto ĉe Majno finiĝis la 25an de aŭgusto 1950 per la proklamo de la verdiktoj. Akuzitaj estis *Hubert Gomerski*, kaj *Johann Klier*. Gomerki estis kondamnita al dumviva arestpuno en malliberejo pro murdo al nekonata nombro de kazoj. Klier estis absolvita de la kulpo pro malsargaj atestoj fare de iuj postvivantaj malliberuloj de Sobiboro, kvankam li estis akuzita pro helpo al la kolektiva murdo.

La proceso kontraŭ la sekvaj dek du akuzitoj, kiun la publiko apenaŭ rimarkis, okazis de la 6a de septembro 1965 ĝis la 20a de decembro 1966 antaŭ la Landa Tribunalo de Hagen. La 15an de januaro 1965, la sama tribunalo decidis ne malfermi ĉefajn procesojn kontraŭ sep akuzitoj, ĉar ili povis prezenti la t.n. putativan kaŭzon. Inter ĉi tiuj sep akuzitoj, kvin jam estis akuzitaj en la Bełżec-proceso,[102] nome Dubois, Fuchs, Jührs, Unverhau kaj Zierke. Kompare kun la Bełżec-proceso, la respondeca Supera Landa Tribunalo de Hamm ne sekvis ĉi tiun decidon, pro oni malfermitis la ĉefan proceson kontraŭ ĉiuj akuzitoj. Dum la proceso almenaŭ 127 atestantoj estis aŭditaj, inkluzive usonajn kaj israelajn. Aleksandr Peĉerskij ne ricevis permeson forlasi Sovetinion, kio malfaciligis la esplorojn. Pro kolektiva murdo al diversaj kvantoj da personoj la sekvantaj personoj estis kondamnitaj al jenaj punoj: *Karl Frenzel* (dumviva aresto), *Franz Wolf* (8 jaroj), *Erich Fuchs* (4 jaroj), *Alfred Ittner* (4 jaroj), *Erwin Lambert* (3 jaroj), *Werner Dubois* (3 jaroj). *Erich Lachmann, Hans-Heinz Schütt, Heinrich Unverhau, Robert Jührs*

---

[101] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Wolf_(SS-Mitglied).
[102] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Belzec-Prozess.

kaj *Ernst Zierke* estis absolvitaj pro la putativstato. *Kurt Bolender* faris suicidon en la 10a de oktobro 1966 post la proklamo de la verdikto.

La iama komandanto de la KC Sobiboro kaj Treblinka, *Franz Stangl*, kiu dum la proceso de Hagen ankoraŭ estis konsiderata kiel malaperinta aŭ perdiĝinta, estis juĝita antaŭ la Landa Tribunalo de Düsseldorf en 1970, kvankam en ĉi tiu proceso estis unuavice traktitaj liaj krimoj en Treblinka. Al la trovo kaj aresto de Stangl esence kontribuis la aŭstra juda „ĉasisto de nazioj“ Simon Wiesenthal (1908-2005), kiu mem estis viktimo de la holokaŭsto, kiun li nur hazarde kaj mirakle potvivis. Kiel atestantoj dum la proceso servis la postvivantoj de la KC Sobiboro Samuel Lerer, Hersz Cukierman, kaj Stanisław Szmajzner.

Stangl bazis sian defendon sur la malgravigo de sia respondeco en Sobiboro. Li klarigis, ke li ja estis la plej altranga funkciulo en Sobiboro, sed asertis, ke li respondecis nur pri la vastigo de la koncentrejo kaj pri administraj aferoj. Li eĉ neis, ke liaj taskoj inkluzivis la kontroladon de la ŝtelita posedaĵo de la mortigotaj judoj. La tribunalo konsideris la akuzojn faritajn kontraŭ li, ekzemple ke, post malsukcesa fuĝo de unu el la malliberuloj de Sobiboro, li ordonis ekzekuti aliajn naŭ, kaj ankaŭ ordonis la ekzekuton de virino, kiu raportis al la ĉefsidejo de la koncetrejoj, serĉante sian antaŭe deportitan edzon. La Landa Tribunalo en Düsseldorf proklamis la juĝon la 22an de decembro 1970, en kiu Stangl estis kulpigita pro la helpo al la amasa murdo de 900 mil judoj kaj kondamnita al dumviva arestpuno en malliberejo, kie li forpasis ses monatojn poste pro suicido.

Alia proceso kontraŭ ses akuzitoj finiĝis ĉe la Landa Tribunalo de Hamburga en 1976, kiu inkluzivs krimojn kadre de la „operaco Reinhardt“ en Sobiboro – la ses akuzitoj estis absolvitaj.

En la postmilita periodo okazis diversaj procesoj kontraŭ ukrainaj Trawniki-viroj, kiuj ankaŭ estis engaĝitaj kiel sekurgardistoj en la KC-oj Sobiboro, Bełżec kaj Treblinka, ankaŭ en Sovetunio. Ses el ili estis kondamnitaj al morto kaj ekzekutitaj. En tiuj procesoj atestis ankaŭ postvivantoj de naziaj koncentrejoj el Pollando. En Kievo okazis pliaj procesoj kontraŭ Trawniki-uloj en 1962/63; la verdiktoj estis anoncitaj en aprilo 1963 (kontraŭ 11 akuzitoj) kaj en junio 1965 (kontraŭ 3 akuzitoj el Bełżec kaj Sobiboro), escepte de unu akuzito, Ivan Terekov, kiu ricevis 15-jaran malliberejan punon. Ĉiuj estis kondamnitaj al morto kaj ekzekutitaj. La ĉefa atestanto en la proceso de 1963 en Kievo estis Alexandr Peĉerskij, kiu planis kaj efektivigis la ribelon de Sobiboro en oktobro 1943. Alia sovetia proceso kontraŭ Trawniki-uloj okazis en 1965 en Krasnodar kontraŭ ses eksaj sovetiaj gardistoj de koncentrejoj de la „operaco Reinhardt“. Unu el la atestantoj estis Aleksej Vajcen, kiu partoprenis la ribelon de la 14a de oktobro 1943 en Sobiboro, kaj kiu identigis la gardiston Ivan Zajĉev. Ĉiuj akuzitoj estis kondamnitaj al morto. Aliaj nomoj de gardistoj de la KC-oj en Bełżec kaj Sobiboro estis Vasyl Bialakov, Nikolaj Matvienko, Ivan Nikoforov, Vasyl Podenko, Emanuel Schultz kaj Ivan Tiĥĉonovskij. (Liston de nomoj de Trawniki-uloj vd. en la libro de Chris Webb).

Ĝis mil Trawniki-uloj estis resenditaj post la milito al Sovetunio, de kie ili originis, kaj estis akuzitaj de krimaj kaj militaj tribunaloj kaj preskaŭ ĉiuj estis kulpigitaj kiel kunlaborintoj de la nazioj, kaj multaj estis kondamnitaj al morto kaj ekzekutitaj. En 1954 tia proceso kontraŭ Trawniki-uloj okazis en Varsovio, Pollando. En okcidenta Germanio (FRG) unu etna germano kaj parto de la germana gvidantaro de Trawniki staris antaŭ la tribunalo. La proceso kontraŭ KC-gvidanto Karl Streibel okazis de la 5a de decembro 1972 ĝis la 3a de junio 1976. Li estis liberigita de la aresto pro manko de sufiĉaj pruvoj. Ĉi tiu juĝo estis tre kontestata kaj fine de 1976 ankoraŭ ne jure valida. La plej lastaj esploroj pri Trawniki-uloj estis faritaj en Kanado kaj Usono en la 1980-aj jaroj. Sed kontraŭ la Trawniki-uloj ne povis esti procesite en Usono, ĉar la krimoj ne okazis sur usona teritorio. La sola celo do povis esti nuligi ilian usonan civitanecon kaj elpeli ilin el Usono.[103]

Aliaj procesoj okazis aliloke ĝis la 1980-aj jaroj, ekzemple kontraŭ iuj akuzitoj, kiuj elmigris al Usono (John Demjanjuk) aŭ Kanado.

Poste, nome la 30an de novembro 2009 proceso okazis kontraŭ la ukraina KC-gardisto *John Demjanjuk* antaŭ la Landa Tribunalo de Munkeno II. La 12an de majo 2011 li estis kondamnita al kvinjara malliberigo fare de la tiu tribunalo pro helpo kaj instigo al la murdo de almenaŭ 27´900 judoj.[104]

---

[103] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/SS-Ausbildungs-_und_Arbeitslager_Trawniki#Strafrechtliche_Ahndung.
[104] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sobibor-Prozess#Die_Sobibor-Prozesse_in_Berlin_und_Frankfurt_1950.

Post la proklamo de la verdikto li estis liberigita pro tro alta aĝo kaj loĝigita al iu hejmo por maljunuloj en suda Bavario, kie li forpasis en marto 2012. La verdikto eĉ ne fariĝis definitiva: Demjanjuk mortis dek monatojn poste, nome antaŭ ol lia kazo povis estis decididita en la revizia proceso.

### La procesoj kontraŭ Ivan (John) Demjanjuk

**Ivan (John) Nikolaeviĉ (Mykolajovyč) Demjanjuk** naskiĝis la 3an de aprilo 1920 en Dubovi Macharynzi, malgranda vilaĝo de la distriko Vinnica, okcidenta Ukrainio, Ruslanda Imperio. Kiel infano de malriĉa kamparana familio li travivis la grandan malsatkatastrofon (holodomoron) en sovetia Ukrainio de 1933 kaj kiel junulo estis kunlaboranto de la loka kolĥozo, kaj ano de la komsomolo. Post la atako de la germanoj kontraŭ Sovetunio en 1941, li fariĝis soldato (artileriano) de la Ruĝa Armeo dum la dua mondmilito. Li forlasis sian vilaĝon kaj neniam plu revidis ĝin kaj siajn gepatrojn, kiuj ambaŭ estis invalidoj. En 1942 li estis vundita ĉe la rivero Prut kaj kuŝis en diversaj lazaretoj. Post resaniĝo li estis sendita al Bakuo kaj en la batalo por la duoninsulo Kerĉ sur Krimeo li estis arestita de la germanoj kun 150 mil aliaj ruĝarmistoj en majo kaj transportita al la KC por militkaptitoj en Rovno, poste al Chełm (Stalag 319[105]), kie regis teruraj vivkondiĉoj. Ekde ĉi tiu momento lia biografio estas ambigua, laŭ du versioj: Laŭ la unua versio, kiun Demjanjuk ĉiam denove rakontis al la tribunaloj, li restis en Chełm inter aŭtuno 1942 kaj somero aŭ aŭtuno 1944. En Israelo li diris, ke inter printempo 1943 kaj vintro 1943/44 li laboris en iu torfejo en orienta Pollando, ke en aŭtuno 1944 li estis sendita kun kelkcent aliaj ukrainaj soldatoj per trajno al la regiono de Graz en Stirio, Aŭstrio, kaj de tie al Heuberg en suda Germanio, kie li aliĝis al la Vlasov-armeo, kiu batalis flanke de la germanoj kontraŭ Sovetunio.[106] Laŭ la versio de la esploristoj, en Chełm Demjanjuk estis varbita de la SS kiel gardisto kaj verŝajne sendita al Trawniki, kie de septembro 1941 ekzistis trejnejo por SS-helppersonaro („voluntuloj“), kiu estis provizata al la germanoj kiel sekurecaj gardistoj de la naziaj koncentrejoj, en kiuj oni malliberigis kaj mortigis la eŭropajn judojn, precipe Bełżec, Sobiboro kaj Treblinka. Anstataŭ mizere perei en loko kiel la KC por militkaptitoj en Chełm, Trawniki estis alloga opcio por sovetiaj militkaptitoj, kiuj volis pluvivi dum la milito. Kiel pruvo por lia ĉeestado en Trawniki servis al la esploristoj kaj juĝistoj la legendeca deĵor-legitimilo kun la numero 1393, kiun liaj persekutantoj konsideris aŭtenta, dum liaj defendantoj asertis, ke ĝi estis dokumento falsita de la sovetia KGB. De Trawniki Demjanjuk estis plej verŝajne sendita al la KC Majdanek, en kies arkivo oni trovis iun dokumenton pri lia ĉeesto en tiu koncentrejo, kaj precipe al la KC Sobiboro, nome la 27an de marto 1943, por gardi kaj sekurigi ĝin kadre de la ukraina taĉmento kaj eventuale helpi mortigi la deportitajn judojn. La posta sorto de Demjanjuk konsistis en tio, ke li estis, komence de oktobro 1943, kun 140 aliaj gardistoj, translokita de Sobiboro al Germanio, nome al la KC Flossenbürg en Bavario, kie oni „neniigis homojn per laboro“. Historiistoj estas konvinkitaj, ke Demjanjuk deĵoris en Flossenbürg kiel gardisto inter oktobro 1942 kaj oktobro 1944. Atestantoj, kiuj povus persone atesti tion, apenaŭ ekzistis. Neniu judo, kiu postvivis la KC Sobiboro, povis memori lin. En sovetia proceso de 1949 kontraŭ li, la eksgardisto *Ignat Danilĉenko* diris al la sovetiaj esploristoj, ke en marto 1943 li renkontis Demjanjuk-on en la KC Sobiboro kaj poste deĵoris kun li en la KC Flossenbürg,[107] kaj alia atestanto, kiu restis en okcidenta Germanio, nomiĝis Aleksandr Nagornyj (vd. sube).

En majo 1945 Demjanjuk prezentis sin al la usonanoj en la internigejo por „senlokaj personoj“[108] en Landshut, Germanio. En Germanio li klopodis forĝi novan vivon kaj laboris en diversaj okazoj, ekzemple ĉe la usona armeo kiel kamionisto, aŭ li trovis okupon ĉe iu germana firmao. En deklaro por la Ruĝa Kruco estis notite, ke inter 1939 kaj 1943 li laboris kiel kamionisto en Sobiboro. Fakte kvarfoje Demjanjuk indikis en la enketiloj, kiujn li devis plenigi por diversaj instancoj, ke li „laboris“ en Sobiboro (kio estis fatala eraro kaj fariĝis granda problemo por li), sopozeble por ŝajnigi polan identecon por eviti la riskon esti resendita al Sovetunio kaj altigi la ŝancon elmigri al Usono. En septembro 1947 li edziĝis en Regensburg kun iu ukraina virino kun la nomo Vera Kovaleva, kiu mem estis deportita de la germanoj

[105] Liston de la Stalag-oj en la Ĝenerala Gubernio vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_Kriegsgefangenenlager_der_Wehrmacht#Generalgouvernement_für_die_besetzten_polnischen_Gebiete.
[106] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Russische_Befreiungsarmee.
[107] Post la milito Danilĉenko estis kondamnita de sovetia tribunalo al 25-jara malliberigo.
[108] Pri la signifo vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Displaced_Person.

al Berlino por deviga laboro. Baldaŭ en Ulm naskiĝis ilia filino Lydia. En oktobro 1950 Demjanjuk registris sin ĉe la usona armea instanco kiel „viktimon de la nazioj“ kaj provis, tra la Reloĝiga Oficejo en Ludwigsburg, elmigri al Usono. Sed li revenis al Ulm pro la suspekto, ke li malsaniĝis je tuberkulozo. Sed en januaro 1952 la familio finfine povis forveturi al Usono per pramo tra Bremerhaven. En Usono Demjanjuk rapide trovis laborlokon, unue en iu bieno en Indiana, poste en la fabriko de Ford Motor Company en Cleveland, Ohio, kie li estis dungita kiel mekanikisto ĝis la pensiiĝo. Ankaŭ lia edzino trovis laboron ĉe la frmao General Electric. En novembro 1958 la familio ricevis la usonan civitanecon – en la deklaro por la usona civitaniĝo Demjanjuk donis falsajn indikojn pri sia pasinteco, kio havos fatalajn sekvojn. Je tiu okazo Ivan ŝanĝis sian antaŭnomon al John. Kiel modela nova civitano de Usono (kiu neniam rakontis al iu ajn pri sia pasinteco) Demjanjuk flegis kontaktojn kun la ukraindevena diasporo kaj vizitis la ortodoksan preĝejon. Naskiĝis pliaj du infanoj, filino Irene kaj filo John. En 1970 li aĉetis malgrandan domon en Seven Hills, Cuyahoga County, kvieta antaŭurbo sude de Cleveland, kaj gvidis normalan, feliĉan vivon.

Komence de la 1970aj jaroj en Usono ŝanĝiĝis la politika sinteno rilate al iamaj naziaj krimuloj, kiuj elmigris al Usono, temo, pri kiu oni estis tro indiferenta ĝis nun, ĉar oni bonvenigis homojn el la tuta mondo, kiuj deziris vivi kaj labori en Usono. Prezidento Gerald Ford kaj lia rivalo Jimmy Carter promesis en aŭtuno 1975 plifortigi la serĉadon de malnovaj nazioj en Usono. En oktobro de tiu jaro aperis en Vaŝingtono listo kun la nomoj de 70 usonaj civitanoj de ukraina deveno, kiuj laŭdire estis ligitaj kun naziaj krimoj dum la dua mondmilito. Ankaŭ la nomo de Demjanjuk troviĝis sur tiu listo. Cirkulis la aserto, ke li estis en Trawniki kaj Sobiboro kaj kunlaboris kun la germanaj nazioj por mortigi la judojn. La liston diskonigis *Michael Hanusiak* (1913-2007), ĵurnalisto de *Ukrainaj Ĉiutagaj Novaĵoj (Ukrainian Daily News)*, gazeto kun sovetia tendenco aperinta en Novjorko. Hanusiak, mem filo de ukrainaj enmigrintoj, asertis, ke li mem kompilis la liston post propra esplorado en sovetiaj arkivoj kaj en kontaktoj kun rusaj ĵurnalistoj kaj polaj advokatoj. Ĉar Hanusiak estis aktiva komunisto kaj altranga, meritplena membro de la usona KP kun bonaj rilatoj en Moskvo, la ukrainoj de Usono suspektis lin esti komplico de la sovetia registaro, tiel ke en iliaj cirkloj aperis la hipotezo pri intrigo kaj konspiro kontraŭ ili flanke de la sovetianoj. Ĉiukaze Hanusiak elpaŝis kiel akra kritikanto de la ukraina naciismo, kiu ludis gravan rolon en la nazia genocido dum la dua mondmilito. Hanusiak sendis la liston al du influaj senatanoj, Jacob Javits el Novjorko kaj Abraham Ribicoff el Konektikuto. Javits plusendis ĝin al la respondeca instanco pri enmigrado (INS) de la usona justicministerio. La INS-oficisto Jacobs trovis la adreson de Demjanjuk en la telefonlibro de Cleveland. Kaj en la aktoj de 1951 por ricevi vizon por enmigri Usonon oni legis, ke Demjanjuk indikis, ke de 1934 ĝis 1943 li laboris kiel farmisto en Sobiboro. Jacobs komencis serĉi atestantojn, sed li trovis neniujn, kiuj povus memori la ĉeeston de Demjanjuk en Sobiboro. Sed la esploro ne estis finita. En marto 1976 INS kontaktis la israelan policon, kiu serĉis naziajn krimulojn, kaj sendis al ĝi materialojn pri suspektindaj homoj el Usono, i.a. pri Demjanjuk mem. Postvivantoj de la KC Sobiboro kaj Treblinka en Israelo rekonis la foton de Demjanjuk kaj identigis lin kiel „Ivano la Teruran“, kiu faris neimageblajn kruelaĵojn en *Treblinka*, kie laŭdire li funkciigis la motoron de la gasĉambroj. Sed lige kun Sobiboro, kiu estis menciita en la listo de Hanusiak, neniu samtempano memoris lin, temis do nur pri Treblinka.

En aŭgusto 1977 la usonaj esploristoj elpaŝis kun akuzo kontraŭ Demjanjuk. Ili riproĉis al li, ke li donis falsajn indikojn en sia peto pri enmigrado en 1951 kaj rekomendis nuligi lian usonan civitanecon por elpeli lin al alia lando. Laŭ la usona konstitucio homoj ne povis esti persekutataj de la leĝo, se ili faris krimojn en alia lando. La sola ebleco agi kontraŭ ili estis nuligi ilian usonan ŝtatanecon kaj elpeli ilin el la lando. En septembro 1977 en la semajna gazeto *Novaĵoj de Ukrainio (News from Ukraine)* aperis artikolo, kiu publikigis la deĵor-legitimilon de Demjanjuk kun la fama numero 1393. Demjanjuk rifuzis la riproĉojn kaj la akuzon, dirante, ke li neniam estis en Treblinka, Sobiboro aŭ Trawniki kaj ke li mem estis viktimo de la germanaj nazioj. En junio 1978 la sovetia registaro sendis al la usona justicministerio interesajn dokumentojn, kiuj enhavis ankaŭ la protokolon pri Fjodor Fedorenko, alia ukraina Trawniki-gardisto, kiu estis kondamnita al morto en Sovetunio, kaj kiuj konfirmis, ke „Ivano la Terura“ ne estis Ivan Demjanjuk, sed iu Ivan Marĉenko. Ĉi tiun version konfirmis raporto de pola registara komisiono, kiu sistemece okupiĝis pri la naziaj krimoj en Pollando, kiun la usonaj esploristoj ricevis la sekvan jaron. En aŭgusto 1978 la influriĉa usona kongresano Joshua Eilberg, ano de la demokratia partio el Pensilavanio, postulis en letero al la tiama justicministro Bell energian traktadon

de Demjanjuk. La politika premo rilate la traktadon de naziaj krimuloj, kiuj kaŝiĝis en Usono, do senteble kreskis.

Anstataŭ la INS, nun la OSI (Oficejo por specialaj esploroj),[109] kiu estis fondita en 1979 kaj respondecis en la usona justicministerio pri la rekontrolado de eksterlandanoj, kiuj ricevis la usonan civitanecon kaj eventuale estis naziaj krimuloj, transprenis la kazon de Demjanjuk. La celo kaj tasko de OSI ne ests puni tiajn homojn, sed nuligi ilian usonan civitanecon. Tie George Parker, juristo de la usona justicministerio, kiu okupiĝis pri la kazo Demjanjuk jam dum jaroj, plej bone konis tiun kazon. Sed li ekhavis dubojn, ĉu „Ivano la Terura“ de Treblinka vere estas Demjanjuk, ĉar la kontraŭdiroj de la diversaj atestoj flanke de la postvivantoj kaj la evidentaj mankoj kaj kuriozaĵoj en la aktoj faris lin skeptika.

En januaro 1980 OSI ricevis el Moskvo la kopion de la eldiro de Ignat Danilĉenko, kiu atestis en la proceso de Kievo en 1949, ke en *Sobiboro* li renkontis Ivanon Demjanjuk en 1943/44.

La fina raporto de OSI dume konkludis, ke la indicoj ne sufiĉas por pruvi, ke Demjanjuk estis en Sobiboro aŭ Treblinka. Sed la konkludo de Parker estis ignorita de la ĉefoj de OSI, kiuj insistis, ke Demjanjuk devis esti „Ivano la Terura“. Parker, kiu notis, ke la proceduro de la ekscivitanigo de Demjanjuk ne povis esti ĉesigita ĝuste „pro politikaj kaŭzoj“, do pro la politika premo, kiu ekzistis rilate la temon de la iamaj naziaj krimuloj, kiuj vivas en Usono, demisiis de sia posteno en OSI pro frustriĝo, ke liaj konsideroj ne estis aŭditaj. OSI devis liveri pozitivajn rezultojn rilate la trovadon de naziaj krimuloj, kiujn oni povas aŭ devas ekscivitanigi, se ĝi volis pluekzisti kaj esti serioze konsiderata de la usona politiko kiel respondeca instanco, kiu ĝuste havis tian taskon.

La 10an de februaro 1981 Demjanjuk aperis unuafoje antaŭ la tribunalo, kiu estis inaŭgurita de ĉefjuĝisto Frank Battisti. La ŝtata prokuroro John Horrigan riproĉis al Demjanjuk, ke li faris falsajn indikojn, kiam li petis vizon por veni al Usono kaj petis la usonan civitanecon, ke li prisilentis la amasmurdon al la judoj, en kiu li probable partoprenis, kaj havis neniujn dubojn, ke li estis „Ivano la Terura“. La akuzanto proponis al la tribunalo nuligi lian usonan civitanecon. Tio signifis, ke li perdus ankaŭ la ĝisnunan restadstatuson en Usono kaj devus esti pelita al alia lando, ekzemple al Israelo, Pollando, Sovetunio aŭ okcidenta Germanio, kondiĉe ke tiuj ŝtatoj akeptus lin, kion li nature celis eviti. Antaŭ la konstruaĵo de la tribunalo 150 homoj protestis kontraŭ la traktado de Demjanjuk, postulis lian liberigon kaj bruligis sovetian flagon, ĉar ili suspektis konspiron flanke de Moskvo kontraŭ Demjanjuk kaj la tuta ukraina diasporo en Usono, kiu estis malŝatata de la sovetiaj komunistoj pro sia kontraŭ-sovetia sinteno. La ukraina komunumo de Usono solidariĝis kun Demjanjuk, en la ukrainaj-ortodoksaj preĝejoj oni preĝis por li, ukraindevenaj usonaj civitanoj sendis leterojn al politikistoj por helpi al sia samnaciano, kaj oni kolektis milionojn da dolaroj por garantii lian defendon. Por la ukrainoj en Usono Demjanjuk estis viktimo de la stalinismo kaj naziismo samtempe.

Post kvinmonata procesado, la 23an de junio 1981 juĝisto Battisti proklamis la verdikton kontraŭ Demjanjuk, kiu estis, kiel atendite, senprokrasta nuligo de lia usona civitaneco per la argumentoj, ke Demjanjuk prisilentis la fakton, ke li estis la SS-gardisto „Ivano la Terura“ en Trawniki kaj Treblinka (sic). Battisti avertis, ke estis eraro akcepti Demjanjuk-on en Usono. Ĉar lia advokato postulis revizion de la verdikto, Demjanjuk dume restis libera homo, sed ne tro longe. Kvankam Israelo ne estis interesata transpreni tiajn kazojn, ĉar la Eichmann-proceso de 1961/62, kiu skuis Israelon, postlasis profundajn spurojn la lando de la holokaŭst-viktimoj, tamen elkristaliĝis la scenaro, ke Demjanjuk estu sendita ĝuste tien, ĉar Germanio, Pollando kaj Sovetunio ne povis esti konsiderataj. En Israelo ekzistis leĝo de 1950, laŭ kiu eblis puni naziajn krimulojn. Do, en aprilo 1983 komenciĝis la procedo por la elpelo de Demjanjuk el Usono, kaj fine de oktobro Israelo formale petis la transdonon de Demjanjuk. Post kiam ĉiuj klopodoj de la advokatoj de Demjanjuk kaj la esperoj de la familio de Demjanjuk disbatiĝis por eviti lian areston kaj transdonon al Israelo, en aprilo 1985 li estis arestita, deponita en la distrikta prizono de Cleveland, de kie en februaro 1986 li estis sendita al alia malliberejo en Novjorko, kie li devis atendi sian elpelon. Peto al la justicministro eviti tion estis rifuzita, kaj kiam la usona ministro pri eksteraj aferoj Shultz subskribis la ordonon de la elpelo. La 27an de februaro 1986 Demjanjuk estis transportita de israela aviadilo al Tel-Avivo, kie li alvenis la venontan tagon.

---

109 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Office_of_Special_Investigations.

En Israelo Demjanjuk estis transportita en la saman malliberejon, kie iam sidis Eichmann. La proceso kontraŭ Demjanjuk, kiu okazis en la kinejo de la internacia kongrescentro de Tel-Avivo, fariĝis ege emocia evento kun grandaj atendoj, ĉar la ĝenerala publika opinio postulis similan rezulton kiel en la kazo de Eichmann. Ĉar la proceso estis dissendita en la radio kaj televido, ĝi elektrizis la landon, tiel ke la malmultaj defendantoj de Demjanjuk troviĝis sur perdita posteno. Samtempe oni montris en israelaj kinejoj la dokumentan filmon de Claude Lanzmann pri la ŝoao. La advokatoj de Demajnjuk parolis pri „perversa“ „farsproceso“ laŭ stalinisma maniero, sed tio estis troigo, ĉar Demjanjuk estis humanece kaj juste traktita kaj povis sen malhelpo utiligi ĉiujn rimedojn de la valida juro por defendi sin, inkluzive la ekzamenadon de la aferoj pere de la Plej Supera Kurtumo de Israelo. Iusence Demjanjuk jam estis anticipe kondamnita kiel „Ivano la Terura“. La tri juĝistoj de la distrikta tribunalo ne plu estis postvivantoj de la holokaŭsto, sed jam apartenis al la generacio de iliaj infanoj. La intereso pri la proceso mem estis komence malforta, sed ĝi ege kreskis, kiam la postvivantoj elpaŝis kiel atestantoj de la holokaŭsto kaj ege emocie rakontis pri la spertoj faritaj en la naziaj koncentrejoj kaj aparte en Treblinka, kie ili vidis „Ivano la Teruran“, pri kiu ili kredis, ke li estis la akuzito, kiu senemocie kaj indiferente sidis sur sia benko, ĉirkaŭata de advokatoj kaj policistoj. La akuzo baziĝis sur du indicoj, unue sur la legendeca deĵor-legitimilo kun la numero 1393, due sur la atestoj de postvivantoj, precipe tiuj de Pinhas Epstein kaj Eliahu Rosenberg, kiu rigardis la vizaĝon kaj la okulojn de Demjanjuk, konfirmante lin sen ajna dubo kiel „Ivano la Teruran“ el Treblinka. Oni estis konvinkita, ke la murdisto de Treblinka estis trovita, sed Demjanjuk laŭte nomis Rosenberg-on trifoje mensogisto. La 8an de aprilo 1988 la juĝistoj kunvenis por patose proklami la verdikton kon Demjanjuk, kiu konsistis el 400 paĝoj da teksto, kiu bezonis dek horojn por esti laŭtlegita. Ĉar Demjanjuk rifuzis aperi mem en la salono, li devis esti kvazaŭ perforte portita en malgrandan ĉelon malantaŭ la scenejo. Laŭ la israelaj juĝistoj Demjanjuk mensogis, kiam li rakontis sian version de la dummilita biografio, kaj asertis, ke li plej verŝajne cirkulis inter la du koncentrejoj Sobiboro kaj Treblinka por plenumi sian laboron, sen havi ajnan pruvon por tia aserto, kiu baziĝis sur supozo aŭ interpreto. Kvankam dum la proceso aperis iuj kontraŭdiroj pri la ĉeesto de Demjanjuk en Treblinka, la juĝistoj venis al la konkludo, ke li estis „Ivano la Terura“. Unu semajnon poste, la 25an de aprilo, la tribunalo denove kunsidis por anonci la punon por Demjanjuk, kiu estis kiel atendite la morto per pendigo. Al Demjanjuk, kiu ĉifoje persone ĉeestis en la salono, restis nur trifoje krucumi sin kaj voki, ke li estas senkulpa. La publiko leviĝis, ĝojkriis, aplaŭdis kaj vokis „longe vivu Israelo!“. Demjanjuk estis reportita al sia ĉelo en la prizono, kie li atendis la malcertan esontecon, unue la revizion de la verdikto kaj poste verŝajne la ekzekuton.

La verdikto de la distrikta tribunalo estis retraktita de la Plej Supera Kortumo de Israelo en la espero por Demjanjuk kaj lia advokato, ke la juĝo de la distrikta tribunalo estos nuligita. En decembro 1990 la israelaj ŝtataj prokuroroj Michael Shaked kaj Daphna Bainvol veturis al Moskvo por serĉi novajn dokumentojn pri Demjanjuk, ĉar intertempe, dum la periodo de Gorbaĉov, multaj sovetiaj arkivoj malfermiĝis kaj eksterlandanoj povis konsulti ilin. Ili trovis la dosieron, kiu enhavis la dokumentaron kun la eldiroj de 37 iamaj gardistoj de la KC Treblinka, kiuj unuanime deklaris, ke ili konis „Ivano la Teruran“, kies vera nomo ne estis Ivan Demjanjuk, sed Ivan Marĉenko.

En 1992 la laboro de OSI koncerne la kazon Demjanjuk estis reekzamenita laŭ postulo de iu usona tribunalo en Cincinnati. La analizado, kiu daŭris unu plenan jaron, alportis skandalan rezulton. Estis konstatite, ke OSI subpremis aktojn, kiuj povintus servi al la defendado de Demjanjuk. Post ĉi-koncerna sciigo de ĵurnalisto, la filo de Demjanjuk, John, asertis, ke OSI malaperigis malŝarĝan materialon en la rubaĵujoj malantaŭ la konstruaĵo, kie li la bofilo de Demjanjuk retrovis ilin, ĉar tiuj aktoj tendencis indiki, ke ĉe „Ivano la Terura“ ne temas pri Demjanjuk, sed pri Marĉenko.

La 29an de julio 1993, sep jarojn post la elpelo de Demjanjuk el Usono, kvin juĝistoj de la Supera Kortumo de Israelo kunvenis por anonci sian juĝon pri la demando ĉu Ivan Demjanjuk estas „Ivano la Terura“ aŭ ne. La teksto de la juĝo ampleksis ĉi-foje eĉ 500 paĝojn. La prezidanto de la kortumo, Meir Shamgar, klarigis, ke la juĝistoj ekhavis seriozajn dubojn, kiam ili studis la materialon. Tio estis tikla momento, ĉar per tia sinteno la israelaj juĝistoj kontraŭdiris la atestojn de postvivantoj de la holokaŭsto, kiuj en principo estis konsiderataj kvazaŭ kiel sanktaj, neerareblaj kaj kredindaj. Sen hezito Shamgar anoncis, ke pro tiuj duboj la kortumo liberigas la akuziton koncerne la riproĉon, ke li estas „Ivano la Terura“ de Treblinka. Nature multaj postvivantoj de la holokaŭsto estis konsternitaj kaj ege seniluziigitaj pri tiu verdikto, kiu tamen enhavis la frazon, ke la tribunalo trovis konvinkajn pruvojn

pri tio, ke Demjanjuk estis gardisto en Sobiboro kaj Flossenbürg. Ankoraŭ neniu ĉeestanto povis imagi la fatalajn sekvojn, kiujn tiu frazo havos en estonto. Tio igis la ŝtatan prokuroraron, apogate de diversaj peticioj flankce de postvivantoj de la holokausto, turni la fokuson de la akuzo de Treblinka al Sobiboro, sed tiu manovro malsukcesis, ĉar en aŭgusto la israela registaro decidis rezigni pri plia jura persekuto de Demjanjuk. Pri nova proceso, kiu traktus la restadon de Demjanjuk en Sobiboro, la registaro ne estis interesata, por eviti novan blamaĝon. Krom tio, la respondeca instanco en Pollando finis la esplorojn pri Demjanjuk. La 21an de septembro 1993 Demjanjuk estis libera post sep kaj duono da jaroj en israela prizono, en kiu li ne sciis, kio okazos al li. Ankoraŭ en la sama nokto li povis reflugi al Usono. Dume en Usono okazis nekredeblaj aferoj. Fariĝis konate, ke OSI subpremis dokumentojn, kiuj malŝarĝis Demjanuk-on pro la timo, ke tiuj dokumentoj, ekzemple listoj de Treblinka, sur kiuj la nomo de Demjanjuk ne aperas, povus en kazo de publikigo malfortigi la israelan akuzan strategion kontraŭ Demjanjuk, kiel pria interna dokumento de OSI aludis.

En februaro 1998 Demjanjuk reakiris la usonan civitanecon, laŭ decido de la federacia juĝisto Paul Matia, kvazaŭ por rekompenci la malbonon, kiu okazis al li. Samtempe li avertis, ke kontraŭ Demjanjuk povas esti malfermita nova proceso, se oni trovos novajn pruvojn kontraŭ li. Por korekti la hontindan blamaĝon pri la fiaskinta ekscivitanigo de Demjanjuk, pri kiu ili nur parte kulpis, ĉar la finan rezulton de la afero ili ne povis antaŭvidi, la respondecaj oficistoj de la usona justicministerio kaj de OSI rekomencis, kun novaj stabo kaj oficejo denove en sekreta loko en Vaŝingtono, fervore serĉi pruvojn, ĉi-foje ne plu pri Treblinka, sed pri Sobiboro kaj Flossenbürg, kie Demjanjuk plej verŝajne servis kiel gardisto de la nazioj. Eli Rosenheim, la nova ĉefo de OSI (Oficejo por specialaj esploroj), celis ripeti la ekscivitanigon de Demjanjuk kaj kaŭzi lian denovan elpelon el Usono, des pli ke lia nomo troviĝis sur la listo de serĉotaj naziaj krimloj de la fama Simon Wiesenthal-Centro en Vieno. Nova proceso kontraŭ Demjanjuk komenciĝis en Usono en 2001, dum kiu la ĉefesploristo de OSI, Edward Stutman, konvinkis la tribunalon opinii, ke Demjanjuk funkciis kiel gardisto en diversaj koncentrejoj dum la dua mondmilito. Tri jarojn poste, la 30an de aprilo 2004, iu usona tribunalo decidis revoki la usonan civitanecon de Demjanjuk por la dua fojo. En decembro 2005 estis decidite transdoni lin al Ukrainio, kion Demjanjuk kontraŭstaris. Anstataŭ tio, la 24an de marto 2009 la enmigraj instancoj de Usono anoncis, ke ili kontaktis la germanan registaron por akiri la dokumentojn necesajn por sendi lin al Germanio.

Ĉar kreskis la premo de Usono kontraŭ Germanio repreni malnovajn naziajn krimulojn, kiuj kaŝiĝis en Usono, la „Centra oficejo por la persekutado de naziaj krimoj" en Ludwigsburg, gvidata de Kurt Schrimm, decidis serioze reokupiĝi pri la kazo Demjanjuk, kiu estis konata al ĝi de pli fruaj jaroj. Tamen laŭ la valida germana juro oni vidis neniun eblecon esplori la kazon kaj garantii la akuzon de Demjanjuk, ĉar la materialo por pruvi krimon en lia kazo ne sufiĉis. En tiu momento komencis ludi gravan rolon Thomas Walter, iama ŝtata prokuroro kaj juĝisto, kiu translokiĝis en Lindau al Ludwigsburg por kunlabori kun la tiea „Oficejo". Kvankam li staris antaŭ la baldaŭa pensiiĝo, li preskaŭ fanatike sekvis la ideon transpreni la kazon de Demjanjuk kaj venigi lin al Germanio, por fari al li la finan proceson en tiu lando. Sed ekzistis pluraj juraj obstakloj por lanĉi proceson kontraŭ tiaj homoj kiel Demjanjuk. Unue, FRG ne konsideris sin aŭtomate respondeca por tiaj homoj kaj kazoj. Laŭ la germanaj leĝoj krimo ne povis esti akuzita en Germanio, se la krimulo ne estas germana civitano, se la krimo ne estis plenumita en Germanio kaj se la viktimo(j) ne estis germano(j). Ĉiuj tri punktoj nete validis en la kazo Demjanjuk kaj unue devis esti formale redeciditaj. Same definitive pruvi al Demjanjuk, ke li estis en Sobiboro, estis malfacile kaj la opcio kondamni lin pro la faritaj krimoj en tiu koncentrejo ĉio alia ol certa, des pli ke li ĉiam neis, ke li laboris tie kiel gardisto. Krom tio, laŭ la germana juro akuzo kontraŭ tia krimulo havis nur ŝancon esti akceptita, se oni povis pruvi al li, ke li faris konkretan krimon, do ekzemple mortigis individuajn homojn. Tiu pozicio, kiu cetere estis kritikata de la usona justicministerio kaj de OSI, kiu jam delonge kunlaboris kun la Ludwgsburga Oficejo, validis en Germanio ĝis 2008. Berlino obstine rifuzis akcepti kazojn el orienta Eŭropo kun la argumento, ke landoj kiel Hungario, Rumanio, Pollando, Kroatio, Ruslando aŭ Ukrainio mem prijuĝu siajn iamajn civitanojn, se ili krimis dum la holokaŭsto. Sed ankaŭ tiuj landoj ne estis interesataj rericevi tiajn homojn. Por Usono do restis nur Germanio, kiu finfine lanĉis kaj organizis la holokaŭston, kiu edukis krimulojn, kiuj faris krimojn en ĝia nomo kaj portis uniformojn de ĝiaj organizaĵoj. Fakte okcidenta Germanio pli kaj pli serioze traktis sian historian pasintecon kaj per tio transprenis sian realan historian respondecon, kiu fariĝis ŝtata politika tasko kaj kvazaŭ eterna morala devo. Sed la tiama kanceliero Schröder kaj lia ministro pri ekstraj

aferoj Joscha Fischer ankoraŭ kontraŭstaris la ideon, kompare kun prezidento Horst Köhler, kiu favoris la novan pensadon, ke oni transprenu iamajn naziajn krimulojn el eksterlando, eĉ se ili ne estas germanoj. La vasta diskuto en juraj, politikaj kaj publikaj medioj estis lanĉita. Do por pravigi la proceson kontraŭ Demjanjuk, la valida juro devis esti modifita, reformita kaj reformuliita en pli vasta, pli ´moderna´ senco.

Ĉar individuan krimon oni ne povis pruvi al Demjanjuk, oni do devis konstrui novan logikon, kiu konsistis en la emfazado de la kolektiva respondeco por tiamaj gardistoj de ekstermaj naziaj koncentrejoj. La centraj ideoj konsistis el jenaj konsideroj: Ĉar en Sobiboro temis pri amasmurdo, ĉiu germana nazio aŭ fremdlanda gardisto, kiu tie deĵoris, aŭtomate fariĝis respondeca kaj kulpa, sendepende de la demando, ĉu li mortigis individuojn aŭ ne. Koncentrejoj kiel Bełżec, Sobiboro kaj Treblinka diferencis de ´normalaj´ koncentrejoj kiel Dachau, Sachsenhausen, Buchenwald aŭ Flossenbürg en tio, ke ili estis nuraj neniigejoj, amasmortigejoj por la homoj, kiuj estis deportitaj tien kaj ke ili havis propran gvidstrukturon sendepende de la centra berlina koncentreja administracio. Kiu estis sendita al Sobiboro, ties mort(ig)o estis neevitebla kaj certa, ĉar eskapo apenaŭ estis reala opcio. Kiam nova transporto alvenis en Sobiboro, la ĉirkaŭ 100-150 ukrainaj gardistoj devis senprokraste helpi en la kolektiva murdprocezo. Do la decida logiko de Walther estis, ke en koncentrejoj kiel Sobiboro la ekzekutanta grupo murdis kolektive kaj ke ĉiu ano de tiu grupo kontribuis individue al la murdo per sia specifa tasko, kiun li havis kaj kiun li ne povis eviti, sendepende de la demando, ĉu li estis decidanta gravulo aŭ malgranda radeto en la tuta maŝino. Se do iu estas akuzita sub tiaj kondiĉoj, li aŭ ŝi povas esti kondamnita kiel parto de la murdsistemo, ĉar tiu persono estus plenuminta la krimon de la „helpo (aŭ kontribuo) al la murdo“. Punktofino.

Post esploroj, kiuj daŭris dek monatojn, la 11an de novembro 2008 la fina, 138-paĝa raporto de Thomas Walther kaj lia kunlaborantino Kirsten Goetze estis transdonita al la ŝtata prokuroaro ĉe la Landa Tribunalo Munkeno, kiu respondecos pri la proceso kontraŭ Demjanjuk, laŭ decido de la Supera Kortumo en Karlsruhe.[110] En la raporto estis notite, ke Demjanjuk kontrubuis al la murdo de minimume 29 mil judoj, precipe el Nederlando kaj aliaj eŭropaj landoj, inter kiuj troviĝis minimume 1939 germanaj judoj. La Bavara Landa Kriminala Oficejo konfirmis la aŭtentecon de la deĵor-legitimilo de Demjanjuk. En marto 2009 la munkenaj ŝtataj prokuroroj ordonis la areston de Demjanjuk – 64 jarojn post la militfino.

Dume, unu el la multaj plendoj, kiujn Demjanjuk faris kontraŭ sia ekscivitanigo en Usono, fiaskis en januaro 2008, kio estis ideala bazo por transpreni la kazon al Germanio, ĉar neniu alia lando volis havi ĝin. Sekvis senprecedenca jura tamtamo lige kun la livero de Demjanjuk de Usono al Germanio. Unue oni ekzamenis, ĉu Demjanjuk entute estas kapabla vojaĝi. Evidente Demjanjuk ne estis tiel kaduka kaj malsana, kiel li ŝajnigis al la publiko. La usonaj advokatoj de Demjanjuk tamen provis malebligi lian sendon al Germanio komence de aprilo 2009. Fine de la kortuma batalo la prokrasto de lia transdono al Germanio estis malakceptita fare de John Paul Stevens, juĝisto ĉe la usona Supera Kortumo, en majo 2009. La 11an de majo okazis la ordono aresti lin, kion oficistoj faris en lia hejmo en Seven Hills ĉe Cleveland. Per speciala aviadilo Demjanjuk estis transportita al Germanio. La vnontan tagon la 89-jara Demjanjuk alvenis en la flughaveno de Munkeno en la akompano de du usonaj justicoficistoj kaj estis senpokraste veturigita al la medicina sekcio de la prizono Stadelheim en suda Munkeno. Kvin horojn post la alveno de Demjanjuk en Germanio oni laŭtlegis al li la arestordonon. Demjanjuk ne komentis ĝin, sed nur konfirmis, ke li komprenis pri kio temas. La Centra Konsilio de la Judoj en Germanio bonvenigis la transdonon de Demjanjuk al Germanio kaj la proceson mem. La tiama asocia prezidanto Charlotte Knobloch emfazis, ke la proceso ankaŭ havas altan simbolan signifon precipe por postvivantoj de la holokaŭsto, kiuj estis en Sobiboro, Treblinka ktp.

La 13an de julio 2009 Demjanjuk estis akuzita de la prokurorejo de Munkeno I pro partopreno en la murdo en almenaŭ 27´900 kazoj. Nature Demjanjuk, t.e. lia advokato Ulrich Busch, plendis kontraŭ la „deportado“ de Usono al Germanio, sed la Federacia Konstitucia Kortumo malakceptis la plendon.

---

[110] En sia leginda libro *Schuld, die nicht vergeht* (Munkeno 2017) la aŭtoro Kurt Schrimm detale klarigis la jurajn cirkonstancojn kaj pravigojn de la transpreno de Demjanjuk al Germanio kaj kial la proceso okazis en Munkeno (p. 167-197). Ĉirilate vd. §§ 3 kaj 9, alineo 1 de la germana punkodo. La munkena tribunalo estis rspondeca por Demjanjuk, ĉar lia plej lasta restadloko antaŭ la forveturo al Usono estis en Feldafing, distrikto Starnberg, Bavario.

La proceso mem komenciĝis la 11an de novembro 2009. En la salonon Demjanjuk estis ŝovita sur rulseĝo, kovrita per granda tuko. Li aspektis kiel ege malsana homo. En la unua tago de la proceso, kiu okazis antaŭ la 1a Punĉambro de la Landa Tribunalo Munkeno, la (deviga) advokato de Demjanjuk, Ulrich Busch, tuj atakis la tribunalon, rifuzante ĝin en la nomo de sia kliento, same la tri profesiajn juĝistojn Ralph Alt (prezidanto), Lenz kaj Fluger, kaj asertis, ke la proceso estas „arbitra" kaj la juĝistoj „neobjektivaj". Poste li prezentis la version, ke Demjanjuk estis arestita de la nazioj kaj „perforte rekrutita" por labori en koncentrejo, ke li ne estis krimulo, sed viktimo. Li trovis kurioze, ke oni „deportis" homon 7000 kilometrojn for de Germanio por fari kontraŭ li proceson, dum aliajn eksajn kaj pli gravajn naziojn, kiuj vivis/as en Germanio kiel liberaj homoj, oni eĉ ne tuŝis/as. Por la judaj atestantoj la vorto „deportado" signifis krudan provokon. Je la fino de sia 40-minuta parolado Busch pridubis la kompetentecon de la germana justico trakti eksajn naziajn krimulojn kiel Demjanjuk, kiu ne estas germano nek faris krimon en Germanio. En tiu nekutima, iom bizara proceso juĝisto Alt reagis senemocie al tiu prediko de Busch kaj tuj daŭrigis okupiĝi pri formalaj demandoj, dum Demjanjuk kondutis per dormeta pozicio. De la medicina fakulo Demjanjuk estis deklarita proces-kapabla, kvankam la akuzito, kiu jes suferis kelkajn malsanojn, mem tute ne ŝajnigis tion. En postaj procestagoj Demjanjuk devis esti ŝovita sur lito en la salonon, sur kiu li aspektis, kvazaŭ li vivos ankoraŭ kelkajn horojn.

Pli ol tridek paralelaj kromplendantoj el Usono, Belgio, Germanio kaj Nederlando partopenis la proceson, precipe reprezentante la viktimojn de la murdo en Sobiboro. Thomas Blatt kaj Philip Bialowitz, kiuj estis venigitaj el Usono, kaj Jules Schelvis el Nederlando, kiuj estis la plej lastaj rektaj atestantoj de la eventoj en Sobiboro, estis pridemanditaj kiel atestantoj por la proceso la 19an de januaro 2010, sed ili ne povis memori, ĉu Demjanjuk ĉeestis en Sobiboro, ĉar ili ne povis rekoni lian vizaĝon. Malgraŭ tio ili nature ne forgesis la kruelan traktadon de la judoj fare de la ukrainaj gardistoj en la KC Sobiboro. La atestantoj emfazis, ke ili ne celas venĝi sin, sed nur rakonti, kio okazis dum la holokaŭsto. Advokato Busch dubis pri la senco de la kontribuo de tiuj kromplenantoj, ĉar ili „ne helpas pruvi la krimojn" de Demjanjuk, ĉar neniu de tiuj kromplendantoj estis rekta atestanto dum la krimo mem". La kromplendantoj nur kaptis sian rajton plenumi sian rolon, donante konkretan vizaĝon al la proceso. Al tio apartenis ankaŭ la rakonto pri la psikologiaj kaj materiaj sekvoj por la postvivantoj de la holokaŭsto kaj ties idoj. Alia demando estis, ĉu havas sencon procesi kontraŭ tia maljuna kaj malsana homo kiel Demjanjuk. La munkena tribunalo klopodis pruvi la ĉeeston de Demjanjuk en Trawniki, Sobiboro kaj Flossenbürg sen atestantoj, sed per plej diversaj paperaj dokumentoj, reuzante la eldirojn de Ignat Danilĉenko (mort. 1985), kiujn li faris en Kievo en 1949, 1979 kaj 1985 eble sub la premo de la justico de la sovetia diktaturo. Danilĉenko diris, ke li konatiĝis kun Demjanjuk en Sobiboro, kie li partoprenis en la amasmurdo al la judoj. Do ankaŭ tiu atesto ne estis centprocente fidinda. Restis do la legendeca deĵor-legitimilo de Demjanjuk kun la numero 1393 por konsideri kiel ĉefan pruvilon, ĉar ĝi deklaris, ke Demjanjuk estis sendita al la KC Sobiboro la 27an de marto 1943. Ĉi tiu centra dokumento, kiu ludis la ĉefan rolon en ĉiuj ĝisnunaj procesoj kontraŭ Demjanjuk kaj kiu devis pruvi lian partoprenon en la holokaŭsto, estis traktita en aprilo 2010. Krom tiu deĵor-legitimilo ekzistis iu listo de la 26a de marto 1943 de 84 Trawniki-viroj, inter kiuj unu el ili, n-ro 30, estis Ivan Demjanjuk. En alia SS-dokumento de la 1a de oktobro 1943, kiu menciis 140-Trawniki-virojn, kiuj estis senditaj al la KC Flossenbürg, troviĝis la nomo de Ivan Demjanjuk. Inter tiuj datoj Demjanjuk supozeble restadis en la KC Sobiboro. Sed de tiuj dokumentoj ekzistis nur kopioj, tiel ke oni facile povis aserti, ke la dokumento esti falsita. Sed kiam Anton Dallmayer, fakulo por dokumentoj, kiu kontrolis la presteknikon de la menciita deĵor-legtimilo, kies aŭtenteco estis kontestata de diversaj flankoj, estis pridemandita la 14an de aprilo 2010 de la Bavara Ŝtata Krima Polica Oficejo, li venis al la konkludo, ke ĝi estis aŭtenta kaj originis el tiu tempo. Busch tamen provis renversi la aserton de Dallmayer per la teorio, ke la legitimilo estis falsita de la KGB, sed fakte neniu defendanto de Demjanjuk havis sukceson per tiu argumento, kiu pli apartenis al la konspiraj teorioj.

La plej lasta atestanto, kiu estis altirita al la proceso, estis iu iama ukraina Trawniki-gardisto kun la nomo Aleksandr Nagornyj. Ĉi tiu kaduka kaj ege malklera homo, kiu naskiĝis en 1917 en iu vilaĝo apud Kievo kaj same kiel Demjanjuk estis arestita de la germanoj dum la dua mondmilito kaj deportita al la koncentrejo por miltkaptitoj en Chelm, estis trovita en Landshut, Bavario, kie li vivis depost la dua mondmilito, kaj konsultita en februaro 2010. Ankaŭ tiu iama sovetia militkaptito estis demandita de la germanoj, ĉu li volas labori kaj estis sendita al Trawniki. Dum la tuta tempo li restis silenta por ne provoki la atenton de la aŭtoritatoj pri sia pasinteco, ĉar li timis esti resendita al Sovetunio, kie oni povus

procesi kontraŭ li kaj kondamni lin al morto. Nagornyj fakte estis la sola ankoraŭ vivanta atestanto entute, kiu asertis, ke li deĵoris kun Demjanjuk en Flossenbürg kaj loĝis kun li en unu ĉambro en Landshut. Per tiu eldiro la alibio de Demjanjuk, kiu asertis, ke en tiu temp li troviĝis en Chełm, de kie li estis rekte sendita al Stirio, estis detruita. Kiam Nagornyj devis rigardi la akuziton de la proksimeco, li respondis, ke „li havas neniun similecon kun Demjanjuk".

Krom ĉio tio Demjanjuk estis ankaŭ suspektita, ke li krimis kontraŭ malliberuloj en la KC Risiera di San Sabbia en Triesto en 1943 kiel membro de la unuoj transdonitaj al la gvido de Odilo Globocnik. Tamen la Regiona Tribunalo de Triesto fermis la esploron per decido de la 29a de aprilo 1992 pro manko de pruvoj. Ankaŭ en Pollando oni esploris pri Demjanjuk pro la mortigo de polaj civitanoj fare de ukrainaj gardistoj en la ekstermejoj de la Ĝenerala Gubernio, precipe en Treblinka. Pro manko de pruvoj la Pola Instituto por Nacia Memoro (IPN) kaj la Distrikta Komisiono, kiu estis respondeca por la priprocesado de krimoj kontraŭ la pola popolo en Lodzo, provizore fermis ĉi tiujn procedojn la 19an de decembro 2007.

Dum la tuta proceso Demjanjuk silentis kaj evitis komenti la akuzojn, sed tri foje li aranĝis groteskan manifestacion. En januaro 2010, survoje al la salono de la proceso li diris kvazaŭ ŝerce: „Mi ne estas Hitlero! Kion vi volas?" En februaro 2011 li aperis kun ŝildo sur la brusto, kiu montris la ciferon 1627. Tiu cifero devis atentigi pri akto, kiu troviĝis en sovetiaj arkivoj kaj laŭdire enhavis la pruvon, ke li neniam estis en Sobiboro. Krom tio lia defendisto Busch laŭtlegis deklaron de Demjanjuk, per kiu li celis komprenigi al la tribunalo, ke tri foje li estis viktimo de iu politika reĝimo, kiu preskaŭ mortigis lin: En Sovetunio dum la stalinismo, en Pollando, kie li preskaŭ malsatmortis kaj en Israelo, kien Usono sendis lin kaj kie li estis kondamnita al morto. Kiam la juĝisto Alt demandis lin, ĉu li komprenis la tekston de la deklaro, li diris „jes", la sola vorto de Demjanjuk dum la tuta proceso mem, kiu daŭris 93 tagojn dum unu jaro kaj duono. En la menciita deklaraĵo Demjanjuk anoncis malsatstrikon, sed ŝajnas, ke ĝi tamen ne okazis.

Busch mem startis lavangon de juraj intervenoj, kiujn la tribunalo devis trakti, sed la juĝistoj rifuzis la plimulton de ili. Laŭ la defendo la proceso riskis fariĝi farso. tamen Busch avertis, ke lia celo ne estas gajni la proceson, sed atingi lian liberigon de la aresto. La obstina advokato, kiu havis sian oficejon en Ratingen ĉe Düsseldorf, konsideris sian kazon kvazaŭ kiel mision (simile kiel Thomas Walther tion perceptis alflanke). Li estis apogata de sia edzino, kiu mem estis ukraindevena kaj pri kiu oni ne vere komprenis, kian rolon ŝi ludis kaj kian influon ŝi eventuale havis al sia edzo. Ambaŭ malŝatis la gazetaron, kiu laŭ ili disvastigis tro negativan opinion pri Demjanjuk, ĉar la ĵurnalistoj estis konvinkitaj, ke Demjanjuk estis komplico de la nazioj, kaj ambaŭ verŝajne ne tro ŝatis la judojn, preferante despli kompati la akuziton, kiun ili konsideris viktimo de la justico, de la gazetaro kaj de la historio. Busch konstruis sian defendon per la argumento, ke oni ne povas pruvi, ke Demjanjuk estis en Sobiboro kaj ke li tie pelis la judojn en la gasĉambrojn, ke lia deĵor-legitimilo estis falsita de la KGB, ke la konfeso de Danilĉenko estis atingita sub la premo de la sovetia justico kaj fine li apogis la kredon, ke la sovetianoj celis aranĝi konspiraĵon kontraŭ Demjanjuk kaj la ukrainoj en eksterlando. Busch estis konvinkita, ke ĉiuj ukrainaj gardistoj en tiaj koncentrejoj estis alfrontitaj per la situacio de la putativo. La proceso mem estis por li hontinda kaj maljusta, ĉar li kritikis, ke la germanoj, kiuj lanĉis la holokaŭston, arogas al si prijuĝi ukrainan gardiston, kiu finfine ne kulpis, ke li trafis la situacion, en kiu li troviĝis. Krom tio Busch pridubis la atestojn de postvivantoj kiel Thomas Blatt kaj avertis, ke mankis atestantoj kaj dosieroj, kiuj povus esti konsiderataj favore al Demjanjuk. Je la fino de sia pledo, kiu daŭris 4,5 tagojn, li alvokis liberigi sian klienton, ĉar laŭ li li jam sufiĉe longan tempon sidis en la malliberejo.

Kiam Kurt Gutmann, advokato el Berlino kaj defendanto de la kromplendantoj, alvokis al Demjanjuk rakonti pri sia laboro en Sobiboro, la akuzito eĉ ne moviĝis. Je la fino parolis Cornelius Nestler, profesoro pri punjuro el Kolonjo. Ankaŭ li estis certa, ke Demjanjuk estis en Sobiboro. Li uzis la okazon starigi la demandon de la legitimeco de tia proceso kaj atakis la postmilitan punjusticon der Germanio por riproĉi al ĝi, ke ĝi estas la historio de gravaj neglektoj kaj eraroj, se temas pri la persekutado de naziaj krimuloj. En tiu senco li bonvenigis ĉi tiun proceson, sed li evitis esprimi proponon pri puno por Demjanjuk, ĉar la imagoj de la kromplendantoj tro diverĝis rilate tiun demandon. La munkena Sudgermana Gazeto bilancis la proceson per la titolo „Multaj supozoj, malmultaj faktoj". Efektive, ankaŭ en, dum kaj post ĉi tiu proceso gravaj duboj pri la rolo kaj kulpo de Demjanjuk ne povis

esti forigitaj. Fakte en Munkeno Demjanjuk ne estis akuzita unuavice, ĉar li estis gardisto en Sobiboro, sed ĉar li partoprenis en la amasmurdo al la judoj en la nomo de la naciosocialismo. Sed ĉar Demjanjuk silentis dum la tuta proceso kaj rifuzis respondi demandojn pri kio li faris en Sobiboro, kaze ke li entute estis tie, oni ne povas scii, kion li faris kaj ne faris aŭ kion li intencis fari dum sia restado en tiu koncentrejo, ekzemple fuĝi, ĉu li aktive partoprenis en la amasmurdo aŭ ĉu li havis aliajn taskojn, kie li povis eviti ĝin. Ĉu li apartenis al tiuj gardistoj, kiuj komercadis kun la judoj kaj tiel nerekte helpis al ili vivi. Ktp. Multon oni simple ne scias kaj verŝajne neniam ekscios. Ĉar dum la ribelo de la 14a de oktobro 1943 li jam ne plu estis en Sobiboro, li ne povis pafi kontraŭ la fuĝintaj malliberuloj. Sed kial li tiel obstine silentis dum la tuta proceso, antaŭe kaj poste ? Do, restas amaso da demandoj kaj denove ne malmultaj duboj.

La 12an de majo 2011 Demjanjuk estis proklamita kulpa kaj kondamnita al kvinjara malliberigo pro partopreno en la murdo en la kazo de 28´060 personoj. La tribunalo konsideris pruvite, ke kiel militkaptito li estis trejnita (en Trawniki) por iĝi unu el ĉirkaŭ 5000 fremdlandaj „volontuloj“, kiuj staris je la dispono de la SS kaj servis kiel gardisto en la ekstermejo de Sobiboro de malfrua marto ĝis meza septembro 1943. Eĉ se neniu individua mortiga ago povis esti atribuita al li persone, Demjanjuk estis deklarita kiel „parto de la eksterma maŝino“ tie, kvankam li estis ´malgranda radeto´, kiel oni kutimas diri. La nombro de viktimoj, por kiu li respondecis, estis kalkulita surbaze de la transportaj listoj de la deportaj trajnoj dum la tempo kiam ‚Demjanjuk servis en Sobiboro (tio estis la kutima praktiko ankaŭ de aliaj tribunaloj en la kazoj de aliaj kondamnitaj krimuloj de naziaj koncentrejoj). La juĝistoj argumentis, ke Demjanjuk ne estus devinta partopreni ĉi tiujn krimojn, se li estus klopodinta eviti tian deĵoron, kvankam por tio necesis enkalkuli la grandan riskon, kiun tia decido povis havi (fakte ekzistis kazoj, en kiuj germanaj dungitoj de naziaj koncentrejoj sukcesis forlasi tian deĵoron, se ili petis tion, sed Demjanjuk estis sovetia militkaptito, kiun oni eventuale estus translokita al alia KC aŭ estus mortigita; sed kial li estis translokita al Flossenbürg kaj de kie? aK ). Nu kiel menciite supre, komence de oktobro 1943 Demjanjuk efektive ial estis translokita al la KC Flossenbürg en Bavario, sed tio ne malokazigis lian partoprenon en la amasmurdo al la judoj.

Post la proklamo de la verdikto la arest-ordono estis nuligita kaj Demjanjuk estis liberigita de la aresto pro alta aĝo de la kondamnito. La aresto en malliberejo kun ties malmola reĝimo ne plu povis esti konsiderata por la 91-jaraĝulo, des pli ke la risko de la fuĝado ne ekzistis, ĉar Demjanjuk estis sennacia kaj tial ne povis forlasi Germanion. La verdikto (kvinjara malliberigo) povis esti komprenata kiel simbola puno. Demjanjuk estis loĝigita en flegejo en Bad Feilnbach apud Rosenheim en suda Bavario, kie li forpasis en marto 2012. En 2015 estis malkovrita privata kolekto kun pli ol 300 fotoj el la posedo de la tiama SS-Untersturmgvidanto Johann Niemann. En du albumoj li dokumentis sian tutan karieron en la SS de la koncentrejo Esterwegen kaj la eŭtanazia programo T4 ĝis la „operaco Reinhardt" en Bełżec kaj Sobiboro. Por la unua fojo la bildoj ankaŭ montris Ivan Demjanjuk en la KC Sobiboro.

Demjanjuk-filo John estis konsternita kaj nomis la decidon honto, ke tiu ukraina militkaptito devis respondeci por la krimoj de la nazioj. Kiel multaj aliaj ankaŭ lia filo estas konvinkita pri la senkulpeco de sia patro.

Ĉe iuj observantoj de la proceso aperis la demando, ĉu tiaj procesoj havas sencon tiom multajn jarojn post kiam la krimoj okazis, des pli se la akuzitoj estas 80-90-jaraj maljunuloj. Nu laŭ la germana juro ne eblas rezigni pri tiaj esploroj, akuzoj kaj procesoj kontraŭ tiaj homoj. Laŭ la germana juro tiaj esploroj, akuzoj kaj procesoj devas esti lanĉitaj kaj efektivigitaj, se tiaj kazoj kiel tiu de Demjanjuk aperas. La persekuto de murdo ne perdas sian validecon. Se tia proceso ŝajne ne plu havis grandan sencon por akuzitoj kiel Demjanjuk, ĝi almenaŭ havis certan signifon por la viktimoj de la holokaŭsto kaj la kromplendantoj, kiuj estis tre kontentaj, ke ili povis rakonti pri siaj spertoj en naziaj koncentrejoj, kie pereis centmiloj da homoj kaj kie ili mem preskaŭ mortis, kaj ĝi havis ankaŭ valoron por la historiografio, kiu ankoraŭfoje ricevis la okazon okupiĝi pri la tiamaj eventoj. Ĉar Sobiboro (kaj Treblinka kaj Bełżec) jam estis preskau forgesita de la samtempanoj, estis utile retrakti la temon publike. Pro tiuj kialoj neniam estas tro malfrue por efektivigi tian proceson. Sed baldaŭ venos la tempo, kiam tiuj homoj, kiuj estis en la naziaj koncentroj, ne plu vivos.

**La iama KC Sobiboro kiel memorejo post la milito kaj nuntempe (kio ekzistas kaj novaj planoj)**

Jam en 1945/46 pola esplorkomisiono vizitis la terenon de la iama KC Sobiboro por kolekti pruvojn por la planita jura proceso en Pollando kontraŭ militkrimuloj. Malgraŭ la detruado kaj ebenigo de la iama neniigejo fare de la nazioj oni trovis diversajn restaĵojn: ostojn, cindron kaj ĥloron. En la postaj jaroj la tereno estis neglektata kaj ignorata kaj lasita al la rabistoj, kiuj serĉis valoraĵojn kaj povis senĝene traesploradi ĝian teron, kie troviĝis la cindro de centmiloj da judoj. Por la postvivintaj judoj tio signifis la krudan malrespektadon kaj profanadon de judaj tombejoj.

Kompare kun Aŭŝvico, kie la pola ministerio de la kulturo kaj arto (!) ordonis protekti la terenon por malfermi muzeon, la unua postmilita memorejo sur la teritorio de la iama KC Sobiboro estis instalita nur en 1965. Ĝia inaŭguro, organizita la 27an de junio de la „Regiona Komitato por la protekto de la memorejoj de la batalo kaj de la martireco“ en Lublino, koincidis kun la Sobibor-procesoj, kiuj okazis en Hagen (Germanio) kaj Krasnodaro (Sovetunio). Surbaze de la scio rikoltita dum la unuaj Sobibor-procesoj kaj de la atestoj de la postvivantoj oni faris skizojn pri tiu koncentrejo. Tiel estiĝis la koncepto de Romuald Dylewski por la unua memorejo en Sobiboro, kiu konsistis el tri elementoj: la stacidomo, la proksimuma pozicio de la gasĉambroj kaj la amastombejoj kun la cindro. Asfaltita strato ligis tiujn tri punktojn, kiuj devis simboli la staciojn, kiujn la judoj trapasis en Sobiboro. En la proksimeco de la gasĉambroj trovis 30x50 metrojn granda placo, kiun la strato trairis. Tie troviĝis 4x5 metrojn granda ŝtonkvadro, kiu estis 8 metrojn alta. Apud tiu kvadro troviĝis la statuo de mortanta virino kun infano. La vizaĝo baziĝis sur la masko de mortigita virino el Majdanek. Sur la soklo estis skribite: „Memore pri la de la hitleristoj mortigitoj en la jaroj 1942 kaj 1943.“ La vortoj germanoj kaj judoj estis evititaj. De tiu punkto la strato estis daŭrigita ĝis senarba parto, kie oni supozis la amastombejojn kaj kie oni aranĝis monteton kiel simbolan amastombon, kiu konsistis el cindro de la viktimoj, kiu estis kolektita por tiu loko. La tombo estis ĉirkaŭata de ronda muro kun diametro de 50 metroj kaj kovrita per asfaltita tegmento. La cindro estis kovrita per gravelo. Fenestro ebligis rigardi en la internon de la tomba monteto. Tie oni vidis ostojn kaj fragmenton de kranio. Ĉi tiu fenestro estis fermita en 1993, ĉar ĝi fariĝis objekto de la vandalismo. En 1993 la memorejo estis gvidata de la Loka Muzeo de Włodawa.

Fakte la memorejo kaj ties gvido travivis konstantan ŝanĝiĝon. Iuj elementoj restis sur la sama pozicio, aliaj estis metitaj al alia loko pro la arkeologiaj esploroj aŭ estis detruitaj. Partoj de la asfaltita tegmento estis elrompita.[111] En 2005 organizaĵoj el Nederlando kaj Pollando konstruis memorstraton, kiu estis ornamita per ŝtonetoj kaj memortabuloj, akompanate de arboj. Tiu strato devis simboli la iaman vojon al la gasĉambroj. Ekde 2012 la memorejo estis submetita al la gvido de la Ŝtata Muzeo Majdanek.

Kvankam la ĝisnuna memorejo markis la lokon de la amasmurdo, ĝi tamen malĝuste respegulis la topografion de la iama murdejo. Tie kie la esploristoj supozis la lokojn de la gasĉambroj kaj de unu amastombejo, estis starigitaj memoraĵoj sen deklari ilian signifon per arkeologiaj pruvoj. Tiel ekzemple la memorilo pri la gasĉambroj troviĝis kelkajn metrojn apud la loko, kie jardekojn poste, en 2014, la restaĵoj de la gasĉambroj estis trovitaj. Krom la ekzakta loko de la gasĉambroj la arkeologoj trovis ankaŭ la vojon al la gasĉambroj, la barakojn de la speciala komando kun la tunelo, kiu estis konstruita de la malliberuloj por fuĝi, kaj amastombejojn. La restrukturado de la tuta memorejo Sobiboro estis planita ekde 2013. Ĉar en tiu tempo la rezultoj de la plej aktualaj arkeologiaj esploroj (de 2014) ankoraŭ ne estis prezentitaj, oni ne povis inkluzivi ilin en la novan planon. Ilia integrado en la novan koncepton signifis enorman defion. Kial?

Dum laboroj faritaj sur la teritorio de Sobiboro estis ĉiam denove trovitaj iuj restaĵoj el la tempo de la amasmurdo. Oni do opiniis, ke estas necese sistemece traserĉadi la terenon. En 2000 estis donita la permeso por la arkeologia fosado kaj en oktobro de tiu jaro alvenis la unuaj arkeologoj al Sobiboro. Ilia ĉefa celo estis retrovi la restaĵojn de la vojo al la gasĉambroj, la gasĉambrojn mem kaj ĝis nun nekonatajn amastombojn. Nur en printempo 2011 arkeologoj povis trovi partojn de la lagro III. En printempo de tiu jaro ili malkovris spurojn de la loko, kie troviĝis la gasĉambroj mem, kaj en septembro 2014 la restaĵoj de la fundamentoj de la gasĉambroj estis elfositaj. La pozicio de la gasĉambroj, kiu estis supozata en la unua memorejo, ne ekzakte kongruis kun la reala loko. Oni ankaŭ povis mezuri, ke la „tubo“, t.e. la strato al la gasĉambroj, estis 4 metrojn larĝa. La arkeologoj ankaŭ trovis novajn

[111] Kiam mi vizitis la lokon (kun Tomasz Chmielik) en 2005, la memorejo faris al mi sufiĉe neglektitan impreson, kompare kun Bełżec, kiu estis flegata memorejo kun moderna muzeo.

amastombojn. Iuj memorobjektoj kaj ankaŭ arboj unue devis esti forigitaj por povi esplori la teron. Laŭ juda tradicio, la movado de judaj tombejoj al alia loko kaj la ĝenado de la trankvilo de la mortintoj estas severe malpermesataj. Krom tio la arkeologoj trafis ankaŭ la truojn de la iamaj fostoj de la bariloj ĉirkau la koncentrejo, sed restaĵojn de la barakoj, kie oni tondis la hararon de la virinoj, ne povis esti trovitaj. Do nur la ekzakta elfosado de la teritorio permesas ĝuste rekonstruadi la strukturon de la koncentrejo kun ties konstruaĵoj. Alia problemo estis la poseda strukturo de la teritorio, nome nur parto de la memorejo apartenis al la muzeo de Majdanek, dum aliaj partoj troviĝis sur la grundo de iu forsta entrepreno aŭ de la pola fervojo aŭ apartenis al privatuloj. Ekzemple en la iama vilao de la komandanto de la KC Sobiboro vivis la estro de la vilaĝo Sobiboro kun la familio. La administracio de la memorejo celis akiri tiujn terenojn por integri ilin en la tutan teritorion de la iama koncentrejo.

En januaro 2013 okazis konkurso por la rekonstruado de la memorejo Sobiboro, kaj en julio la ricevitaj proponoj estis premiitaj. Gajnis la koncepto de la arkitektoj Marcin Urbanek, Piotr Michalewicz kaj de la historiisto kaj artisto Łukasz Mieszkowski. Por ili la ĉefa ideo de la restrukturado de la memorejo estis la protekto de la viktimoj. En tio la sferoj de la mortintoj kaj vivantoj devis esti strikte apartigitaj unu de la alia. Elfosi la kadavrojn kaj bruligi ilin estis konsiderata kiel profanado. En Sobiboro la ofendado de la viktimoj ne finiĝis per ilia morto. La nazioj reelfosis multnombrajn viktimojn, bruligis kaj entombigis ilin duan fojon. Ĉar la vojo al la cindra monteto kondukis meze tra unu el la amastombejoj, en la unua memorejo de 1965 la vizitantoj fakte promenadis super la restaĵoj de la mortigitoj sen konscii pri tio aŭ rimarki tion. Do por lasi la mortintojn en eterna trankvilo oni diskutis pri apartigo de la sektoro de la vizitantoj disde la sektoro, kie troviĝas la amastomboj, kiuj ne rajtas esti piede tuŝitaj nek esti videblaj de ekstere. Tiu ideo tamen estis kontraŭstarita per la argumento, ke ĝi estas tro radikala kaj ke la vizitantoj ne komprenos ĝin. Pro tio formiĝis kompromiso, laŭ kiu la vojo al la gasĉambroj estu simbolita per du unuopaj muroj, kiuj devus etendiĝi sur iom altigita pozicio sur gravela grundo. En la fino de la vojo, sur kiu la judoj estis pelitaj en la gasĉambrojn, la vojo inter ambaŭ muroj devis mallarĝiĝi kaj la muroj mem devis renkontiĝi. Tiuspeca mallarĝiĝo ĉe la fino de la vojo devis simboli, ke por la judoj ne plu ekzistis elirejo. La vojo inter la muroj mem ne devis esti irebla por la vizitantoj, sed ĝi povis esti nur videbla de la distanco, ĉar la vizitantoj havis elirejon. Tiu koncepto ankaŭ devis respeguli la ideon, ke samtempe la iamaj mortontoj ne estas lasitaj solecaj de la nuntempaj vizitantoj, ĉar ili povas memori pri ili tre proksime de la loko, kie ili pereis. Laŭ tiu maniero la mortigitaj homoj devis reakiri sian dignon. Sed tiu simbola vojo kun la du muroj ne estus povinta esti konstruita laŭlonge de la origina aleo, kiu estis instalita en 2005, ĉar ne temis pri la origina vojo al la gasĉambroj. Intertempe oni rezignis pri la ideo de la du muroj. La postaj planoj antaŭvidis nur unu muron, kiu devus simboli videblan barieron inter la vivo kaj morto. La strato por la vizitantoj estis planita tre proksime de la muro, ĉar la marĉa tereno (kiu jam kaŭzis problemojn al la nazioj) ne permesis alian solvon, kiu estis favorata de la respondeculoj, kiuj donis la taskon rekonstruadi la memorejon.

Por longa tempo la arboj estis la plej gravaj atestaĵoj de la krimoj de la nacisocialismo en Sobiboro. Ankaŭ en la nova instalaĵo ili devus ludi gravan rolon, kvankam oni celis iom forpreni ilian idilian etoson. Laŭ nova plano la vojo devus konduki la vizitanton al iu punkto de la muro, kie troviĝus fendo, tra kiu oni povus vidi la tombejon sen surpaŝi ĝin. Kaj la muro devus ĉirkaŭi la senarban lokon por protekti ĝin. La cindra monteto estus reintegrita en la novan koncepton kaj restus en sia origina pozicio.

La plano krome antaŭvidis, ke ĉe la alveno en la memorejo la vizitantoj devus unue vidi la konstruaĵon de la *muzeo*. Oni opiniis, ke la ideo de la trankvila memorado estu tamen pli grava ol la ideo de la aktiva lernado en la muzeo pri la historio de la loko. En la muzeo oni tamen havu la okazon spekti ekspozicion pri la ŝoao. Tra la vitra fronto de la muzeo oni havus senperan rigardon al la loko de la iama lagro II, kie komenciĝis la ribelo de la 14a de oktobro 1943, unuflanke, kaj al la arbaro, en kiu la fuĝintoj kaŝiĝis, aliflanke. Per tiu optiko la vizitanto ricevus la konscion pri la vojo kaj al la morto kaj al la libereco. La muro devus komenciĝi nur kelkajn metrojn for de la muzeo. En la rekonstruita memorejo mem ekzistus punktoj, kiuj donus informojn pri la topografio de la iama koncentrejo. La koncernaj tabuloj estus fiksitaj laŭlonge de la muro. En la proksimeco de la muzeo troviĝus ankaŭ placo por memorigi la scenon de la separado de la virinoj kun ties infanoj disde siaj viroj. Tie oni starigus ankaŭ la menciitan statuon de la virino kun la infano el la 1960aj jaroj. La arkitektoj de la rekonstruota memorejo devas ĉiam adaptiĝi laŭ la novaj arkeologiaj trovitaĵoj. Precipe la israela flanko, t.e.

reprezentantoj de Jad Vaŝem, postulis, ke estu konservataj kiel eble plej multaj originalaĵoj kiel videblaj pruvoj de la murdo. Sed la arkitektoj preferis malgrandajn kestojn el vitro, kiuj ebligas la rigardon al la diversaj restaĵoj. Por ili pli gravas la protekto de la viktimoj ol la pruvoj.

En kunlaboro kun arkeologoj, politikistoj kaj historiistoj oni planas novan koncepton por la memorejo por la iama KC Sobiboro. Post la parlamentaj elektoj de oktobro 2015, kiam la naciisma PiS fariĝis la reganta politika partio en Pollando, nova komisiito de la ministerio de la kulturo estis nomita kiel respondeculo por la interparoloj kun la kreantoj de la memorejo. La dato de la fina planado de la nova memorejo ankoraŭ ne estas konata. Ĝia inaŭguro devis okazi en 2015, sed la arkeologiaj trovaĵoj prokratis ĝin. Krom tio, la financaj rimedoj por la konstruado elĉerpiĝis. Do, la rekonstruado de la nova memorejo estas ligita kun multaj obstakloj.[112] Sur la ne tre ampleksa retpaĝaro de la muzeo la historio de ĝia rekonstruado finiĝas en la jaro 2000. Tamen en ĝi oni anoncas la ekziston de surlokaj informejo, ekspozicio, librovendejo kaj aliajn servojn por vizitantoj, kiuj estas riceveblaj surloke ekde julio 2020.[113]

Fino

Utiligita literaturo:

Libroj pri Sobiboro kaj la „operaco Reinhardt“:

Antokolski, Pawel, Kawerin, Wenjamin: Der Aufstand in Sobibor. In: Ehrenburg, Ilja; Grossman, Wassili (Hrsg.): Das Schwarzbuch. Der Genozid an den sowjetischen Juden. Germana eldono eld. de Arno Lustiger, Rowohlt, Reinbek 1994. Ĉi tiu unua skizo pri la KC Sobiboro kaj ĝia ribelo aperis en *Znamja* 4/1944 (ruslingva teksto: http://jhist.org/shoa/grossman007.htm).

Arad, Yitzhak: Belzec, Sobibor, Treblinka. The Operation Reinhard Death Camps. Indiana University Press, Blomington 1987 437 p., 1999 448 p.

Arad, Yitzhak: The Operation Reinhard Death Camps. Belzec, Sobibor, Treblinka. Reviziita kaj kompletigita versio. Indiana University Press, Blomington 2018. 525 p. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/549157867)

Lehnstaedt, Stephan: Der Kern des Holocaust: Belzec, Sobibor, Treblinka und die Aktion Reinhardt. C. H. Beck, München 2017. 207 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/e19_978-3-406-70702-5_01.pdf)

Lehnstaedt, Stephan; Traba, Robert: Die „Aktion Reinhardt“. Geschichte und Gedenken. Metropol Verlag Berlin 2019. 395 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-86331-445-3_01.pdf)

Musial, Bogdan (Hrsg.): „Aktion Reinhardt“. Der Völkermord an den Juden im Generalgouvernement 1941–1944. Fibre Verlag, Osnabrück 2004. 454 p.

Berger, Sara: Experten der Vernichtung. Das T4-Reinhardt-Netzwerk in den Lagern Belzec, Sobibor und Treblinka. Hamburger Edition 2/2014. 622 p. (Enhavo: https://d-nb.info/1035024586/04).

Blatt, Thomas Toivi: From the Ashes of Sobibor. A Story of Survival. Northwestern University Press. 1981. 242 p.

Blatt, Thomas Toivi: Sobibór – Der vergessenen Aufstand. Bericht eines Überlebenden. Unrast Verlag Hamburg/Münster 2004. 254 p.

Blatt, Thomas Toivi: Nur die Schatten bleiben: Der Aufstand im Vernichtungslager Sobibór. Aufbau-Taschenbuch-Verlag, Berlin 2003. 335 p. (Enhavo: http://aleph.sg.ch/exlibris/aleph/a23_2/apache_media/F7MSGTLQ8C9BNP1FP6G8UI8K78IQKB.pdf)

Bruder, Franziska: „Hundert solcher Helden“. Der Aufstand jüdischer Gefangener im NS-Vernichtungslager Sobibór. Unrast Verlag Hamburg/Münster 2013. 183 p. (Enhavo: https://d-nb.info/1022705210/04)

[112] Laŭ: Orte der Shoa Muhle, Klara: Der historische Ort der ehemaligen Tötungsstätte Sobibór. En: Ganzenmüller, Jörg; Utz, Raphael: Orte der Shoah in Polen. Gedenkstätten zwischen Mahnmal und Museum. 2016, p. 147-166.
[113] Vd. http://www.sobibor-memorial.eu.

Distel, Barbara: Sobibor. En: Wolfgang Benz, Barbara Distel (Hrsg.): Der Ort des Terrors. Geschichte der nationalsozialistischen Konzentrationslager. Band 8: Riga, Warschau, Vaivara, Kaunas, Płaszów, Kulmhof/Chełmno, Bełżec, Sobibór, Treblinka. C.H. Beck, München 20 08. 464 p.

Band 9: (Enhavo: https://ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT014926415/PDF)

Freiberg, Berek: Sobibór. En: Beer, Frank; Benz, Wolfgang; Distel Barbara (eld.): Nach dem Untergang. Die ersten Zeugnisse der Shoah in Polen 1944-1947. Berichte der Zentralen Jüdischen Historischen Kommission. Metropol & Verlag Dachauer Hefte, Berlin/Dachau 2a eld. 2014. p. 619-652.

Petscherskij, Aleksandr: Aufstand in Sobibor. Metropol Verlag, Berlin 2018. 136 p.

Rashke, Richard: Flucht aus Sobibor. Basierend auf Interviews mit 18 Überlebenden. Roman. Bahoe books 2017. 340 p.

Schelvis, Jules: Vernichtungslager Sobibór. Unrast Verlag, Hamburg/Münster 2003. 360 p.
Pli frua eldono de tiu libro aperis en la Metropol-eldonejo, Berlin 1998. 334 p.

Schelvis, Jules: Eine Reise durch die Finsternis. Ein Bericht über zwei Jahre in deutschen Vernichtungs- und KonzentrationslagernUnrast Verlag, Hamburg/Münster 2005. 192 p.

Wachsmann, Nikolaus: KL: Die Geschichte der nationalsozialistischen Konzentrationslager. Siedler Verlag, München 2016. 992 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/e19_978-3-88680-827-4_01.pdf)

Webb, Chris: The Sobibor Death Camp. History, Biographies, Remembrance. Ibidem-Verlag, Stuttgart 2017. 519 p. (https://www.swissbib.ch/Record/482987545). Kiel elektronika libro elŝutebla ekzemple sub thalia.de, orellfuessli.ch, exlibris.ch. La sama aŭtoro verkis ankaŭ imilajn librojn pri la KC en Auschwitz, Chełmno, Bełżec kaj Treblinka. (Vd. ankaŭ la retujon de lia esplorcentro sub https://www.radicalrightanalysis.com).

Wefing, Heinrich: Der Fall Demjanjuk. Der letzte grosse NS-Prozess. Das Leben. Der Prozess. Das Urteil. C.H-Beck, München 2011.

Wewryk, Kalmen: Nach Sobibor und zurück. Bahoe Books, Wien 2020, und Metropol Verlag, Berlin 2020. 177 p.

Wienert, Annika: Das Lager vorstellen. Die Architektur der nationalsozialiszischen Vernichtungslager. Neofelis, Berlin 2015. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/357007964)

Fotos aus Sobibor. Die Niemann-Sammlung zu Holocaust und Nationalsozialismus, hrsg. vom Bildungswerk Stanisław Hantz e. V. und der Forschungsstelle Ludwigsburg der Universität Stuttgart. Metropol-Verlag, Berlin 2020. 380 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-86331-506-1_01.pdf )

Libroj pri ligitaj temoj:

Aly Götz: „Endlösung“. Völkerverschiebung und der Mord an den europäischen Juden. S. Fischer, Frankfurt a.M. 1995. 446 p. (Enhavo: https://ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT006536992/PDF)

Benz, Angelika: Handlanger der SS. Die Rolle der Trawniki-Männer im Holocaust. Metropol, Berlin 2015. 309 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-86331-203-9_01.pdf)

Benz, Wolfgag: Lexikon des Holocaust. C.H. Beck, München 2002. 262 p.

Benz, Wolfgang: Der Holocaust. C.H. Beck, München 1995 (7/2008). 127 p.
(Enhavo: https://d-nb.info/988024772/04. Kiel pdf: https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/e-books-deutsch/wolfgang-benz/der-holocaust/id/9783406666889). Ekzistas ankaŭ angla traduko.

Benz, Wolfgang (eld.): Dimension des Völkermords. Die Zahl der jüdischen Opfer des Nationalsozialismus. Dtv, München 1996. 584 p. (Enhavo: https://ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT007158352/PDF.

Böhler, Jochen: Der Judenmord in den eingegliederten polnischen Gebieten 1939-1945 Fibre Verlag Aug 2010. 425 p. (Enhavo: https://d-nb.info/993895271/04)

Böhler, Jochen: Auftakt zum Vernichtungskrieg. Die Wehrmacht in Polen 1939. Fischer Taschenbuch Verlag 2006. 278 p. (Enhavo: https://ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT014067072/PDF)

Browning, Christopher: Die Entfesselung der „Endlösung“. Nationalsozialistische Judenpolitik 1939-1942. Propyläen, München 2003. 832 p. (Enhavo: https://ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT013707096/PDF)

Browning, Christopher: Ganz normale Männer: Das Reserve-Polizeibataillon 101 und die „Endlösung“ in Polen. Rowohlt, Reinbek bei Hamburg 1993. 330 p.

Bruder, Franziska: Die jüdischen Aufständischen im NS-Vernichtungslager Sobibór und der Partisanenkampf. Ein Fallbeispiel für das Gebiet um Parczew/Włodawa und Brest. En: Zückert, Martin k.a.: Partisanen im Zweiten Weltkrieg. der Slowakische Nationalaufstand im Kontext der europäischen Widerstandsbewegungen: Vorträge der gemeinsamen Tagung des Collegium Carolinum und des Instituts für Zeitgeschichte München-Berlin in Bad Wiessee vom 6. bis 9. November 2014. Vandenhoeck & Ruprecht, Göttingen 2017. 320 p. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/503322318)

Hänschen, Steffen: Das Transitghetto Izbica im System des Holocaust. Die Deportationen in den Distrikt Lublin im Frühsommer 1942. Metropol Verlag, Berlin 2018. 608 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-86331-381-4_01.pdf)

Hilberg, Raul: Die Vernichtung der europäischen Juden. Fischer Taschenbuch Verlag, Frankfurt a. M. 1990. 1350 p. (Enhavo: https://ub.unibas.ch/tox/IDSLUZ/001093344/PDF)

Karski, Jan: Mein Bericht an die Welt. Geschichte eines Staates im Untergrund. Antje Kunstmann, München 2011. 620 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-88897-705-3_01.pdf)

Kijowska, Marta: Das Leben de Jan Karski. Kurier der Erinnerung. C.H. Beck, München 2014. 382 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/e06_978-3-406-66073-3_01.pdf)

Klee, Ernt: Was sie taten. Was sie wurden. Ärzte, Juristen und andere Beteiligte am Kranken- oder Judenmord. Fischer TB Verlag, Frankfurt a. M. 1986.

Kogon, Eugen, k.a. (eld.): Nationalsozialistische Massentötungen durch Giftgas. Fischer Taschenbuch Verlag, Frankfurt a. M. 1986. 350 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_3-10-040402-5_01.pdf)

Kuwałek, Robert: Das Vernichtungslager Bełżec. El la pola lingvo de Steffen Hänschen. 2a prilborita eldono. Metropol, Berlin 2014. 398 p. (Enhavo: https://d-nb.info/1049902718/04)

Muhle, Klara: Der historische Ort der ehemaligen Tötungsstätte Sobibór. En: Ganzenmüller, Jörg; Utz, Raphael: Orte der Shoah in Polen. Gedenkstätten zwischen Mahnmal und Museum. Böhlau Köln/Weimar/Wien 2016. 357 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-412-50316-1_01.pdf)

Pehle, Walter H. kaj Schlott, René: Raul Hilberg.: Anatonie des Holocaust. Essays und Erinnerungen. S. Fischer, Frankfurt a. M. 2016. 336 p. (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/e19_978-3-10-002505-0_01.pdf)

Sereny, Gitta: Am Abgrund. Gespräche mit dem Henker. Franz Stangl und die Morde von Treblinka. Piper, München 1995. 442 p.

Fotoj:

Schande von Sobibor: Neue Fotos zeigen KZ-Aufseher Demjanjuk im Vernichtungslager

(https://www.focus.de/wissen/mensch/geschichte/schande-von-sobibor-neue-fotos-zeigen-kz-aufseher-demjanjuk-im-vernichtungslager_id_11602596.html)

Filmoj:

Jack Gold: Flucht aus Sobibor, (1989) – Origina titolo: Escape from Sobibor, USA 1987 (TV), DVD germ./angl. 2012. (https://www.youtube.com/watch?v=XIDsHySiVyM).

Pavel Kogan, Lily van den Bergh: Aufstand in Sobibor, (1989) – Origina titolo: Opstand in Sobibor, UdSSR/NL 1989, Dokumenta filmo. DVD germ./angl./ned./fran.,/rus./pol. subtitoloj 2011/2013.

Sobibor, 14. Oktober 1943, 16 Uhr (Dokumentarfilm, vor allem des Interviews mit Yehuda Lerner, einem Überlebenden des Aufstandes; Originaltitel: Sobibor, 14 octobre 1943, 16 heures, Frankreich 2001. Regie: Claude Lanzmann, Frankreich 2001).

Konstantin Khabenskiy: Sobibor, (2018) – Originaltitel: Собибор, Russland 2018. (https://www.youtube.com/watch?v=GevO15ZNxZw)

Interretaj resursoj:

KC Sobiboro (Vikipedio):
https://de.wikipedia.org/wiki/Vernichtungslager_Sobibor

Skiza mapo de la KC Sobiboro:
https://sobibor.de/wp-content/uploads/2015/05/Karte-Vernichtungslager.jpeg

Koncizaaj biografioj de la de la nazioj de la KC sobiboro:
https://www.sobiborinterviews.nl/en/extermination-camp/biographies-of-ss-men

Detalaj biografioj de la nazioj de la KC sobiboro:
https://www.sobibor.org/wp-content/uploads/2016/05/M_BEM_ksi_Sobibor_Extermination_Camp_20150107-1.pdf

Listo de la SS-personaro en la KC Sobiboro:
https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_Sobibor_extermination_camp_personnel

Listo de al postvivantoj de la KC Sobiboro:
https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_survivors_of_Sobibor
https://www.sobiborinterviews.nl/en/the-revolt/survivors-of-the-revolt

Trawniki-anoj de Sobiboro:
Listo estas trovebla ĉe Blatt, Sobibor – der vergessene Aufstand, p. 65-68.

Trawniki-anoj de Treblinka:
http://www.deathcamps.org/treblinka/pic/trawnikilist.jpg

Konataj Trawniki-anoj:
Иван Демьянюк
Фёдор Федоренко
Ярослав Билянюк
Владас Зайончкаускас
Яков Палий

Transportoj de Nederlando al Sobiboro:
https://nl.wikipedia.org/wiki/Sobibórtransporten

„Operaco Reinhardt“:
https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion_Reinhardt
Sobibór-proceso:
https://de.wikipedia.org/wiki/Sobibor-Prozess

Demjanjuk-proceso:
https://www.youtube.com/watch?v=5T7cYiTPFdE
https://www.youtube.com/watch?v=Cki-_Ge41AQ
https://www.youtube.com/watch?v=z4xZv3FL2c4
https://www.youtube.com/watch?v=M1yF1-anZhI

Partizanoj de Parczew:
https://de.wikipedia.org/wiki/Parczew-Partisanen

La Ĝenerala Gubernio:
https://de.wikipedia.org/wiki/Generalgouvernement

Holokaŭsto:
https://de.wikipedia.org/wiki/Holocaust

Intervjuo kun Jules Schelvis (angl.):
https://www.sobiborinterviews.nl/en/nederlandse-overlevenden/jules-schelvis

Aliaj kontribuaĵoj de la A. Künzli pri similaj temoj en Esperanto:

Holokaŭsto en Pollando: Sufero, batalo kaj ekstermado de la bjalistokaj judoj. Rezista movado en la bjalistoka geto (1941-43). Raporto de Szymon Datner. pdf (21 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Datner_Bjalistoko.pdf

Kiam en la infero de Kovno fluis la sango. Holokaŭsto en Litovio 1941-44. pdf (123 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Litovio_holokausto1941-44.pdf

Aŭŝvico 2015, Putin, la judoj kaj la antisemitismo. pdf (11 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Ausvico2015_Putin_antisemitismo.pd

Kiel Lidia Zamenhof pereis en Treblinka. pdf (30 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Treblinka.pdf

Morala rimarko: Ĉi tiu studo ne estis verkita por fari komplezon al la (propagando de la) Esperanto-movado, kiu ĝenerale ne ŝatas prijudajn (aŭ prinaziajn) kaj similajn temojn. Ĝi estis verkita por legantoj, kiuj interesiĝas pri tiaj temoj, deziras kleriĝi pri la historio, kiu ne estu forgesota, kaj ĝenerale legi ion interesan.

© www.planlingvoj.ch, oktobro 2020. Krom slavistiko kaj orienteŭropa historio, la aŭtoro (nask. 1962) studis ankaŭ internacian juron ĉe la Zurika universitato, 1985-92. Antaŭ diversaj jaroj li vizitis la lokojn de la iamaj KC en Treblinka, Bełżec kaj Sobiboro, sed estis ankaŭ en Aŭŝvico, Dachau, Sachsenhausen, Buchenwald, Mauthausen, Theresienstadt, Salaspils, Klooga kaj San Sabba kaj daŭre studas la historion de la naziaj koncentrejoj kaj de la holokaŭsto.

Por kontroli ĝian kvaliton la teksto estos iam relegata.